Giacomino Martinez

Esperantismo en Friulo



Fervojista Postlaboro - Udine
Nova Espero Friuli
2019

MALLONGIĜOJ

adv.	Advokato
A.C.U.C.	Associazioni Culturali ed Umanitarie Associate - Kunaj Kulturaj kaj Homanaj Asocioj
A.E.L.I.	Associazione Editoriale Libraria Italiana - Itala Libra Eldona Asocio
ark.	Arkitekto
bibl.	Bibliotekist/ino
C.E.E.	Comunità Economica Europea - Ekonomia Eŭropa Komunumo
C.L.A.V.	Centro Linguistico e Audio Visivo - Lingvistika kaj Sonvida Centro
C.R.A.L.	Circolo Ricreativo Aziendale Lavoratori - Firma Laborista Distra Klubo
C.R.U.P.	Cassa di Risparmio di Udine e Pordenone - Ŝparkaso de Udino kaj Pordenono
Ĉefep.	Ĉefepiskopo
D.L.F.	Dopolavoro ferroviario - Fervojista Postlaboro
d.rino	Doktorino
d.ro	Doktoro
E.	Esperanto
ELF-AREK	Esperanto Ligo Filatelista - Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj
E.N.A.L.	Ente Nazionale Assistenza lavoratori - Nacia Laborista Asistada Instituto
G.E.A.	Gorizia Esperanto-Asocio
G.E.J.A.	Gorizia Esperantista Junulara Asocio
G.K.K.	Gorizia Kastora Klubo
Gen.	Generalo
geom.	Geometro
Hon.	Honorinda (deputito)
I.E.F.	Itala Esperanto-Federacio
I.E.J.	Itala Esperanto-Junularo
I.F.E.A.	Itala Fervojista Esperanto-Asocio
I.F.E.F.	Internacia Fervojista Esperanto-Federacio
I.E.I.	Itala Esperanto Instituto
I.J.F.	Internacia Junulara Festivalo
I.J.E.F.	Internacia Junulara Esperantista-Festivalo
I.K.S.	Internacia Kultura Servo
I.K.U.E.	Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista
I.L.E.I.	Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
inĝ.	Inĝeniero
I.P.A.	Internacia Polica Asocio
kard.	Kardinalo
kas.	Kasisto
kav.	Kavaliro
Kol.	Kolonelo
kom.	Komandoro
libr.	Librotenisto
L.K.	Lingva Komitato
L.K.K.	Loka Kongresa Komitato
mark.	Markizo
M.F.E.	Movimento Federalista Europeo - Eŭropa Federalisma Movado
mons.	Monsinjoro
nda	Aŭtornoto
N.E.F.	Nova Espero Friuli
n.ro	Numero
O.N.D.	Opera Nazionale Dopolavoro - Nacia Postlabora Institucio
P.I.V.	Plena Ilustrita Vortaro
pres.	Presejo
prez.	Prezidant/ino
prof.	Profesoro
prof.ino	Profesorino
S.A.T.	Sennacieca-Asocio Tutmonda
sen.	Senatano
sekr.	Sekretario
skab.	Skabeno
s.ino	Sinjorino
s.ro	Sinjoro
Tagl.	Tagliamento - Taljamento
T.E.A.	Triesta-Esperanto.Asocio
T.E.J.O.	Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

T.E.Ĵ.A.	Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio
T.E.K.	Trilanda Esperanto-Konferenco
U.E.A.	Universala Esperanto-Asocio
U.E.C.I.	Itala Katolika Unuiĝo Esperantista
U.K.	Universala Kongreso
U.P.U.	Unione Pacifista Universale - Universala Pacifista Unuiĝo
vic-prez.	Vic-prezidanto

ANTAŬPAROLO

Ĉi tiu verko celas rekonstrui la historion de Esperantismo en Friulo kaj memorigi tiujn, kiuj tre klopodis por la disvastigo de la Internacia Lingvo en nia regiono.

Kiel rezulto de ĉi tiu serĉado estas eble kapti, je iliaj esencaj trajtoj, profilojn kaj aktivecon de tiuj, kiuj estis aŭtoritataj protagonistoj en la loka Esperanto-mondo, kaj el ili indas memorigi tiujn, kiuj tre klopodis por la senlaca misio pri la instruado. Por ili estas nia danko, ĉar ili kontribuis enradikigi en Friulo la ĉeeston de *samideanoj*[1], kiuj, per kursoj kaj prelegoj, ĝis hodiaŭ daŭrigas "teni alta la torĉon" de Esperanto por disvastigi kaj transdoni la idealon de la Majstro al novaj generacioj.

La sciigoj kaj la dokumentoj cititaj oni ilin devas al gesamideanoj, kiuj tre volonte liveris ilian konon pri la okazaĵoj aŭ la materialon, kiun ili posedis. Kaj ankaŭ estis tre utilaj la malnovaj jarkolektoj de esperantaj revuoj, fonto de multaj kaj utilaj sciigoj.

Ĉi tiu laboro estas nur ŝtoneto enmeti en tiun riĉan mozaikon pri analogaj laboroj, kiuj, kune, kontribuas al la kompleta redakto de la historio pri Esperantismo en Italio.

Plie, estas mia devo danki: Jean Amouroux (Perpignan), Mario Blasoni (filo de Armando)[2], Aldo Chiaruttini, Andreina Della Savia (filino de Johano), Vito La Colla (filo de Nikolao[3] kaj nevo de Stefano, Palermo), prof. Karlo Minnaja (Padova), familio Paulet (Sankta Vito de Taljamento), Karlo Sarandrea (Roma), prof. Johano Strasiotto (Pravisdomini), Primo Trevisani, Danila Venuto (Mozaika Lernejo, Spilimbergo), Ernesto Zanchetta (Cimpello de Fiume Veneto), pro la gravaj sciigoj kaj la materialo metita je dispono por realigi ĉi tiun laboron.

Jakobeto Martinez

Noto 1 En Esperanto: sam-id-an-o = adepto de la sama ideo; termino uzata por indiki geesperantistojn.

Noto 2 Mario Blasoni (n. Udine, 26 junio 1935), ĵurnalisto. Li estis redaktoro ĉe "Messaggero Veneto" (Messaĝĝero Veneto) de 1959 ĝis 1994, ĉefkronikisto dum 25 jaroj. En liaj artikoloj li registris ĉiujn friulajn okazaĵojn dum 35 jaroj. Premio Friûl Aquila d'oro (Friula Ora Aglo) 1986 (agnosko al friulanoj originaj kaj adoptaj, kiuj per ilia entreprenita, aŭ arta, aŭ kultura, aŭ socia aktiveco donis prestiĝon al Friulo en la mondo).

Noto 3 Ĵurnalisto, frato de la fama esperantisto Stefano La Colla, kaj fondinto de la Palermo-a Grupo "Sicilia Esperanto-Klubo" al li titolita.
(Pri la biografio de fratoj La Colla vidu: *Esperantismo en Sicilio* de Giacomino Martinez).

Antaŭ ol ekzameni okazaĵojn kaj personojn pri Esperantismo en Sicilio, estas necese skizi la originojn de la lingvo, kiu, naskita en la menso de Zamenhof knabo, estis de li eltrovita kiam li estis plenkreskulo, kiel ilo por superi la lingvajn barojn.
Ludovik Lejzer Zamenhof naskiĝis en Bialystok, nuntempe Pollando, regiono de la malnova pola respubliko, kiun la rusa imperio aneksis al si. En ĉi tiu regiono ĉeestis diversaj popoloj: Poloj, Rusoj, Germanoj, Hebreoj. Al la lingva diverseco respondis profunda malsameco de kutimoj, religioj, moroj, pensmanieroj.



D.ro Lejzer Ludovik Zamenhof
Bialystok, 15-XII-1859 - Varsovio, 14-IV-1917

La ideo pri komuna lingvo, kiel vehiklo de kono, de kompreno kaj de toleremo, naskita ekde la plej frua infanaĝo antaŭ la hororoj de masakroj, neniam lasis lin.
Dum la unuaj jaroj de gimnazio, ĉerpinte materialon el diversaj lingvoj, kiujn li scipovis, kaj el multaj vortaroj de la patro, Zamenhof eklaboris pri nova lingvo, kiun oni povis facile lerni, iu ajn estu la gepatra lingvo.

Ekde la komenco antaŭ liaj okuloj aperis riĉa gramatiko kaj granda vortaro kaj tio lin turmentis senĉese ĝis kiam li vidis la skribaĵon svejcar**skaja** (drinkejo) kaj konditor**skaja** (kukejo). Tiu **-skaja** ekinteresis lin ĉar la sufikso donis la eblecon fari, el unu vortradiko, aliajn vortojn, kiujn ne estas necese lerni aparte.
Ekde tiam li ekpristudis la sistemon pri afiksoj kaj la granda vortaro malpliiĝis tre multe. Tiel, dum jaroj kaj jaroj de kompara studado, serĉado, provoj, tradukoj, sendormaj noktoj, en 1878 ekestis la nova lingvo[4].

Ĝis tiam la patro, Markus, profesoro pri lingvoj, ne malaprobis lian verkon ĉar la knabo sukcesis en ĉiuj ekzamenoj. Post la gimnazio oni devis decidi pri la profesio kaj tiu de kuracisto estis tiam unu el tiuj permesitaj al hebreoj en la rusa imperio. Sed ofte amikoj kaj kolegoj de Markus Zamenhof lin admonis pri lia filo. “Unu fiksa ideo en la kapo de la knabo certe minacas frenezon. Estus domaĝe lasi tiun talenton por konstrui ĥimerkastelon. Baldaŭ li malsaniĝos, se li daŭrigas ankoraŭ!”. Pro tio Ludovik promesis forlasi sian projekton, almenaŭ provizore.

Kiam Ludovik revenis el Moskvo, kie li studis medicinon, al la patrino li rakontis la promeson farita al la patro kaj, el ŝi, li sciiĝis ke la patro bruligis liajn kajerojn. Sed Ludovik memoris parkere ĉion kaj denove li refaris sian verkon.

Sur la kajeroj de aŭgusto 1881 reaperis preskaŭ la sama lingvo kiel en 1878. Dum ses jaroj Zamenhof laboradis ĉiutage perfektigante kaj plibonigante sian lingvon.

De longe Zamenhof serĉis eldoniston sed neniu volis riski monon. Tamen estis necese eldonigi lian lingvon ĉar, dum lia silenkto, ekfloris Volapük de la germana abato Johann Martin Schleyer (Oberland, 18 Julio 1831 - Konstanz, 16 Aŭgusto 1912)[5]. Pri ĉi tiu lingvo Zamenhof sciis nenion kaj post kiam li sciiĝis pri ĝi, li konstatis ke la solvo ne estis celkonforma. Estis necese montri al la mondo ke la celo estas valida kaj estas malbona nur la sistemo.

Noto 4 “…oni gardis la legendon pri la juna kuracisto, kiu konsumis ĉiusemajne tri funtojn de vaksaj kandeloj, laborinte nokte por eltrovi la internacian lingvon”. (Roman Dobrzyński, *Strato Zamenhof, eltrovinto de Esperanto*, paĝo 121a, Eldonejo Giuntina (Ĝuntina), Florenco, 2009. Origina titolo: *La Zamenhof-strato*).

Noto 5 La aŭtoro ne akceptis konsilojn por plibonigi la lingvon, fakte Zamenhof diris: “Bastono plantita teren ne fruktas”. Post la eldono de la Esperanto-gramatiko, volapükistoj pasis al la lingvo de d.ro Esperanto.

Fine, la 14an de Julio 1887 aperis la unua eldono, en la rusa lingvo. Ĝi titoliĝis: *Международный язык. Предисловие и полный учебник* - Doktoro Esperanto. Internacia Lingvo. Antaŭparolo kaj Plena Lernolibro. La verko enhavis gramatikon pri 16 reguloj kaj dulingvan vortareton pri 900 vortradikoj.

Per deklaro en la dua paĝo, la aŭtoro rezignis ĉiujn rajtojn, ĉar "internacia lingvo, kiel iu alia lingvo, estas socia propraĵo". Laŭ la ĝenerala uzado, la lingvo de doktoro Esperanto baldaŭ nomiĝis simple *Esperanto*.


Дръ ЭСПЕРАНТО.

МЕЖДУНАРОДНЫЙ ЯЗЫКЪ.

ПРЕДИСЛОВІЕ и ПОЛНЫЙ УЧЕБНИКЪ.

[por Ruso.]

Цѣна 75 копѣекъ.

ВАРШАВА.

Типо-Литографія Х. Кельтеръ, ул. Новолипье № 11.

1887.

La unua Esperanto-gramatiko

1900, jaro de la Universala Ekspozicio en Parizo, oni povas konsideri la komencon de Esperantismo. Esperanto ekdisvastiĝis en la tuta Francio[6] kaj en multaj eŭropaj Landoj. En Italio oni ekparolis pri efektiva Nacia Esperantismo post la kongreso en Florenco de 1910 (21 - 23 marto).

La Universala Ekspozicio en Parizo (1900)

En Friulo la plej grava eminentulo pri Esperantismo certe estis Aĥilo Tellini, naskita en Udine la 25an de februaro 1866 en strato Cancani n.ro 5, de Johanbaptisto (Palmanova, 13 novembro 1823 - 9 julio 1910) aŭ Gio. Batta, kiel skribita sur la tombo en la Udin'ea Tombejo "Sankta Vito" kaj de Viktoria Pasini-Vianello (23 decembro 1837 - 22 majo 1892).

Nel 1883 Aĥilo Tellini diplomiĝas ĉe la Reĝa Liceo de Udino kaj la 24an de oktobro 1884, enskribiĝite ĉe la fakultato pri matematikaj, fizikaj kaj naturaj Sciencoj ĉe la Universitato de Torino, krom la devigaj studobjektoj, li elektas vizitadi ankaŭ kelkajn liberajn kaj nedevigajn kursojn ĉe la instruista Seminario aligita al la Fakultato. El tiuj, krom kompara Anatomio, Zoologio kaj Botaniko, ĝi inkludas lecionojn pri ornama desegno gviditaj dum tiu universitata jaro 1884 - 1885 de grafo Karlo Ceppi[7].

Noto 6 En Bulonjo-ĉe-Maro okazis la 1a Universala Kongreso (7 - 12 aŭgusto 1905), al kiu partoprenis 688 geesperantistoj el 20 landoj.

Noto 7 **Karlo Ceppi** (Torino, 11 oktobro 1829 - tie, 9 novembro 1921), inĝeniero kaj arkitekto. Aktiva en la Torino-a zono, komence li interesiĝis pri sakra konstruaĵo. El liaj urbaj kunstruaĵoj la stacidomo Porta Nuova (Pordo Nova) (1863 - 1866).

Tellini iĝos tre bona desegnisto kaj pritrakti teknikajn kapablojn pri la desegno estis ekde ĉiam tre grava por naturistoj. Interesaj estas liaj desegnaĵoj de la *Carte geografiche del Friuli Occidentale ed Orientale* (Geografiaj mapoj de la Okcidenta kaj Orienta Friulo) (skalo de unu por 100.000) kie, tre detale - kaj rigore friullingve – li notis por ĉiu urbo, la ĉeeston de servoj por la popoloj: de la pastro, ĝis la apotekisto, ĝis la akuŝistino kaj ĝis la sanitaraj servoj, ĝis la lernejo, ĝis la kazerno, ĝis la poŝtoficejo, ĝis la juĝaj oficoj.

Aĥilo Tellini

La naskiĝa domo de Aĥilo Tellini

En 1888, apenaŭ dudekdujara, magistriĝinte per la plej alta noto pri naturaj Sciencoj ĉe la Universitato de Torino, li iris tuj poste Romon laborinte ĉe la katedro pri Geologio en la universitato kiel asistento de lia majstro, prof. Aleksandro Portis[8].

En Romo Tellini laboradis pri la specifa fako de lia doktoreco, eldoninte serion de gravaj sciencaj verkoj, pri paleogeografio, glaciologio kaj roma geologio, atinginte enviindan pozicion en la fako pri naturaj Sciencoj, tiel la Komunumo de Romo volis rekoni oficiale liajn studemajn meritojn atribuante al li la oran medalon pro publika merito. Lia *Carta geologica dei dintorni di Roma - regione alla destra del Tevere* (Geologia mapo pri ĉirkaŭaĵoj de Romo - regiono dekstre de Tibero) estis eldonita en 1893 (Romo, Loescher 1893).

En la ĉefurbo li havis la okazon koni la familion De Dominicis kaj en 1890 li edzinigis la junan filinon Ida, tiam deksesjara, ĝuste naskita en Roma la 30an de septembro 1873. El la geedziĝo naskiĝis 7 gefiloj: Iza, Leda, Adria, Bruno, Sparta, Nievo kaj Sergio.

En 1891, kune kun prof. Mario Cermenati[9] de la Romo-a Instituto, li fondis la “Rassegna delle Scienze Geologiche in Italia” (Revuon pri la Geologiaj Sciencoj en Italio), avangarda revuo premiita en la 1a Itala Geografia Kongreso de Genova en 1892, sed forlasita post tri jaroj, pro la trafitaj oponadoj.

Noto 8 Aleksandro Portis (Torino, 17 januaro 1853 - tie, 21 decembro 1931), scienculo kaj ankaŭ verkisto, eseisto, fakulo pri Geologio kaj pri Paleontologio. Docento ĉe la Universitato de Roma de 1888, li estis eminenta fakulo kaj li plenumis multajn paleontologiajn esplorojn precipe pri vertebruloj de la liguria kaj piemonta Terziaro. Plie, li okupiĝis pri geologio de

la tereno de Romo kaj ĉirkaŭaĵoj (*Contribuzioni alla storia fisica del bacino di Roma - Kontribuadoj al la fisika historio de la baseno de Romo*).

Noto 9 Mario Cermenati (Lecco, 1868 - Castel Gandolfo, 8 oktobro 1924), fakulo kaj politikisto, okupis la Katedron pri Geologio kaj Paleontologio en Roma kaj ankaŭ tiun pri Historio de naturaj Sciencoj. Li okupis rolojn de Vic-ministro en kelkaj ministerioj dum la regado Boselli kaj Orlando (1917). Dum la ofico ĉe la Ministerio pri Agrikultoro, en 1920, li estis la fondinto pri la kreo de la Nacia Parko "Grand' Paradizo". En 1927 al li oni dediĉis placon kaj bronzan monumenton, rekviziita en 1943 ĉar necesis pafilegojn, kaj anstataŭita per la nuna el marmoro skulptita de Francesco Modena. Ĝi estas en la omonima placo, iam nomita de la greno, rigardanta al la lago.

Paŭlo Boselli (Savona, 8 junio 1838 - Roma, 10 marto 1932), Estro de la Ministerio pri Nacia Unio de junio 1916 ĝis oktobro 1917, li estis devigita demisii post Caporetto.

Viktorio Emanuelo Orlando (Palermo, 18 majo 1860 - Roma, 1 decembro 1952), Ĉefministro post Caporetto (de la 30a de oktobro 1917 ĝis la 23a de junio 1919).

La graveco de liaj studadoj kaj la klareco de liaj verkoj destinis prof.on Tellini al la universitata kariero, sed li, en 1894, preferis Friulon reiri, lia "Malgranda Patrujo", por okupi la katedron pri naturaj Sciencoj ĉe la "Reĝa Teknika Istituto" de Udine (la nuna "A. Zanon")[10] kaj sin dediĉi per plena engaĝiĝo al la preferataj sciencaj studoj pri Friulo, precipe pri hidrologio. Ĉi tie li anstataŭas prof.-on Torkvato Taramelli[11] pri la geologiaj kaj mineralogiaj studoj, kiuj poste estis eldonitaj en la *Analoj* de la Instituto.

En la komenco de la kariero

En 1897 li fondis la "Circolo Speleologico ed Idrologico Friulano (Friula Speleologia kaj Hidrologia Klubo"-n), la unua en Italio[12].

Noto 10 La "Reĝa Teknika Istituto" de Udine estis fondita la 12an de septembro 1866 per reĝa dekreto, kiun Kvintino Sella, Komisaro de la Itala Reĝo por la Udine-a Provinco, subskribigis en Florenco al princo Eŭgeno de Savoia, ĝenerala vicestro de Viktorio Emanuelo II. La titolo al Antono Zanon okazis en 1883. Pri la sidejo, la Komunumo disponigis la konstruaĵon lokita en placo Garibaldi (jam placo Antonine aŭ de Barnabanoj), kie Pastroj Barnabanoj jam dum la Deksepa jarcento konstruis iliajn lernejojn. En 1955 la Instituto forlasas la sidejon en placo Garibaldi por transloĝiĝi al la nuna placo Cavedalis (Studcentro). (Por pli profunda kono de la Istituto "A. Zanon" vidu: Piero Fortuna, *Scuola Zanon* (Lernejo Zanon), Casamassima Eldonisto sas (simple komandita società), 1990).

Antono Zanon (Udine, 18 junio 1696 - Venezia, 4 decembro 1770, kie li transloĝiĝis en 1738), agronomo, industriisto, ekonomikisto. Per komerca kaj industria aktiveco, li proponis la pliboniĝon de la moruskultivado kaj de la silkindustrio startigante la unuan ŝpinejon en la urbo, kiel oni povas legi sur la memortabulo en strato Zanon n.ro 25: "En ĉi tiu loko Antono Zanon kreinto de la silkindustrio en Friulo starigis sian ŝpinejon en 1761". En 1762 li fondis en Udino la "Società di agricoltura pratica" (Societon pri praktika agrikulturo). Li enigis la terpoman kultivadon. Li lasis multe da eseoj pri agrara ekonomio.

Noto 11 Torkvato Taramelli (Bergamo, 15 oktobro 1845 - Pavio, 31 marto 1922), instruisto, geologo, geografo, eseisto. Li estis la unua Prezidanto de la "Società Alpina Friulana (Friula Alpa Societo) en 1874. Li estas aŭtoro de multaj eseoj pri la friula geologio kaj hidrografio.

Noto 12 En 1965 prof. Mikelo Gortani verkis: "Por la progreso de la naturai studoj en Friulo estis granda sorto ke en la lastaj jaroj de la Deknaŭa jarcento prof. Aĥilo Tellini, diligenta enketanto kaj verviganto, estis nomumita por gvidi en la glora Teknika Instituto de Udino la Katedron pri Sciencoj (…). Estis Tellini, dum liaj multformaj enketoj en diversaj lokoj de la provinco, la aŭtoro de tiuj speleologiaj Migradoj en Friulo, kiuj, kune kun la studoj de Olinto Marinelli en la ĉirkaŭaĵoj de Tarcento, estis la unua skipo science valida pri speleologiaj kaj hidrologiaj esploroj en nia regiono. Kaj estis ankoraŭ Tellini, ke, utiliginte sagace la revigliĝon por la naturaj studoj, kiu manifestiĝis dum tiu periodo inter niaj junuloj, havis la meriton

subteni kaj plenumi ekde 1897 la fondon de la “Friula Speleologia kaj Hidrologia Klubo”, la unua el ĉiuj italaj speleologiaj grupoj!”.
La grupo grotoj de la “Società Alpina delle Giulie” (Triesta Alpa Societo de Julaj) de Trieste, fakte, aktivis en la aŭstri-hungaria imperio, eĉ se fondita en 1883. (Mallonga historio de la Friula Speleologia kaj Hidrologia Klubo).

Mikele Gortani (Lugo, 16 januaro 1883 - Tolmezzo, 24 januaro 1966), geologo, naturisto. Li doktoriĝis en 1904 pri naturaj Sciencoj kaj instruis Geologion ĉe sep universitatoj. Li estis la plej grava itala fakulo pri la Carnia Paleozoiko; je lia honoro familio de fosiloj havas la nomon “Gortanella” (Fosilia speco de la aŭstra permio malkovrita en 1966). Li estis Prezidanto de la Friula Filologia Societo de 1945 ĝis 1948.

Olinto Marinelli (Udino, 11 februaro 1874 - Florenco, 14 junio 1926), geografo, kundirektoro de la “Rivista Geografica Italiana” (Itala Geografa Revuo); Prezidanto de la “Società Alpina Friulana” (Friula Alpa Societo) de 1901 ĝis la forpaso. Li skribis: “Se la vorto “regiono” estas tre vaga, tiu de “regionismo” oni devus elpeli el la vortaroj pro kialoj de lingva pureco, el la sentimento de italoj pro kialoj de patriotismo”.

En 1904, pro familiaj problemoj, li estis devigita lasi la instruadon[13] kaj je la fino de 1908 li transloĝiĝis al Bolonjo, kie ekloĝis en strato Mura D’Azeglio n.ro 600, poste en strato Vallescura n.ro 11, en la kvartalo Saragozza (1909), kaj en strato de’ Gombruti n.ro 7 antaŭe (1916) kaj n.ro 5/2a poste (1920) - nun strato Alfredo Testoni[14], kie li malfermis filatelan kaj numismatikan vendejon en strato Zamboni n.ro 44, antaŭ la universitato kaj librovendejon titolita al Piero Zorutti. Li konfidis la tutan lian riĉan sciencan bibliotekon al la Respubliko Sankta Marino[15], kaj al Muzeo pri Natura Historio de Triesto li donacis memoraĵojn pri lia scienca vojaĝo en Eritreo, de Massaua ĝis Karen, de oktobro 1902 ĝis marto 1903. (Krom kolekti multenombran materialon - kolektoj de mamuloj, reptilioj, amfibioj, fiŝoj, moluskoj, insektoj kaj plantokolektoj - prof. Tellini povis fari diversajn biologiajn observojn ĉirkaŭ la birdoj de tiuj landoj enhavante sciencan intereson. Prof. Tellini ne prizorginte laciĝojn, malkonfortojn kaj rimarkindajn monan sinoferojn, volis kontribui al la kono pli ekzakta kaj pli profunda pri faŭno kaj flaŭro).

Korespondaĵo adresita al prof. Tellini en Bolonjo

Finiĝis tiele la unua periodo de la vivo de Aĥilo Tellini, tiu de naturista scienculo kaj komenciĝis la dua.

Noto 13 Kontraŭ la perfida administra ago Tellini, en 1904, apelaciis al Ministerio pri Instruado, sed neniam li havis respondon.

Noto 14 En Bolonjo estas mallonga strato ene la muroj lastaj, kiuj nun oficiale nomita “Muroj de Pordego D’Azeglio”. La pordego, kiu ekzistis centre la vojforko inter avenuoj Aldini kaj Panzacchi, strato Mamolo (direkte Suden, ekster la urbo) kaj strato D’Azeglio (direkte centren, ĝis placo Maggiore) ne plu ekzistas de 1903. Tiu vojforko, el kiu eliras ankaŭ la koncernata strato, nomiĝas oficiale placo de Pordego sankta Mamolo. Pri la stratnumero 600 eble ĝi ekzistis tiam, ĉar la strato estas tre mallonge (la adreso “Strato Muroj D’Azeglio n.ro 600” estas skribita ankaŭ en “Esperanta Abelo“ n.ro 14 de la 25a aŭgusto 1909, nda). Estas interese, ke tiu strato estu tre apuda al strato Vallescura.

Strato de’ Gombruti (nomo de antikva familio) estis pli longa kaj enhavis ankaŭ la vojpecon poste nomita Alfredo Testoni (komediverkisto, aŭtoro de *Kardinalo Lambertini* kaj multe da verkoj en Bolonj-a dialekto), sed tio jam en 1942. La vojpeco

de strato de' Gombruti estas tiu inter strato Barberia kaj strato Kvar Novembro; strato Testoni tiu inter strato Kvar Novembro kaj strato Ugo Bassi (Pri tiuj precizigoj mi dankas d.ron Romano Bolognesi).

En "Informa Bulteno" januaro - februaro 1972, de la Esperanto-Grupo de Bologna "Aĥilo Tellini" (strato de' Foscari n.ro 2), je la paĝo 12a estas eldonita la letero de s.ro Alfredo Zironi, kiu persone konis prof.on Tellini: "…Pri la familio de prof. Tellini mi pluhavas ankoraŭ tre belan ameman memoron, ili loĝis en strato Gombruti n.ro 5 (nun strato Testoni) en la palaco de markizino Beccadelli kie mi loĝis. Estis la jaroj ĉirkaŭe 1924, mi estis ankoraŭ knabo, mi ofte iris en la domon Tellini ludi kun mia amiko kaj samaĝa Sergio, filo pli malgranda de profesoro…"
Kaj en la n.ro 2/1999 de "Ce fastu?" (Kion vi faras?), je la paĝo 232a oni legas : "Aĥilo Tellini startigis, kun la gazeta admistrado en Bolonjo, strato de' Gombruti 5... gazeton titolata "La Patrje Ladine" (La Ladina Patrio). La unua numero estis eldonita en la monato de majo 1921, kiel supplemento al "L'Esperanto"...".
En strato Zamboni n.ro 44 situis ankaŭ la Librovendejo Zorutti.

Homo scivola pri ĉiuj kampoj de la kono (naturisto, geologo, folkloristo, eseisto)[16], li sin dediĉis al la studado pri la filologio kaj la literaturo ladina, pro l' amo por Friulo kaj pro nova pasio al lingvaj studadoj kaj precipe pri universala lingvo, Esperanto. Tiele radikala vivoŝanĝo igis lin originala persono, ĉar estas strange ke homo povu abrupte koncentri la tutajn siajn interesojn al la studado pri lingvo kiel Esperanto, al kiu aliuloj sin dediĉis marĝene. Tamen Achille Tellini faris pri tio sian ekzistomotivon.
Sendube prof. Aĥilo Tellini estis la unua esperantisto en Udino.
Li alproksimiĝis al Esperanto ekde 1901, en 1907 li ekeldonis verkojn diversajn en la nova internacia lingvo, aperitaj ĝis 1912 en la 24 numeroj de la serio "Esperanta Abelo"[17].
Kiel prof. Emile Bord de Diĵono, prof.Tellini kreis en 1907 la "Internacia Helpa Mono"-n, por faciligi la sendon de malgrandaj sumoj inter geesperantistoj. Li vendis markojn (formato 33 x 25)[18] je 2 spesdekoj (5 centimoj)[19], kiujn li poste reprenis je la sama valoro. Tiuj markoj estis eldonitaj je 8 koloroj (ora, viola, ruĝa, verda, griza, blua, flava kaj bruna), sed baldaŭ oni ĉesigis la eldonon ĉar ĝi estis konsiderita neleĝa ĉar monemisio estis rezervita nur por la Ŝtato. Tiuj markoj, poste, estis donitaj al la Universala Esperanto-Asocio, kiu surstampis literojn "U.E.A."[20], kaj uzitaj kiel glumarkoj.

Glumarkoj "Internacia Helpa Mono"

Noto 15 Temas pri milo da libroj alvenitaj al la Ŝtata Biblioteko la 27an de julio 1913. "La unika oficiala dokumento, kiun ni posedas estas eltiraĵo el la Protokolo de la Ŝtata Kongreso (Institucia Organo de nia Respubliko) de la kunsido de la 3an de Julio 1913, kie oni konstatas komunikon fare de prof. Borbiconi laŭ la volo de prof. Tellini donaci al la Registara Biblioteko "sia kolekto de n.ro 6000 sciencaj libroj". Bedaŭrinde nuntempe ni ne sukcesas trovi la tutan Legacon Tellini-on ĉar, siatempe, ĝi estis unuigita al aliaj donacoj, ne antaŭvidinte specifan katalogadon. Kiel ajn ne estas eldonaĵoj en Ladina Lingvo aŭ en Esperanto donacitaj de prof. A. Tellini.". (Letero n.ro B/7714 de la 13a de januaro 1997 de la Ŝtata Biblioteko de la RSM adresita al prof. Karlo Minnaja, Padovo).
En artikolo aperita en reto sub la titolo "Ŝtata Biblioteko kaj Libraj Havaĵoj de la Respubliko Sankta Marino", en la paragrafo "Kiel ekestas la Ŝtata Biblioteko" oni legas: "En la unua jardeko de '900 la numero de verkoj, kiujn havas la biblioteko pliiĝis tre multe, fakte aldoniĝis donacoj de familioj Broccoli de Napolo, Nardi de Bolonjo, de la Komunikema Biblioteko de Bolonjo kaj, tre interessa por fakuloj pri naturaj Sciencoj, la kolekto de eldonaĵoj de Aĥilo Tellini".

Noto 16 S.ino Andreina Della Savia rakontis al mi ke, kiam ŝi estis ankoraŭ infanino, la patro kunportis ŝin fari longajn promenadojn laŭ la Torento Cormor kun prof. Tellini, kaj ŝi miris vidante tiujn du plenkreskulojn preni ŝtonojn.

Noto 17 La serio de "Esperanta Abelo" estas je la paĝo 20, kiom ajn mi klopodis trovi.
La 2an de decembro 2005 la skribanto sendis fotokopiojn de la n.roj 9, 15, 16, 23 kaj 24, ekzistantaj en la N.E.F.-biblioteko, al la Grupo de Bologna, kiu estis sen iu ajn numero.

Noto 18 La glumarko havas la n.ron 9 (1907) en la Katalogo ELF-AREK.

Noto 19 Speso: internacia monunuo fikcia, proponita en 1907 de René de Saussure, kiu valoris 0,0025 francajn frankojn. Centimo: centono (de franko, de liro).
Spesilo: utiligita antaŭ la 1a Monda Milito de kelkaj britaj kaj svisaj bankoj, kaj precipe de la Esperantista Ĉekbanko.

René de Saussure (Ginevra, 17 marto 1868 - Berna, 2 decembro 1943), matematikisto, lingvisto kaj esperantisto. Li verkis gravajn laborojn pri Esperanto laŭ lingva skizo.

Noto 20 U.E.A.: fondita la 28an de aprilo 1908 fare de la svisa Hector Hodler. Ĝi kunigas naciajn asociojn el la tutaj landoj kaj geesperantistoj izolitaj en diversaj nacioj. Ĝi estas en konsulta rilato kun O.N.U. kaj rilatas ankaŭ kun UNESKO. Ĝi antaŭenpuŝas la disvastigon de la internacia lingvo kaj organizas la Universalan Kongreson. Ĝia organo estas"Esperanto" kaj ĝi eldonas ĉiujare la "Jarlibro"-n. Ĝia sidejo estas: 3015 BJ Roterdamo (NL), Nieuwe Binnenweg 176.

REGULARO DE INTERNACIA PAGILO AŬ HELPA MONO

1) La subskribinto ĵus eldonis artajn markojn kiuj valoras 2 spesdekojn (5 centimojn) po ĉiu.

2) Li disvendas tiujn markojn laŭ ilia valoro, sed al la mendo oni devas aldoni 10 spesdekojn por la sendo en letero (ĝis 100 markoj) aŭ 2 kiel presaĵo, kaj 12 aŭ 14 por la rekomendo.

3) Li resendas per poŝtmandato la valoron de la markoj revenintaj al li. Oni devas aldoni la prezon de la poŝtmandato (10 sd. po 10 sm.), aŭ de la rekomendita letero. La markoj estas reprenataj ankaŭ se difektitaj, stampitaj de la poŝto aŭ gluitaj sur papero aŭ kartono.

4) La gazetoj kaj la firmoj kiuj konstante anoncos, ke ili akceptas, kiel mono, la markojn de mi eldonitaj, ricevos la monon respondantan al la senditaj markoj kaj ili ne havos iajn poŝtelspezojn. Se eble, mi petas atendi ĝis kiam la sumo atingos 10 sm. antaŭ ol la ŝanĝon.

5) La personoj kiuj mendos almenaŭ 2 sm. da markoj, la gazetoj, la firmoj kaj la naciaj societoj kiuj akceptas la markvaloron, havas rajton voĉdoni por la elektado de provizora konsilantaro rilata al la praktika de la helpa mono. Samtempe oni decidos al kiu mi devos liveri la monon por ke la samideanoj havu konfidon. Oni aranĝos tenejojn de la markoj en ĉiu lando kaj oni eldonos markojn de alia valoro.

6) La mono korespondanta al la markoj ne resenditaj por la ŝanĝo en nacian monon aŭ en aliajn markojn, estos dediĉita al la eldono de esperantaĵoj.

Aĥilo Tellini, S. Rocco Udine, Italujo, 1an novembro 1907

En marto 1909 li organizis la Esperantan Ekspozicion en la kadro de la Monda Ekspozicio de Bolonjo. Sciigoj pri la ekspozicio aperis en *Esperanta Abelo* n.ro 9 de la 22a de majo 1909.

La 16an de aprilo 2009, ĉe la Eldonejo Marinelli (strato Riva del Reno n.ro 76, Bolonjo) oni inaŭguris la esperantistan Ekspozicion ĉe la Internacia Ekspozicio pri Arto, Laboro kaj Nutrado dum printempo 1909: "1909 - 2009 Jarcento de Esperanto en Bolonjo".

Internacia Ekspozicio de Bolonjo: propagandaĵoj

En la sama jaro li faris sian unuan propagandan prelegon por la Internacia Lingvo kaj kvidis sian unuan kurson de Esperanto ĉe la lernejoj sankta Dominico.

La 20an de aprilo 1912 li fondis la unuan Katedron de Esperanto en Italio[21], kiu de aprilo 1932 alprenis la nomon Itala Instituto de Esperanto[22] kies direkcio li estris ĝis 1922[23].

COLLEZIONE DELLA CATTEDRA ITALIANA DI ESPERANTO
E SOTTOCOMITATO LINGUISTICO NAZIONALE
KOLEKTO DE LA ITALA KATEDRO DE ESPERANTO
KAJ NACIA SUBLINGVAKOMITATO

CATTEDRA ITALIANA DI ESPERANTO

= STATUTO = REGOLAMENTI =
CORSI PER CORRISPONDENZA = DIPLOMI
= SERVIZIO TRADUZIONI = TESI PER I DIVERSI
GRADI DI ESAME

Lire 0·25 1913 Sm. 0·100

POŜTKARTO
UNIVERSALA POŜTA UNUIĜO
QUESTIONARIO
SULLA
Lingua Ausiliaria Internazionale
proposto dalla Cattedra Italiana di Esperanto
1. - Crede Ella utile una lingua Internazionale Ausiliaria?
2. - Ritiene che si debba ricorrere ad una lingua artificiale?
3. - In caso affermativo pensa che possa adottarsi l'Esperanto?
Si prega di rispondere al Questionario sulla presente cartolina, e di affidarla alla posta dopo averla affrancata.
Alla Direzione della
Cattedra Italiana di Esperanto
(Sede Centrale)
BOLOGNA
Vallescura 11

Statuto kaj poŝtkarto de la Itala Esperanto-Katedro

Li eltrovis la katedron, por disvastigi Esperanton, per malnova ŝtata institucio kiu validis en Italio: "Cattedra ambulante di agricoltura" (Vaganta Katedro pri Agrikulturo), kiu sendis siajn teknikistojn kaj fakulojn al diversaj urbetoj por prelegi kaj leciondoni al kamparanoj.

Dum unu el liaj paroladoj, prof. Elio Migliorini[24] diris ke "…Tellini estas direktoro, estas propagandisto, estas sekretario, estas skribanto de diplomoj, estas korespondanto", ĉion li faras kun misiista fervoro ĉar "fondita la Katedro por gvidi kursojn kaj disdoni diplomojn, Tellini komencas sian senĉesan vagabondadon dum 3 - 4 jaroj en diversajn urbojn de Norditalio… ĉiuj tagoj unu prelego por Esperanto".

Noto 21 *Itala Esperanto-Katedro, Statuto = Regularo = Koresponda kursoj = Diplomoj = Tradukaj Servo = Tezo pri la diversaj ekzamenaj gradoj* (Kolekto de la Itala Esperanto-Katedro kaj Nacia Lingva Subkomitato, La Tipografica, Sankta Vito de Taljamento, 1913).

Noto 22 Itala Esperanto instituto: kultura Institucio aŭtonoma kaj sen profita celo, kiu prizorgas kaj antaŭenigas la lernadon kaj la disvastigon de Esperanto en Italio, eldononte lernatestojn kaj atestojn pri instrukapableco al tiuj, kiuj sukcesas en ekzamenoj fiksita de la regularo. La italaj Katedroj estas lokaj sekcioj de la Instituto. La nuna sidejo estas en Torino, strato Quarello n.ro 40.
La ĝeneralan direkcion oni konfidis al Korado Grazzini, kiu estris ĝin dum 30 jarojn kiam, pro malsano, li demisiis kaj oni lin anstataŭigis per prof. Karlo Agostini, elektita kiel Ĝeneralan Direktoron dum la 33a Kongreso en Sankta Benedikto de Tronto, en 1962.

Korado Grazzini (Florenco, 8 decembro 1883 - tie, 21 septembro 1971), bankoficisto, esperantisto de 1907. Li estis Estro de la Itala Instituto de Esperanto (1925 - 1963).

Karlo Agostini (Mongidoro, Bolonjo, 1906 - Modena, 21 septembro 1996), instruisto pri itala kaj latina lingvo. Li alproksimiĝis al Esperanto okaze de la 24a Nacia Kongreso en Bolonjo (6 – 10 septembro 1952). Li estis Prezidanto de la Grupo de Bolonjo (1955 - 1957) kaj Ĝenerala Direktoro de la I.E.I..

Noto 23 Antaŭ ol fondi la Tellini-an Katedron, ekzistis jam "Itala Instituto de Esperanto" (jam "Liguria Esperanto-Instituto", fondita en 1910), fondita en Ĝenovo en 1911 dum la 2a Kongreso de la italaj esperantistoj (25 - 28 majo), poste translokita al Pavia ĉe d.ro Pier Karlo Monti, kiu, la 30an de januaro 1913 konsentis kunfondi la Instituton kun la Tellini-a Katedro. Per letero de la 19a de marto 1913 pastro Jakobo Bianchini petis al prof. Tellini la opinion pri la propono unuigi la I.E.I. kun la Katedro. En 1922 la Katedran direkcion oni forprenis al Tellini post 10 jarojn de senĉesa sindediĉo. Speciala komisiono, nomumita dum la 6a Kongreso de Trento en 1921 (16 - 17 aŭgusto) kaj konsistigita el Prezidanto de la I.E.F. adv. Atilio Vaona, Humberto Toschi (Dozzena Imolese, 10 junio 1897 - Bolonjo, 28 julio 1966), Bruno Migliorini kaj Renzo Benedetti, pristudis por la Katedro novan sistemon per kiu la ordinaran administradon oni translokis al "Direktoroj kaj Regionaj Prezidantoj", kunordigitaj per Centra Direktoro (kiel hodiaŭ la Itala Instituto de Esperanto havas sian Ĝeneralan Direktoron).

Poste tiu komisiono sendis leteron al prof. Tellini dirante: “Specialan dankon iru al la grandemerita ĉeffondinto Doktoro Tellini kiu, en sennombraj malfacilaĵoj, havis la konstantecon direkti la instituton ĝis la hodiaŭa konsisto”.

Atilio Vaona (Zevio, 20 septembro 1880 - Torino, 1969), advokato, esperantisto de 1911. Li estis unu el la fondintoj de la Grupo de Verono kaj unu el la plej aktivaj italaj esperantistoj el la unua postmilito. En la 6a kongreso de Trento (16 - 17 aŭgusto 1921) li estis nomumita I.E.F.-Prezidanto. Tre bona kaj konvinka parolanto, li klopodis propagandi, precipe en la turisma kampo. Transloĝiĝita al Torino, en 1966 - 1967 li estris la I.E.I.. Ankaŭ li estis Lingva Komitatano.

Noto 24 Elio Migliorini (Rovigo, 9 marto 1902 - Roma, 7 decembro 1988), titola profesoro pri Geografio, frato de Bruno. Li eklernis Esperanton dekdujara. Li klopodis por Esperanto per artikoloj, prelegoj kaj gvidinte kursojn. De 1922 U.E.A.-delegito en Romo kaj Membro de la I.E.I.. Verkisto, kun la frato Bruno, de *Esperanta legolibro*. En 1982 li eldonis *Pioniroj de Esperanto en Italio*.

Celadoj de la Katedro estis: elekto pri kapablaj instruistoj, organizado pri kursoj kaj ekzamenoj, kapilara propagando per lecionoj kaj prelegoj.

Dum la jardeko kiam li estris la Katedron, prof. Tellini klopodis pri la kreo de Regionaj Institutoj, metante je dispono de la geinstruistoj la tutan necesan materialon (propagandaj folioj, gramatikoj, vortaroj), li helpis la eldoniston Antonio Paolet de Sankta Vito de Taljamento, kiel li persista subtenanto de la esperantista ideo, pri la eldono de sia revuo, iĝita poste organo de la Itala Esperanto-Katedro.

La sekvanta monato de majo, kune kun aliaj pioniroj, li fondis la grupon de Bolonjo[25].

La grupo de Bolonjo en 1912 - prof. Tellini: lasta vico, 3a de dekstre

STATUTO

DE LA

„ EMILIA ESPERANTO ASOCIO “

SEDE CENTRALE

BOLOGNA

Approvato dall'Assemblea generale dei soci l'11 Febbraio 1912

BOLOGNA
Tip. GROSSI - Via Belle Arti, 14
1912

La interna paĝo de la statuto

En 1914 la Katedro sendis kelkajn siajn eldonaĵojn al Zamenhof, kiu respondis la 14an de majo 1914 por danki. La teksto poste estis eldonita en “L’Esperanto” n.ro 13 de la 10a de julio 1914: “Kara Sinjoro, kun plezuro mi ricevis la diversajn librojn, eldonitajn de la “Itala Katedro de Esperanto”. Volu akcepti mian koran dankon. Al la utila laborado de la Katedro mi deziras plej bonan sukceson. Via L.L. Zamenhof”.



CATTEDRA ITALIANA DI ESPERANTO
SEDE CENTRALE: BOLOGNA – Vallescura, 11

La danko de Zamenhof
(El la “Legaco Tellini”, Urba Biblioteko “V. Joppi”)



L'Esperanto

Periodico quindicinale di studio e propaganda
a cura della Cattedra Italiana di Esperanto
Lecionoj de klasikaj kaj vivantaj Lingvoj per Esperanto

Aprobo de D-ro L. L. Zamenhof al la “Itala Katedro de Esperanto”

Kara Sinjoro,

Kun plezuro mi ricevis la diversajn librojn, eldonitajn de la “Itala Katedro de Esperanto”. Volu akcepti mian koran dankon. Al la utila laborado de la Katedro mi deziras plej bonan sukceson.

Via
L. L. Zamenhof

La danko de Zamenhof

Noto 25 La Asocio havis sidejon en strato Asse n.ro 6 kaj ĝi nomiĝis “Emilia Esperanto-Asocio”, sed ĉe Tellini, en strato Vallescura n.ro 11, estis la Esperanto-Oficejo, la oficejo, kiu zorgis pri la eldonoj en Esperanto.

Statuto de la “Emilia Esperanto-Asocio”, Centra Sidejo Bolonjo, aprobita de la ĝenerala Kunveno la 11an de februaro 1912 (Pres. Grossi - strato Belle Arti, 14 - Bologna, 1912).

Post la dua Mondmilito, oni refondis la asocion en majo 1949 laŭ la nomo de Bolonja Esperanto-Grupo Aĥilo Tellini”, memore al la unua fondinto pere de adv. Rafaele Bagnuulo, inĝ. Otello Nanni (Bologna, 1892 - Milano, 1 julio 1965), prof. Humberto Toschi kaj de la fervojistoj Oktavo La Mura kaj Jozefo Zacconi (Bolonjo, 19 aprilo 1893 - tie, 16 marto 1964), Respublikkavaliro pro esperantaj meritoj.

En 1994 al la nomo oni aldonis “1912”, jaro de la fondo. La nuna adreso estas: Bolonja E.sta-Grupo “Aĥilo Tellini 1912”, strato Avesella n.ro 16, 40121 Bolonjo.
En 1914 estis eldonita speciala poŝtkarto por informpetoj pri personoj de regionoj en milito (50 poŝtkartoj kostis 1 frankon) kaj en 1915 la Katedro eldonis vortareton titolita *Malgranda interpretisto por personoj en milito*. De 1914 ĝis 1918 Tellini estas rilatpunkto pri serĉadoj, restarigi kontaktojn, sendi pakaĵojn, korespondaĵo kun militkaptitoj.

Tiele skribas d.ro Ghez la 2an de septembro 1914 : “Brava, tre bela la ideo pri la informservo; ĝi estos certe tre utila por multoj. Mi faris mian plejeblon por havi sciigojn pri Chierego kaj Simonis, sed ĉio estis vane ĉar ne estis permesita la korespondado kun Francio..”. Dum tiu periodo, fakte, Karlo Simonis kun la edzino kaj la filo kaj Francisko Chierego, partoprenantoj en la 10a U.K. de Parigi (2 - 9 aŭgusto 1914, ne okazis), estis arestitaj kaj enprizonigitaj de la franca polico ĉar urbanoj de malamika lando. Nur post du monatojn ili estas ellasataj dank’al Gen. Hippolite Sébert, fama esperantisto kaj gravulo en la franca armea medio.

Postkarto kaj glumarko “Informoj pri militkaptitoj”

En aŭgusto 1915 la Katedro elmetis por vendo en Bolonjo serion de glumarkoj desegnitaj de Bindo Migliorini. La serio enhavis 16 markojn po 5 koloroj diversaj: verda, blua, ruĝa, bruna kaj nigra[26] (la folio ne estas katalogita).

La serio de glumarkoj desegnita de Bindo Migliorini

Memoriga ksilografio de prof. Tellini

Surprenita la taskon kiel delegito de la U.E.A. en Bolonjo, li eldonis esperantan gramatikon kaj sintakson, kaj, ĉiam ĉe la eldonisto Paolet, li esperantigis ĉapitron el *Le confessioni di un ottuagenario* (Konfesoj de okdekjarulo) de Nievo - *La idilio ĉe la fonto de Venkieredo*, aperitaj en “Esperanta Abelo” n.ro 16 kaj n.ro 15, prelegante samtempe por ilustri la originon, la progresigon kaj la praktikajn aplikojn pri la nova lingvo.

Plie, li tradukis multajn popolajn kantojn kolektitaj en manuskripto kaj kompilis kelkajn *Metodaj vortaroj Itala-Esperanto-n*, eldonitaj en “Itala Esperanto Revuo”.



La kanzono '*Ho suno mia*

Noto 26 Per letero de la 8a de majo 1915 (titolita Papero de la Esperanto-Grupo "L.L. Zamenhof", S. Maurizio 2748, Venezia) Bruno Migliorini sciigas prof.on Tellini "…Samtempe kun la libroj, mi sendas la 8 desegnaĵojn, kiujn fine mia patro faris: vidu, ĉu ili plaĉas al vi…".

Unu el la metodaj vortaroj

En 1916 komenciĝis policrimedoj kontraŭ la aktiveco de esperantistoj. Multaj organizoj estis dissolvigitaj. La Movado suferas ĝeneralan retroiron kaj ĝi ŝajnas paralizita. Precipe Tellini, pro liaj ideoj estis daŭre kontrolita (plifoje li devis alfronti la suspektojn, la denuncojn, eĉ la anonimajn akuzojn, la policajn kontrolojn) kaj ankaŭ li estis suspektita praktiki aktivecon kontraŭitala. Lia loĝejo en strato Vallescura estis submetita al traserĉo kaj eĉ oni prezentis denuncon al la Milita Tribunalo.

Sur "La Patrie dal Friûl" n.ro 4, aprilo 2009, paĝo 10a, s.rino Lidia Testoni, pranepino de Tellini, skribas: "En 1916 li estis akuzita spioni favore al Aŭstrio pro letero, kiun li sendis al pastroj kaj al komunumaj sekretarioj en Friulo por peti informojn pri la nuna uzo de la friula lingvo kaj kunmeti "Lunari daj furlans" (Almanako-n de friuloj). Agis la prefekteco de Udino kaj de Bolonjo kaj Tellini estis enketita kaj denuncita al la Milita Tribunalo. Do, li estis tenita sub kontrolo kaj lia verkaro estis cenzurita, sed neniam li forlasos iun el siaj interesoj, el siaj pasioj, el siaj studoj".

Kaj en la n.ro XXII de decembro 2004 de "Gnovis pagjinis furlanis" (Novaj paĝoj friulaj) de la Unio Friulaj Verkistoj, en la artikolo de Donato Toffoli "La Almanako neniam eldonita. Achille Tellini dum la 1a mondmilito", oni legas: "... Polizistoj, kiuj estos unu tago en la domo de nia en Bolonjo, post kiam ili aŭ alia el ili jam vizitis du lian kunlaborantojn en Friulo: sacerdoto de Meduno kaj tipografo de Sankta Vito de Taljamento, ili serĉas la pruvojn pri kontrabanda kaj spionada aktiveco kun kaj pro malamikaj landoj, fortega suspektigo, kiu ne havos ian punan efikon: Tellini kaj la aliaj du ne havas konsekvencojn".
Temas pri "Almanako de friuloj por 1916" (Sankta Vito de Taljamento, Paolet, 1951) kaj la du gravuloj estas pastro Jakobo Bianchini kaj Antono Paolet.

Kontraŭe kio okazis en Milano, la tuta esperanta korespondado adresita al Bolonjo estis cenzurita. Pli foje libr. Jacinto Gambirasio de Ponte Sankta Petro skribis por elimini tiun malegalecon de traktado kaj ankaŭ por la eksterlanda korespondado. La 5an de januaro 1917 libr. Ganbirasio sciigis al prof. Tellini la alvenintan letero de Ministerio pri Poŝtoj kaj Telegrafoj, Ĝenerala Poŝta Direkcio (Registronumero Ĝenerala 4195/28): "Objekto: esperantlingva korespondado. Romo, la 31an de decembro 1916. Koncerne la raporton de via sinjora moŝto de la pasinta 21a de oktobro, pri la korespondado el kaj al eksterlando skribita esperante, oni havas la meriton komuniki, ke la Milita Aŭtoritato pri cenzuro, al kiu, por kompetento, estis sendita kopion de la sama raporto, informas ke dispoziciis ĉar la indikitaj korespondaĵoj, post kontrolo, estu pluenigitaj kiel eble plej rapide. La Ĝenerala Direktoro (Nelegebla subskribo).".

Oni ne povas ekskludi ke tiu malfacila situacio igis lin transloki lian loĝejon kaj la sidejo de la Itala Katedro en strato de' Gombruti n.ro 7a kaj, poste, lasi por ĉiam Bolonjo kaj reveni al sia naskiĝa lando, la "Malgranda patrujo".

En 1919 li aliĝis al la starigo de la Friula Filologia Societo[27] kaj de 1928 li ekeldonis liajn verkojn en la Filologia gazeto ("Ce fastu?" - Kion vi faras? kaj "Strolic" - Almanako). Per letero de la 27a de marto 1920 Prezidanto de la Friula Filologia Società sciigis Tellini-n, ke "li estis elektita esti parto de la komisiono de la F.F.S. pri bibliografio".

Noto 27 La Friula Filologia Societo "Graziadio Isaia Ascoli" estis fondita en Gorizia la 23an de novembro 1919. ("Ce fastu?", Revuo de la Friula Filologia Societo "G. I. Ascoli", n.ro 2/1999, speciala numero okaze de la 80a datreveno de la Filologia).

Graziadio Isaia Ascoli (Goricio, 16 julio 1829 - Milano, 21 januaro 1907), glotologo, docento pri lingvistiko en Milano, senatano de la Reĝolando. Li estis la kreinto de la itala glotologa scienco en Italio (en 1873 li fondis "L'Archivio glottologico italiano" (La Itala Glotologia Arkivo-n).

En majo 1921, en Bologna, li aldonis "La Patrje Ladine: riviste pa-l Friûl, Çarñe, Dolomitis da l'Adis e Canton Grisou" (La Ladina Patrujo: revuo por Friul-, Karn-, Dolomit- de Adiĝo kaj Grizon-lando), verkita esperante kaj friullingve, kie li ilustras lian sonĝon vidi agnoskita la friulan lingvon, uzita la ladinan flagon kaj restaŭrita la Aquileia-n Patriarkecon kiel modelo de sendependa Friulo[28]. Komence ĝi estis eldonita kiel suplemento al "L'Esperanto", periodaĵo de la Itala Esperanto-Katedro.

Sed tre grava estis la "Tesaur de lenge furlane" (Trezoro pri friula lingvo) (1919 - 1922), kie li kolektis ĉion, kion oni povis rilati al la lando, al kutimoj, al la lingvo kaj al la pensmaniero friulaj.
La bildo estas formita de aglo sur kvinpinta stelo; supre la bildo estas la skribaĵo friulingve: LA TESAUR DE LENGE FURLANE, preslitere, ripetita, flanke la bildo, esperante: TREZORO DE L' LINGVO FRIULA.



Krovilo de "Trezoro"

Sekvis en ordo "Il Stroligh Furlan" (La friula astrologo), "Sentimenti ed effetti nella poesia popolare dei Ladini Friulani" (Sentoj kaj efektoj en la popola poezio de Ladinoj Friulaj), "Archivi de leterature furlane antighe e moderne" (Arkivoj pri friulaj literaturoj antikvaj kaj modernaj) kaj "Zonte a li svilotis" (Aldono al vilotoj).



Kovriloj de la Tellini-aj eldonaĵoj

En 1922 prof. Aĥilo Tellini estis gasto pli ol unu monaton de Paolet. Dum tiu periodo, ĉiuj tagoj, li vizitis la friulajn urbojn por studi pli profunde la konon de la lingvo friula kaj li notis diferencojn de la sama lingvo de unu aŭ la alia urbeto (vidu, ekzemple, Esperanta Abelo n.ro 23: *Leksikona komparo inter lingvoj Friula kaj Provenca* kaj n.ro 24: *Leksikona komparo inter lingvoj Esperanta kaj Friula*, de 1912).

Per cirkulero de la 9a de aprilo 1925 oni komunikis al Tellini pri lia elekto en la Lingva Komitato per 86 voĉoj. Li estis ankaŭ korespondanto por Akademio pri la ladina lingvo[29].

Prof. Tellini estis unuafoje elektita en 1911 per 38 voĉoj el 66 voĉdonintoj (letero de la 19a de julio 1911 de la Esperantista Lingva Komitato, 51 Rue de Cliché, Paris, subskribita de Sekretario Gabriel Chavet) kaj lia elekto finiĝus en 1920, laŭ la Regularo oficialigita en 1912 (ĉiu ano estis elektita dum 9 jaroj sed oni povis lin reelekti). Pro la milito lia elekto estis ŝanĝita al 1925. Prof. Tellini estis reelektita en 1934 kaj lia elekto finiĝus en 1943, sed li forpasis en 1938 (Pri tiuj precizigoj mi dankas prof.on Karlo Minnaja).

Noto 28 Ladina Flago je strioj horizontalaj lazura, blanka kaj verda (koloroj, kiuj laŭ Tellini poezie simbolis la ladinan pejzaĝon) kaj blazono, tio estas la aglo sur lazura fono por indiki Friulon. La friula aglo fakte estas la antikva simbolo de Patriarkeco de Akvileio, kiun Tellini volis restaŭri "kun la celo naciisma, politika, historia, eklezia kaj folklora".



La sciigo pri la Lingva Komitato

En 1927 Aĥilo Tellini Udinon revenis, kie loĝis en Placo Viktorio Emanuelo, nun Placo Libertà, n.ro 9-a[30].

Gravuraĵo de 1771: dekstre, la domo de Aĥilo Tellini

Nuna vidaĵo de la sama konstruaĵo

Tre konata ĉe la plej gravaj Eŭropaj esperantaj rondoj, en 1935 li eldonis gramatikon kun esperanta vortaro kaj ekzercoj por ladinoj friulaj.

La gramatiko friullingve

Noto 29 Lingva Komitato: estis starigita okaze de la 1a UK (Bulonjo-ĉe-Maro, 7 – 12 aŭgusto 1905), kun Zamenhof kiel Prezidanto, "por konsiliĝi kun li pri ĉiuj demandoj rilataj al la lingvo". Estis elektitaj 102 membroj el 28 nacioj. En 1908 por

forigi la malutilon de la granda nombreco, oni starigis la Konstantan Superan Komisionon aŭ Akademio, kies nombro de membroj ne povas superi 18 (*Enciklopedio de Esperanto*, Hungara.E.-Asocio, Budapeŝto 1986, paĝoj 340a, 341a).
Celoj de la Akademio estas: konservi kaj protekti la lingvon Esperanto laŭ ĝia Fundamento (la 16 reguloj fiksitaj de Zamenhof, nda) kaj kontroli ĝian evoluon; esplori ĉiajn lingvajn demandojn, kiuj koncernas Esperanton; kritiki verkojn el lingva vidpunkto; defendi Esperanton kontraŭ ĉiaj konkurencoj." (*Jarlibro* 1989, U.E.A., paĝo 101a).
La Akademio havis korespondan anojn pri fakoj aŭ specifaj lingvoj, kiuj povis esti ankaŭ komitatanoj. Prof. Tellini, do, estis ano kaj de L.K. kaj koresponda komitatano pri la lingvo ladina (Precizigo de prof. Karlo Minnaja).

Je la paĝo 77a de *Che cos'è l'Esperanto* (Kio estas Esperanto*)* de Matteo Dompè (Buttolo - Korso Carbonara n.ro 2, Ĝenovo, 1934, XI) estas eldonita letero datita novembro 1933 de prof. Tellini, kiu subskribas "D.ro A. Tellini, koresponda Ano de la Esperantista-Akademio pri la lingvo ladina".

Sama surskribaĵo troviĝas je la paĝo VI de la *Kompleta vortato Esperanto-Itala* de Tellini, eldonita de Paolet en 1931: "A. Tellini, koresponda akademiano pri la lingvo ladina".

Noto 30 Antaŭe Placo San Zuan aŭ Contarene (Sankta Johano aŭ Kontarena) (la 23an de aprilo 1530, post kiam oni plivastigis la placon, ĝi estis titolita laŭ la nomo Contarena honore al venecia guberniestro Gerolamo Contarini). En la placo la teretaĝoj de la domoj normale estis uzita por oficejoj kaj butikoj diversaj. Post kiam mi petis informojn ĉe la apoteko Beltrame, en ĉi tiu adreso eble estis la studejo de Tellini ĉar la eniro de la loĝejo estis en placeto Belloni. (Por pli profunda kono pri la konstruaĵo kie loĝis prof. Tellini vidu: Jozefo Bergamini kaj Viktoria Masutti, *Casa Beltrame in Udine: storia di una farmacia* (Domo Beltrame en Udino: historio pri apoteko), Grafikaj Artoj Friulaj, 2004).
Kiam prof. Tellini forpasis en Udino, la 1an de oktobro 1938[31], post kormalsano, kiu lin afliktis de longe, granda parto de la materialo, kiun li kolektis, estis ankoraŭ neutiligita kaj pasis al la urba Biblioteko, kune kun la kolekto de liaj verkoj kaj lia riĉa dialekta biblioteko pri diversaj italaj Regionoj[32].

Nel pomeriggio di oggi è morto serenamente il

Prof. Dott.

Achille Tellini

Membro onorario dell'Ateneo di Brescia. Membro onorario dell'Accademia di Scienze Lettere ed Arti di Venezia. Cittadino onorario della Repubblica di San Marino.

La MOGLIE, i FIGLI, le COGNATE, le NUORE, i GENERI, i NIPOTI ne danno con profondo dolore il triste annuncio.

Si dispensa dalle visite e per espressa volontà dell'Estinto si prega di non inviare fiori.

Udine, 1 ottobre 1938-XVI.

La forpaso de prof. Aĥilo Tellini

La tutan materialon li konfidis antaŭe al la amikaj manoj de la direktoro, d.ro Johano Baptisto Corgnali[33].

Tiele skribis Anĝelo Zoratti (Korso Valentino n.ro 129 - Casale Monferrato) en "Informa bulteno" n.ro 8, 9, 10 (aŭgusto, septembro, oktobro 1958) de I.F.E.A.:
"Kiam la Itala Registaro (dum Musolini-a diktatoreco) malpermesis propagandi nian lingvon kaj la Grupoj estis devigitaj fermi ties sidejojn kaj kaŝi la esperantan materialon, D.ro Tellini diris al mi: "Post multaj jaroj de senlaca laboro, inter korpremoj, malfacilaĵoj, humiliĝoj kaj kelkaj ĝojoj, ploras al mi la koro ne povante plu daŭrigi la disvastigon de nia kara lingvo; mi ne volas ke mia privata biblioteko estu detruita, ĉar mi arde esperas ke nia movado denove rekomencos antaŭeniri kaj jam mi testamentis, tial ke la tuta materialo fariĝu propraĵo de la Udine'a Komunuma Biblioteko.".

En la artikolo "Forpasis Aĥilo Tellini" , aperita sur "Popolo del Friuli" (Friula popolo) de la 2a de oktobro 1938, la kronikisto skribis: "…batalema spirito, genia inteligento, vasta kulturo, originalecaj ideoj, rara modesteco, bonanimeco, distingis tiun civitanon, kiu forpasas testamentinte al fakuloj grandan havaĵon de verkoj".

Sur la memorŝtono, kiu estas en la biblioteka enirhalo "V. Joppi" kaj dediĉita al "Merituloj" oni legas ankaŭ "Prof. D.ro Achille Tellini 1938".

IL MUNICIPIO DI UDINE
DECRETO CHE I NOMI DEI DONATORI PIÙ BENEMERITI DEL PATRIO MUSEO E BIBLIOTECA FOSSERO DEI SCULPITI A DURABILE MEMORIA ED ESEMPIO 1928

A PERENNE RICORDO DEI BENEMERITI DONATORI

La memorŝtono enmasonita en la enirhalo de la Urba Biblioteko de Udino

Noto 31 La 31an de marto 1937 tiele skribas prof. Tellini al lia amiko prof. Elio Migliorini: "…mi estas en la dormoĉambro kun la malpermeso eliri ĝis kiam oni ne havos belan veteron… sed mi petas nur forpasi sen tro suferi; mi estos fidela al Esperanto, ankaŭ tiea".

Noto 32 En 1983 parto de la legaco de prof. Tellini, kiu konsistas en ĉirkaŭ 250 libroj kaj gazetoj estis reordigita kaj katalogita de N.E.F.-anoj. La grupa estraro ekkontaktis la bibliotekon la 16an de junio 1981 kaj dum sekva interparolo kun la estrino, okazita la 19an de februaro 1983, ili havis la rajtigon nur po 2 anoj por reordigi materialon, kiu ankoraŭ estas en la subtegmenton.

Noto 33 Per letero Registro n.ro 14 de la 2a de majo 1986 d.rino Lelia Sereni, Estrino de la Urba Biblioteko "V. Joppi", responde al la peto farita de la grupo la 21an de aprilo 1986, sciigis al N.E.F. ke "…la privata biblioteko de Achille Tellini estis konfidita al d.ro Corgnali, Estro de ĉi tiu biblioteko, en julio 1930. Ne ekzistas ĉe ni notariaj aktoj pri legaco aŭ inventaraj protokoloj, kiuj tiam eble estis deponitaj en la Udine'a Komunumo, jura proprietulo de la tuta libra havaĵo de la Urba Biblioteko…".

Per letero de la 21a de aprilo 1933 Tellini rajtigis Johano-n Della Savia ĉeesti okaze de la lego de siaj lastaj vortoj, ĉar la dokumento (deponita en sekurkesto ĉe la Udine'a Ŝparkaso) koncernis ankaŭ Esperanton**.**

Poste, la 6an de majo 1934, prof. Tellini denove memorigis al Della Savia pri la ĉeesto okaze de la lego de sia testamento post sia entombigo kaj konigi al geesperanistoj la enhavon rilate al Esperanto, kaj kontroli ke la testamento mem estu plenumita precize je la litero kaj je la spirito fare de testamentaj kaj heredantaj ekzekuciistoj. Plie, ĉiam li devos nomumi samideanon, kiu daŭros en la laboro post sia forpaso aŭ kiam li estos neebliga plenumi ĝin. Tiuj dispozicioj estis transskribitaj, sub diktado, de Johano Della Savia dorse de la letero datita 21an de aprilo 1933.



UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
CENTRA OFICEJO : 12, Boulevard du Théâtre, GENÈVE (Svisslando)



La aŭtografa dispozicio de prof. Tellini kaj la transskribo de Della Savia

Per letero datita la 8an de majo 1961, adresita al Adelio Paulet, prof. Grazzini skribas tiele pri la amiko Tellini: "… la maljuna idealisto, kiu donis al Esperanto fidon, pasion, entuziasmo de pioniroj!".
Por pli profonda kono pri Tellini scienculo, oni transskribas la artikolon de Leo Pilosio eldonita en la bulteno de la Friula Filologia Asocio "Ce fastu?" XIV (1938), paĝoj 305 - 306: "Prof. Aĥilo Tellini. La 1an de oktobro forpasis en Udino AĤILO TELLINI; kun li malaperis fama personeco kaj amligita filo al Friulo. Ĝis la lastaj tagoj de lia vivo Aĥilo Tellini estis laborema. Lia laboro dum la lastaj jaroj estis celanta por ilustri Friulon kaj la dialektan literaturon, per metodoj kaj intencoj al kiuj ni ne povas akcepti. Sed lia pli bona "periodo" Li ĝin havis dum la juneco kaj la matureco kiam kun decida volo, dank'al lia vasta inteligento li elstaris junaĝe (li naskiĝis en Udino en 1866) en la kampo pri naturaj sciencoj. Fakte, en la vivo de Aĥilo Tellini ni distingas du periodojn netaj kaj precizaj: la unuan kiam Li aplikiĝis al la studado pri naturaj sciencoj kaj baldaŭ, pro liaj esploroj kaj studoj, atingis eminentan pozicion en la scienca kampo, kaj la duan, kiu enhavas la lastajn jarkvinojn de la vivo kiam li sin dediĉis - ĉiam kun fervoro kiel antaŭtempe - se ne per la samaj rezultoj, al la studo pri la filologio kaj la literaturo

ladina. Pri lia esplorista, eksperimentanta kaj studema laboremo pri sciencoj restas de Tellini vasta bibliografio (pri kiuj oni donas la ĉefaj verkoj rilate al Friulo), kiu demonstras, ke malgraŭ junulo la scienculo nia sukcesis per originalaj verkoj kaj pro tio, tre juna, li estis parto de la Reĝa Venetia Istituto pri Sciencoj kaj Literaturo kaj Artoj, honoro tiam kaj nun rezervita por tre malmultaj (eble tro malmultaj) friulaj fakuloj. Kiel fakulo pri naturaj sciencoj Li dediĉis parto ne eta de siaj serĉadoj al Friulo, kaj ilustris ĝin laŭ ĉiu rilato de lia vivo. De ĉi tiuj vastaj konoj pri nia provinco li utiligos poste por eldoni pezan, kaj ne tute sistema bildlaboro pri Friulo laŭ la titolo verdire ne tro klare: "*Prospettive nelle industrie turistiche del più grande Friuli*" (Perspektivoj en la turismaj industrioj el la plej granda Friulo*)*, en kiu kune kun multaj ideoj, proponoj kaj asertoj, kiuj oni ne povas ĉiam akcepti, se ne per severa ekzameno kritika, estas multaj sciigoj utilaj, akraj, kaj inteligentaj bedaŭrinde disperditaj en grandega raporto je milo da paĝoj.
La friula geologio kaj hidrologio estis tute specife pristuditaj de Aĥilo Tellini, sed Li, dank'al la helpo de historiaj studoj, tre bone ilustris la laboron de elstaraj Friulanoj, kiuj tre specife sin dediĉis al la studado pri sciencoj. Sed Tellini ne kontentiĝis studi nur Friulon; Li estis precipe fakulo en la plej larĝa senco el la vorto, kaj pri lia scienza verkaro ni memoras, pro la koincido kun la nuna renaskiĝo pri la koloniaj studoj, lian verkon - laŭ diro de fakuloj - pri la aviafaŭno en la Eritrea Kolonio eldonita antaŭ ĉirkaŭ tridek jaroj. En tiu kampo li laboris preskaŭ sen antaŭuloj, subtenita nur per certa kompetento kaj per viva pasio por tiu lando, kiu konstituis la unuan kaj tre pridiskutita kolonian sukceson de Italio. Ĉi tiu laboro farita surloke - dank'al lia financa sendependeco - estis tiam unu el la malmultaj verkoj pri la kolonia faŭno studita kun rigora metodo kaj vasta scienca preparo.
Post multe da sukcesoj atingitaj dum malmultaj sed tre brilaj jaroj de serĉadaj kaj dediĉoj pri la preferataj sciencaj studoj, Aĥilo Tellini subite interrompis ĉian sian studon, kaj forlasis por ĉiam kaj definitive la batalon en kiu li tre sukcesis. Sed la amo por la libroj kaj por la kono lin reprenis kiam Li ekiris al maljuneco. La studo pri lingvoj, utopio pri universala lingvo, kelkaj lingvaj kaj filologiaj teorioj, al kiu ne multoj sin sentis aliĝi okupis liajn lastajn studajn jarojn. Lia amo al Friulo havis dum tiu periodo novan celon dank'al lia studoj kaj pri la pura filologia kampo baldaŭ Li sin dediĉis al tiu historia-literatura: pri la ladina literaturo. Li eltrovis novan grafismon kaj ankaŭ skizis genezon de la lingvo ladina. El ĉi tiu lia aktiveco interesas al ni nur la studojn pri historio kaj scivolemo, kiujn Li kolektis en tri gazetoj presitaj kaj eldonitaj en limigita nombro da ekzempleroj. El la kolektoj: "Il tesaur de lenge furlane", "La patrie ladine" kaj "Archivi de letterature furlane antiche e moderne" ni trovas diversajn serĉadojn havantaj historian kaj historia-biografian karakteron tre interese. Krom la studoj en "Guardafogo" kaj en la eldono de "Strolich" de P. Zorutti, oni povas memori la kolektojn pri devizoj, proverboj kaj interesa vortaro pri la slango uzita de vagabondoj kaj almozuloj. La du kolektoj estis faritaj persone de A(chille). Jen mallonge skizita la laboremon de A. Tellini, kiu - krom la teorioj kaj la hipotezoj filologia-lingvistikaj de Li prilaboritaj kaj subtenitaj - en Lia verkaro ĉiam li demonstris grandan kaj profundan amon al Friulo, kiun Li ilustris per siaj sciencaj serĉadoj kaj kiun li amis per siaj studoj pri nia dialekta literaturo. Pil." Sekvas la liston de la eldonaĵoj pri Friulo zorge de J.B. Corgnali.

SERIO DE LA "ESPERANTA ABELO"-j

La serio de "Esperanta Abelo", komencigita en 1907 en Udino kaj daŭrigita en 1908 en Bolonjo kaj tie ĉesigita en 1912, antaŭe ĝi rilatis al rimarkoj pri popolaj kutimoj kaj tradicioj kolektitaj en Friulo, poste al studoj je scienca karaktero kaj fine al traduko de verkoj, kiujn Tellini numeris sinsekve, antaŭigante la numeron per "Esperanta Abelo n.ro ...".
Estas rimarkinde ke Tellini uzas formatojn diversajn kaj ke la enhavo de la kajeroj ampleksas diversajn branĉojn. Iuj estas skribitaj itale, aliaj esperante, aliaj ankoraŭ dulingve.



Esperanta Abelo n.ro 1

Alvoko por eldono de universala landkartaro aŭ atlaso. Doktoro Aĥilo Tellini, S. Roko, Udine (Italujo), la 21an julio 1907. Privata presejo, prezo 20 cent., 8 sd.
Dediĉita al la membroj de la 3a Universala Kongreso en Kembriĝo (12-17 aŭgusto 1907). La kajero enhavas ankaŭ serion de bildoj pri Udino - Klarigo de la vidaĵoj de UDINO (nordorienta Italujo).
Fotokopio alvenis al mi de Hispanio.



Esperanta Abelo n.ro 2

- Diversaĵoj - 1908
  Clarence Bicknell: Mia fidela amiko, La bufo, Gibraltar (angle) Hibraltaro, La hirundo kaj la rano, La anserino (tradukaĵo el Tennyson), La fiŝo, Funebra vesto, Sankta Lucia (populara Napola kanteto). Udino (Italujo), privata presejo Tellini 1907, prezo 8 sd. - 20 cent..
- Klarigo de la murbildoj por la instruado de fizika geografio kaj de geologio. D.ro Aĥilo Tellini, S. Roko, Udino (Italujo), 1907.

Ekzemplero trovita en la Udine'a Biblioteko.

Clarence Bicknell (Herne Hill, apud Londono, 27 oktobro 1842 - Casa Fontanalba Val Casterino, 17 julio 1918), filantropo, botanikisto, arkeologo, esperantisto. Deveninta el riĉa angla familio, magistriĝinta pri Matematiko en Kembriĝo, li postlasis spurojn pri sia aktiveco en multaj fakoj: botaniko, prahistorio, filantropiaj verkoj. En 1878 li transloĝiĝis al Italio, al Bordigera, kie muzeo havas ankoraŭ lian nomon (Muzeo Bicknell de la Internacia Instituto pri Liguriaj Studoj). Antaŭe volapükisto, de 1897 li iĝas esperantisto kaj en 1910 li fondas la grupon de Bordighera "Esperantista Grupo Antaŭen". En 1912 li aliĝis al la fondo de la Itala Esperanto-Katedro. Bicknell estis unu el pionieroj de Esperanto en italio kaj en tiu lingvo li verkis poeziaĵojn kaj teatraĵojn kaj esperantigis el famaj verkistoj. Per letero de la 30a de julio 1918 Luizo Pallini komunikis al prof. Tellini la kialon pri la forpaso de Clarence Bicknell: "gastro-intesto akuta" sekvita de "fulmrapida korparalizo". Li estas sepultita en la tombejo de Tenda.

Bildo

Esperanta Abelo n.ro 3

Ebla reeldono de la kajero *Vidaĵoj de Udino, kun klarigo*, jam aneksita al Alvoko por la Kongreso en Kembriĝo de 1907 (Esperanata Abelo n.ro 1).
Vidaĵoj de Udino kun klarigoj.



Esperanta Abelo n.ro 4

- *Monata nombro de l' tagoj de parta frosto en Italujo. Karto de la tagoj de parta frosto en Italujo.* Skalo de 1:5.000.000. Udino (Italujo), privata presejo A. Tellini, 1908 (1an de marto).
- *Friulo malaperanta.* A. Tellini. Udine 1an de januaro 1908.
  Krom la du kartoj, la kajero enhavas du ilustraĵojn kun 45 desegnoj de iloj kaj ilaro subskribitaj de D. Vaccaroni. La teksto komenciĝas per biografia noto: "Dum geologia ekskurso kun mia amiko Decio Vaccaroni sur la plataĵo de Forgaria…"
  En la lasta paĝo estas eldonita la regularo por la utiligo de la Internacia Helpa Mono (Aĥilo Tellini. S. Rocco Udino, Italujo, 1an novembro 1907).

Fotokopio alvenis al mi de Hispanio.

Bildo

Esperanta Abelo n.ro 5

La vintro en Italujo. Disdono de la tagoj de parta frosto sur la duoninsulo.
Sciigo alvenis al mi de U.E.A..

Bildo

Esperanta Abelo n.ro 6

Pluvkarto de l' Orientaj Alpoj kaj de la Venetaj provincoj (1an de julio 1908).
La titolo kaj la numero de la serio mi eltiris el la slipo ĉe la Udine'a Biblioteko. Sed en la ujo mankis la kajeron.

Bildo

Esperanta Abelo n.ro 7

Neĝkartoj de l' Orientaj Alpoj kaj de la Veneta kompartemento (Nord-Orienta Italujo)

Bildo
Esperanta Abelo n.ro 8

Ekslibriso de prof. Tellini

Ekslibriso n.ro 1. Ĝi estas alvoko al kolektantoj. Tellini dediĉas ĝin tute al lia pasio por la Ekslibrisoj kaj redaktas liston de italaj kolektantoj, dividita laŭ la urbo (Februaro 1909).

Sur la kovrilo Tellini metas, origine, la "glumarko"-n farita por la Internacia Ekspozicio en Bolonjo kaj aldonas lian Ekslibrison, kiun li presigis de Alfredo Baruffi.

Tellini prezentas Alfredo-n Baruffi: "Mi havas la honoron kunsendi mian Ex-Libris-on ĵus eldonita laŭ desegno de l' fama artisto, kav. Alfredo Baruffi, ilustrinto de la verkoj de l' poeto Johano Pascoli (Paskoli) sekvulo de Carducci (Karduĉi)".

La granda granatarbo kun la radikoj enfundigitaj en la mondo kaj la kvinpinta stelo esperanta, kiu elstaras super la densa plekto de branĉoj kaj de fruktoj apertaj montri la riĉecon de grajnoj. Je la bazo de branĉoj, sub la stelo, estas la inicialoj "A B"

La granatarbo, kaj eĉ pli la frukto de la granatarbo aperta, havas universalajn signifojn, propraj al multaj kultoroj kaj religioj: fekundeco, abundo, frateco, solidaro, karitato kaj amo.

En la Ekslibro de Tellini la maturaj fruktoj, kiuj montras la internon riĉa je granoj, rilatinte al Esperanto elvokas la union de kulturoj kaj de popoloj, la frateco kaj la solidaro. Pripensu, ekzemple, kiom da solidara aktiveco faris geesperantistoj dum la unua mondmilito, sed ankaŭ la riĉeco, en la senso de la evoluo je komercaj kaj je ŝanĝaj, ke unu lingvo kunpartigita povis stimuli.

Alfredo Baruffi, alivorte Barfredo de Bolonjo, Giustin el Budiara (Bolonjo, 13 decembro 1873 - 1948), gravuristo, ksilografisto kaj aŭtodidakta pentristo. Oficisto ĉe la Ŝparkaso en Bolonjo, li asimilas aŭtonoman artan kulturon, per novigaj proponoj de la eŭropaj revuoj kaj la vizitado de la arta medio de Palaco Bentivoglio, en Bolonjo, kie li

havas la atelieron de 1897. Dum la sama periodo li komencas ilustri foliojn kaj urbajn gazetojn, laborante ankaŭ por humuraj kaj poeziaj tekstoj. Dum la jaroj de la jarcentfino li komencas ankaŭ lian eldonon pri Ekslibrisoj. Signifaj pruvoj pri la klareco de lia grafika signo kaj pri la kapablo kiel enpaĝigisto estas liaj strekdesegnoj por la nova eldono de la Dia Komedio (1900 - 1902).

La lingua ausiliare internazionale Esperanto

Esperanta Abelo n.ro 9

La internacia helpa lingvo Esperanto. La ekspozicio en Bolonjo (22 majo 1909), prezo 5 cent.

La ekspozicio estis la okazo por proponi la verkojn ne nur de Zamenhof, eltrovinto de la internacia lingvo, sed ankaŭ de kelkaj pioniroj de Esperanto en italio. En ĉi tiu numero de *Esperanta Abelo* Tellini havigas liston de la ĉefaj esperantaj verkoj disponeblaj ĉe lia Esperanta-Oficejo. El la juĝantaro, kiu juĝos kaj premios la eksponantojn de la esperanta secio partoprenis ankaŭ Clarence Bicknell, Luizo Pollini, asistanto kaj kunlaboranto de Tellini kaj pastro Giacomo Bianchini.
Originala ekzemplero estas en la N.E.F.-biblioteko.

Bildo Bildo Bildo Bildo

Esperanta Abelo nr. 10 Esperanta Abelo nr. 11 Esperanta Abelo nr. 12 Esperanta Abelo nr. 13





Esperanta Abelo n.ro 14

Exlibris kaj Artaj Markoj, Bolonjo (Italujo), ĉe Aĥilo Tellini, la 25an aŭgusto 1909.
Unu paĝo estas dediĉita al la patro, ankaŭ li kolektanto de Ekslibrisoj: mallonga biografian skizon, kun rilato ankaŭ al la defendo de Venecio en 1848 - 1849, kaj al la fondo en Udino de gimnastejo kaj de skermejo.
La kajero enhavas ankaŭ liston de esperantaj eldonoj kaj la kaptitolo de la revuo “La Spritulo” eldonita en Lipsia de 1908 kaj estrita de Richard Bresch.
Fotokopio alvenis al mi de Belgio.



Esperanta Abelo nr. 15

El La memoraĵoj de okdekjarulo de Hipolito Nievo*, La idilio ĉe la fonto de Venchieredo (elp. Venkieredo). La kastelo de Fratta.* Tradukis A. Tellini. Bologna 1910 ĉe la Esperanta Oficejo, Vallescura 11, paĝoj 32, prezo sm. 0.25 - fr. 0.65.
Originala ekzemplero estas en la N.E.F.-biblioteko.

Hipolito Nievo (Padovo, 30 novembro 1831 - Maro Tirreno, 4 marto 1861), verkisto kaj patrioto. Volontulo garibaldano en 1859, li partoprenis en la ekspedicio de la Milo. Li forpasis okaze de la ŝippereo de ŝipo Ercole (Herkulo), ĉe Ischia, dum la kurso de Palermo al Napolo. Lia ĉefa verko estas la romano, parte aŭtobiografia, *Konfesoj de italo*, posteuma eldonita en 1867 laŭ la titolo *Konfesoj de okdekjarulo.*

Esperanta Abelo n.ro 16



La eldono de 1921

D.ro A. Tellini, *Corso di Lingua Internazionale Ausiliare Esperanto. Grammatica e Sintassi (*Kurso de Internacia Helpa Lingvo Esperanto. Gramatiko kaj Sintakso*)*. Bolonjo 1911, Esperanto-Oficejo, Vallescura 11, paĝoj 32, prezo lire 0.50 - sm. 0.200
En artikolo de s.ino Lidia Testoni estas skribita ke en 1913, kun la n.ro 25, eldonos per Esperanta Abelo represon laŭ la tipoj de Garagnani kaj Filoj en Bolonjo.
Alia eldono “tre pliigita” estis eldonita en 1921 de Paolet.
Originalaj ekzempleroj de la du eldonoj estas en la N.E.F.-biblioteko.

Bildo

Esperanta Abelo n.ro 17

Felikso Cavallotti, *Blankaj rozoj*.

Felikso Cavallotti (Milano, 6 oktobro 1842 - Romo, 6 marto 1898), advokato, poeto, dramverkisto kaj politikisto. Li estis konsiderita la nekontraŭata estro de la “Ekstrema maldekstro”en la parlamento. Li estis mortigita je duelo sekve de disputo kun la estro de la “Gazzetta di Venezia” (Gazeto de Venecio).

Bildo

Esperanta Abelo n.ro 18

Luqman al-hakim, *Fabloj de Lokman la saĝa*. El la itala tradukis A. Tellini. Bolonjo 1912, Esperanto-Oficejo, paĝoj 30.
Temas pri la traduko de la 31a Surao el Korano. Surao dirita de Luqman, la saĝa maljunulo, kiu rekomandas al la filo saĝecon, paciencon kaj modestecon.
Sciigo alvenita al mi de Karlo Sarandrea, sed la numero estas en Nederlando.





Esperanta Abelo n.ro 19

Johano Bovio, Kristo ĉe la festo de Purim. Unuakta dramo. Tradukis A. Tellini. Bolonjo 1912, Esperanto-Oficejo, paĝoj VIII + 41.

Ekcepte la bildo, la tuta verko estas mane skribita kaj havas la jaron 1911.
Ekzemplero trovita ĉe la Udine'a Biblioteko.

Johano Bovio (Trani, 6 februaro 1837 – Napolo, 15 aprilo 1903), filozofo kaj politikisto, deputito en la Parlamento de la Itala Reĝolando (1876). Patro de poeto Libero Bovio, aŭtoro de tekstoj de multaj famaj kanzonoj Napolo-aj.

Bildo

Esperanta Abelo n.ro 20

Kompararo laŭ itala lingvo. Tradukis A. Tellini. Bolonjo, Esperanto-Oficejo, 1911, paĝoj 16.
La vortoj aŭ frazoj de tiu ĉi broŝureto estas eltirataj el eldona ĉapitro de la verko de Jozefo Giusti (Ĝusti): *Toskanaj proverboj* (Florenco, 1853).
Sciigo alvenita al mi de Karlo Sarandrea, sed la numero estas en Nederlando.

Jozefo Giusti (Monsummano Terme, Pistoia, 12 majo 1809 - Florenco, 31 marto 1850), poeto, aparteninte al riĉa familio de bienposedantoj, travivita dum la releviĝa periodo.

Bildo

Esperanta Abelo n.ro 21

Edmondo De Amicis, *La urbo kiu dormas. La urbo de l' revoj.* El la itala A. Tellini. Bolonjo, Esperanto-Oficejo, 1912, paĝoj 44.
Sciigo alvenita al mi de Karlo Sarandrea, sed la numero estas en Nederlando.

Edmondo De Amicis (Onegla, Imperia, 21 oktobro 1846 - Bordigera, Imperia, 11 marto 1908) post kiam li studis en Kuneo kaj en Torino li eniris 16jara en la oficirlernejon en Modena, kie li iĝis oficiro. Demisiita de la armeo li iĝis la verkisto pli legita en Italio, sekve de la eksterordinara sukceso de la verko *Cuore* (*Koro)* (1866).

Bildo

Esperanta Abelo n.ro 22



Esperanto Abelo n.ro 23

A. Tellini, *Leksikona komparo inter lingvoj Friula kaj Provenca*, Bolonjo, Esperanto-Oficejo, 1912, paĝoj V + 72, prezo sm. 0.300 – fr. 0.75.

La paĝoj I-V enhavas la dediĉon al Alexander Wolf, arkeologo, lingvisto kaj historiisto. En Udino li sin okupis pri lingvistiko, arkeologio kaj toponimio, kolektante dokumentojn kaj apudante dum la serĉado Vincenzo Joppi kaj Jozefo Bragato por la urba biblioteko de Udino.

Mankas la finalo de la litero T kaj la ceteraj. Plie, mankas la antaŭparolo, la mallongigoj kaj la fino kiel skribita en la antaŭa paĝo la dediĉo.

Ekcepte la bildo, la tuta verko estas mane skribita.

Originala ekzemplero estas en la N.E.F.-biblioteko.

Alexander Wolf (Pforzheim, 1826 - Udino, 1904), arkeologo, lingvisto kaj historiisto. Post kiam li partoprenis en la ribeloj de 1848 en Germanio, li estis devigita rifuĝi en Svisio, Francio kaj, fine, en Usono kie li akiris la civitanecon en 1856. Li transloĝiĝis al Italio kaj restadis en Venecio, Ĝenovo, Plaĉenzo, Tortona kaj, do, Udino, kie li reatadis de 1866 ĝis la forpaso. En Udino li sin okupis pri arkeologio kaj toponimio, kolektante dokumentojn kaj apudante dum la serĉado Vincento Joppi kaj Jozefo Bragato por la urba biblioteko de Udino.

Vincento Joppi (Udino, 28 maggio 1824 - tie, 1 luglio 1900), magistriĝinta pri Medicino en Padovo, sed lia kuracista kariero ne estis eksterordinara. Post la anekso de Friulo al la Itala Reĝolando, ĉar estis konkiskitaj de la nova regado, kune kun la ekleziaj havaĵoj, la arkivojn de konventoj, de la religiaj institutoj kaj de frataroj, oni konfidis al li la taskon kontroli ilin. li reordigis pacience ĉion kaj en 1877, forlasita definitive la praktikado de medicino, li konkuris en la ofico de bibliotekisto, kiun li tenis poste ĝis du monatoj antaŭ la forpaso. (El: *Udine di une volte. Immagini della memoria (*La iama Udino. Bildoj pri memoraĵoj*)*, Eldonoj La Librejo de Demetra, 1998).

Jozefo Bragato (Venecio, 1815 - 1915), oficisto, erudito. Li laboris ĉe la urba biblioteko de Udino. Li eldonis interalie: *Guida artistica di Udine* (Arta gvido de Udino*)* (Udino, 1913) kaj *Da Gemona a Venzone* (De Gemona al Venzone) (Bergamo, 1913). Li kunlaboris por la *Guida delle Prealpi Giulie (*Gvido al Antaŭalpoj Juliaj*)* , 4a vol. de la Guida del Friuli (*Gvido al Friulo)*, eldonita en Udino en 1912.



Esperanta Abelo n.ro 24

A. Tellini, *Leksikona komparo inter lingvoj Esperanta kaj Friula*, Bolonjo, Esperanto-Oficejo, 1912, paĝoj 46, prezo sm. 0.300 - fr. 0.75.
La kajero estas fermita je la paĝo 46 kun la litero L de la geografiaj nomoj. Mankas la konkludoj je la paĝo 56.
En la kajero estas enmetitaj propraj, geografiaj kaj historiaj nomoj (de paĝo 39a ĝis paĝo 41a) kaj listo de geografiaj nomoj, kiu havas diversan formon en la itala lingvo (de paĝo 42a ĝis paĝo 46a). Ekcepte la bildo, la tuta kajero estas mane skribita.
Originala ekzemplero estas en la N.E.F.-biblioteko.

Post la n.ro 7 estus kvar kajeroj ne numeritaj, kiujn Tellini enmetas en la serion:

- Reeldono de geologia studo, kiu atribuigis al Tellini la oran medalon de la Romo-a Komunumo: *Geologia karto de la ĉirkaŭaĵoj de Romo - regiono dekstre de Tibero.*

- *Murbildoj por la instruado de fizika geografio kaj geologio, kun klarigo en lingvoj Esperanto, franca kaj itala*

- Nekrologo, Esperantlingve, por inĝ. Luizo Gortani, patro de geologo Mikele Gortani. Honore al ĉi lasta familio de fosiloj havas la nomon Gortanella.

  Luizo Gortani (Cedarchis, Arta Terme, Udino, 1850 – Tolmezzo, Udino, 1908), inĝeniero, botanikisto, verkisto. Li laboris en Italio kaj en Hispanio. Li estis projektisto de gravaj fervoraj laboroj kiel la ponto super rivero Tagliamento, kiu kunigas Tolmezzo kun Verzegnis kaj Cavazzo.

  Mikele Gortani (Lugo, Ravenna, 16 januaro 1883 – Tolmezzo, Udino, 24 januaro 1966), geologo, naturisto. Li doktoriĝis en 1904 pri naturaj Sciencoj kaj instruis Geologion ĉe sep universitatoj. Li estis la plej grava itala fakulo pri la Karni-a Paleozoiko; je lia honoro familio de fosiloj havas la nomon Gortanella (Fosilia speco de la aŭstra permio malkovrita en 1966). Li estis Prezidanto de la Friula Filologia Societo de 1945 ĝis 1948.

- *Kristanaj preĝoj por Blinduloj.* Ĝi estas esperante-brajlo kaj kiel eldonisto estas la filino Adria (Fraŭlino Adria Tellini eldonistino).

  En la lasta paĝo de la kajero estas rimarkigitaj du eldonoj por la ne vidantoj: la monata “Mentore dei ciechi” (Mentoro de blinduloj) (Societo Nikolao Tommaseo en Florenco, 1876) kaj “Esperanta Ligilo”, la revuo brajle, kiu Théophile Cart eldonis en 1904, estrita de Cart mem, poste de Harald Thilander kaj de Raymond Gonin, hodiaŭ oficiala periodaĵo de la L.I.B.E. (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj).

  Adria estas la patrina avino de s.ino Testoni.

  Kie ne specifita, la sciigo estis eltirata el artikolo de s.ino Lidia Testoni.

Poŝtkarto kun desegnaĵo de *Esperanta abelo*

La desegno sur la kovrilo de la Esperanta Abelo-j estis utiligita de Tellini ankaŭ sur la leterpapero kaj sur poŝtkartoj: unu spado kaj unu plumo interkruciĝas, la krucpunkto estas surmetiĝita de la kvinpinta stelo de Esperanto el kiu eliras kvin radiofaskoj. Malalte la desegno, inter klingo kaj kalamo, estas la skribaĵo “Pro la bonaĵoj kaj kontraŭ la malbonaĵoj”.
La spado revokas la patran pasion, tre granda kulturhomo, por la arto kaj la skermo. Gio. Batta. Tellini estis komercisto kaj terkultura proprietulo sed ankaŭ fakulo pri Danto kaj sperta pri la friulaj tradicio.

Unu el la gravuloj pri Esperantismo en Friulo estis pastro Jakobo Bianchini, naskita en Carbona la 12an de marto 1875[34], la unua el 12 gefiloj de Luizo kaj Anĝela Simonatto.



La juna pastro esperantista

La gepatroj de pastro Jakobo Bianchini:
Anĝela Simonatto kaj Luizo Bianchini

Dank’al parokestro de Pieve di Rosa, pastro Gabrielo Fioritto, kiu metis je dispono jaran sumon pro la malbonaj kondiĉoj de la familio de Luizo Bianchini, li vizitadis la unuajn tri gimnaziajn klasojn en Galleriano[35], ĉe emerita profesoro de la Udine’a Seminario, pastro Antono Della Vedova. Poste li iris al la Seminario de Udino kaj

Portogruaro, kie, en la preĝejo dediĉita al sankta Luizo Gonzaga, li estis ordinita sacerdoto la 2an de aŭgusto 1903, de Lia Moŝto Francesco Isola. Li estis la unua sacerdoto en la urbeto.
Esperantisto de januaro 1905, li sin dediĉis kun pasio al studadoj kaj disvastigo de la lingvo, prelegante kaj gvidante esperantajn kursojn por laboristoj kaj por elmigrantoj en Fontanafredda, en la salono de s.ro Saldan, Spilimbergo, Sankta Vito de Tagljamento, Pordenono, Aviano kaj en la teknikaj lernejoj en Sacile[36]. La 11an de februaro 1913, en ĉi tiu salono, prelegis Claudius Colas de Parizo[37], Lingvistika Komitatano kaj Ĝenerala Sekretario de la Internaciaj Katolikaj Esperantaj Kongresoj, alvenita al Fontanafredda por viziti sian amikon pastro Bianchini.
En la broŝureto *Pradis di Sotto 1885 - 1985* (Pradis de Malsupre 1885 – 1985*)* eldonita de la Organiza Komitato por la centiara datreveno de la paroko Sankta Koro, je la paĝo 39a oni legas: "Li estis genia fakulo kaj lerta versisto. Li havis komplekson esti malbela, kompense li havis moralajn kaj intelektajn kvalitojn, kiuj kompensis la fizikan difekton.

La fakulo

Noto 34 Pastro Jakobo Bianchini verkis, ke la loko estis nomita Villabianchina, ĉar fondita kaj loĝita precipe de Bianchini, siaj prapatroj ĉirkaŭe 1600. Ĉi tiu nomo estis en la antikva mapo kaj en la aŭstriaj topografiaj kartoj ĝis 1866, kaj precipe en la "Topografia karto de la Friulo-a Provinco", dediĉita al Lia Imperiestra Moŝto Arkiduko Ranieri, de la Lombard-Venetia Reĝolando, gardita en 1905 en la pastrodomo de Gruaro. Antikva anekdoto memorigas, ke en ĉi tiuj urbetoj, en la riverlito de Rivero Taljamento, la maljunaj bovinoj je malaltavalora, kiujn oni grasigas por ilin buĉi en familio, oni nomiĝas "carbone" (bovaĵo bona), kaj buĉi ilin oni diris "carbonare". Unu familio havis "carbonato", kaj knabino serĉe forprenis de la frato la porcion da "carbona"; la alia postkuris ŝin kriante: "Donu al mi mian carbona-n". Pasis personoj de Sankta Paŭlo, ili aŭdis tiun kvereleton, kaj subite ili nomis la urbeton laŭ la nomo "Carbona", nomo kiu restis kaj anstataŭis Villabianchina-n, pasante en la komuna uzo. En la letero de la 4an de februaron 1906, adresita al prof. Tellini, pastro Jakobo Bianchini skribas: "Villa Bianchini (dirita Carbona)" kaj la "Gazzettino di Venezia" (La Gazeto de Venecio) de la 2a de majo 1924, eldoninte la foton de la gepatroj de pastro Bianchini, okaze de la 50a datreveno de la geedziĝo (14an de februaro 1924), raportas Villa Bianchina (Sankta Vito de Taljamento).

Noto 35 Galleriano de Lestizza kaj Pieve di Rosa, urbetoj respektive je ĉirkaŭ 25 kaj 35 km-ojn de Udino.

Estis liaj karakterizaj dotoj sincereco kaj lojaleco. Li scipovis la hispanan, la germanan, la francan lingvon kaj li distingiĝis en la tuta Eŭropo pro la sonĝita internacia lingvo, Esperanto. Pri ĉi tiu lingvo li eldonigis la unuan gramatikon kaj tradukis multajn sakrajn verkojn en tiu lingvo. Li partoprenis en esperantaj kongresoj en Eŭropo kaj ekstere. Li kapablis kunigi la atenton por la bezonoj de elmigrantoj kun la studado. Li suferis multe da nekomprenadoj, pardoninte kun grandanimeco. Li encerbigis la amon al floroj kaj al la malgrandaj humilaĵoj, sed noblaj. Li antaŭenpuŝis la sindonemon al la Sankta Koro".
La 5an de aŭgusto 1905, en la friula ĵurnalo "Il Crociato" (La Kroĉato), li eldonis chian unuan artikolon pri Esperanto. Tiele finas sian artikolon pastro Bianchini: "Ne timu pro la malsukceso de Volapük nek pro tiu de la aliaj eltrovoj. Lasu la mortintojn trankvilaj kaj klopodu niajn zorgojn por la vivantoj". Lia nomo ofte aperis en la semajna dioceza revuo "La Concordia" (La Konkordo) pro prelegoj, kunvenoj kaj liaj verkoj en Esperanto. Li estas ankaŭ menciita en kelkaj verkoj ekzemple: *Enciklopedio de Esperanto* (Budapeŝto, 1933), *Esperanto en perspektivo* (Ivo Lapenna, Roterdamo, 1974), *Pionieri dell'Esperanto in Italia* (Pioniroj de Esperanto en Italio) (Elio Migliorini, Romo, 1982).

Städtische Straßenbahn, Dresden.

Dieser Fahrschein berechtigt* Jo Bianchini Teilnehmer an dem

4. Internationalen Esperantoweltkongreß

in der Zeit vom 15. bis 22. August 1908 zur unentgeltlichen Fahrt auf allen Linien der städtischen Straßenbahn (ausschließlich der staatlichen Linien Mickten — Kaitzhainbrücke, Plauen—Helfenberg und Cotta—Cossebaude, des Streckenteils Gasthof Räcknitz—Wölfnitz, sowie der Gemeindeverbandslinie Leubnitz—Plauen)

Die Direktion

№ 00968 * Bitte hier Namen einzusetzen! M. 1.05.

Pastro Jakobo Bianchini dum la 4a U.K. (Dresda, 1908)
Centre: Zamenhof kaj la edzino Klara Zilbernik

En aŭgusto 1908 li estis en Vieno por servi Sakramentojn al la italaj elmigrantoj obteninte de la Ĉefespiskopa Kurio de tiu urbo la rajtigon al la predikado.
En aprilo 1909, okaze de la Esperanta Ekspozicio en la kadro de la Internacia Ekspozicio en Bolonjo, oni donis al li la "Diplomon kiel Ano de la Esperanta Juĝantaro". En ĉi tiu okazo pastro Bianchini prezentis sian verkon premiita per bronza medalo[38].

Noto 36 Kun la elmigrintoj li plutenis senĉesajn kontaktojn kaj post kiam ili revenis al Patrujo pro la Granda Milito, li instruis al ili italan, latinan kaj francan lingvon. Plie, pastro Bianchini tre klopodis por serĉi militkaptitojn en la tutaj batalantaj landoj sciigante la Sanktan Sidejon, la Ruĝan Krucon en Ĝenevo, la Italan Ruĝan Krucon kaj familiojn. Li rolis ankaŭ kiel peranto por la korespondado inter privatuloj de la batalantaj landoj. Dum la aŭstria invado, pastro Bianchini zorgis pri vunditoj kaj suferis 68tagajn kaptitecon, aljuĝita de Kap. Von Randow, ĉar li rifuzis liveris sciigojn. Plie, li estis interpretisto de la bohema kuracisto Cèsky Brod, kiu okupiĝis pri la ĉambroj por vunditoj kaj malsanuloj kaj dank'al la bona rilato starigita li gardis militkaptitoj kaj la popolo de reprezalio.

Noto 37 Claude, François (Claudius) Colas (Saint-Huruge, 29 novembro 1884 - Batalo ĉe Marno, apud Sompuis, 11 septembro 1914), pioniro de la franca katolika Esperantismo. De 1908 ĝis 1911 li estis redaktoro de "Espero Katolika" kaj en 1910, kun Austin Richardson, li fondis I.K.U.E.-on. Li klopodis por la Internacia Katolika Esperantismo organizante ankaŭ diversajn kongresojn (Parizo, 1910; Romo, 1913; Lurdo, 1914).

En la novelo *Epizodo de milito. Kristnaska Novelo* de Claudius Colas (A. Paolet, Sankta Vito de T., 1915, paĝo 13a) tiele verkas pastro Bianchini: "Claudius Colas, mia tre kara amiko, heroe forpasis en Francia la nokton de la 10a-11a de septembro 1914, trafita de kunglo en la kapo. Li estis serĝento, kaj forpasis, plenuminte sian devon, ĉe la fronto de siaj soldatoj. Li lasis la edzinon kaj tri infanojn, la plej granda apenaŭ kvinjara. Colas estis unu el la plej kleraj kaj elokventaj francaj esperantistoj. Kiam esperantismo inter katolikoj estis preskaŭ ne plu aktiva, li revenigis ĝin al nova vivo, revivigante ilian gazeton "Espero Katolika". Li fondis la tre belan ilustritan gazeton "Esperantiste Catholique", kiu post malmultaj monatoj disvastigis al dudek landoj. Kiam li estis vokita al la milito, li estis en Lourdes, kie li organizis la 5an kongreson, kiu ne okazis. Li laboris por la *Tutmonda Jarlibro* kaj por la Officiala Gazeto; li skribis multe da artikoloj. Ĉi tiu novelo, titolata: *Epizodo de la estonta milito*, li ĝin verkis en 1911, kaj mi ĝin proponas al vi itallingve, ĉar mi opinias ĝin aktuala, kiel memoro de la klera kaj virta amiko, intentante samtempe prezenti al vi ekzemplon de honesta urbano kaj de brava soldato".

I.K.U.E. estas "laika organizo de la katolika Eklezio kun sidejo en Romo kaj arigas tiujn, kiuj ŝatas la internacian lingvon. Ĝi klopodas por apliki la kristanajn idealojn kaj disvastigi, pere de Esperanto, la evangelian mesaĝon laŭ la ordono de Jesuo Kristo: "Iru tra la tuta mondo kaj prediku la evangelion al ĉiu kreitaĝo" (Mar 16, 15)".

Noto 38 La Esperanta Abelo n.ro 9 de la 22a de majo 1909 ne precizigas kian verkon ĝi estas.

La diplomo pri "Juĝanto Esperantista"

Dum la sama jaro oni rifuzis al li la permeson partopreni en la 5a Universala Kongreso en Barcelono. Per letero n.ro 14 datita la 19an de aŭgusto 1909, Subsekretario de la Reĝa Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj skribas tiele:

“…Mi bedaŭras informi vin, ke, ĉar la Reĝa Registaro jam rifuzis inviton de la Hispana Ambasado partopreni en la Kongreso, ne estas eble, post tio, nomumi oficialajn reprezentantojn…”.
Tio okazis ankaŭ okaze de la 6a Universala Kongreso en Waŝington, ĉar “ …la Usona Registaro ĝis nun ne sendis invitilon al la Itala Registaro partopreni en la Kongreso mem …”, kiel skribis Ministro la 5an de junio 1910 per letero n.ro 51.
En novembro 1910, ĉe la Emilja Esperanto-Asocio, li faris prelegojn kaj esperantajn lecionojn kun la konsento de Ĉefepiskopo de tiu urbo, Jakobo Della Chiesa, estonta papo Benedikto XV[39]. Fine oni donis al li ateston: “Kronu dankmemora - supren resonu la aprobo - de la Emilja Esperantista Asocio - al pastro prof. Jakobo Bianchini alvenita al Bolonjo en novembro 1910 - por revivigi - per kredo kaj apostola konvinkiĝo - per sciplena majstro - la agemam kaj fidindan studon - de la nova lingvo - kiun d.ro Zamenhof - el la klasikaj kaj antikvaj kaj modernaj lingvoj - per genia flugilo li reordigis - dezirante - en la novaj pensmanieroj - kun gardo al la rajtoj de naciaj lingvoj - la revenon de la homa familio - al la originaj praaj - unu de vorto unu de menso unu de koro” [40].

Herida memory la reconoscenza - alto risuoni il plauso - dell' Associazione Esperantista Emiliana - al Sacerdote professore
Giacomo Bianchini
venuto in Bologna nel Novembre del 1910 - per ravvivare - con fervo e convincimento di apostolo - con sapiente abnegazione di maestro - lo studio alacre e fidente - del novello idioma - che - il dottore Zamenhof - dalle classiche e vetuste e moderne lingue - con ala di genio ricomponeva - ampiamente - nelle correnti nuove del pensiero - nella libertà dei nazionali linguaggi - il ritorno della umana famiglia - alle origini primigenie - una di verbo una di mente una di cuore.
D. F. B.

La atesto de la Emilja Esperantista-Asocio

En aŭgusto 1911 li partoprenis en la 2a Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj en Hago kaj en la 7a Universala Kongreso en Antverpeno[41].
En 1912 li aliĝis al la starigo de la Itala Esperanto-Katedro kaj li sukcesis emigi Antono-n Paolet de Sankta Vito de Taljamento sin dediĉi al Esperanto[42].

Noto 39 Pastro Bianchini memoras ke Ĉefespiskopo diris al li: “Instruu Esperanton tiel ke ankaŭ iu el miaj sacerdotoj iĝu instruisto pri ĉi tiu lingvo”.

Noto 40 Sube la atesto estas literoj D. F. B.. La skribanto sin adresis al la Bolonja Esperanto-Grupo petante kies inicialoj estu, sed oni ne sciis la respondon.

Noto 41 Ankaŭ ĉifoje la Itala Registaro ne konsentis, sed pro monomanko en la bilanco pri Kongresoj, kiel skribis la 31an de julio Vic-ministro de Ministerio pri Instruado. Pastro Bianchini iris tien je propraj elspezoj kaj li estis gasto ĉe s.ro Oskaro van Schoor. Per letero de la 1a de julio 1911 s.ro Oskaro van Schoor petis la ĉeeston de pastro Bianchini ne nur por revidi bonan amikon, sed ankaŭ ĉar “ni ne povus labori pli praktive kaj interkonsente pri verkaĵoj kaj la eldono de itala gramatiko por esperantistoj. Ĉi tiu laboro pri kiu ni jam priparolis en Dresdeno kaj en Parizo, ĝis nun haltis iom ekde kiam ni ne plu revidis…”.

Noto 42 Je la fino de la milito li tre suferis pro la demidetruo de liaj verkaĵoj, pro la rekvizicio de la presejo Paolet, kie li presigis siajn verkojn.

Cattedra Italiana di Esperanto
Fondata nel 1912
Diploma di Membro Effettivo
Il Signor Bianchini Sac. Giacomo
Insegnante del "Liceo Ginnasio"
è stato eletto Membro Effettivo, a sensi dell' articolo 7 del vigente statuto.
Per la Sede Centrale

La diplomo de la Itala Esperanto-Katedro

En lia parolado de la 8a de septembro 1952, okaze de la 24a Itala Kongreso en Bolonjo (6 – 10 septembro), prof. Korado Grazzini diris: “Al prof. pastro Bianchini, ne nur la Instituto (Itala Esperanto-Istituto, nda), sed ĉiuj italaj geesperantistoj estas ŝuldaj por havi “malkovrita” en lia Friulo fidelan kaj persistan samideanon, Antono Paolet, kiu silente kaj modeste ne hezitis surpreni kun kuraĝa fido la sinoferon de la eldonado de tiu revuo - “L’Esperanto” - kiu sub aŭspicioj de la Katedro vidis la lumon kaj ĝi estis konstanta kaj daŭra lumo de la Itala Esperantismo.”.
La antaŭajn jarojn la unua mondmilito la aŭstria polico kontraŭis la Triestan Esperantistan Rondon, ĉar ĝi timis, ke Esperanto estu anarkia ilo. Por pruvi la senfundamenteco de ĉi tiu timo, la 28an de aprilo 1912 patro Jakobo Bianchini faris en Triesto du prelegojn pri la internacia lingvo Esperanto. Dum siaj prelegoj, li diris ke Esperanto ne celas faligi naciajn lingvojn, evidentiginte la akcepton, kiun faris al Esperanto kaj civilaj, kaj religiaj, kaj armeaj aŭtoritatoj kaj ke diversaj regadoj sendis iliajn reprezentantojn al Esperanto-kongresoj. Ankaŭ Reĝo Viktorio (Emanuele III, nda) sin esprimis tre favore al la esperantista idealo, okaze de la aŭdienco donita al prof. Edmondo Privat de la Universitato de Parigi, unu el la plej eminentaj esperantistoj en la mondo.

Turismaj informadoj fare de Ministerio pri Gazetaro kaj Propagando – 1936

En aŭgusto de la sama jaro li partoprenis en la 3a Kongreso de Katolikaj Esperantistoj en Budapeŝto.

3 2 1
3a Katolika Esperanto-kongreso (Budapeŝto, 1912)
1. Pastro Bianchini, 2. Austin Richardson, 3. Claudius Colas

En 1913 pastro Bianchini, jam rekonita pioniro de la katolika Esperantismo, dum prelega rondvojaĝo tra urboj diversaj, estis ankaŭ en Milano (la 10an de marto, Esperantista Klubo) kaj en Pavio (la 11an de marto, Universitata Klubo “Sankta Severino Boezio“) kie ĉeestis respektive ĉefepiskopo kardinalo Andreo Ferrari kaj episkopo Francisko Ciceri[43]. Post la prelegoj, la prelatoj donacis al pastro Bianchini du aprobajn aŭtografojn por Esperanto, bondezirante la triumfon de la nova lingvo.
En lia aŭtografo Lia Eminenca Moŝto kardinalo Ferrari skribis: “Mi bondeziras tuj baldaŭa, prospera sukceso al disvastiĝo de Esperanto, tiel ke ĉi tiu lingvo estu gloro de la Katolika Religio kaj ĝi servu al la disvastigo de la sama”. Plie, kard. Ferrari, en junio 1913, per aŭtografa letero al pastro Bianchini, promesis preĝejon (estis tiu de Sankta Fedele) je dispono de katolikaj esperantistoj por celebri la Sanktan Meson kaj prediki esperante dum la Nacia Kongreso, kiu baldaŭ okazos en Milano.
La 2an de septembro 1913, en la kadro de la 4a Itala Esperanto-Kongreso (Milano, 31 aŭgusto - 2 septembro) en la ĉefepiskopeja salonego kunvenis multnombraj katolikoj kie pastro Bianchini, post kiam li esprimis la ĝojon, la dankemon, kaj la esperojn, kiuj kuraĝigas la katolikajn esperantistojn, prelegis pri: “Klerikaro, Esperanto kaj Elmigrado”.

IV° CONGRESSO INTERNAZIONALE
DEI CATTOLICI ESPERANTISTI IN ROMA
dal 4 al 10 Settembre 1913
TESSERA PERSONALE DI RICONOSCIMENTO
Il Presidente del Comitato
Firma del Titolare
Roma, 31 Ott. 1913

4a Katolika Esperanto-kongreso (Romo, 1913)
La rekonkarto de pastro Bianchini

La 9an de oktobro 1913, dum la Kongreso I.K.U.E., kiu okazis en Romo, pastro Jakobo Bianchini estis elektita Ĝenerala Sekretario kaj, antaŭvide al la antaŭfiksita Kongreso en Lurdo, li estis taskita pretigi la *Jarlibro*-n de la katolikaj esperantistoj el la tuta mondo, petonte informojn ankaŭ de amikoj el ĉiu lando tiel ke ĝi estu tre interesa ankaŭ por ne esperantistoj.
La 10an de decembro 1913 en Aviano, kun la helpo de pastro Antono Tubello, pastro Bianchini prelegis en la lernejoj de tiu urbeto pri Esperanto kaj ĝiaj progresoj.
Analoge Tellini, pastro Jakobo Bianchini tre klopodis por serĉi militkaptistojn kaj rolis kiel peranto pri la korespondaĵo inter privatuloj en ĉiuj militantaj landoj. Post kiam Italio eniris militon, li estis nomumita de la Komunumo de Meduno "korespondanto de la civilasistada komitato" pri la korespondaĵo eksterlande de familioj kun iliaj elmigrintoj kaj kun soldatoj pere de armeaj pastroj. Dank'al lia interesiĝo kaj pro liaj homaj dotoj Meduno-anoj kaj Novarons-anoj ne havis mistrakojn de germanoj.
En 1919, kune kun Aĥilo Tellini, li aliĝis al la starigo de la Friula Filologia Societo.
La 28an de januaro 1927 pastro Jakobo Bianchini, komisie de la Udine'a Esperantista-Grupo kaj de la Udine'a Popola Universitato, prelegis en la Aŭlo de la Reĝa Teknika Instituto pri: "Utileco kaj graveco de la Internacia Lingvo". La invito estis farita per letero de la 7a de decembro 1926 subskribita de Rafaelo Vannucchi, vicprezidanto de la Udine'a grupo.
De longe pastro Bianchini deziris ke oni efektivigis sian deziron, ke oni organizus en Udine la Nacian Esperanto-Kongreson. Kaj kiam oni informis lin, ke oni elektis Udine-n por organizi la 14an Kongreson, li tre ĝojis. Per letero de la 28a de januaro 1929 tiele pastro Bianchini skribis al la esperantistoj de Udine: "…Mi dankas pro la anonco kaj mi tre ĝojas eksciante pri la aktiveco kaj kostanteco de tiu Esperanta grupo, kaj ankaŭ mi ĝojas vidante realiĝi mia sonĝo antaŭ 24 jaroj havi en Udine la Esperantan Kongreson…".



La aŭtografa letero de pastro Bianchini

Noto 43 Andreo Karlo Ferrari (Lalatta de Palanzano, Parma, 13 aŭgusto 1850 - Milano, 2 februaro 1921), ĉefepiskopo de Milano de 1894 ĝis 1921, estis proklamita beato de papo Johano Paŭlo II en 1987.

Francisko Ciceri, episkopo en Pavio de la 15a de aprilo 1901 ĝis la 2a de junio 1924.

Okaze de la 25a kaj 50jardatreveno de lia unua Sankta Meso, celebrita en Carbona la 3an de aŭgusto 1903, en la preĝejo Sankta Antono de Padova, li sendis esperantajn versojn al amikoj[44].

MCMIII - III Aŭgusto - MCMXXVIII

… …

Plej pura feliĉo
Je Krista dediĉo,
Labori, suferi
En Krist' Eklezi',
La kronon esperi
Eternan ĉe Di'.
…

1903 - 3 aŭgusto - 1953
Kvindekjara Datreveno
de mia Unua Sankta Meso

Kvindek jaroj jam forpasis
Ĉe l'altaro de l' Sinjoro ;
Kiu vivon al mi lasis
En la ĝojo kaj dolor'.
Ho Jesuo, nun rigardu
Ĉi serviston en maljun';
Lin helpadu, lin Vi gardu,

XXVª JARREVENO
DE LA UNUA SANKTA MESO
MEMORAĴO
AL AMIKOJ KAJ SAMIDEANOJ

p. JAKOBO BIANCHINI
Cimpello ĉe Pordenone
(Fruli - Italujo)

Lin pardonu ne lin pun'.
Se per pekoj, mia Dio,
Estis mi iafoj' vundit',
La labor' por la Eklezio
Vi kalkulu je merit'.
Ho Vi Princo de l' paŝtistoj,
De la vivo ĉe la fin'
Min Vi metu ĉe l' servistoj
Por eterne laŭdi Vin.

-

Al amikoj kaj samideanoj
Sac. Jakobo Bianchini
CIMPELLO ĈE PORDENONE
Friuli Italujo

Tiele skribas d.ro Ghez la 6an de aŭgusto 1928: "Mi gratulas vin tutkore pro la datreveno de via unua Meso, kaj deziras al vi ĉiun feliĉon. Povu la bona Dio vin gardi kaj konservi vin por la tutmonda esperantistaro".
Li pasigis la tutan sian vivon en Friulo, kie dum kvindek jaroj li praktikis la sacerdotan ministerion en Visinale de Pordenono (Kapelano de la 18a de oktobro 1903 ĝis la 24a de aŭgusto 1904, spirita patro de la 25a de aŭgusto 1904 ĝis la 5a de novembro 1905), Sankta Kvirino de Pordenono (kapelano de la 6a de aprilo 1906 ĝis la 7a de aprilo 1907), Fontanafredda (kapelano de la 7a de septembro 1907 ĝis la 19a de novembro 1914), Meduno (kapelano de la 19a de novembro 1914 ĝis la 16a de februaro 1921), Navarons de Meduno (parokestro de la 7a de januaro 1915 ĝis la 16a de februaro 1921), Pradis di Sotto (spirita patro de la 16a de februaro 1921 ĝis la 3a de junio 1921, parokestro de la 3a de junio 1921 ĝis la 2a de aŭgusto 1927) kaj poste, la 2an de aŭgusto 1927, li transloĝiĝis al Cimpello de Pordenono kie li forpasis la 12an de januaro 1954[45].
Per letero de la 16an de januaro 1937 pastro Bianchini skribas: "Dio abunde min repagis pro la doloroj, kiujn mi suferis en Pradis, kaj mi fartas bone en ĉi tiu urbo.".



Urboj kie pastro Bianchini praktikis la pastran ministerion

Noto 44 En Carbona ne estis ankoraŭ sonoriloj kaj por la unua Meso sonoradis por li tiuj de Bando.

Noto 45 Antaŭ ol lia forpaso, pastro Bianchini aĉetis la tutan ornaton pri lia sepolto por ne pezigi sur iu la elspezojn, kaj fiksis la sepultejon. Li volis, plie, ke sur la tombo estu skribitaj la vortojn: "klera pia humila".
Okaze de la trideka tago post lia forpaso, oni skribis: "Tenere li edifis la fidelulojn per sia serena kompato, per sia humila kaj milda animo, per sia ĝusta katekismo, kun aparta amo, ĉerpita en la sanktaj libroj kaj lasis, al tiuj, kiuj lin konis, neforgeseblan memoron pri sia bona karaktero kaj grandan deziron sekvi la virtajn ekzemplojn.".

La tombo de pastro Bianchini

Granda predikisto, pastro Jakobo Bianchini estis parokestro metoda (ĉiam li faris ĉion je la sama horo), karisma (li havis kunnaskitan pervadkapablon) kaj humila (kiam li vizitadis familiojn por beni la domojn, li volis nenion sed ĉiam li diris "donu ĝin al misiistoj").
En la artikolo aperita sur "Il Piccolo" di Trieste (La Malgranda de Triesto) de la 24a de junio 1942 oni priskribas pastron Bianchini tiele: "Je malaltstatura, sed ne maldika; brunakolora haŭto, kiu distance ŝajnas bronze; trajtoj, kiuj trudas atenton por ne diri respekton; frunto vasta kaj duongrizaj haroj. Lia okulo ĉiam ŝajnas fiksa sur io, kiu rilatas literojn, vortojn kaj signifojn al li tre karaj, kiuj trovas fundamenton kaj klarigon samptempe en la vorto kaj en la nomo sankciita al historio, tio estas Esperanto".
Dum la periodo en Pradis, li intuiciis la gravecon de la grotoj kaj per poeziaĵo kvazaŭ li faris antaŭvidon, kiel li verkis "Je la beno de l' kredo".
La poeziaĵo "Le Grotte di Pradis" (La grotoj de Pradis*)* konsistas el 14 strofoj po 4 versoj.

Malsuprenante en abismojn - de profundaj grotoj
Ke akvoj dum jarmiloj - ilin boris tie ;
Estas vere konsterno - kiu konfuzas al mi l' koron
Belegajn anfraktojn - ĉie admiri.

Se mi rigardas ĉirkaŭaĵojn - ien en l' fundo
Ĉirkaŭas min egaj - hororaj ŝtonegoj ;
Se mi rigardas supren - sublimajn mi ekvidas
Eternajn ruiniĝojn - de mornega.

Ĉe l' piedoj estas akvoj - kiuj falas de l' monto
Kaj ili bruas - ke ŝajnas muĝi ;
Poste ili fluas klaraj - kiel silenta fonto,
poste mallonge sin kaŝas - por malaperi inter ŝtonoj.

Sed je mallongdistance - ili malkaŝas pli klaraj,
Denove la okulo - ilin vidos fali,
aŭdi ilin denove - de rokoj plaŭdi
per mortosaltoj - de ekstrema beleco.

Ili estas profundaj vorticoj - estas strangaj elstaraĵoj,
Estas saltoj, estas antroj - feina loĝejo,
kiuj pensigas - pri eternaj verdiktoj,
pri senfinaj luktoj - de eterna batalo.

Falanta mondo - kiu ŝvebas ĝi ŝajnas al mi
Kaj mirplena igas - ĉi tie nian penson;
Kiu en Romo ne vidis - la grandajn katakombojn
Venu ĉi tie unu horon - rigardi ilin.

Ili estas fendoj, kiuj ŝajnas - por doni al vi
ekzempleron,
Templomurojn - skuitaj tiam
Ke Kristo por l' homo - suferis multajn turmentojn
Kaj laŭ sono de tertremo - kruce li mortis.

Estas antroj - kiuj ŝajnas templetoj
De l' antikvaj idoloj - de l' pagana tempo:
Ili ŝajnas al vi ruinojn - de belaj sepultejoj
Kiuj enfermas restaĵojn - de l' kristanaj martiroj.

Malvarmega kaj morna - dum ĉiu sezono,
Eĉ unu sola fiŝo - povas vivi tie:
Se estus prenita - lecionon Dante ĉi tie
Infero havus - multe pli tercinoj.

Kiu kredo en l' kor' - gardas tre klara
Ĉi tie nepre pensas - kiu kreis;
La plejalta potenco - ekvidigas, lernigas
La dian arton - kiu ĉi tie oni presis.

Sed la hodiaŭa popolo - pri strangaj faroj
Ne havas intereson - ne vidas la kialon;
Sed la estonta popolo - de alia morgaŭo
Grandan profiton eltiros - je la beno de l' kredo.

Ĉar en la mondo - estas ĉio, kiu bezonas
Pro kelka plano - fiksita en la ĉiel';
La grotoj de Pradis - estas donacoj kaj rezervoj
En la estonteco - por fideluloj.

La homaj pensoj - estas blindaj, mallongaj
Kaj la estontaj tempoj - vane antaŭvidas ;
Sed Dio regas - destinon de l' mondo
Kaj grandajn sukcesojn - rezervas en sia mano.

Tiel en tiu rondo - enfermita inter tiuj montoj
Per radiotranĉo - kiu "KOSA" ĝin faras,
Paŝtista popolo - kiu tute malgravas,
grandiosa destino - eble li havos.

Tiele pastro Jakobo Bianchini, parokestro en Pradis di Sotto, en 1922 ekzaltas la belecon pri tiuj ejoj[46].
Unu el la grotoj (la verda groto, tiel nomata ĉar ilumigita per lumoj de la sama koloro) iĝis fascina kapelo kie oni celebras la noktomezan Kristnaskan Meson; la "hororkavo" titolita laŭ la nomo Bianchini, kiu unue ekzalti per versoj tieajn belecojn, estas superrigardata de granda krucifikso el bronzo, skulptaĵo de prof. Gatto de Treviso.



La krucifikso el bronzo

Detalo de la verda groto

Krom kvanto de verkoj aperitaj en diversaj revuoj, oni memoras: *Hebrea kalendaro* (1906), *Malgranda katolika katekismo* (1937), *Esperanta lernolibro por italoj* kaj *Cursus completus Esperanti* (1934), du kursoj. itallingve kaj latinlingve, intence verkitaj por esperantistoj inter 1914 kaj 1915, kaj ankaŭ *Teknika religia vortaro*, eldonita en "Espero Katolika", oficiala organo de I.K.U.E., al kiu dum longa tempo li estis aktiva kunlaboranto, meritinte la aprobon de papoj Benedikto XV, Jakobo Della Chiesa (Pegli, 21 novembro 1854 - Roma, 22 januaro 1922; Papo de la 3a septembro 1914 ĝis 1922) kaj Pio XI, Aĥilo Ratti (Desio, 31 majo 1857 - Roma, 10 februaro 1939; Papo de la 6a de februaro 1922 ĝis 1939)[47].



SAC. JACOBUS BIANCHINI

Cursus Completus Esperanti

Grammatica - Exercitia - Glossarium

Typographia A. Paolet
S. Vito al Tagliamento (Italia)
1934

Cursus Completus Esperanti

Omaggio dell'Autore
al carissimo Amico
Dott. Cav. Arturo Ghezzo
Trieste

La libro donacita de pastro Bianchini al d.ro Arturo Ghezzo

Kiam pastro Bianchini sendis la manuskripton pri sia unua gramatiko al Zamenhof por peti lian opinion, resendante la verkon Zamenhof, per letero de la 11a de junio 1909, diris ke la tuta plano de la libro estas iom tre malfacila por komencantoj, kiuj pensos, ke Esperanto estu tre malfacila lingvo. Samtempe li sugestas fari provon kun iu, kiu ne konas ankoraŭ la lingvon kaj volus ĝin lerni. Poste li elektos "ĉu la plano estas oportuna aŭ ne".

Noto 46 Dun la sesdekaj jaroj pastro Terziano Cataruzza, parokestro en Pradis di Sotto (tiele, kiel oni kutime konas urbeton Gerchia), kun la helpo de la loka Speleologia Grupo kaj multaj laboremaj parokanoj, transformis ĉi tiun lokon kaj nun ĝi grande mirigas: grotojn, anfraktojn kaj kalkaj gorĝoj formitaj per malrapida kaj konstanta erozio de Torento Cosa. La grotoj estis malfermitaj la 14an de aŭgusto 1965.

Noto 47 *Gramatiketo de friulana lingvo por esperantistoj* je 21 paĝoj, verkita en Fontanafredda en 1909 kaj ciklostilita per alkoholo, estas gardata en la urba Biblioteko "V. Joppi" de Udino (Diversaĵoj 1449). Simila gramatiko poste estis eldonita sur "L'Esperanto" de 1921 sub la titolo *Gramatiko de friula lingvo*. La unua finas per verko de Petro Zorut (Pietro Zorutti, nda) *La gnot dei Muars* (La nokto de l' mortintoj), kaj la dua per *L'ódule* (La alaŭdo).

Petro Zorutti (Lonzano, 27 decembro 1792 - Udino, 23 februaro 1867) funkciulo, dialekta poeto. Li estis admirita de Tommaseo kaj de Carducci.



Dr L. ZAMENHOF
VARSOVIO
Str. Dzika № 9.

Kara Sinjoro!



Dr L. ZAMENHOF
VARSOVIO
Str. Dzika N-o 9
11-VI-09

Kara Sinjoro!

Hodiaŭ mi resendas al Vi la manuskripton de Via lernolibro. Mi ĝin tralegis kaj per krajono mi notis en ĝi la neĝustajojn kiujn mi trovis.

Pri la tuta plano de la libro mi devus diri al Vi, ke ĝi ŝajnas al mi tom tro malfacila por komencantaj lernantoj. Ekzemple Vi uzis tie tre multe da proverboj, kiuj per sia stilo verŝajne estas nekompreneblaj por personoj, kiuj ne havas ankoraŭ sufiĉe da lerteco en la lingvo; aŭkaŭ la tro ofta uzado de sufiksoj kaj prefiksoj en la senco de apartaj vortoj estos eble tro arta por komencantoj, kaj ili pensos, ke Esperanto estas tre malfacila lingvo. Sed ĉar mi ne estas pedagogo kaj mi ne povus tute bone juĝi pri tia afero, tial mi konsilus al Vi, ke Vi faru provon kun la persono kiu ne konas ŝankoraŭ nian lingvon kaj volus ĝin lerni; tiom Vi tuj rimarkos, ĉu la plano, kiun Vi elektis, estas apertuna aŭ ne. En ĉia okazo mi deziras al Via libro plej bonan sukceson.

Mi petas Vin, ke Vi nenion diru pri tio ke mi legis kaj korektis Vian verkon, ĉar por eviti ĉian malpacon mi decidis antaŭ 4 jaroj ke mi al neniu libro donos mian publikan aprobon aŭ mian publike konatan helpon.

Via

ZAMENHOF

La letero de Zamenhof

La kialo de tiu sugesto estis ĉar pastro Bianchini uzis tre multe da proverboj kaj li uzis la afiksoj en la senso de apartaj vortoj. El tiu manuskripto, laŭ la sugestoj kaj korektoj de Zamenhof, pastro Jakobo Bianchini redaktis la gramatikon, kiun oni eldonis en “L’Esperanto” de 1913.
Tre multe sukcesis sia *Tutmonda adresaro de katolikaj esperantistoj* aperita en 1914 dulingve Esperanta kaj Latina.
Por enregistriĝi en la adresaro estis necese: esti katoliko, esti esperantisto, peti informojn per letero kaj pagi anticipe elspezojn por la respondo, sin helpi unu la alian laŭ propraj eblecoj.
En la apendico pastro Bianchini petas al tiuj, kiuj transvivos militon memori lin dum la preĝoj: “Se mi atingos ripozon ĉe Dio, el la ĉielo mi memoras vin kaj nian asocion. La laboro, kiun mi komencis, vi daŭrigos ĝin por la gloro de Dio kaj por la homara bono.”.
En la adresaro estis la adresoj de 1337 esperantistaj katolikoj el 46 landoj, el kiuj 227 pastroj kaj 8 episkopoj. Italoj estis 308. Estis ankaŭ 620 hoteloj, 20 naciaj katolikaj asocioj kaj 10 esperantaj revuoj.



Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista

CIRKULERO
Al la Katolikaj Esperantistoj

Samideanoj. Gefratoj,

Por nin plej facile reciproke koni kaj helpi, mi intencas eldoni kiel eble plej baldaŭ **ADRESARON DE KATOLIKAJ GEESPERANTISTOJ** de la tuta mondo, kaj de almenaŭ unu ŝlilinda hotelo en ĉiu urbo. — Pro tio mi insiste petas ke oni min helpu kolekti kiel eble pleje da respondoj al jenaj demandoj:

1. Nomo persona kaj familia.
2. Profesio.
3. Lando.
4. Ĉefurbo de via ĉirkaŭaĵo.
5. Via urbo.
6. Via strato kaj numero.
7. Kion vi povas fari por katolikoj vojaĝantaj aŭ petantaj informojn.
8. Kiaj estas ne karaj kaj tiel honestaj hoteloj de via urbo en kiuj povas kun trankvila konscienco loĝi katolikoj, pastroj, religiuloj. Aldonu ilian ĝustan adreson kaj se eble prezojn.

Atendante rapidajn, ĝustajn, konsciencajn informojn, Vin antaŭdankas

Pastro JAKOBO BIANCHINI
ĜENERALA SEKRETARIO
Fontanafredda (Udine)
(ITALIJO)

La cirkulero pri la adresaro

TUTMONDA ADRESARO
DE
KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ
KAJ DE
Honestaj malkaraj Hoteloj
KUN ALDONO DE
Gramatiko kaj Vortaro Esperanto-Latino

ANNUARIUM UNIVERSALE
DE
CATHOLICIS ESPERANTISTIS
DEQUE
Honestis parvipretii diversoriis
CUI ACCEDIT
Parva Grammatica cum Glossario de Esperanto Idiomate

Collegit - contexuit
SACERDOS JACOBUS BIANCHINI
Comitatus Linguistici Internationalis Parisiensis Socius
Internationalisque Catholicae Esperanisticae Societatis
Generalis Secretarius

Unua Jaro — 1914

"LA TIPOGRAFICA"
S. VITO AL TAGLIAMENTO (Italia)

La *Tutmonda Adresaro* de 1914

Pastro Bianchini estis ankaŭ verkisto pri teatraĵo, memoraĵoj kaj verkis la faman friulan himnon.

FRIULA HIMNO

De l’ Gothard’ ĝis Akvilejo,
De la montoj ĝis la mar’,
Nia ter’ estas sidejo
De labora gefratar’.

Tra jarcentoj konserviĝis
Inter montoj, sur eben’
Nia lingvo, resoniĝis,
Kaj meritis grandajn ben’.

Plej konkorde laboradi
Volas ni en pac’ kaj am’ ;
Nian lingvon konservadi
Kun la fida nia program’.

Nia flago trikolora
Verda, blanka kaj lazur’
Ĝin defendos plej valora
Nia brako laŭ la ĵur’.

De l’ Patrujo la gardado
Forte staras la Friul’;
Al tutmonda laborado
Iras niaj laborul’.

Filoj estas ni de Romo,
Defendantoj de nia ter’ ;
Estas glora por ni nomo
Katolika de la ver’.

Man’ en mano ni gefratoj
Plej konkorde vivu ni ;
Estu ni bonaj soldatoj ;
Kaj nin benos ĉiam Di’.

Li partoprenis en internaciaj kongresoj de katolikaj esperantistoj. En Parizo (1910), kie li salutis nome de Episkopo de Conkordia, Francisko Isola, de Tellini kaj de Meazzini, dum sia prelego pastro Bianchini diris: "… ĝis nun en mia diocezo nur mi estas aktiva esperantisto, ĉar multe da personoj mokas Esperanton kiel frenezo, sed mia Episkopo, animo forta kaj sincera, ne zorgas pri ili kaj li aprobas ĉion, kio estas bono… Tiel mi esperas ke, ankaŭ en mia lando, komenciĝos favora epoko por nia lingvo kaj la ekzemplo de mia Episkopo utilos veki dormantojn, venki malamikojn, por ke apud la Kristokruco flirtigu, kiel servantino, ankaŭ la verdan flagon de Esperanto…".
Li havis korajn kontaktojn kun Protestantoj, Evangeliistoj kaj li estis amiko kun Ortodoksa Episkopo, al kiu li donacis ekzemplerojn de Biblio en Esperanto. Plie, li rilatis al esperantistaj grupoj, precipe tiuj de Udino kaj Triesto, kaj, dum lian sacerdotan ministerion en Cimpello, li ligiĝis al la komunumo de Azzano per amikeco kaj kun Ĉefpastro de Azzano Decimo, pastro Davido Burlon, kaj kun instruisto Silvano Manias.

La koverto de la Esperantista-klubo "Nova Sento" de Azzano Decimo

Kiam li eksentis la pezon de la jaroj, pastro Bianchini daŭrigis sian episkopan sindevigon kun la sama entuziasmo de 1927 post kiam li alvenis al Cimpello, kaj iom post iom ke li alproksimiĝis al la lastaj jaroj de la vivo, lia aspekto emanis serenecon kaj mildecon, dotoj, kiuj karakterizis lian agon al aliaj kaj la humila maniero vivi kun la gento.
Tre ŝatata estis lia laboro por institucioj kiel I.K.U.E. kiel Ĝenerala Sekretario, Lingva Komitato kaj Akademio, kiel reprezentanto de nia nacio[48].



La demandaro por la kandidatoj plenigita de pastro Bianchini

La gravan kolekton de esperantaj verkoj, kiu formis lian bibliotekon, li donis al la Dioceza Seminario por pliigi esperantajn studadojn, tre necesaj por elmigrintoj kaj sacerdotoj en mislando.
La 4an de februaro 2016, per decido n.ro 12, la Komunumo de Cimpello titolis straton al pastro Bianchini.



La vizitkarto de pastro Bianchini

Noto 48 La kandidatiĝo por pastro Bianchini en la Lingva Komitato estis proponita de Austin Richardson (kompleta nomo Austin François Richardson Taylor, naskita la 21 oktobro 1843 en Amuynoabah, forpasita la 21 aŭgusto 1913 en Bossey), Prezidanto de I.K.U.E. de la 1a de aprilo 1910 ĝis la 21a de aŭgusto 1913).

Tre grandan kontribuaĵon al la Movado donis Antono Paolet[49] de Sankta Vito de Taljamento, naskita la 28an de marto 1880 de Vincento kaj Jakoba Francescutti, forpasita la 17an de decembro 1960.



Antono Paolet

En 1908 Paolet estis en Dresdeno[50] kie okazis la 4a Universala Esperanto-Kongreso (15 - 22 aŭgusto). Vivi realecon, kiu evidentigis la lingvan problemon kiel ĉefa fundamento por la transvivo, eble lin faris pripensi. Kaj eble decida estis la fakto ke la nova helplingvo Esperanto povis konstitui la ilon por fratigi popolojn.
Reveninte de Germania, li estis logita de pastro Bianchini, "simpatia figuro de friula pastro", sin dediĉi al Esperanto.
Tial li eklernis la lingvon aŭtodidakte kaj li estis ravita. Organizita malgrandan presejon en strato Pomponio Amalteo, li ekkontaktis prof.on Grazzini kaj la 10an de januaro 1913 ekeldonis - per apogo ankaŭ de Aĥilo Tellini kaj, poste, la helpo de prof. Bruno Miglorini[51] - la revuon "L' Esperanto"[52], kiu tre kontribuis al la disvastigo de la lingvo, kaj iĝis, poste, organo de la I.E.F. [53].

Almanacco Pratico 10 Gennaio 1913 Anno I - N. 1

L'Esperanto

LINGUA INTERNAZIONALE

Periodico Quindicinale di studio e propaganda

a cura della Cattedra Italiana di Esperanto

Sede Centrale BOLOGNA, Vallescura, 11 - Bibbiena (Arezzo) - Bordighera - Capodistria Cazzano (Budrio) - Firenze - Fontanafredda (Pordenone) - Gorizia - Modica - Moggia Napoli - Perugia - Rimini - Trento - Trieste - Villacco

Direzione ed Amministrazione presso l'editore A. Paolet - S. Vito al Tagliamento (Udine)

Un anno (Italia e Colonie) L. 1,25 - Estero L. 2,50 - Un numero separato Cent. 5

ESCE IL 10 E IL 25 DI OGNI MESE

La kapo de la unua numero de "L'Esperanto"

Almanacco Pratico 10 Febbraio 1913 Anno I - N. 3

L'Esperanto

LINGUA INTERNAZIONALE

Periodico Quindicinale di studio e propaganda

a cura della Cattedra Italiana di Esperanto

Sede Centrale BOLOGNA, Vallescura, 11 - S. Giovanni Valdarno (Arezzo) - Bordighera Capodistria - Cazzano (Budrio) - Firenze - Fontanafredda (Pordenone) - Gorizia - Modica Moggia - Napoli - Perugia - Rimini - Rovigo - Trento - Trieste - Villacco

Direzione ed Amministrazione presso l'editore A. Paolet - S. Vito al Tagliamento (Udine)

Un anno (Italia e Colonie) L. 1,25 - Estero L. 2,50 - Un numero separato Cent. 5

ESCE IL 10 E IL 25 DI OGNI MESE

PAROLE DEL DOTT. ZAMENHOF.

Varsovie, 23-1-913.

Kara Sinjoro,

La du ekzemplerojn de "L'Esperanto" mi danke ricevis.

Via

ZAMENHOF

La n.ro 3 kun la respondo de Zamenhof

Noto 49 Origine Paulet, modifita Paolet pro preseraro. Parolinte kun s.ro Adelio, filo de Kavaliro, la patro neniam pensis korekti ĝin pro la disvastigo de la eldonaĵo, kaj tiu nomo estis plutenita.

Noto 50 La patro laboradis en Germanio.

Noto 51 Bruno Miglorini (Rovigo, 19 novembro 1896 - Poggio Secco, 18 junio 1975), lingvistiko, universitata profesoro. Li sciiĝis pri Esperanto tre juna, post prelego de Tellini en Rovigo la 14an de januaro 1913. Ankoraŭ liceano, Bruno Migliorini "estis logita, ne pro la rafinita parolado de Tellini (kiu, iomete balbutanta, ne estis tre bona preleganto kaj en la kongresoj ne ŝatis diri belajn vortojn, kiuj diris nenion), sed la konvinko per kiu tiu homo priparolis la esperantan ideon akiris ĉi tiun junulon kaj aliulojn ke post malmultaj monatoj fondiĝis en Rovigo la Esperanta-grupo "Verda Stelo", unu el la unuaj en Veneto" (El la prelego de prof. Elio Miglorini de la 11an de aprilo 1978 ĉe la Esperantista-Grupo de Bolonjo okaze de la 40a datreveno de la forpaso de Achille Tellini).
Prof. Bruno Mgliorini partoprenis en konkursoj pri tradukado kaj pri origina prozo kaj en Italio kaj en Hispanio. En la "Internaciaj Floraj Ludoj" de 1914, li estis premiata por la verko *Utilo alportota de helpa lingvo internacia al la komerco*. Li subskribis ĝin per pseŭdonimo "Ĉu mi?". De 1949 ĝis 1963 li estis Prezidanto de la Itala Lingva Akademio. Li estis Ĉefredaktoro de la Itala Enciklopedio: li okupiĝis pri Lingvistiko kaj Literaturo.

Noto 52 Studada kaj propaganda revuo zorge de la Itala Esperanto Katedro, kiu, en la komenco, aperis monate po du fojoj. La revua redakcio estis en Bolonjo: ĉiu numero enhavis 8 paĝojn kaj kostis 5 centimojn, dum la jara abono kostis 1,25 lirojn po 24 numeroj. La tuta kolekto de la unua jaro estis volumo enhavante ĉirkaŭ 200 paĝojn. La revuo estis sendita, senpage, ankaŭ al Zamenhof, kiu, el Varsavia, la 23an de januaro 1913 dankante respondis.

Poŝtkarto sendita al Franko Bodini en strato Pelliccerie

Tiele skribas prof. Ghez de Triesto la 6an de februaro 1913 al Paolet: “La subskribanto aplaŭdas plenkore kaj ne trovas esprimon por laŭdi tiun estimatan redaktejon pro la ege laŭdinda ideo eldoni ĵurnalon itallingve, kiu havas la rolon konatigi Esperanton al ĉiuj italoj. Pro tio, li faras siajn plej korajn bondezirojn ĉar la laŭdinda iniciato havu la plej bonan el sukcesoj kaj li ne mankos apogi kun ĉiuj siaj fortoj la ĵurnalon inter samideanoj en Trieste kaj en la italaj kaj aŭstriaj provincoj. …”.


La letero de prof. Ghez

En 1914, precipe dank’al prof. Tellini, sur la revuo oni ekeldonis tradukajn kaj originalajn verkojn. Distingiĝis el la aŭtoroj ankaŭ pastro Jakobo Bianchini, Arturo Ghez kaj Bruno Migliorini.
Tiuj la kondiĉoj akceptitaj de Paolet, la sola proprietulo kaj estro de “L’Esperanto”, post la respondeca paso de la revuo[54]:

a) La kovrilo estos konservota; en la spaco sub la “leviĝanta suno” oni povos skribi: Oficiala organo de la la Itala Esperantista Federacio.
b) Laŭ tia formo povos aperi la unua numero la 25an de seprembro.
c) Ekstere la septembra numero estos almetota karteton kun la jena kribo:
Ĉesinte aperi “Itala Esperantisto”, al ĝiaj abonintoj oni sendos ĝis la fino de la nuna jaro la jenan revuon “L’Esperanto”, kiu per tiu ĉi numero ekkomencas esti oficiala organo de la Itala Esperantista Federacio.
d) Sinjoro Paolet restos Estro de la revuo kaj li plutenas la rajton rifuzi la eldonadon de artikoloj kaj sciigoj, kiujn li kredu malutilaj al la interesoj de la revuo kaj de la esperantista propagando escepte de la oficialaj komunikadoj de la I.E.F., kiu surprenas ĉian respondecon.

Noto 53 “L’Esperanto” ekestis oficiala organo de la I.E.F. de la n.ro 9 de la 25a de septembro 1921, anstataŭ la revuo “Itala Esperantisto” eldonita en 1910 kiel organo de la Esperantista-Grupo de Palermo. De la 1a de januaro 1930, laŭ la peto de kav. Paolet, Franko Bodini estros “dumtempe” la revuon, redaktota en Udine (strato Pelliccerie n.ro 2). Renovigota kun la titolo “Itala Esperanto Revuo”, plibonigita kaj pliriĉigita, aperos ĉiumonate kaj enhavos 28 paĝojn de teksto kaj 4 paĝojn de reklamo. La revuo kostos al grupo 7.000 lirojn jare. Por alfronti elspezojn, oni devis trovi reklamanoncojn je la sumo de 1.000 liroj inter Udine kaj la najbaraj urbetoj.
La “Itala Esperanto Revuo” volita en Udine kaj konfirmita en Komo, ĉesas sian eldonon kun la n.ro 12 de decembro 1931. De la 1a de januaro 1932 “ĝi renaskiĝos en alia, sed pli nova formo… ĉar la itala esperantismo, kiu per malrapida, sed per firmaj paŝoj, dum tiu periodo bezonas ion pli disvastiga, pli freŝa, pli ĝisdatiga kaj eventuale pli polemika, ol tiu, kiu povu esti revuo kaj krome monata”. Estro de la nova revuo “L’Esperanto” estos Nikolao La Colla, eldonita, je granda formato, en Torino, ĉe la presejo de la “Gazzetta del Popolo” (La popola gazeto) (Torino-a Eldonejo, Korso Valdocco n-ro 2).

Noto 54 Per letero de la 19a de marto 1913 pastro Jakobo Bianchini petis al prof. Tellini la opinion pri la propono igi “L’Esperanto”-n organo de la I.E.F.. Tio ĉar “la Esperanta Rondo de Milano proponis al mi elekti nian ĵurnalon kiel sia officiala organo kaj same proponis al mi S.ro Prof. Monti el Pavio, kiu ankaŭ deziras unuigi la Italan Instituton de Esperanto kun la Itala Katedro”.

e) La revuo daŭrigas la eldonon de literaturaj kaj lingvaj artikoloj kiel antaŭe, kaj s.ro Paolet estos juĝanto dum la elekto kaj akcepto de artikoloj.
La revuo akceptos propagandajn artikolojn eksterlande pri italaj allogoj, prefere per kliŝoj.
La revuo akceptos komunikadojn de la I.E.F. metonte je ĝia dispono almenaŭ kvar paĝojn; ĉu la I.E.F. volu limigi sian respondecon nur al tiu parto de la revuo, oni povos antaŭmeti la subskribaĵon: Oficiala parto rezervita al la Itala Esperantista Federacio.

f) S.ro Paolet metos je dispono de la I.E.F. 500 ekzemplerojn el siaj numeroj ekde septembro, kun la rilataj poŝtaj kaj banderolaj elspezoj: el tiuj 400 povos esti sendotaj (fare de s.ro Paolet) al malnovaj abonantoj de la Itala Esperantiso, 50 eksterlande al adresoj sugestotaj de la I.E.F. kaj 50 kie pli bone oni volu.

g) La septembra numero estos je 32 paĝoj (kaj ĝi enhavos la esperantan raporton Alessio pri la freŝaj kongresoj), la aliaj de 1921 verŝajne je 16 paĝoj.

h) La eldonontan materialon oni devos sendi al Paolet antaŭ la tago 10a de la monato, kiam ĝi devos esti eldonata.

i) Oni povos aldoni al la revuo cirkulerojn aparte de la I.E.F. por la abonantoj de Itala Esperantisto; ĉu la cirkuleroj estos eldonotaj de s.ro Paolet la relativaj elspezoj estos kalkulota aparte laŭ proporcio po 0,04 lirojn por ĉiu ekzemplero (por la papero), plus lirojn 10 por ĉiu paĝkomponado (kun formato ½ registro).

k) La I.E.F. por ĉiu numero de "L'Esperanto" (ekde tiu de septembro) donos al s.ro Paolet kompenson de liroj 200 (kaj por numeroj je 16 paĝoj kaj je 32 paĝoj), kiujn oni devos deponi antaŭ la tago 25a ĉiumonate.

l) La enspezo el novaj paganoncetoj estos asignota duone al s,ro Paolet kaj duone al la I.E.F.. El tiu kalkulo ekskluzivas anoncetoj, kiujn eldonisto Paolet volos fari favore al la eldonaĵoj en sia eldonejo aŭ nevenditaj ĉe sia eldonejo aŭ favore al la revuo "L'Esperanto".

La suprediritaj kondiĉoj estis legitaj, pridiskutitaj kaj aprobitaj de la C.K. de la I.E.F. dum la asembleo de la 30a de aŭgusto 1921 kaj subskribitaj en Venezia la 5an de septembro 1921 fare de la Ĝenerala Sekretario F. Pizzi por la C.K. de la I.E.F. [55].


Le presenti condizioni furono lette, discusse e approvate dal C.C. della I.E.E. nella adunanza del 30 agosto 1921.

Venezia, 5 settembre 1921

Per il C.C. della I.E.E.
Il Segretario generale

La subskribo de Francisko Pizzi

La 22an de februaro 1913 Paolet havis la viziton de Claudius Colas, kiu antaŭe estis en Fontanafredda ĉe pastro Bianchini.
Lia presejo, "La Tipografica" (La Tipografjka), estis difektita dum la unua Mondmilito, sed, post la ĉesigo de la milito, Paolet rekonstruis kun rezignoj la presejon detruita dum la malamika invado de Friulo, reprilaboris kaj daŭrigis estri la Revuo-n ĝis 1929[56].

Noto 55 La I.E.F., fondita la 21an de marto 1910 dum la 1a Nacia Esperanto-Kongreso en Florenco (21 - 23 marto), estas senprofita asocio, kiu okupiĝas pri la disvastigo de la helpa internacia lingvo Esperanto en Italio. Ĝia sidejo estas en Milano, strato Villoresi n.ro 38. La I.E.F. estis registrita laŭ la Prezidenta Dekreto 1720 de la 28a de junio 1956. Ĝia organo estas la revuo "L'Esperanto".

Alberto Alessio (Schio, 19 novembro 1872 - Crespano del Grappa, 12 septembro 1944), matematikisto kaj admiralo ĉe la Mararmeo.

Francisko Pizzi (Padovo, 15 novembro 1880 - Florenco, 1946), bibliotekisto ĉe la Sanktamarka Biblioteko de Venezia, tre aktiva en la itala katolika movado (Ĝenerala Segretario de I.K.U.E.), I.E.F.-sekretario. Ankaŭ li estis ŝatata origina poeto (*La Protektanto*, 1932).

Noto 56 Dum la okupado de Friulo fare de armeo aŭstra-germana-bulgara, Vincento Paulet restis en Sankta Vito de Taljamento dum la familio rifuĝis en Bagni della Porretta, kaj li klopodis konservi presliterojn, paperojn kaj manuskriptojn. Plifoje militistoj klopodis forporti ĉion sed s.ro Vincento ne cedis sub la petoj. Dank''al li, estis eble reutiligi la materialon post la milito.
Antono Paolet partoprenis en la unua Mondmilito kiel Kaporalo, efektiva de la 6a Kompanio de la 231a Infanteria Regimento de la Brigado "Avellino".

Li ne estis nur la proprietulo de la presejo kie la Revuo estis presita, sed ankaŭ li plenumis la taskojn kiel redaktisto, korektisto, laboristo kaj administranto, ricevi abonpetojn, prepari banderolojn kaj sendi la revuon[57]. Dume, li sukcesis verki unuaktan dramon *Ensorĉo*" (1915)[58] kaj instrui stenografion ĉe la Teknika Lernejo en Sankta Vito de Taljamento de 1922 ĝis 1925[59].

Paolet laboras en sia presejo


Malgranda Kolekto de "L'Esperanto"
sub la patronado de la Itala Katedro de Esperanto
N. 2-3
A. PAOLET
ENSORĈO
UNUAKTA DRAMO
Cent. 30
Sm. 0120
1915
S. Vito al Tagliamento
UNIVERSALA ESPERANTIA BIBLIOTEKO
1467 Recenzo 1915

La interna paĝo de la verko

SCUOLA ITALIANA DI STENOGRAFIA
Sistema Gabelsberger - Noë
SI ATTESTA
che il signor Antonio Paolet
ha lodevolmente sostenuto gli esami nella conoscenza teorica della stenografia secondo il sistema Gabelsberger - Noë, riportando una classificazione di 10 punti su 10.
La Commissione esaminatrice
Il Presidente del Collegio degli Stenografi
Il Docente

La stenatesto

En septembro 1920 oni donis al li la Diplomon Honora Membro de la Itala Esperanto-Katedro.


Cattedra Italiana di Esperanto
Fondata nel 1912
Diploma di Membro Onorario
Il Signor Paolet Antonio
è stato eletto Membro Onorario, a sensi dell'articolo 5 del vigente statuto.
Per la Sede Centrale

La diplomo donita de la Itala Esperanto-Katedro

Noto 57 Paolet prezentis al la Udine'a Komerca kaj Industria Ĉambro la denuncon kaj la Firman enskribon, kiu havis la n.ron 4542 de la 5a de majo 1925. Lia membrokarto kiel eldonista membro por la jaro 1929 ĉe A.E.L.I. havas n.ron 121.

Noto 58 La dramo *Ensorĉo* estis eldonita en "L'Esperanto" n.ro 2 de la 25a de februaro 1915 (1a kaj 2a sceno, de paĝo 29a ĝis paĝo 32a) kaj n.ro 3 de la 25a de marto 1915 (de la 3a ĝis la 8a sceno, de paĝo 41a ĝis paĝo 46a).

Noto 59 Paolet vizitadis Gimnazion kaj ankaŭ li havis diplomon por instrui Stenon. Pro tempomanko neniam li povis sin dediĉi al la instruado de Esperanto.

La jaroj antaŭ la dua mondmilito estis kriza periodo por Esperanto. Tio kaŭzis stagno en la vendoj de eldonaĵoj kaj Paolet estis devigita interrompi sian aktivecon.

Senkuraĝiĝita, li estis preta cedi la tutan lian libran produktadon al la I.E.F. kontraŭ 60.000 liroj kaj retiriĝi el merkato. Sed dank'al prof. Korado Grazzini (tiam Vicprezidanto anstataŭ prof. Georgo Canuto), kiu certigis al li la tutan sian kunlaboradon por la renaskiĝo de Esperanto, Paolet daŭrigis lian laboron.
Per letero de la 2an de februaro 1936 tiele prof. Grazzini skribas al Paolet: "Tre kara Paolet, Via letero tre ĉagrenis min. Certe mi bedaŭrus ne plu vidi la esperantan presejon, Vian presejon, kiu portis tiom da lumo en la historio de nia movado en Italio. Vi senkuraĝiĝis, kaj mi ne konsideras Vin malprava; sed pensu ke la nuna tempo estas nedaŭra kaj ni trairas ĝuste metidan periodon, ĉar ni povos je la taŭga momento, ne tre malproksima, repreni aktivecon, kiu sendube havos kuraĝigajn reflektiĝojn...".
La senkuraĝiĝo de Paolet sciis ankaŭ Aĥilo Tellini kaj pastro Joakobo Bianchini. Ĉi lasta tiele respondis al Tellini la 14an de julio 1938: "Tre kara samideano, mi respondas al via letero, kiun vi sendis al nia amiko Paolet. La Povra Paolet eltenis rezignojn pli ol liaj fortoj por Esperanto, kaj tio ne mirigas ke nun li senkuraĝiĝis. Ke Esperanto hodiaŭ trairas vintran krizon bedaŭrinde estas vere; sed mi havas firman esperon, ke post vintro revenos printempo kun floroj, somero kaj aŭtuno kun fruktoj. Laŭ mi, hodiaŭ Paolet ne devus ne povus daŭrigi pasivan laboron; sed nur konservi liajn eldonaĵojn atendante pli bonajn momentojn, kiuj ne povos manki, krom ne okazos kataklismo, kiun mi volas esperi malproksima. …".
La sekvantaj jaroj estis karakterizitaj per abunda korespondaĵo inter Paolet kaj prof. Grazzini pri la represo de la vortaro de Tellini kaj de la *Corso di Esperanto per l'allievo e l'autodidatta* (Esperanta kurso por la lernanto) *kaj la memlernanto* al kiu provaĵkorektado kunlaboris Johano Della Savia[60].



La vortaro de Tellini

Kavaliro Paolet estis la unua esperanta eldonisto en Italio. Li kapablis krei eldonan aktivecon, kiu sciigis en la tuta mondo sian familian nomon kaj la nomon de Sankta Vito de Taljamento, kiu povas sin konsideri lulilon de Esperanto en nia Lando.
Per la fondo kaj la eldono de la Revuo kaj lia laŭdinda eldonista aktiveco, li kunlaboris aktive por disvastigi kaj konigi la lingvon en la tuta Italio.
Interalie, li zorgis pri la eldonado de didaktika materialo: gramatikoj, vortaroj kaj legolibroj de Korado Grazzini, Jakobo Meazzini, Bruno Migliorini, Alfredo Stromboli, Aĥilo Tellini[61] kaj skriboj kaj verkaĵoj de italaj verkistoj esperantigitaj, el kiuj *Historio de Kristo* (1931)[62] de Johano Papini kaj *Koro* (1936) de Edmondo De Amicis[63].

Noto 60 En la enkonduko de la *Vocabolario completo Esperanto-Italiano* (Kompleta vortaro Esperanta-Itala*)* de Aĥilo Tellini (A. Paolet Eldonisto, S. Vito de Taljamento, 1931), je la pagò VI oni legas: "La kompilinto dankas samideanojn: prof. Aleksandro Mazzolini kaj sinjoroj Antono Paolet kaj Johano Della Savia, kiuj aldonis vortojn kaj tre klopodis pri provaĵkorektadoj…".

Noto 61 Jakobo Meazzini, pastro, naskita en Bibbiena d'Arezzo. En 1912 li aliĝis al la starigo de la Itala Esperanto-Katedro. Nomumita en Triesto (21 septembro 1922) kiel estro de la Katedro, li prezentis demisiojn la 22an de marto 1925, forlasinte la provizoran direkcion al prof. Korado Grazzini.

Alfredo Stromboli (Borgo Sankta Sepolcro, 28 oktobro 1875 - Volterra, 7 novembro 1949), doktoro pri Kemio. En marto 1911 li fondis la Liguria-n Esperanto-Instituton (kiu, poste, unuiĝos al la Katedro).

La kovrilo de la libro *Koro*

Lia riĉa biblioteko enhavas multaj el la plej gravajn verkojn el la monda literaturo, nature esperantigitaj: *Floretoj* de Sankta Francisko (1926), *Infero* de Danto, tradukita en tercinoj de Kálmán Kalocsay, *Quo Vadis?* de Henryk Sienkiewicz, *Julieta kaj Romeo* de William Shakespeare[64], *La Sankta Biblio* tradukita de Zamenhof, krom multe da verkoj esperante skribitaj dum tiu periodo.
La 27an de aprilo 1946 la Estraro de la Akademio Properziana de Subasio en Asizo, nomumis Paolet-on "Korespondanta membro".

Noto 62 Post kiam la aŭtoro permesis eldoni ĝin esperante, Hektoro Fasce de Ĝenovo esperantigis la verkon kaj poste ĝi estis disvastigita eksterlande. Kav. Paolet estis la unua itala eldonisto, kiu, krom Vallecchi el Florenco - eldonisto de preskaŭ ĉiuj verkoj de Papini - povis eldoni verkon de la fama verkisto. La nomo de la tradukinto ne estas skribita; en lia loko estas asterisko.
En letero sen dato kaj subskribo, je la punkto 3a estas skribita: "La nomon de la tradukinto mi ne povas sciigi al vi ĉar lia deziro estas ne konigi ĝin laborante anonime konvinkiĝinte ke tiamaniere sia laboro plimulte efikos por la propagando. Tamen mi povas vin informi ke li estas itala samideano kiu esperantiĝis jam de preskaŭ 21 jaroj. Li kunlaboris, ĉiam sub plej malsamaj pseŭdonimoj, ĉu en "Literatura Mondo" ĉu "Heroldo" ĉu mia gazeto. Ankaŭ li aranĝis la lernolibrojn por italoj, nun elĉerpitaj kaj lastjare tradukis, laŭ permeso de l' aŭtoro la prelego "Antikva Romo surmare" de nia Ĉefministro Benito Mussolini eldonita per bonfara celo".

Noto 63 La nomo de la tradukinto ne estas skribita; en lia loko estas asterisko. La 13an de decembro 1962 s.ro Fasce sendis poŝtkarton al Adelio Paulet por manifesti al li sian deziron esperantigi ankaŭ *Daniele Cortis* de Fogazzaro. Subskribis la poŝtkarton ankaŭ Lea Fasce.
La rajtigo eldoni la verkon en Esperanto estis donita al s.ro Fasce la 24an de februaro 1926. Kiam s.ro Fasce skribis al Paolet por sciigi al li tion, li transskribis parton el la letero de la filo de De Amicis, de Torino. Temas certe de la filo Ugo, ĉar Furio sin mortigis en 1898 pro la situacio naskita en familio.

Johano Papini (Firenze, 9 januaro 1881 - tie, 8 julio 1956), naskita en familio de metiistoj, li havis infanaĝon kaj adoleskon soleca konsolitaj per la entusiasmo al literaturo, kulturita dank'al la ava biblioteko antaŭe kaj la urba poste. Ekde la unuaj jaroj de la jarcento li sin engaĝiĝis en la aktiveco pri la kultura pliigo, stariginte en 1903 la revuon "Leonardo". *Historio de Kristo* anoncas la religian konverton de Papini post jaroj de profonda spiritaj ŝanĝoj.

Edmondo De Amicis (Oneglia, Imperia, 21 oktobro 1846 - Bordigera, Imperia, 11 marto 1908) post kiam li studis en Kuneo kaj Torino je 16jara li eniris la Oficirlernejon en Modena kie li iĝis oficiro. Demisiita el la armeo, li iĝis la verkisto la pli legita en Italio, sekve de la eksterordinara sukceso de la verko *Koro* (1866).

Noto 64 Pri ĉi tiu tradukado, Kálmám Kalocsay (Abaŭjszânto, 6 oktobro 1891 - Budapeŝto, 27 februaro 1976) utiligis la helpon de Stefano La Colla (Salemi, Trapani, 2 oktobro 1889 - Milano, 5 februaro 1966), al kiu li sendis ekzempleron de la verko kun aŭtografa dediĉo tercine. La dediĉo estis eldonita en "L'Esperanto" de decembro 1987. (Pri la biografio de Stefano La Colla vidu *Esperantismo en Sicilio* de Jakobeto Martinez).

Sankta Francisko (Asizo, 1181 aŭ 1182 - tie, 3 oktobro 1226), naskita laŭ la nomo Johano de Pietro Bernardone, estis proklamita Patrono de Italio de Papo Pio XII en 1939.

Henryk Sienkiewicz (Wola Okrzejska, 5 majo 1846 - Vevey 15 novembro 1916), pola verkisto. En 1905 li havis la Nobel-premio pri Literaturo por la verko *Quo Vadis?*.

William Shakespeare (Stratford-on-Avon, 23 aprilo 1564 - tie, 23 aprilo 1616), angla dramverkisto kaj poeto.

La nomumo de Paolet

La dediĉo de Kalocsay al Stefano La Colla



La honoraĵo de Paolet



La diplomo donita al kav. Paolet

La 13an de januaro 1952, “por elstaraj meritoj akiritaj per verkoj celantaj la bonstaton de la homa kolektivo kaj la progreson de civilizacio”, Paolet estis ordenita per la esperanta honorigo Kavaliro “Universala Ordeno de Antares”, kavalira asocio agnoskita per letero n.ro A.M.G./T.T./46 de la 28a de februaro 1946 de la Ĉefstabejo de la Alianca Milita Regado Zono Trieste[65].

Kelkaj jaroj antaŭ lia forpaso Paolet, fermita la presejon, daŭrigis la laboron kiel eldonisto en la postbutiko de la edzina mercerejo[66]. Li utiligis la presejon de s.ro Marco Primon de Sankta Vito de Taljamento tial la “Esperantista presejo Paolet” iĝis la “Presejo Primon”, kiu presis kelkajn verkojn por la eldonisto Paolet kiel *Papo Pio X Beata* (1951), *Vortaro Esperanto-Itala* de Korado Grazzini (1955), *Anekdotoj pri Danto* (1956), *Ŝakludado* de Jozefo Giacosa (1957), *Italaj rakontoj* de De Amicis (1957).

La “Unua Parto” (Itala-Esperanto) de la vortaro donacita de Paolet al Della Savia
(Presejo Primon - S. Vito de Taljamento - aŭgusto 1954)



Korektita paĝo de la vortaro

Noto 65 Temas pri la “Universala Akademio de la Regado Kosmo-Astrozofia” (U.A.R.K.A.) por la studo kaj la evoluigo pri Metapsikio, fondita de Renato Damiani de Triesto la 18an de februaro 1946 (strato Carducci n.ro 12), kies Statuto estis legitimita de la Ĉefstabejo de la Alianca Armea Regado, Zono de Trieste, per letero A.M.G./C.T./46 de la 28a de februaro 1946.
“La Akademio sin proponas evoluigi la studadon pri tiuj branĉoj tiel gravaj kaj malmultaj konataj kaj ŝatataj el la plimulto, kiuj kune konstituas la okultan sciencon” (Art. 3 de la Statuto).
La Akademio enhavis, en sia interno, ankaŭ la “Universalan Spiritan Ordenon de Antares”, Kavalira Asocio kies atesto estis skribita esperante. La disdono de la atestoj estis aŭtorizita de la Alianca Armea Regado per dekreto A.M.G.-T.T.46 de la 28a de februaro 1946. Per letero AHQ/FTT/97/5/11 de la 27a de januaro 1948 la Zona Komisaro, Vic-kolonelo R.A.A.H. Gardner rajtigis Renato-n Damiani utiligi la malnovajn atestojn de la Ordeno ne post la 15an de februaro 1948, atendonte ke oni presu la novajn.
La emblemo adoptita de la Ordeno de Antares enhavas la verdan stelon, kiu prezentas la duan lingvon por ĉiuj: Esperanto.
(“Archeografo Triestino”, Serio IV - 2001 - vol. LXI, CIX de la Kolekto).
(Pri la biografio de Renato Damiani vidu *Cent jaroj de Esperanto en Triesto*, Biblion Eldonoj srl, Milano, 2008).

Noto 66 Poste la mercerejo kaj konfekcia vendejo estis administrita de la filo Adelio ĝis kiam li ĉesis la laboran aktivecon.
Kiam prof. Grazzini sciiĝis de Paolet pri la intenco retiriĝi el la aktiveco, tiele li skribas al li la 20an de aprilo 1960: “… Post kiam Vi laboris kun pasio kaj kun fido dum malfacilaj momentoj, ĉu estas vere la okazo forlasi la

kampon kiam oni ekkolekti la rezulton de viaj penoj? La presejo, kiu havas Vian nomon, kiu diskonigis al la mondo urbeton kiel Sankta Vito de Taljamento pri kiu neniu ne konis ĝian ekziston, kiun Vi fondis kaj kreskigis iom post iom de la unuaj broŝuretoj ĝis la freŝaj eldonaĵoj, kiuj eltenas la komparon kun tiuj de la famaj eldonejoj, Via laboro farita kun persisto kaj fido devus do malaperi? Fatale jaroj pasas por ĉiuj, kaj dum ili pasas malpliigas fortoj kaj bezonas kunlaboradon per energioj pli freŝaj kaj pli fortaj. Estas tiu konsidero, kiun ni ne povas malzorgi fari al ni mem. Estas morala sindevigo ke, ekzemple, entrepreno kiel la Via (ĉiam mi rilatas, nature, al tiu esperanta) surprenas al la publiko, kaj tio ne permesas, ke laŭ la nuna stato de la progresigo surpresita de la movado nur du brakoj, kelkfoje ankaŭ iom lacaj, povus kompensi adekvate ĉiujn necesojn. Mi dezirus, amike, inviti Vin fari iom la ekzamenon pri ĉi tiu situacio por pristudi solvon, kiu permesos al Via eldonejo daŭrigi sukcesi akorde kun la pliigitaj necesoj de la movado. Sendube la solvo pli natura kaj pli logika estus tiu, ke Vi trovu en Via familio necesan komprenon, kaj tion mi bondeziras al Vi sincere. Sed se tian komprenon oni neus al Vi, obstine neata, mi volus konsili al Vi ne lasi vin surprizi pro la neebleco daŭrigi tute sola surporti pezon, kiu sendube iĝos supera al viaj fortoj. Pri ĉi tiu mia parolado, mi ripetas, mi petas Vin ne voli vidi neoportunan entrudiĝon en la aferoj, kiuj ne koncernas min, sed nur la esprimo de sento pri antikva ĉiama amikeco. …".
Abunda estis lia korespondado kun geesperantistoj, kiu etendiĝis de la Okcidenta Eŭropo ĝis Rusio, de Ameriko ĝis Ĉinio kaj Japanio. Ofte la adreso estis: "A. Paolet eldonisto Italujo", sed en Sankta Vito de Taljamento la poŝtaĵo alvenis akurate.

Korespondaĵo sen la indiko de la strato

Ĉiudirekte li ricevis leterojn kaj varmajn aprobojn por la aktiveco, kiun li praktikis malgraŭ li malgajnis. Rusoj, ekzemple, anstataŭ monon sendis al li diversajn gravuraĵojn kaj bildetojn. Ĉi tiu laboro okupis lin tre multe sed li sukcesis kontentigi ĉiujn.
Pro liaj kulturaj meritoj, en 1954 li estis nomita "Kavaliro de la Itala Respubliko" de prezidento Luizo Einaudi[67]. Per letero de la 8a de septembro 1964 de adv.gr.of. Raffaele Bagnulo (Ŝtata Ĝenerala Vicadvokato) de Bologna (Avenuo Gozzadini n.ro 7)[68] adresita al Adelio Paulet oni legas: "...Neniam mi havis la plezuron Lin renkonti; oni diris al mi ke li estis ĉi tie, en Bolonjo, dum la kongreso de la '55, en kiu mi ne partoprenis ĉar malsana, aperinte nur ĉe la momento de la fermo. Kunfrato de la franciskana triaordeno mi sciiĝis pri li kaj per tiu ligo mi trovis la kristanan lumon de la "interna ideo" de Esperanto resumita en tiu saluto, kiu restas ankoraŭ la homan aspiron: "Pax et bonum!".
Tio estis por mi nature, ke, kiam mi havis okazon atentigi al Ŝtatestro teni en konsidero la meriton de la esperanta aktiveco por atribuado de honoraĵo de la ordeno pro Respublika merito, mi faris spontaneajn proponojn kaj sen la scio de la kandidatoj. Ĉar la eldona aktiveco estis tenita kun aparta konsidero, atribuinte la meriton, tion mi proponis, kaj ĝi estis la sola, por Via patro. La omaĝo estis laŭdeva, sed ĝin oni ne atribuis sen mia provoko kiel justa ago...".
Estas malfacile pensi ke sior Toni (tiele oni vokis lin en Sankta Vito de Taljamento), evitema kaj afabla, estu gravulo. Estis li, fakte, kiu konigis la plej gravajn italajn verkojn al geesperantistoj.

Noto 67 Luizo Einaudi (Carrù, 24 marto 1874 - Romo, 30 oktobro 1961). Post la liberigo, li estis Gubernatoro de la Itala Banko (1944 - 1948), Vic-ĉefministro kaj Ministro de la Bilanco (1918) kaj, de 1948 ĝis 1955, Prezidento de la Respubliko.

Noto 68 Post kiam Paolet havis sciigon de adv. Bagnulo, la 22an de julio 1954 Paolet skribas al d.ro Nikolao Picella, Ĝenerala Sekretario de la Prezidenteco, por lin danki pri la interesiĝo, aldonante ke "…la ĝojiga sciigo estis de mi eksciita kun tre kontento kaj kun la ĝojiego de la tuta mia familio. Mi petas Via Moŝto prezenti al Lia Prezidenta Moŝto miajn plej sincerajn dankojn kaj certigi lin, ke la alta honoro donita al mi estas la plej bona premio el mia aktiveco.".

Rafaele Bagnulo (Napolo, 29 majo 1880 - Bolonjo, 28 decembro 1975) startigis "L'Esperantista"-n kaj "Gefrataro Esperanta"-n. En 1902 li fondis la Esperanto-Grupon de Napoli. En la kongreso de Bulonjo-ĉe-Maro (1905) li estis elektita Lingva Komitatano. En aprilo 1912 li aliĝis al la starigo de la unua Itala Esperanto-Katedro. S.ro Bagnulo ekkontaktis Paolet-on de la 9a de februaro 1951, post kiam li emeritiĝis.

Edziĝita al Lucia Gregoris (Sankta Vito de Taljamento 28 marto 1875 - tie, 29 majo 1950), li havis du gefilojn: Jozefa (20 junio 1912 - 18 aprilo 2009) kaj Adelio (8 junio 1917 - 7 februaro 2001)[69].

La 31an de majo 1987 en la preĝejo sankta Laŭrenco en Sankta Vito de Taljamento oni aranĝis ekspozicion por memorigi kav.-on Paolet. La ekspozicio estis trionigita: la unua enhavis korespondaĵajn kolektojn inter geesperantistoj; la dua, librojn eldonitaj de Paolet; la tria, verkojn kaj lian korespondaĵon.

Tiele Hektoro Fasce[70], per letero de la 20an de decembro 1960 adresita al familio Paulet, skribis pro la forpaso de Kavaliro: "Homo, patro, esperantisto kaj samideano tiom amema, aktiva kaj altmerita, kiom silentema kaj modesta.".

En la artikolo "Ricordo del "Maestro" Antono Paolet" (Memoro de la "Majstro" Antono Paolet"), aperita sur la "Gazzetino" de merkredo la 4an de januaro 1961, je la paĝo 4a, oni legas: "Okdek jarojn li vivis sen ke iu, krom la erudiciuloj, rimarkis lin. Li faris de la laborema kaj konstrua humileco Sian vivmanieron, ĉerpante movimpulson kaj forton el valoroj kaj el virtoj de la Fido, sublimataj de la perfektigeblo de Franciskanismo. Li vivis evitema pri ĉiu resono, tute okupita por sia laboro kaj siaj idealoj. Samlandanoj mem, lin memorante, revidas lin kiel homo honesta kaj rekta, je delikata sento, kvazaŭ timema ĝeni la aliajn marŝante.".

La laborado de kav. Paolet estis daŭrigita de la filo Adelio, kiu prizorgis represi kelkajn verkojn.

Per letero de la 6a de aprilo 1961 adresita al Adelio Paulet, tiele skribas prof. Grazzini: "…kaj la memoro kaj la omaĝo pli bela kaj pli inda estas la daŭrigo ke Vi, kun pasia fila amemo, faras pri la laboro de Li".

Adelio Paulet

Noto 69 Pri la funebra ceremonio en la Katedralo de Sankta Vito de Taljamento, la grupo N.E.F. klopodis ĉar pastro Nello Marcuzzii celebru la Sanktan Meson. Dum sia homilio, pastro Nello resumis la vivon kaj la aktivecon de kav. Paolet kaj de lia filo Adelio.

Noto 70 Hektoro Fasce (m. 1966), pioniro de Esperanto en Ĝenovo. Tre fervora esperantisto, efika kunlaboranto de Stromboli, konvinkita asertanto de *La utilo de la interna ideo* por elimini malakordoj kaj kontrastoj. Forlasita la oficejon, li transloĝiĝis dum kelka tempo al eksterlando (precipe al Ĉeĥo-Slovakio) por gvidi kursojn. Li tradukis el la franca Esperantan lernolibron (1913). Liaj tradukadoj en Esperanto estis eldonitaj anonime (*La antikva Romo surmare* (1928) de Mussolini, *Historio de Kristo* (1931) de Papini kaj *Koro* (1936) de De Amicis). Li estis parto de la Organiza Komitato de la 2a itala kongreso (Ĝenovo 25 - 28 majo 1911). La 12an de novembro 1965 la Ĝenov-aj esperantistoj volis honori lian memoron titolante al li la Bibliotekon de la Ĝenov-a Esperantista Unio.

Ĉiam en 1913, en Udino, la tiama tre juna Johano Della Savia (Codroipo, Udino, 15 marto 1897 - Udino, 22 januaro 1967) iĝita scivola pri esperanta gramatiko trovita en la biblioteko de lia parokestro, li sin metis legi ĝin restinte mirigita de la lingvo kaj tuj li eklernis ĝin[71].
Post la studoj pri librotenado ĉe la Instituto "Valussi", Johano Della Savia laboris ĉe entrepreno, kiu komercis per lignoj (Entrepreno Alessandro Del Torso, strato Pradamano)[72] kaj "por liaj organizaj dotoj kaj perfekta esperantisto", lia estis la merito, en 1923, fondi la Udine'a Esperanto-Grupo-n de la postmilita periodo[73].
Li klopodis ĉiamaniere por disvastigi Esperanton pliigante kaj stimulante la grupan aktivecon gvidante kursojn, kunlaborante kun la fama prof. Tellini pri la kompilado de la vortaro Esperanto-Itala (aperita en julio 1931), skribante esperantajn artikolojn kaj poeziaĵojn kaj tenante abundan korespondadon kun multe da geesperantistoj en Italio kaj eksterlande[74], kiel Elio Migliorini kaj Edmondo Privat[75].
Li esperantigis la *Gvido-n tra la urbo Udino*[76] kaj novelon de Karlo Bertolazzi *Senza arrosto* (*Sen rostaĵo)*[77].
De 1919 li estis numumita delegito U.E.A. por Udine.

La vizitkarto de Della Savia

Della Savia kun Paolet kaj Bodini
en Sankta Vito de Taljamento - 9.8.1925

Della Savia kaj prof. Tellini en Tricesimo - 2.5.1926

Noto 71 Estas la parokestro de la Redemptora Preĝejo, en strato Mantica. El interparolo kun la parokestro de la 1a de februaro 2002, en la biblioteko estas neniu libro pri Esperanto.

Noto 72 Letero de la Popola Universitato de la 9a de novembre 1923 (dato de la poŝta stampo) havis la jenan adreson: "Johano Della Savia, Entrepreno G. Tonini kaj Filoj, strato Asilo M. Volpe (Infanvartejo M. Volpe), Udine". S.rino Andreina Della Savia ne povis konfirmi la sciigon pri la patra ofico en tiu entrepreno (konstrua), sed ŝi aŭdis onidiron pri ĝi ĉar la patro estis amiko de familio Tonini.

Noto 73 En la "Fina raporto al la kunveno de membroj" de la Udine'a Popola Universitato, lerneja jaro 1922 - 23, oni legas je la paĝo 7a : "Esperanta kurso - En la Popola Universitato, dank'al la laborema ago de s.ro Giovanni Della Savia, studema pri tiu internacia lingvo, estis gvidita mallongan esperantan kurson, vizitita kun admirinda asidueco de okdeko da ambaŭseksaj partoprenantoj kaj, kio pli gravas, kun tre bonaj sukcesoj. Al ĉiuj oni disdonis ateston pri partopreno, disdonitaj je la fermo de la kurso fare de tiu Fakultatestreco. Tiu kurso, kiu ebligis fondi Esperantan Grupon en Udine, laŭeble estos ripetota por novaj lernantoj kaj plivastigota por tiuj, kiuj jam vizitadis lecionojn la pasintan printempon".

Noto 74 S.ino Andreina Della Savia rakontas ke iam la patro ricevis leteron adresita "Al s.ro Giovanni - Udino". Oni sukcesis trovi lin ĉar estis la stampo kun la verda stelo kaj la adresito ne povis esti ke li.

Noto 75 Edmondo Privat (Ĝenève, 17 aŭgusto 1889 - Rolle, 28 aŭgusto 1962), universitata profesoro pri Juro, verkisto kaj ĵurnalisto. Li eklernis Esperanton en 1903. Li estis redaktoro de la revuo "Esperanto" (1920 - 1934) kaj U.E.A.-Prezidanto (1924 - 1928). Proza kaj poezia verkisto en Esperanto, li estas konsiderata la historiisto de la Movado (*Vivo de Zamenhof*, *Historio de Esperanto*).

Noto 76 Eldonita je 500 ekzempleroj okaze de la 14a Nacia Esperanto-Kongreso (Udino, 28 - 30 julio 1929).

Noto 77 Karlo Bertolazzi (Rivolta d'Adda, 2 novembro 1870 - Milano, 2 junio 1916), verkisto, komediverkisto kaj ĵurnalisto. La novelo estis eldonita en la n.ro 3 (marto, 1922) de "L'Esperanto" (de paĝo 39a ĝis paĝo 43a).

Kovrilo de la gvidlibro



La membrokarto de Johano Della Savia

Della Savia estis konsiderita de Rafaelo Vannucchi “meritplena apostolo de Esperantismo en nia Friulo”.

« Mi sincere kredas ke Esperanto estas la sola solvo de tre grava problemo de la Homaro: Helpanta Ŝloŝillingvo; kaj mi ĉiam rigardos ĝian absolutan netuŝeblecon, kiel la simbolo de mia forteco kontraŭ atakoj kaj malamikoj de nia verko ».

Johano della Savia

“Mi sincere kredas ke Esperanto estas
la sola solvo de tre grava problemo de la
Homaro: Helpanta Ŝloŝillingvo; kaj mi ĉiam
rigardos ĝian absolutan netuŝeblecon, kiel
la simbolo de mia forteco kontraŭ atakoj kaj
malamikoj de nia verko”.

Johano Della Savia

Kunlaborante kun la Popola Universitato la 8an de decembro 1922, en la Aŭlo de la Reĝa Tecnika Instituto, li donis lecionon pri “La problemo pri la internacia lingvo kaj Esperanto” kaj li sukcesis enmeti esperantajn kursojn en la universitatan programon (En la *Katalogo de la verkoj ordigitaj laŭ verkistoj kaj titoloj* de la Nacia Esperanto-Biblioteko (Massa, majo 2008) ĝi havas la n.ron 1031, loko 400-128).
Tiele skribas prof. Morpurgo, Prezidanto de la Popola Universitato, per letero de la 4a de majo 1924 al Della Savia: “…Permesu ke miavice, kaj en la nomo de la tuta Estraro de ĉi tiu lernejo, mi adresas al Vi la esprimon de la plej sincera aprobo kaj de la plej kora gratulo pro la fervoro kaj la entuziasmo per kiuj Vi klopodis por disvastigi, ankaŭ en Udine, la internacian helpan lingvon. La Popola Universitato ĝojas kaj estas fiera apogi, laŭ niaj eblecoj, Vian laŭdindan iniciaton.”.
La kurso organizita en januaro 1925 estis prezentita en la n.ro 2, paĝo VII, de la “Itala Esperanto Revuo” tiele[78]:

> Krome la anoncoj aperigitaj en la loka gazetaro, oni sciigas ĉiujn Anojn, ke la 14an de januaro komenciĝos - sub la Popola Universitato aŭspicioj - publika Kurso de Esperanto, kiu daŭros ĉirkaŭ kvin monatojn. Instruisto estos nia Prezidanto, samideano Johano Della Savia, docento de la Itala Esperanto-Katedro.
> Tiu kurso okazos en lernoĉambro de la Reĝa Teknika Instituto, de 20.30 ĝis 21.30, lunde kaj merkrede.
> Oni ricevas aliĝojn ĉe la Sidejo de la Popola Universitato (strato Bartolini n.ro 3), ĉe Librovendejo Carducci, Librovendejo Miani, Papervendejo Flaibani kaj ĉe la pedelo de la Reĝa Teknika Instituto.
> La aliĝkotizo - fiksita de la supre menciita Popola Universitato - estas la jena:
> Lirojn 10 por anoj de la Esperanta Grupo kaj de la Popola Universitato.
> Lirojn 15 por ne anoj.

Noto 78 La 13an de novembro 1924 oni informis la grupon, ke la propono gvidi Esperanto-kurson estis akceptita de la Estraro sed oni ne povis komenci lecionojn ĝis kiam la Ministerio pri Instruado rajtigos la Lernejestron de la Reĝa Teknika Instituto disponigi ĉambrojn de la Popola Universitato.

La 1a grada ekzamenoj okazis dimanĉon la 14an de junio 1925 en Triesto, ĉe la Regiona Esperanto-Instituto de Julia Venetio, sidejo de la ekzamena komisiono de la Itala Esperanto-Katedro.

Cattedra Italiana di Esperanto
Istituto Linguistico fondato nel 1912

Certificato di I Grado

Aristide Colussi

La atesto de Aristide Colussi

En 1927, en Budapeŝto, li edziĝis al la hungara esperantistino Blanka Mandel (Budapest, 25 oktobro 1900 - Favaro Veneto, 14 aŭgusto 1964)[79] kaj el la ilia geedziĝo naskiĝis la 6an de januaro 1929 filineto, kaj oni donis al ŝi la nomon Andreina[80].


LA ESPERANTISTA EDZIĜO

de samideanoj S-ro Della Savia kaj F-ino Mandel, kiel sciigite en l'antaŭa N-ro, okazis en Budapest la 21-an (ne la 18-an) Aprilo.

Atestantoj je la ceremonio estis S-roj Barász Zsigmond kaj Sas Károly, kaj, kiel oficiala interpretisto, samideano Mahler Béla, ĉiuj el Budapest.

La geldzoj ne konas alian krom sian gepatran lingvon; nur Esperanto ludis kaj ludas la interkomprenigan rolon, kaj vere ĝi estas por ili da lingvo de la amo.


ESPERANTISTA EDZIĜO

Esperanto kaj amo ne konas barojn de lando kaj lingvo.

Kun ĝojo ni anoncas ke nia tre kara amiko kaj tre fervora samideano S-ro JOHANO DELLA SAVIA, pioniro de la Esperanto-movado en Udine, Delegito de UEA, Docento de la Itala Katedro de Esperanto, la 18 Aprilo edziniĝis kun F-no BLANKA MANDEL, Esperantistino el Budapest.

La edziĝa ceremonio okazis ĉe la Budapesta Urbodomo.

Jen aliafoje ame kunigitaj per Esperanto du diversnaciaj juneco j.

I.E.R., kiu jam de sia naskiĝo ŝatas la fidelecon de Samideano Della Savia, la klopodojn de li senĉese faratajn por ĝia disvastigo, en nomo de la tuta Itala Esperantista Familio, prezentas al Li kaj al lia hungara Edzino la plej varmajn kaj korajn bondezirojn.

Sub la ombro de nia insigno kreskiĝu la idoj de la nova «verda» Familio.



Edzo:	Edzino:	Jaro kaj loko de geedziĝo:
Andersson K. G. svela	Aak Anastasia estona	? ?
Blaise Pau belga	Jones Margaret angla	1910, Liverpool
Blinov Eŭgeno rusa	Maitinsky Klara hungara	1931, Moskva
Chomette Charles usona	Van der Veken Germaine belga	1929, Antwerpen
Della Savia Giovanni itala	Mandel Blanka hungara	1927, Budapest
Dittrichstein Viktor hungara	Peyrard Juliette franca	1929, Lyon
Egg Alfred svisa	Wells Jennie angla	1922, Basel

La geedziĝo de Della Savia en “Itala Esperanto-Revuo” kaj en *Enciklopedio de Esperanto*

Geedzoj Della Savia

Familio Della Savia

Noto 79 En “Itala Esperanta Revuo” n.ro 12 de decembro 1926, je la paĝo 227a estas eldonita ŝia traduko pri kristnaska novelo de Jokaj Mór (*Mortfrostita infano*). Ŝi estas sepultita en la Udine’a tombejo “Sankta Vito”, apude la edzo.

Noto 80 En 1917 la estontaj geedzoj Della Savia ekkorespondadis (li estis 20jara kaj ŝi 17jara) kaj, post la milito, Johano Della Savia plifoje iris al Budapest ĝis kiam oni celebris la geedziĝon kaj enloĝiĝinte en Udino.
Ĉiam s.ino Andreina rakontas, ke la patrino parolis germane, sed siaj gepatroj havis komuna la Zamenhofan lingvon kaj dank’al Esperanto ili povis sin koni kaj geedziĝi. Ilia geedziĝo estis skribita en *Enciklopedio de Esperanto*, je la paĝo 184a.
Giovanni Della Savia partoprenis en la 1a mondmilito kiel Ĉefkaporalo, efektiva de la 17a grupo de la 134a Bataliono Bombokanonoj.

La Udine'a Esperanta Grupo estis fondita la 6an de junio 1923 dank'al partoprenantoj en la esperanta kurso, kiu okazis de la 12a de aprilo ĝis la 5a de junio 1923[81].

La membrokarto de la Udine'a Esperanto-Grupo



La statuto de 1923

El la grupafondintoj, oni elektis la jenan Estraron : honora prezidanto prof. d.ro Henriko Morpurgo[82], efektiva prez. geom. Guido Franz, vic-prez. Amleto Gentilini, sekr.-kas. Johano Della Savia, membroj prof.ino Anneta Preindl, Johano Da Forno, libr. Hermano Deisosa, geom. Franko Bodini.
El tiuj, kiuj fondis la Udine'a Esperanto-Gruppo-n oni devas memori s.ron Viktorio Fop, kiu jam en 1909 estis aktiva kaj fervora esperantisto. Kiam li edziĝis, li transloĝiĝis al Torino kie naskiĝis siaj du gefiloj, Ĝina kaj Piero, al kiuj li transdonis krom la plej altajn moralajn principojn ankaŭ la amon por la Internacia Lingvo[83].

Noto 81 Antaŭe Johano Della Savia fondis grupon helpita de Johano Baptisto Corgnali, kiel oni legas je la paĝo 56a en "L'Esperanto" n.ro 5 - 6, de la 25a majo - 25a junio 1916.

Johano Baptisto Corgnali (Reana del Rojale, Udine, 29 septembro 1887 - Udino, 28 oktobro 1956) erudito kaj ŝatata lingvisto, profunda kaj forgesita famulo pri la friula kulturo, estis estro de la urba Biblioteko de Udine de 1924 ĝis 1953. Li estis aŭtoro kune kun Herkulo Carletti kaj Julio Andreo Pirona de la friula vortaro *Il nuovo Pirona* (*La nova Pirona)* (1935). En 1920 li estis sekretario kaj unua bibliotekisto de la Societât Filologiche Furlane (Friula Filologia Societo). En 1925 li estis en la listo de la grupo kun la adreso la biblioteko. En la enkonduko de la *Kompleta vortaro Esperanta-Itala* de Aĥilo Tellini (A. Paolet Eldonisto, S. Vito de Taljamento, 1931), je la paĝo VI oni legas: "La kompilinto dankas… kaj ankaŭ la altestimata d.ro G.B. Corgnali, bibliotekisto de la Joppi-a de Udine, kiu estis efike pri la helpa interpretado de kelkaj maloftaj kaj novaj vortoj.".

Al ĉi tiu eminentulo de pasia famulo kaj bibliotekisto, en 1992, oni dediĉis la salonegon de la "Joppi" por alfluigi ĉiujn legantojn "nepropraj" (t.e. kiuj legis nur verkojn kunportitaj el la hejmo, kaj ne tiuj oferitaj de la Biblioteko), kiuj ja fine obstrukcis la legosalonegon en palaco Bartolini igante ĝin ne frekventebla. En la salonego estas alfiksita la memorŝtonon: "Al Johano Baptisto Corgnali, Bibliotekisto de la "Joppi", 1924 - 1953".

Noto 82 Henriko Morpurgo (Udino, 6 aŭgusto 1891 - tie, 5 februaro 1969), instruisto, muzikologo, komponisto. Doktoriĝita pri Juro en Romo kaj pri Beletro kaj Filozofio, li havis multajn plublikajn taskojn (li estis Prezidanto de la Komerca Ĉambro kaj de la Sciencaj, Beletraj kaj Artaj Akademio de Udino de 1924 ĝis 1927) kaj li estis aktiva ĉe asocioj por la humaneca asistado.

Sur lia tombo estas skribita: "Li havis la doton de supera humanista inteligenteco - humanisto, filozofo, famulo pri artoj - iniciatoro de institucioj - kulturaj kaj bonecaj - daŭriganto de la patra ago - li estis en Friulo eminentulo - modesta kaj honorevita - li forkonsumis sian tutan vivon - por la aliaj - kiuj lin salutis majstro - kaj transigos - la eternan memoron".

Noto 83 Ĝina Fop (1929 - 8 julio 1963) fondis la Esperanta-Grupon de Carmagnola kaj ŝi estis unu el la ses fondintoj de la I.E.J. (palaco Carignano, Torino). Ŝi prizorgis la "Gazetara Revuo Itala" en la revuo "L'Esperanto". Ŝi forpasis pro embolio.

Piero Fop estis kunfondinto de la I.E.J. kaj Ĉefredaktoro de "Nova Sento", informilo de la J.E.J.. Li forpasis en 1999.

La 2an de majo 1924 ĉe lernoĉambro de la Reĝa Teknika Instituto okazis la unua eksterordinara kunveno de la grupo. Estis aldonitaj kelkaj modifoj en la statuto (abolicio de la kotizo po £ 5, malpliiĝo de la ĉiumonata kotizo po £ 1, redukto de la estrara nombro al 3 - Prezidanto (Aŭgusteno Cormons), Vic-prezidanto (Danto Valzacchi) kaj Sekretario-Kasisto (Johano Della Savia), abrogacio art. 6) kaj oni decidis ke la kunvenejo estu "Kafejo Romo" en strato Mercatovecchio (La "Kafejo Romo" situis je duonvojo, dekstre, veninte de la placo).



Leterkovertoj adresitaj al la Grupo ĉe "Kafejo Romo"

En la kunveno de la 2a de septembro 1924 oni priparolis kaj decidis la proponon pri la grupa flago. Por fronti elspezojn, oni malfermis monoferon por starigi fonduson "Pro Grupa Flago".


E S P E R A N T A G R U P O

ENVIAGO :

Pagitaj kotizoj 31a Oktobro n.j.	L.	595,30
" sumoj "pro grupa flago"	"	185,--
" kotizoj Nov. kaj Dec. n.j.	"	160,--
" " por la jaro 1924/25	"	48,--
E n t o t a l	L.	988,30

ELEMESOJ :

Diverses elspezoj de la unua de Januaro n.j. 31a bodiaŭ	L.	522,35
DISPONEBLA SUMO . . .	L.	465,95

UDINE, la 27aN de Novembro 1924.

LA SEKRETARIO-KASISTO

La kasraporto de 1924
kun la titolo "Pro Grupa Flago"

La sekvantan monaton oni faris peton al la Komunuma Aŭtoritato pri la asigno de ejo por destini ĝin al societa sidejo, bedaŭrinde kun nea rezulto.
La grupo iĝis multenombre kaj en la kunveno de la 27a de novembro 1924, ĉe la sidejo de la Agentaj Unio, oni decidis reporti la numeron de la Estraro ĝis 7, fiksinte por ĉiu el ili la jenajn oficojn: prez. Johano Della Savia, vic-prez. libr. Celeste Giordani, sekr. Galliano Dolce, kas. Romano Artuso, tri konsilianoj (M.o Mario Cavagna, Franko Monterisi kaj Galliano Gabai).
En la sama jaro 1924, oni fondis en Udino[84] kaj en Goricio la Fervojistajn Esperanto-Grupon.

2 1 3 4

La inaŭguro de la Socia Standardo
1. Johano Della Savia, 2. Franko Bodini, 3. Anneto Preindl. 4. Jakobo Beorchia
Dorse de la bildo estas algluita skribatan bileton "Memore al la esperantista fervojisto Jakobo Beorchia (unua dekstre la standardo)". La bildo estis donacita en 1982 de famiglio Beorchia de Tarcento: s.ino Iole kaj gefiloj Klaŭdo kaj Maria, kuniĝita de bileto: "Kun multe da bondeziroj al la Grupo Espero Friuli de Udino memore al la esperantista fervojisto Jakobo Beorchia la gefiloj Klaŭdo kaj Maria Beorchia"

Noto 84 En 1927 la grupo aliĝis al Postlaboro (fondita en 1926 laŭ leĝo).

Dimanĉon la 4an de januaro 1925, en la Socia Teatro[85], laŭ la sono de la esperanta himno ludita per muzikistaro de Passons estrita de muzikinstruisto D'Arienzo, okazis la inaŭguro de la "Verda Standardo" de la Udine'a Esperanto-Grupo. Ĉeestis civilaj kaj lerneja aŭtoritatoj de Udino kaj multaj lokaj komercaj kaj industriaj elstaruloj. Partoprenis diversaj reprezentantoj de la esperanta grupo de la Udine'aj fervojistoj kun kape Jakobo Beorchia[86], de Julia Venetio, el kiuj Karlo Simonis, Wanda Asquini kaj Guido Stefanelli[87], de Jugoslavio, el kiuj Ernesto Wisk kaj ankaŭ la fama d.ro Polidoro Polidori, kiel reprezentanto de la Regiona Instituto de la Julia Venetio kaj de la I.E.F., kies sidejo tiam estis en Bari.
Post kiam d.ro Polidori parolis mallonge pri la Itala Esperanto Katedro kaj pri la I.E.F., li sin adresis al la Udine'aj esperantistoj kaj diris interalie: "… La verda standardo, kiun hodiaŭ vi flirtigas, estu lokita ne en la ombro sed en la lumo de nia glora Trikoloro, kiu, spegulante lumecon de nia bela itala ĉielo, ĉion lumigas ĉirkaŭ si, kaj kun la varmo de la patria amo, kiu en sia ruĝa koloro simboliĝas, ĝi varmigas la koron de ĉiu italo, kiu indas vere de tiu nomo, ĉie en la mondo li vidu ĝin flirtigi kaj brili en la suno. …".
La ceremonia patrino, prof.ino Anneta Preindl, forprenante la blankegan vualon kovrante la standardon, diris laŭte: "Tiu espera, ama kaj paca drapo povu signi novan eraon de konkordo inter la homoj de bonvolo".
Oficiala oratoro estis d.ro kav. prof. Arturo Ghez[88] de Triesto, Estro de la Esperanta Instituto de la Julia Venetio, kiu finis sian paroladon per himno al la esperanta idealo kaj al Italio.

SALUTO AL UDINE

ARTURO GHEZ

Saluto al Udino de Arturo Ghez

La grupo ne havinte definitivan sidejon, en la kunsido de la 20a de novembro 1925 prez. Johano Della Savia informis la Estraron ke la grupo enmetigis anonceton en la ĵurnalon "Patria del Friuli" (Friula Patrio) por trovi ejon kiel asocia Sidejo. Bedaŭrinde neniu el la ofertoj estis akcepteblaj kaj senfruktaj estis la obstinaj elserĉoj, kiujn la Estranoj faris en la urbo por doni al Grupanoj dignan kunvenejon kaj samtempe favori pli grandan aktivecon kaj pli profitdonan kaj regulan laboradon de la Estraro.

Noto 85 La Teatro Socia estis konstruigita en 1770 dank'al grupo da elstaruloj de 17 Udine'aj familioj nobelaj. En 1764 la Societa Konsilio havis la rajtigon de la Venecia Respubliko kaj la 17an de Julio de la sama jaro, okaze de la unua Konsilia kunsido, en la Kunvenejo de la "Nobelulaj Rezidejo", oni difinis la unuajn ekonomiajn agojn por la teatra konstruo. La Nobela Teatro Socia, konstruita de ĉefmasonisto Sebastiano Domenico Lotti de Bertiolo per projekto de la Udine'a inĝeniero Tiberio Maieroni, estis inaŭgurita la 6an de aŭgusto 1770 per serioza opero pri mitologia temo: *Eurione*.
En la teatro oni faris restaŭradojn en 1795 kaj aldonis plibonigojn en 1824 - 1825. Radikala modifo, ene kaj ekstere de la teatro, estis farita per projekto de la udina arkitekto Andreo Scala en 1852. De la 23a de majo 1852 la nomo de la teatro ne plu estis "Nobela Teatro Socia" aŭ "Nobela Teatro de la urbo Udine", sed simple "Teatro Socia".
La Teatro Socia estis solene remalfermita kaj inaŭgurita per la opero *Rigoletto* de Giuseppe Verdi, la vespero de la 23a de julio 1853, unafoje lumigita per la nova gaslumo.
En 1907, post kiam oni malfondis la malnovan Socion de la teatro, ĝi estis aŭkciita, kune kun la tuta meblaro tie konservita, al Jozefo D'Odorico kontraŭ 45.000 liroj.
La 16an de marto 1908, post la restaŭrado farigita de la proprietulo, kiu aĉetis la konstruaĵon komence por transformi ĝin en hotelon, la teatro estis denove inaŭgurita per la opero *Mefistofele* de Arrigo Boito, sed bedaŭrinde ĝi havis mallongan vivon. Fakte la 11an de decembro 1911 incendio detruis ĝin definitive. (Ŝtata Arkivo de Udine, *Archivi di Famiglie, Persone e Società. Archivio: Teatro Sociale di Udine* (Arkivoj de Familioj, Personoj kaj Societoj. Arkivo: Teatro Socia de Udino).
La Teatro Socia situis en la stratangulo inter strato Stringher (eks strato de Teatroj, titolita al la Udine'ano Bonaldo Stringher en 1931) kaj strato Savorgnana.

Eurione, libreto de Antono Papi, muziko de Ferdinando Jozefo Bertoni (Salò, Brescia, 15 aŭgusto 1725 - Desenzano del Garda, Brescia, 1 decembro 1813).

Noto 86 Mi min adresis al la filo Klaŭdo sed li havis nenion pri la koncernata periodo, krom vizitkarto de Johano Della Savia datita 18an de aprilo 1931 enhavante gratulojn kaj bondezirojn por la gepatraj geedziĝo.

Noto 87 Pri ilia biografio vidu: *Cent jaroj de Esperanto en Triesto*, Biblion Eldonejo srl, Milano, 2008.

Estis proponita tial, de Rafaelo Vannucchi[89], fondi kategorion de grupanoj, kiuj sin engaĝu doni monatan sumon, krom la kotizon, por surpreni la elspezon pri ejo luita. La propono ne estis prenita en konsidero ĉar en la praktiko malfacile ĝi povus sukcesi, ĉar la kotizo estus tre alta kaj tiuj engaĝoj povus ĉesi pro ia kaŭzo, konsekvence la grupo sin trovus en malagrabla situacio.
La 3an de decembro 1925, ĉe la Popola Universitato, okazis la jarkunveno. Oni elektis: prez. Franko Bodini, vic-prez. Rafaelo Vannucchi, sekr. Johano Della Savia, kas. Amabile Zilli, konsilanoj Libero Grassi, Mario Cavagna, libr. Johano Galvani, Galliano Dolce, Romano Artuso.
En la sama jaro oni sendis al Kvestoro la asocian statuon kaj la grupan liston por la rekono, laŭ la leĝo, kiel "publika Asocio".
El tiuj, kiuj en Fontanafredda klopodis por disvastigi Esperanton indas memori d.ron Alberto Bortoluzzi. Li ĉiam propagandis la Internacian Lingvon inter kolegoj kuracistoj kaj siaj pacientoj. Li forpasis la 3an de februaro 1914 en malsanulejo, en Venezia.
En Goricio tre aktiva estis s.ro Virgilio Foschian de Crauglio, kiu tre multe klopodis por reorganizi Esperantismon[90] post la milita periodo. Estis la jaro 1922 kaj lia aktiveco estis diskonigita per gravaj artikoloj de la ĵurnalo de Goricio "Il popolo friulano" (La friula popolo). En 1929 Virgilio Foschian estis Delegito U.E.A. en Crauglio, urbo je ĉirkaŭ 25 Km sudoriente de Udino.

Virgilio Foschian

Tre aktiva en la urbeto Sagrado estis s.ino Anĝela De Martinis Stacul.
La 5an de februaro 1926 Franko Bodini proponis sendi al grupanoj monatan informilon. Post la pridiskuto pri la titolo, oni aprobis tiun proponita de Cavagna: "Esperanta folieto" itale skribita. Por ŝpari tempon kaj monon Della Savia proponis unuigi informilojn: tiun de fervojistoj kaj de la grupo sed ne ĉiuj estis akorde kaj fine oni decidis ke la grupoj moviĝos en konkordo laŭ vojoj diversaj por atingi la komunan celon.
Poste, la 19an de februaro 1926, oni titolis definitive la informilon kiel grupa organo "Friula Esperantisto" kaj pretigis la aktaron por la koncesio de la legitimaĵo de Tribunalo. Samtempe oni ekkontaktis Paolet-on por peti antaŭkalkulon pri la presado de la informilo.



La informilo "Friula Esperantisto"

Noto 88 Arturo Ghez (Triesto, 11 januaro 1873 - tie, 28 julio 1950), aktiva esperantisto de Triesto (en 1906 li fondis la Esperantistan Klubon, kiun li estris dum multe da jaroj) kaj aŭtoro de esperantaj verkoj, li havis italigita la familian nomon en Ghezzo (Geco) dank'al la dekreto 10 januaro 1926. Malsana de kelkaj jaroj, li estis devigita de longe al senmoveco. (Pri la biografio de prof. Arturo Ghez vidu: *Cent jaroj de Esperanto en Triesto*, Biblion Eldonejo srl, Milano, 2008.

Noto 89 Rafaelo Vannucchi estis en Udino unuafoje la 26an de majo 1915 matene, kiam lia toskana regimento, marŝante al landlimo, haltis iomete apud Pordego Akvileio. Post la milito li esperantiĝis "konvinkita" de Galliano Dolce kaj Johano Della Savia.

Noto 90 En 1911 en Goricio jam estis la grupo Unione Esperantista Friulana (Friula Esperanto-Unio). En 1913 la Estraro estis: prez. Jozefo Ipavitz (Instruisto de la loka Katedro), vic-prez. R. Paternolli, sekr. P. De Marchi, kas. Rod. Carrara, direktoro G. Genuizzi, revizoroj Mod. Seculin kaj Ed. Scomina.

Jozefo Ipavitz, komercisto, forpasis en 1920. Li estis tre bona propagandisto kaj fondinto de la Friula Esperanto-Unio, kies prezidanto li estis. Li prelegis kaj gvidis kursojn. Plie, li adoptis Esperanton por sia komerca korespondado al eksterlando.

Post multaj petoj faritaj al lokaj Aŭtoritatoj por la atribuo de sidejo, fine la Urba Konsilantaro donis ejon, senpage, ĉe eksTribunalo en strato Dell'ospedale n.ro 1d kune kun la Teatra Societo "Petro Zorutti" [91].
La 5an de majo 1926 okazis la unua kunveno en la nova sidejo kaj la sekvantan tagon oni inaŭguris ĝin. Vannucchi, Della Savia kaj Dolce havis la taskon prizorgi la organizadon. Prezidanto Franko Bodini post kiam dankis la partoprenantojn kaj precipe la Podestaton pro la koncesio de la ejo, li parolis pri la grupa historio kaj aktiveco, aldonante ke baldaŭ oni eldonos historian gvidlibron pri Udine farita de Johano Della Savia, Delegito U.E.A.[92]. Poste oni disponigis propran ejon situanta en strato Beato Odorico el Pordenone n.ro 1.

Poŝtkarto sendita al la nova sidejo

La 18an de junio 1926 tre sukcesis la unua publika prelego de Libero Grassi pri la "Historio pri Udino" [93].
Dum la ĝenerala kunveno de la 21a de decembro 1926 oni decidis aldoni modifojn en la statuto kaj samtempe prizorgis la monkolektaton por ŝtata prunto de "Littorio" (Liktora) je liroj 2.000[94].
Laŭ la propono de prezidanto Bodini, la 5an de januaro 1927 oni aprobis la aliĝon al O.N.D.[95], kiel kultura Esperanto-sekcio, post kiam alvenos la rajtigon de la I.E.F. kaj de la sama O.N.D.. La grupo estis la unua Udine'a asocio, kiu aliĝis al "Postlaboro" [96].

Noto 91 Ĝis tiam la adreso de la Udine'a Esperanto-Grupo estis: ĉe Johano Della Savia, strato Di Toppo n.ro 5/3, Udine.

Noto 92 La *Gvidlibro pri Udine* (Itala-Esperanto) estis eldonita okaze de la 14a Nacia Kongreso (Nacia Libertempa Institucio, Udine'a Esperanta Grupo, Broŝureto n.ro 1, Pres. A. Paolet - S. Vito de Tal. - 1929 VII). La sama *Gvidlibro* estis eldonita en "L'Esperanto" de 1929 (de paĝo 35a ĝis paĝo 39a, de paĝo 49a ĝis paĝo 52a kaj de paĝo 65a ĝis paĝo 71a).

Noto 93 Libero Amedeo Grassi (pseŭdonimoj: Magri Nero, Algiso Berris) (Udine, 1866 - tie, 3 aprilo 1937), ĵurnalisto, gravulo de la Udine'a kultura, estis la fondinto kaj la estro de la Associazione Friulana degli Artigiani (Friula Metiista Asocio), kaj li sin dediĉis al studoj je loka karaktero. Li estis defendanto de la iredentismo, intervenisto. En 1915 li fondis kaj estris "Il Popolo friulano" (La friula popolo), organo de faŝismo kaj informisto pri la laboristaj bezonoj. Li estis korespondanto de "Secolo" (Jarcento), de "L'idea nazionale" (La nacia opinio) kaj de "Popolo d'Italia" (La Itala popolo) (de 1917 ĝis 1922). Li verkis ankaŭ friulingve, verse kaj proze. Kav. Libero Grassi, konanto pri friulaj artaĵoj, ĉerpante la inspirton el popola ribelo kiu okazis en Palmanova kontraŭ francoj de la Revolucia periodo, verkis originalan libreton kun la titolo *I Gespui furlans* (La Friulaj Vesproj), historia dramo ludita de muzikisto Franko Escher. La operon neniam oni ludis. Artikolo pri la opero estis eldonita en "Il Giornale del Friuli" (La Friula ĵurnalo) de la 19a de aŭgusto 1924.
Artikolo pri lia forpaso, aperis en "Il Gazzettino" (La Gazeteto) (de Nordo-Eosto, Venezia) de la 4a de aprilo 1937. La nekrologo, aperita ja la paĝo 2a de "La Gazeteto" de mardo 6a aprilo 1937, raportas: "Sabaton matene forpasis kav. Libero Grassi. Pro la specifa deziro de la forpasinto, post la entombigo, la edzino Maria Zimmermann, gefiloj Rosina, Kandido, Adolfo kaj geedzoj Trevisani donas la tristan mortanoncon kaj dankas ĉiujn, kiuj iel partoprenis en ilia ĉagreno. Udino, la 5an de aprilo 1937 XV".
Dum vizito al forpasitaj amikoj, mi trovis, laŭ hazarde, en la tombejo "Sankta Vito", la tombon de Libero Grassi. Bedaŭrinde ne estis lian foton, kaj ankaŭ tiun de familianoj tie sepultitaj. La tombo troviĝas je ĉirkaŭ 10 metrojn apud tiu de Aldo Chiaruttini.

Franko Escher (Triesto, 1859 - Torino, 1939), pseŭdonimo Franko Del Frassino, muzikisto. En 1880 li dizertis de Aŭstrio (estis la iredentisma periodo), por transloĝiĝi al Udine. Li estis unu el la plej bona famulo pri popola muziko friula. Li instruis kanton kaj muzikon, fondinto de ĥoraj societoj, muzikverkisto. Lia verkaro estas vasta kaj diversa: mesoj, operoj, operetoj, romancoj. En 1900 li eldonis en Udine vilotojn kaj friulajn kantojn.

Noto 94 La "Prestito del Littorio" (Liktora deprunto) (tio estas la konvertado de la Ŝtataj Obligacioj kontraŭ konsolidaj depruntoj) estis trudita la 6an de Novembro 1926 por la deviga konsolidigo de B.O.T. ordinaraj, 5jaraj kaj 7jaraj.

Noto 95 Nacia Libertempa Institucio, amuza organizo por laboristoj proponita de la tiama reĝimo. Establita per Reĝa Dekreto de la 1a de majo 1925 n.ro 582, transigita al leĝo de la 18a de marto 1926 n.ro 562 (La O.N.D. "celas antaŭenigi la sanan kaj profitan liberan tempon de laboristoj, per starigoj por plibonigi la fisikajn, intelektajn kaj moralajn kapablojn").

Noto 96 Dum la kunveno de la 7a de decembro 1929 la ĉeestantoj aplaŭdis la jenan telegramon: "Nacia Libertempa Institucio, Romo. La tuta anaro Udine'a Esperanta Grupo kunvenita en la jara kunveno aliĝinto provinca estro doktoro Marcovigi fieras esti el la unuaj peti aliĝon al la Institucio konfirmas kompletan sindediĉon al Faŝismo intencante per Esperanto disvastigi Italion eksterlande salutojn Bodini prezidanto".

La aktiveco de la Udine'a grupo estis laŭdita de la Federacio kaj en la revuo n.ro 5 de februaro 1927 oni legas: "…por la ekzempla zorgemo kaj por la rapideco, al kiuj ĝi inspiras siajn rilatojn kun la I.E.F., montrante ke ĝi tre bone komprenis la kunordigan funkcion; ĉar gi zorgis informi la I.E.F.-on pri sia intenco fari lokan agadon ĉe aliaj Institucioj, ĝustatempe por ricevi el Federacio la permeson aŭ la necesajn informojn kaj rimarkojn; fine ĉar ĝi kontribuis al la prunto de "Liktora" per pli ol 1.500 liroj kolektitaj inter la Grupanoj".
La 4an de septembro 1927 okazis funebra ceremonio memore al Mario Cavagna, malkovrinte sur la tombo artan memortabulon el fero kaj latuno, apogita sur trigamba el fero, kun surgravuritaj memorvortoj: "ĉio el vi ne mortis" [97].
La 23an de aprilo 1928 la grupo gastis la "mondvojaĝanton" Nikolao Giuroff, bulgara, kiu, en la sidejo, li prelegis pri la travivaĵoj kaj pri la moroj, kutimoj k.t.p. de la popoloj, kiujn li vizitis. Partoprenis en la prelego ankaŭ la Delegito U.E.A. en Eisenerz, Rudolf Josef Schaur.
Kun la paso de la jaroj la grupa aktiveco ĉiam pli iĝis intensa kaj la aliĝoj iĝis multnombraj. La sidejo iĝis malgranda kaj oni ekbezonis ejon pli granda. La grupo havis intencon transloĝiĝi al sidejo de la "Confraternita Calzolai" (Pia societo ŝuistoj), nun sidejo de la Istituto Nazionale Assicurazione Infortuni sul Lavoro - I.N.A.I.L. (Nacia Instituto Asekuro Kontraŭ Akcidentoj), kiu, sole, okupis vastan ejon en la sama palaco kaj la 27an de aprilo 1928 oni sendis peton al la Urbestro sed sen rezulto. Oni ripetis la peton je la jarfino al nova Urbestro, kiu estis pli ema ekzameni ĝin.
En junio 1928 Vannucchi transloĝiĝis al Tarvisio pro laboro kaj la 14an, antaŭ ol lia transloĝiĝo, Johano Della Savia dediĉis poezaĵon al li.

SALUTO AL VANNUKI RAFFAELLO

Kun permeso, laŭ kutimo,
Per nia bela Esperanto.
Mi salutas vin en… rimo
Valorega batalanto.
La novaĵ' estis malbela,
Suferiga, korpremanta,
Estas bato ja kruela
Por la Grupo Esperanta.
Se al iu ajn maŝino
Mankas peco, ĉiu scias,
Ke nur povas lam' vivadi
Aŭ ke tute ne funkcias.
Mi ne volas ja profeti
De la Grupo la disfalon,
Ĉar, tutcerte, bonvoluloj
Daŭrigados la batalon.
La labor' poresperanta
Estas ne nur pure ĝua;
Estas ĝi afer' plej sankta,
Vere homa kaj instrua.
Bonan, koran, lertan, viglan
Perdas ni Vicprezidanton;
Sed movado nia ne perdos
La senlac' kunbatalanton.

Vortoj mankas por, ĝisfunde,
Danki Vin, Amiko kara,
Kaj por laŭdi Vian laboron
Por la Grupo, senkompara.
Sekvu Vin, Samideano,
La plej kor' deziro nia:
Ke Esperanto disvastiĝu
Sur la grundo Tarvizia.
Ĉar mi estas konvinkita
Ke persiste Vi laboros
Ĝis la lingvo Zamenhofa
En Tarvisio brile floros.
De l' Ĝeneva U.E.A.,
Kun honoro kaj merito,
En Tarvisio jen la nova
Plej baldaŭa Delegito!
Kaj mi finas dezirante
Ke Vannucchi "Rafaelo"
Ne ĉesigu la laboron
Por la bono kaj la belo.
De nia kara Esperanto
Por ke ĝi, ero post ero,
Progresadu plej triumfe
Ĉe l' popoloj de la tero.

Malgraŭ lia transloĝiĝo, la 26an de junio 1928 prezidanto Bodini informis lin pri lia daŭro kiel Vic-Prezidanto de la grupo ĝis la venonta ĝenerala kunveno.
Post lia forveturo estis necese kunmeti "Instruistaro"-n por daŭrigi kursojn, ĉar tiuj restitaj (Della Savia kaj Dolce) ne sufiĉis por plenumi petojn.
La 6an de oktobro 1928 en la sino de la grupo oni fondis Studentan Sekcion, kies aliĝintoj estis studentoj de la Reĝa Teknika Instituto "A. Zanon". La estraro estis: prez. Maŭrico Budai, vic-prez. Johano Placereani, sekr. Rikardo Giordani, konsilantoj Bruno Tonon kaj Eleia Sambuco. Ĉi tiu sekcio dependis sub ĉiu rilato de la grupo, kiu reguligis ĝian aktivecon akorde kun la socia statuto.
Laŭ la validaj normoj, la fondo de la Studenta Sekcio kaj la rilata estraro oni komunikis al la Udine'a Kvestoreco per letero registrnumero 708 de la 5a de februaro 1929.

Noto 97 Anĝelo Zoratti estis la artaĵaŭtoro. Mario Cavagna forpasis la 1an de septembro 1926 en la Udine'a hospitalo. Li estis 38 jarojn aĝa.



1 5 2 3 4

Udine'a Esperanta Grupo - 26.1.1929
1. prof. Aĥilo Tellini, 2. Johano Della Savia, 3. Franko Bodini, 4. Armando Blasoni, 5. la Zamenhofa busto estas en la ĉambro de prof.ino Franciska Tamburlini, ĉe la Biblioteko "V. Joppi", kunportita de G.B. Corgnali, kiu tiam estris ĝin. Skulptisto: J. Maske, kiel oni povis legi.

La 26an de januaro 1929 oni elektis la novan Estraron: prez. Franko Bodini, vic-prez. Galliano Dolce, sekr.-kas. Amabile Zilli, helpa sekr. Johano Della Savia, konsilianoj Johano Da Forno, Rafaelo Vannucchi, Anĝeleto Zoratti, revizoroj libr. Armando Blasoni kaj geom. Piero Morteani, bibl. Sabina Giordani.
La 6an de februaro 1929 la Studenta Esperanta Sekcio ekeldonis la bultenon "La voĉo de studentoj". En la "malfermita letero al legantoj" Maŭrico Budai skribas: "…La bulteno enhavas, eĉ mallonge, ĉion, kio povu interesi la esperantan lernanton aŭ la simplan simpatianton. Fakte pli ol unu paĝo estis rezervita al tiu lasta, enhavante tre rapidan kaj facilan kurson… Tamen por iuj el vi la bulteno eble estos plua trompo, sed ne paŭtu kontraŭ ni se ĝi ne estas adekvata al viaj aspiroj… Por la momento ni malfermis la vojon kaj nia "informilo" bone aŭ malbone ekvidis la lumon…".
Sekve de la 13a Kongreso kiu okazis en Peruĝo, Udino estis elektita por gastigi la 14an Nacian Esperanto-Kongreson. Post la jesa respondo al Prezidanto de la I.E.F., Gen. Karlo Cordero Di Montezemolo[98], oni proponis la prezidantecon de la Organiza Komitato al la Udine'a Urbestro.
La 15an de januaro 1929 oni decidis la Kongresajn taskojn:

Bodini	ekkontaktos la lokajn Aŭtoritatojn;
Dolce	okupiĝos pri la sekretarieca laboro;
Zilli	estos la kongresa kasisto;
Della Savia	klopodos pri la ekspozicio de esperantaĵoj kun la helpo de bibliotekistino Celeste Giordani;
Zoratti	klopodos pri la loĝigo de kongresanoj;
Vannucchi	pretigos priskribon *Udino kongresa urbo*[99];
Blasoni	helpos Dolce pri la sekretarieca laboro.

Tiele skribas pastro Jakobo Bianchini, de Cimpello de Pordedone, la 28an de januaro 1929 al udinanoj: "Estimataj Udine'aj samideanoj, mi dankas pro la anonco kaj mi tre ĝojas eksciante pri la aktiveco kaj la kostanteco de tiu Esperanta grupo, kaj ankaŭ mi ĝojas vidante realiĝi mia sonĝo je antaŭ 24 jaroj havi en Udino la Esperantan Kongreson. Mi jam estas maljuna por daŭrigi mian persistan antaŭmilitan laboron, sed mi esperas fari ankoraŭ ion por nia lingvo Esperanto, kaj de nun mi promesas mian ĉeeston en la Udine'e Kongreso. Bonvolu akcepti la tutan mian simpation por la laboro de tiu grupo kaj mian malgrandan kunlaboradon. Baldaŭ mi esperas fari vojaĝon al Udino por konstati propravide la aktivecon, kiun oni faras tie. La plej maljuna el la friulaj esperantistoj, kiu mi estas, mi ne povas ne priatenti la progresojn pri nia kara lingvo en nia Friulo". (La letero mane skribita estas je la paĝo 32).

Noto 98 Karlo Cordero di Montezemolo (Mondovì, Kuneo, 7 aŭgusto 1858 - Caletta de Castiglioncello, 2 aŭgusto 1943), markizo, generalo de la rezervo. En 1925, okaze de la 10a Nacia Kongreso en Bari, oni lin elektis Prezidanto de la I.E.F., ofico, kiun li estris longtempe. Ĉiam en 1925 li fondis la Livorno-an Esperantistan Grupon.

Noto 99 *Udino - la urbo de la Kongreso. Memoroj de infanteriano esperantista* de Vannuki estis eldonita je la paĝo 5a en "L'Esperanto" 1929.

La rekonkarto, kiun oni donis al li la 10an de julio 1929, havas la n.ron 37.

CONCESSIONE SPECIALE I

XIV° CONGRESSO NAZIONALE DI ESPERANTO

UDINE, 28-29-30 LUGLIO 1929 - VII

TESSERA PERSONALE DI RICONOSCIMENTO N. 37

del Sig. Sacerdote Giacomo Bianchini

partecipante al Congresso.

Udine, 10 luglio 1929 - VII

IL PRESIDENTE DEL COMITATO

FIRMA DEL TITOLARE

Termini di tempo per i viaggi:

andata: dal 20 luglio al 28 luglio 1929

ritorno: dal 30 luglio al 12 agosto 1929

La rekonkarto de pastro Bianchini

La 9an de julio 1929 oni decidis ke la grupa Estraro estu ankaŭ la Organiza Komitato de la Kongreso kaj tio estas: prez. gr.of.adv. grafo Ĝino Di Caporiacco[100], vic-prez. geom. Franko Bodini, membroj Galliano Dolce, Johano Della Savia, Johano Da Forno, Amabile Zilli, Anĝelo Zoratti[101].
La 14a Itala Esperanto-Kongreso okazis sukcese de la 28a ĝis la 30a de julio 1929[102]. Oni elektis tiun periodon por ne surmeti la Kongreson kun la Universala en Budapeŝto.

Memorigaj kartoj de la kongreso

Glumarkoj de la kongreso

Noto 100 Ĝino di Caporiacco (Udino, 16 majo 1878 - tie, 7 oktobro 1933), advokato, Urbestro de Udino, liberala deputito por Sankta Danielo de Friulo (Urbeto apud Udino). Li estis Prezidanto de la Friula Militorfa Instituto en Rubignacco.

Noto 101 Anĝelo Zoratti (1892 - Kasale Monferrato, Aleksandrio, 31 decembro 1977), fervojisto kaj Kavaliro de la Ordeno de Viktorio Veneto, vivis dum multaj jaroj en Udino kie li estis lernanto de Aĥilo T Tellini. Li estis unu el la italaj esperantaj fervojistoj tre aktiva antaŭ la Granda Milito. Anĝelo Zoratti, kune kun Jozefo Quarone, en 1961 eldonigis en la I.F.E.A.-revuon *Itala fervojisto - Informa bulteno* la terminojn pri lokomotivoj.

Jozefo Quarone (Voghera, Pavio, 1884 - Milano, 8 marto 1970), fervojisto, eklernis Esperanton en 1909, kiam li estis juna fervojisto en Sampierdarena. Post 10 jarojn li transloĝiĝis al Vogera kie li gvidis E.-kursojn kaj fondis la E.-grupon. En 1933 li transloĝiĝis al Milano kaj fondis du grupojn inter fervojistoj. Li verkis *Kompleta traktato por la studo de la internacia lingvo Esperanto* eldonita de la Milano-a grupo "Concordia" (Konkordja) en 1949, kaj li estis unu el la plej gravaj pioniroj el Esperantismo. Okaze de la Fervojista Eŭropa Konferenco de la 1a - 3a de aprilo 1949 en Vieno, li gvidis la italan delegacion kaj subskribis la deklarojn kaj la proponojn akceptitaj de la Konferenco. Li donacis multe da Esperantaj libroj al la Biblioteko "Ricottiana" (Rikottiana) de Voghera. Li estis membro de U.E.A. kaj de I.F.E.F. ekde ĝia fondo (Amsterdam, 4an de aŭgusto 1948).

Noto 102 Prof. Ivo Vianello, Lernejestro ĉe la Industria Lernejo "Benito Mussolini" de Gemona de Friulo, pretigis artan desegnon por memoriga poŝtkarto de la Kongreso. Bedaŭrinde la tipografo de la venecia "Il Gazzettino" perdis ĝin pro tio oni anstataŭigis ĝin per la "Udine'a Ŝildo-Blazono". En 1921 prof. Vianello estis estrarano de la I.E.F..

En tiu okazo - unuafoje en nacia kongreso de Esperanto - en la preĝejo Sankta Jakobo oni celebris la Sanktan Meson en Esperanto, zorge de franciskano Modesto Carolfi[103].
Kunmetis la Kongresan Prezidadon: prez. prof. Georgo Canuto, vic-prez. d.ro Arturo Ghezzo, sekr. Galliano Dolce kaj Rafaelo Vannucchi.
La glumarko havas la n.ron 170 de la ELF-AREK-katalogo.
La kongreso, al kiu aliĝis 150 italaj geesperantistoj el trideko da urboj kaj 7 eksterlandanoj el Estonio, Ĉeĥo-Slovakio, Francio, Germanio kaj Svisio, estis malfermita en la salonego de la Lionello-a Loĝio, en placo Viktorio Emanuelo (nun placo Libereco), sidejo de la malnova urbodomo, de la Udin'ea Urbestro, grafo Ĝino Di Caporiacco kaj oni priparolis la jenajn temojn:
- la nova organizado de la revuo, kiu de 1930 ĝi estos pli luksa kaj pli riĉa, ĉiam presita ĉe la eldonisto Paolet;
- la propagandaj perspektivoj kaj la aplikado de Esperanto al turismo, komerco kaj arto;
- la fondo de la nacia arkivo pri la Esperanta materialo;
- la elekto de la sidejo por la venonta Kongreso, por kiu kandidatis Komo.
En lia inaŭgura parolado, la Urbestro diris interalie: "… Utiligi universalan lingvon, kiu, en la rilatoj inter popoloj, forprenas la privilegian uzadon de eksterlandaj lingvoj, estas nobla tasko, kiun ĉiuj italoj devas solene apreci kaj intense aprobi. Kaj se oni alvenos al la atingo de tiu idealeco, nia nacia spirito estos gaja, des pli, ĉar ni estas filoj de tiu granda patrino, kiu kondukis al la imperio konkerita per forto, la beleco de la propra lingvo, tial ni ne toleras, ke lingvoj kaj eksterlandaj terminoj naskitaj kiam falis ĝian potencon, invadu kaj perturbu la purecon de nia lingvo…".
El la aktivecoj organizitaj okaze de la Kongreso, oni devas memori: la inaŭguron, en Teatro "Puccini", de la standardo de la Triesta Esperantista-Klubo, ceremonia patrino grafino Elodia Di Caporiacco, edzino de la Udine'a Urbestro; la unuan Nacian Esperanto-Ekspozicion[104], organizita de Franko Bodini[105] en la ĉambro apude la Konsilia Salonego; teatraĵon, kiu enhavis la prezentadon de la unuakta komedio *Natale* de Dario Niccodemi[106] esperantigita *Naskiĝo* fare de Gaetano Facchi[107], kaj ludita pere de aktoroj de la Grupo de Brescia (fraŭlinoj Brunelli, libr. Bruneri kaj libr. Tosana) kaj *La Vittima - Viktimo* de Silvio Zambaldi[108] ludita pere de la trupo "La Città di Udine" (La Urbo Udino) estrita de Carlo Serafini kaj folkloran spektaklon kie la Udine'a ĥoro "Alberto Mazzuccato" estrita de A.D. Cremaschi kantis kelkajn el la plej belaj friulaj "vilotoj" [109].

La premstampo de la Nacia Esperanto-Muzeo

Noto 103 Pastro Modesto Carolfi (Sankta Georgo Piacentino, 5 aŭgusto 1884 - Bolonjo, 1 julio 1958), nomata "Apostolo de Esperanto en Emilia Romagna", estis la fondinto de la Rimini-a Esperantista-Grupo (12 januaro 1913), Prezidanto de la I.E.F. (de 1917 ĝis oktobro 1920) kaj Prezidanto de U.E.C.I., kiun li fondis en Bolonjo en 1920 okaze de la 5a Nacia Kongreso, kiel itala sekcio de I.K.U.E.. En 1912 li aliĝis al la starigo de la Itala Esperanto-Katedro.

Noto 104 Dum la kongreso oni prezentis la fondon de Nacia Esperanto-Muzeo. Ĝi devis kolekti la tutan instruan propagandan materialon, la Kongresajn dokumentarojn, la komisionajn raportojn, eldonaĵojn, aliĝilojn, k.t.p. tiel ke oni povos pruvi per faktoj kio estis farita en Italio kaj kiamaniere disvastiĝis Esperantismo en la mondo. La Muzeo havos stabilan kaj migrantan sekcion. La unua, por konservi ĉiujn dokumentojn kaj eldonaĵojn; prunta la dua, por organizi specialajn ekspoziciojn, kiuj, pretigitaj en la sidejo de la Muzeo, estus pretaj post unu semajnon kaj liverotaj al organizo, kiu deziros utiligi ĝin por ekpropagandi. Laŭ petoj, la Muzea Direkcio povos pretigi dum malmulte da tempo komercan, instruan, k.t.p. ekspozicion selektante materialon ĉar iniciato sukcesus. La Udine'a grupo jam atentigis pri tiu plano en la monato de marto, sin devontigonte kolekti materialon liverita de samideanoj, ordigi ĝin kaj remeti je la dispono de la I.E.F., kiu, post kiam finos la laboro, havos materialon antaŭaranĝita, klasifikita kaj ordigita. La Kongreso aprobis la planon kaj ĝi delegis la Udine'an grupon funkcii kiel Organiza Oficejo. En la Kongreso en Padovo, Bodini finis lian paroladon de la 27a de julio 1931 liverante, nome de la Udine'a grupo, la Muzeon al la I.E.F. kun "la aŭguro de serioza, konstanta kaj precipe longdaŭra pliigo".

Noto 105 Franko Bodini, geometro, naskiĝis la 9an de septembro 1904. Esperantisto de 1922, li estis agema antaŭe en Udino, kie li estris la Kulturan Faŝistan Instituton kaj poste en Torino, kie li direktis la Kason por malsanuloj de la Konstrua Industrio. Dum la jaroj 1930 - 1931, li estris la "Itala Esperanto-Revuo"-n (strato Tarcento n.ro 3, Udine) kaj organizis ankaŭ la naciajn kongresojn en Komo (1930) kaj Padovo (1931). Li estis ankaŭ Konsiliano de la I.E.F. (1931) kaj Komisaro de Julia Venetio kaj, en 1935, ano de la L.K.K. en la 27a Universala Kongreso en Romo.

En ŝia parolado, grafino Di Caporiacco diris: “Mi estas tre feliĉa ĉeesti, kiel patrino, la standardan inaŭguron de la Trieste’a Esperantista-Grupo. Mi alskribas la honoron de tiu tasko al la amo, kiun mi kaj ĉiuj friulaninoj havas al la urbo Triesto, kiu al Udino kaj al Friulo estas unuigita en komuneco kun memoroj kaj esperoj: Mi bondeziras al tiu standardo, esprimo de idealo, kiun neniam povos esti disigita de la italeca sento, flirtu ĉiam apud la standardoj de la Patrio, por ĉiu pli granda konkero.”.
Plie, okaze de la ekskurso al Aquileia de la 29a, prof. Facchi inaŭguris la standardon de la Grupo Esperantista de Brescia. Patrino estis elektita s.rino Teresa Maria Pischiutta.
La varma danko al la organizantoj fare de prof. Georgo Canuto - kiu jam en la malfermo li salutis nome de Prezidanto de la I.E.F. - fermis la Udine’an Kongreson, kiu sukcesis ankaŭ finance.
La aktoj de la Kongreso estis eldonitaj en kajero (n.ro 1.000 ekzempleroj) kaj la grupo surprenis la presajn elspezojn[110].



La kovrilo de la *Aktoj de la Kongreso*

Dum la kongreso okazis la ekzamensesio de malsupera kaj supera grado. Atingis la 1an superan gradon (instruo): Italo Leono de Brescia; la 2an malsuperan gradon (kapabla atesto): Silla Granzotto, Maŭrico Budai, Gismondo Veneziani, Sofia Bodini, Amadeo Pontoni e Bruno Tonon de Udino, Hanna Berner kaj Matelda Rossi de Cordenons; la 1an malsuperan gradon (elementa): Elda Linda de Udino.
Kursoj gviditaj dum la periodo 1925 - 1930:

- ĉe lernoĉambro de la Reĝa Teknika Instituto: Johano Della Savia (14 januaro 1925 - 6 majo 1925)[111];
- ĉe la Popola Universitato: Mario Cavagna (1925);
- ĉe la sidejo de la Studenta Asocio Friula: Johano Della Savia (1925);
- ĉe la provizora sidejo de la grupo (“Kafejo Romo”): Johano Della Savia (1925, ĉiuj ĵaŭdoj vespere);
- publikaj kaj privataj ĉe la Sporta Asocio Montara de U.O.E.I. (Laborista Unio Italaj Ekskursistoj) (1926);
- ĉe la Fervojista Postlaboro por fervojistoj (1926);
- ĉe lernoĉambro de la Reĝa Teknika Instituto: Johano Della Savia (komenco: 1a decembro 1926);
- ĉe la sidejo, por komencantoj, ĉiu mardo, ĵaŭdo kaj sabato vespere. La kurso, komenciĝita la 15an de septembro 1927, estis gvidita de Galliano Dolce;

Noto 106 Dario Niccodemi (Livorno, 1874 - Romo, 1934), komediverkisto, teatra redaktoro kaj trupestro.

Noto 107 Gaetano Facchi (Brescia, 2 decembro 1888 - tie, 1979), esperantisto de 1920. En 1922 li fondis la grupon en Brescia. En 1925 li instigis la lokan Komercan Ĉambron por disvastigi cirkuleron pri Esperanto koncernante la italan komercon kaj industrion al ĉiuj delegitoj U.E.A.. De 1926 li estis delegito de la itala esperantismo por eksterlando kaj de 1931 li estis estrarano de la I.E.F.. Li skribis diversajn artikolojn en la esperantistaj revuoj. Li kunlaboris en la *Enciklopedio de Esperanto*.

Noto 108 Silvio Zambaldi (Palazzolo aull’Oglio, 1870 - Milano, 1932), komediverkisto, aŭtoro de de multenombraj teatraĵoj, kaj dramoj kaj komedioj.

Noto 109 “Spieli de anime furlane o letterature popolâr tradizionâl de Çarňe e dal Friûl”, sezione del “Tesaur de lenghe furlane” (Speculo de la friula animo aŭ tradicia literaturo popola de Karnjo kaj Friulo”, sekcio de “Trezoro de la friula lingvo), estas la plej riĉa kolekto pri friulaj vilotoj (popolaj kantoj). Temas pri kolekto de versaĵoj, kiuj Tellini klasis laŭ 10 diversmanieroj, indikinte por la tuta materialo, la diferencojn, la ejon kaj la nomon de la informanto.

Noto 110 La eldonaĵo *Aktoj kaj raporto de la XV Nacia Esperanto-Kongreso* (Eld. A. Paolet, S. Vito de Tal., 1930) estis la “Suplemento al la Itala Esperanto Revuo”, n.ro 4, aprilo 1930.

Noto 111 La ekzamenoj estis eltenitaj en Trieste la 14an de junio 1925 kaj sukcesis: Galliano Dolce, Helena Fedrico, Franko Bodini, Rafaelo Vannucchi, Vitaliano Sapigni, Aristide Colussi, Albano Cancelliero, Danto Valzacchi, Jakobo kaj Oktavo Beorchia (Por unu atesto, vidu bildon paĝo 49).

- ĉe la Reĝa Teknika Instituto: Johano Della Savia (1927);

- por aŭtomobilistoj kun 180 partoprenantoj (1928);
- por lernantoj de mezlernejo kun 153 partoprenantoj (1928);
- ĉe la Reĝa Teknika Instituto “A. Zanon”: 1a grado malsupera (komenco : 6a novembro 1928, kun lecionoj ĉiu mardo kaj vendredo) kaj 2a grado malsupera (komenco : 7a novembro 1928, kun lecionoj ĉiu merkredo);
- du publikaj kursoj ĉe la Teknika Instituto kun 35 aliĝoj: Mario Cavagna (1929);
- ĉe la Episkopa Kolegio “Bertoni” kun 39 partoprenantoj: Galliano Dolce (1930);
- ĉe la Porinstruista Instituto “Perkoto” kun 29 partoprenantoj plej parte virinoj: Gismondo Veneziani (1930);
- ĉe la sidejo, por privatuloj, kun 12 partoprenantoj: Johano Della Savia (1930);
- ĉe la sidejo, en strato Beato Odorico de Pordenone. Komenco: 6a novembro 1933, kun lecionoj ĉiu lundo kaj merkredo.

Cattedra Italiana di Esperanto
Istituto Linguistico fondato nel 1912
Certificato di 1° Grado

Cattedra Italiana di Esperanto
Istituto Linguistico fondato nel 1912
Certificato di 2° Grado

Atestoj de Armando Blasoni

En 1930 membraliĝoj malabundis pro malmulta aktiveco de la grupo, kiu estis okupita por organizi la Kongreson en Komo kaj la Feston de la Itala Libro; sed precipe pro la redakto de la Revuo, kiu tre multe okupis la Estraron, kaj la organizado de la Nacia Muzeo[112].
La 30an de majo 1931 okazis la ordinara kunveno de la Udine’a Esperantista-Grupo. Post la raporto de la eliranta Estraro, oni elektis la novan Estraron: prez. Geom. Franko Bodini, vic-prez. Libr. Maŭrico Budai, sekr. Galliano Dolce, kas. Amabile Zilli, konsilianoj libr. Gismondo Veneziani, Galliano Gabai kaj Bonifaco Linda, revizoroj Sabina Giordani kaj prof. kav. Italo Rossi, bibl. prof.rino Celeste Giordani. Plie libr. Veneziani kaj Zoratti estis taskitaj pretigi la Muzeon por la Kongreso en Padovo.
En 1931 oni fondis la grupon de Cordenons (Esperantista Grupo (O.N.D.) ĉe Nacia Postlabora Institucio) kaj de Gradisca d’Isonzo (ĉe Postlaboro, dank’al Virgilio Foschian)[113].

La Esperantista Grupo de Cordenons en foto de la 12a de marto 1933
Centre, sub la standardo, Matelda Rossi

Poŝtkarto de la Grupo de Cordenons

En la artikolo “Kiel Esperanto kunfratigas la popolojn”, aperita en “L’Esperanto” n.ro 6 - 7 de 1921, Virgilio Foschian rakontas, ke antaŭ la milito li ne sciiĝis pri Esperanto kaj li alproksimiĝis al ĝi dank’al la esperantisto de Trento Johano Travaglia[114], militkaptito kun li en Kirsanov, Sud-Eosto de Rusio, kiu priparolis al li pri ĝi entuziasme. Ĉar en la kaptitejo estis aliaj esperantistoj, oni organizis Esperantan kurson dank’al la delegito U.E.A. en Moskvo, Sabunievic, kaj gvidita de F. Taŭfer.

Noto 112 Grupanara situacio de la fondo ĝis 1930: 1923 n.ro 18, 1925 n.ro 45, 1927 n.ro 75, 1928 n.ro 84, 1929 n.ro 93, 1930 n.ro 82.

Noto 113 La grupo estis fondita post la kurso gvidita monatoj antaŭe kaj fermita je la antaŭtago de la la Nacia Kongreso en Padovo (26 - 28 julio 1931). La kunvenejo estis la Hotelo “Triesto”, en placo Unueco.

Noto 114 Johano Travaglia estis organiza Komitatano de la 6a Itala Esperanto-Kongreso (Trento 16 - 18 aŭgusto 1921). Li forpasis en 1970, 82jara.

La 18an de aprilo 1931 okazis, en la Sidejo de la Faŝista Partio, la oficiala inaŭguro de la standardo de la Esperantista Grupo de Cordenons. En la ceremonio ĉeestis ankaŭ prof. Canuto, kiel reprezentanto de la I.E.F., geom. Gaiotti, Urbestro de Cordenons, Eugenio Turrin, Vic-Prezidanto de la grupo, pastro Jakobo Bianchini, fraŭlinoj Berner kaj Rossi kaj Instruisto Rossi.


O. N. D. - Sezione di Pordenone

Egregio Signore,

Sabato 18 corr. alle ore 20.30, alla Casa del Fascio il Chiarissimo Prof. GIORGIO CANUTO della R. Università di Torino, terrà l'annunciata conferenza Esperantista sul tema:

La standardizzazione del linguaggio

Sarà gradita l'ambita presenza della S. V.

LA PRESIDENZA

La invitilo pri la prelego de prof. Canuto

La Urbestro, kiel grupa Prezidanto, en lia parolado esprimis la valoron de la helpa lingvo ankaŭ "kiel ilo por ekzalti la Patrion eksterlande". Patrino de la standardo estis Ada Rossi.
La 1an de oktobro 1931 okazis la malfermo de la Esperanto-kurso en lernoĉambro de la Profesia Lernejo "G.B. Maccari" de Gradisca d'Isonzo. La lecionoj estas donitaj de Virgilio Foschian de la Regiona Instituto Julia Venetio.

La 9an de decembro 1931, ĉe la loka O.N.D., kunvenis la grupanoj de la grupo de Cordenons. Ĉeestis urbestro geom. Luizo Gaiotti[115], Prezidanto de la grupo, pastro Leonardo Davè, lernejestrino Maria Anna Pasquali, Hanna Berner, Matelda Rossi, instruisto (lerneja kaj ankaŭ ne metia organisto) Mida Rossi, multaj simpatiantoj kaj ĉiuj esperantistoj. Dum tiu kunveno oni elektis "Honora Membro" pastron Leonardo Davé.

Gefratoj Rossi. De maldekstre, Matelda, Ada, Mida, s.ro C. Op 't Roodt, Tina

Aktiveco farita de la grupo de Cordenons:
- 10 julio 1930: malfermo de la kursoj gviditaj de Hanna Berner, Matelda Rossi kaj instruisto Jozefo Rossi (patro de fratinoj Rossi). Ĉeestis ekzamenojn pastro Jakobo Bianchini;
- 30 marto 1931: malfermo de la 1a kaj 2a grada kursoj gviditaj en la Sidejo de la Faŝista Partio, sidejo de la grupo, de Hanna Berner kaj Matelda Rossi;
- 25 decembro 1931: nedeviga Esperanto-kurso ĉe la Teknika Instituto "Guido Monti" kaj Scienca Liceo, per interesiĝo de la lernejestro kav. I. Andreetta, fare de prof.ino Hanna Berner, unu el la gefondintoj de la grupo;
- 1932: due elementaj kursoj ĉe la Teknika Instituto kaj la Dalmatika Agada Grupo, ambaŭ en Pordenone, zorge respektive de Hanna Berner kaj s.ro Fantin. Konsistigis la ekzamenan komision Johano Della Savja kaj Gismondo Veneziani;
- 27 januaro 1932: prelego de Hanna Berner pri "Esperantistaj londonaj impresoj". Ĉeestis ĉirkaŭ 60 personoj;
- 29 januaro 1932: prelego de pastro Jakobo Bianchini pri Esperanto ĉe la katolika kultura kunvenejo de Pordenone;
- 2 januaro 1933: du Esperanto-kursoj, unua kaj duagrada, kun trideko da partoprenantoj, zorge de Matelda Rossi. La lecionoj pri la kurso por komencantoj estis duonsemajne (marde kaj vendrede de 20.00 ĝis 21.30), tiuj pri la duagrada estis semajne (merkrede de 20.00 ĝis 21,30). La ekzamenoj okazis la 22an de aprilo kaj konsistigis la ekzamenan komisionon Johano Della Savia kaj Gismondo Veneziani;
- 24 februaro 1933. geom. Luizo Gaiotti, Prezidanto de la grupo, faris prelegon al multenombra publiko de esperantistoj kaj sinpatiantoj, pri "Dalmatio" ;
-12 marto 1933: prof.ino Karolina Minio[116], Prezidanto de la Venezia Esperanto-Grupo, estis gastino ĉe la grupo. Ŝi donacis al la grupa biblioteko la libron *Historio de Kristo* de Papini;
- 17 marto 1933: per iniziato de la grupo, libr. G. Chiussi, de la Montosekcio de Pordenone, prelegis pri: "De la milita antaŭtago ĝis Viktorio Veneto".

Noto 115 En 1933 geom. Luizo Gaiotti, Podestato de Cordenons kaj Konsiliano de la Mezinstruada Konsorcio de la Pordenone'a Distrikto (placo de la Vittoria, Cordenons) estis I.E.F.-estrarano.

Kun la forpaso de la tempo alvenis al Urbestro de Udino ejopetojn, senpage, fare de naciaj patriotaj asocioj, precipe de Armeo.
En 1932, post la persistoj de kelkaj el ili, precipe Infanterio, la Urbestro estis devigita informi la grupon forlasi la sidejon ĉar ĝi apartenas al "Favora Asocioj" sugestante, samtempe, ĝian transloĝiĝon al alia ejo, ekzemple ĉe la Kultura Biblioteko Faŝista. Nenion efikis protestoj de Bodini, sed la Urbestro (grafo Ĝino Di Caporiacco), kvankam li atendis antaŭ ol doni respondon al petoj, li estis devigita decide tiele ĉar iu intencis protesti kontraŭ Prefekto. Ĉar oni ne devis malobei deziron de Urbestro, kiu estis pli peto ol ordono, oni decidis transloĝiĝi al la Kultura Biblioteko Faŝista.
En 1935 en Pordenone oni presis poŝtkarton desegnita de Jože Srebrnič el Nova Gorica por la grupo de Cordenons.
Okaze de la kvindekjara de Esperanto (1887 - 1937) en Udino oni eldonis karton kun la bildo de Zamenhof, desegnita en 1936 ĉiam de Jože Srebrnič, je la koloroj viola, ruĝa kaj verda (La karto aperis sur la slovena kalendaro de 1937).



Poŝtkarto pri la 50 jaroj de Esperanto

Ĉiam okaze de la kvindekjara de Esperanto, Johano Della Savia eldonis serion da glumarkoj (La folio havas la n.ron 298 en la Katalogo ELF-AREK).

La propagandfolio de Johano Della Savia

Malgraŭ ĉiuj iniciatoj havis apogon de la Aŭtoritatoj[117], ĉe la alproksimiĝo de la dua Mondmilito komenciĝis malfacilaĵoj por Esperantismo fare de la reĝimo. Por la dua fojo la milito nuligis la laboron faritan en jardekoj pro malamika sinteno al la ideo pri universala lingvo. Tiu sinteno, pro politikaj kaj ideologiaj kialoj, establiĝis en kelkaj landoj (kiel Germanio kaj Italio) dum la milita periodo kaj en la jaroj tuje antaŭaj. Tamen, post 1945, la esperantistaj aktivecoj refloris en la tuta mondo, pro la renovita deziro pri kunlaborado inter la popoloj, kiu estis interalie la bazo de eŭropaj packontaktoj subskribitaj post la milito.
La milito disigis la grupon kaj nur la 27an de majo 1950 ĝi sin refondis kaj repreni la kulturan aktivecon[118].


ESPERANTO GRUPO UDINE
Elenco dei Soci del Gruppo Esperantista Udinese
ricostituito il 27 Maggio 1950
data di fondazione: 6-6-1923

La listo de grupanoj de la 27a de majo 1950

Noto 116 Karolina Minio-Paluello, pseŭdonimo M. Romillo (Venecio, 15 novembro 1903 - Milano, 6 novembro 1984) edziniĝis al Luizo Minnaja (Pisticci, Matera, 21 januaro 1899 - Romo, 27 januaro 1974) kaj el ilia geedziĝo naskiĝis du filoj: Nikolao (Romo, 9 januaro 1938) kaj Karlo (Romo, 19 marto 1940). La 3an de aprilo 1923, en Venecio, en la kadro de la "Internacia konferenco pri la Komuna lingvo por Komerco ka Turismo", kunvokita de la Helvetia Komerca Ĉambro, okupis la rolon de Iolanda okaze de la ludo *Ŝakludado* de Jozefo Giacosa.



La grupa membrokarto

Foto de la Udine'a Esperanto-Grupo - 1952
1. Blanka Mandel-Della Savia, 2. Johano Della Savia, 3. Luiza Blasoni, 4. Eleonora Varettoni, 5. -, 6. -, 7. Liliana Mazzoli, 8. Luigi Chiaruttini, 9. Ĝian Franko Cosatti, 10. pastro Ipppolito Pellis, 11. Sara D'Olivo, 12. Ĝianni Bravo, 13. Aldo Chiaruttini, 14.-

Mariano de Friulo - 1952
1. Armando Blasoni, 2. Luizo Chiaruttini, 3. Ĝian Franko Cosatti, 4. Johano Della Savia, 5. Blanka Mandel-Della Savia, 6. Pastro Ippolito Pellis, 7. Luiza Blasoni, 8. Ĝianni Bravo, 9. Sara D'Olivo, 10. Eleonora Varettoni. 11. Liliana Mazzoli

Noto 117 Rezultas ke, "responde al petskribo pri la Esperanta demando, prezentita al Ĉefministreco, de specifan Komisiono, alvenis al la Itala Esperanto-Federacio longan kaj afablan leteron subskribita anstataŭ Ĉefministro, de Lia Moŝto Acerbo, per kiu la Regado esprimas sian kontenton pri la celoj kaj la aktiveco de Esperantismo en Italio kaj sian favoran opinion pri la helpa lingva problemo. Per la sama letero oni taskis Generalon Markizo de Montezemolo, I.E.F.-estrarano, reprezenti la Italan Regadon en la 15a Universala Esperanto-Kongreso ĵuse okazita en Norimberga (1 - 8 aŭgusto) kun ĉirkaŭ 5.000 geesperantistoj el 44 landoj (*Jarlibro* raportas 4963, nda). La pasintan aprilon Lia Ministra Moŝto Rossi donis sian patronecon al la internacia konferenco en Venezia por la uzo de Esperanto en komerco, en turismo kaj en telefono sen dratoj, kaj la Regado estis oficiale reprezentita. Per tiuj aŭspicioj oni organizas ankaŭ la VIII Itala Esperanto-Kongreso, kiu okazos en Terni dum la periodo 22 - 24 de la venonta septembro, kun reprezentoj el diversaj Ministerioj kaj de gravaj institutoj, kun "antaŭkongreso" en Assisi kaj "postkongreso" en Romo …".
Temas pri alkohola ciklostilita artikolo kun la titolo "La Faŝisma Regado por Esperanto", sen dato kaj subskribo, kun piednoto krajona: "Kun peto eldonigi en multaj ĵurnaloj. Salutojn F. Ĉesarini". La du kongresoj okazis en 1923.

Fidia Cesarini, librotenisto ĉe la Financoficejo de Potenza, Delegito U.E.A.. (El la *Oficiala Jarlibro de la Esperanto-Movado* 1926). Fidio Romero Giuseppe Cesarini, esperantisto de 1915, naskiĝis en Panicale (Peruĝo). Li faris eksterordinaran propagandon en la suda Italio per paroladoj, artikoloj en tre gravaj gazetoj kaj kursoj.

Jakobo Acerbo (Loreto Aprutino, Pescara, 25 julio 1888 - Romo, 9 januaro 1969), ekonomisto, pli foje dekoraciita pro milita valoro.

Teofilo Rossi (Chieri, Torino, 27 oktobro 1865 - Torino, 29 decembro 1927), Ministro pri Industrio kaj Komerco de 31 oktobro 1922 ĝis 5 julio 1923, kiam lia ministerio estis aboliciita kaj enprenita en Ministerio pri la nacia Ekonomio.

Noto 118 La Udine'a Esperanta Grupo havis sidejon en strato Poscolle n.ro 18/1 kaj oni kunvenis ĉiusabate je la 21.00. La unua kunveno okazis la 3an de junio 1950 en la ĉeesto de libr. Armando Blasoni, Luiza Blasoni, Johano Della Savia, Helmut Rath, Anĝelo Zoratti, Sara D'Olivo, Ĝino Tempo kaj Aldo Chiaruttini.

La 21an de aprilo 1951 la udinaj esperantistoj elektis ilian Estraron: prez. libr.. Armando Blasoni, sekr. Johano Della Savia, kas. Aldo Chiarutini.

Armando Blasoni

Aldo Chiaruttini

La 3an de majo 1952 okazis la jara asembleo de la Udine'a Esperanto-grupo. Oni elektis: prez. libr. Armando Blasoni, vic-prez. Bruno Tonon, sekr. Johano Della Savia, kas. Aldo Chiarutini.
La gruprefondo estis kaŭzo de granda entuziasmo kaj en la kursoj partoprenis ankaŭ gefiloj de grupanoj.

Istituto Italiano di Esperanto

Certificato

rilasciato al Sig. Chiaruttini Aldo

che ha superato presso la Cattedra di UDINE gli esami di 1° grado

di lingua Esperanto prescritti dalle disposizioni regolamentari dell'Istituto.

La Commissione Esaminatrice — Il Direttore Generale

UDINE, 13 FEB. 1951

La atesto de Aldo Chiaruttini

Istituto Italiano di Esperanto

Certificato

rilasciato al Sig. Blasoni Mario

che ha superato presso la Cattedra di UDINE gli esami di 1° grado

di lingua Esperanto prescritti dalle disposizioni regolamentari dell'Istituto.

La Commissione Esaminatrice — Il Direttore Generale

UDINE, 5 APR 1952

La atesto de Mario Blasoni

ENAL

Gruppo Esperantisti Udinesi

UDINE - Via Girardini, 8

DIPLOMA

di lingua ausiliaria «Esperanto» di 2° Grado

rilasciato al Signor Blasoni Luiza

La commissione esaminatrice

La atesto de Luiza Blasoni

Ilia aktiva partopreno en la interna vivo de la grupo portis al la fondo, en majo 1952, de la Udine'a Esperanto-Junularo de la Udine'a Esperanto-Grupo, kies sidejo estis tiam en strato Carducci n.ro 10, kaj ĝi celis la propagandon de Esperanto inter la junueco. En la sociaj oficoj estis elektitaj: prez. Ĝian Franko Cosatti[119], sekr. Liliana Mazzoli, kas. Luciano Lodolo, konsilianoj Sara D'Olivo, Bruno Drigani kaj Aldo Chiarutini.

GIAN FRANCO COSATTI

Presidente de la Udine'a Esperanto Junularo

UDINE ITALIO

La vizitkarto de Ĝian Franko Cosatti

Dum la unuaj monatoj de 1953 la Junulara Sekcio havis sian kunvenon, kie oni elektis la jenan Estraron : prez. Luciano Lodolo, sekr. Ĝian Franko Cosatti, kas. Aldo Chiaruttini.

Noto 119 La 19an de aprilo 1953 oni elektis lin kiel membron de la Nacia Estraro de la Itala Esperantista-Junularo, sekve de la demisio de la tuitolulo. Oni konfirmis lin en la ofico la 6an de septembro 1953 okaze de la 4a Junulara Kunveno en Komo. Ĝian Franko Cosatti aliĝis ankaŭ al Eŭropa Federalisma Junularo.

La 18an de decembro 1952, en la grupsidejo, en la ĉeesto de multenombra publiko kaj kelkaj elstaruloj de la Eŭropa Federalismo[120], Johano Della Savia, Sekretario de la grupo, memorigis la Zamenhof-tagon. La oratoro demonstris kiel Zamenhof estis ne nur profunda lingvisto, sed ankaŭ noblulo, inspiroplena por unuigi la homaron, al ĝi doninte efikan ilon de koheremo. Della Savia finis sian paroladon evidentigi la gravan signifon de la Zamenhofa vivo, kiu estas ĝis nun ekzemplo por ĉiuj homoj de bonvolo.
Poste paroladis prof. Martino Scovacricchi, kunsekretario de la Udine'a Sekcio de la Eŭropa Federalismo, kiu mallonge priparolis pri la graveco de Esperanto en la federalisma politiko entreprenita de ĉiuj Eŭropaj Ŝtatoj, raportante poste pri mocio, kiun li prezentis al la 5a Nacia Kongreso de la Eŭropa Federalismo rilate al la universala lingvo. Prof. Scovacricchi finis lian paroladon dezirante pli kunlaboradon inter Federalismo kaj Esperantismo, kies agado sin proponi plirapidigi la unuigan proceson de popoloj.
La 7an de aprilo 1953 gastis ĉe la grupo la germana instruistino Sybilla Kreischer de Kolonjo, en Udino por viziti la tombon de kuzo[121], forpasita dum la lasta Granda Milito en ĉi tiu regiono. Okaze de la Universala Kongreso en Oslo (37a, 2 - 9 aŭgusto 1952), s.rino Kreischer konis okaze esperantiston Anĝelo Zoratti, kiu, rehejmiĝinta, tre multe interesiĝis por retrovi la tombon, kaj li klopodis ĉar iu familiano povus viziti ĝin.


7. 4. 1953.

Hodiaŭ mi havis la plezuron esti inter la afablaj gastamikaroj de Udine. Denove mi povis konstati, ke Esperanto estas ponto inter la koroj de la popoloj, kaj ke la Esperantistoj estas granda familia rondo.
Mi dankas al la grupo tre kore pro la afableco kaj gastimeco kaj deziras ĉiun bonan kaj progresbon.

Sibylla Kreischer
Köln a/Rh. Germanio.

La dediĉo de Sybilla Kreischer

La 4an de novembro 1953 okazis en la Ejo de la paroĥa Amuzejo de Fogliano Redipuglia esperanta kunveno, organizita fare de pastro Ippolito Pellis, pri: "Esperanto kiel praktika ilo de unio inter popoloj". Prelegis d.ro Bruno Luciano Marini[122], prezidanto de la T.E.A.. Ĉeestis grupanoj de Triesto kaj Udino.
Ĉar Udino estas najbare la limo, la grupo ofte ricevis vizitojn de eksterlandaj geesperantistoj. Krom amikoj aŭstriaj, vizitis la grupon anglaj, francaj, svedaj, danaj, nederlandaj, finnaj kaj jugoslavaj geesperantistoj. Ĉiuj esprimis en la grupa libro la simpation por nia regiono kaj por la akcepto ricevita de la Udine'aj esperantistoj. Speciala vizito estis tiu de Gismondo Veneziani en 1951 kaj de Angelo Zoratti en 1954, ano de la antaŭa grupo, transloĝiĝinta al Piemonte.


Udine 1° de Augusto 1954

Memore de kelkaj belaj kaj gaj en Udine (en monatojo!) k. de in promenado en Akuileja (inter la romanaj restaĵoj)

Pierette St Rain

15 bis rampe Salée
Alger

Udine, 7. 6. 1952.

Kun ĝojo mi helpos plenigi ĉi-tion libreton kun amikaj deziroj kaj pensoj, kaj mi estas dankhava ke mi havas okazon vizioli la esperantogrupon en Udine.

Egon Madsen
Danlando.

Li sendos al mi la PK pri al la 41° UAK.

Vivu Esperanto kaj vivu la Udinea grupo!
Salutojn kaj bonderiojn al ĉiuj!
Veneziani Gismondo
Udine, la 8an de Aŭgusto 1951

Vivu Esperanto kaj vivu la Udinea grupo!
Salutojn kaj bonderiojn al ĉiuj!
Veneziani Gismondo
Udine, la 8an de Aŭgusto 1951

Dediĉoj de geesperantistoj, kiuj vizitis la grupon

Noto 120 Federalismo: politika koncepto, kiu subtenis la asocion de pluaj malgrandaj ŝtatoj en Federacio anstataŭ unueca ŝtato.

Noto 121 Temas pri Wilhelm Kreischer, sepultita en la Kampo Ĉ, Vico IIIa, de la Udine'a tombejo "Sankta Vito". (La epizodo estis rakontita de Zoratti mem per artikolo aperita sur "L'Esperanto" n.ro 1, januaro - februaro 1953).

Noto 122 Pri la biografio de B.L. Marini vidu: *Cent jaroj de Esperanto en Triesto*, Biblion Eldonoj srl, Milano, 2008.

La grupo kunlaboris kun diversaj turismaj entreprenoj, kiuj rezervis paĝon por Esperanto. Sukcesis tre multe, kaj petita dum longtempo el eksterlando, tiu de la provinca E.N.A.L. pri Friulo, la banloko de Lignano kaj la kampadejo en Forni di Sopra (Forni de Supre). La kolora turisma prospekto estis eldonita itale, france, germane kaj Esperante.
La 29an de aŭgusto 1954, okaze de la fermo de la nacia kampanejo "Alpi Carniche" (Karnikaj Alpoj) en Forni di Sopra, kunvenis ĉe la tendourbo de la antaŭ dirita loko, kvindeko da geesperantistoj per iniciato de la Udine'a Esperanto-Grupo, pri ilia unua sub ĉiela kunveno.

Forni de Supre: Esperanta kunveno - 29.8.1954
1. Primo Trevisani, 2. Johano Della Savia, 3. Egon Børge Jensen, 4. Filino de Renato Maltecca, 5. Blanka Mandel-Della Savia, 6. Aldo Chiaruttini, 8. Helmut Rath, 9. Filino de Renato Maltecca, 10. S.ino Maltecca,12. Ĝian Franko Cosatti, 13. Renato Maltecca, 14. Filino de Renato Maltecca, 15 Filo de Renato Maltecca, 16 Filo de Renato Maltecca

La kunveno kunigis ankaŭ Eksterlandajn esperantistojn. Ĉe la fermo de la kunveno, parolis Prezidanto de ENAL[123], hon. Fausto Barbina, prezidanto de la Turisma Entrepreno, Kol. Ferdinando Antoniacomi, d.ro Maltecca de la Udine'a Esperanto-grupo kaj reprezentantoj de Danio, Aŭstrio kaj Hungario.
La 18an de novembro 1954, en la sidejo de la Bankistaj Klubo en strato Belloni n.ro 1, okazis la eksterordinara kunveno de la Udine'a Esperanto-grupo. Oni elektis: prez. libr. Armando Blasoni, vic-prez. Bruno Tonon, sekr.-kas. Aldo Chiaruttini, instruanto d.ro Renato Maltecca, konsilianoj Johano Della Savia kaj Anĝelo Zoratti, Junulara Sekcio Mario Blasoni.
La 15an de decembro 1954, por honori la 37an datrevenon de la forpaso de d.ro Zamenhof, oni aranĝis, ĉe la ejoj de la Klubo E.N.A.L. en strato Belloni n.ro 1, libran ekspozicion por sciigi la lingvan progresojn pri kulturo, komerco kaj turismo.
Unu el la plej aktivaj propagandistoj dum tiuj jaroj estis la grupano Helmut Rath. Naskita en Aŭstrio, li loĝis en Udino, en strato Pradamano, kaj, pro lia kono pri la lingvo, plifoje li estis gvidanto okaze de ekskursoj en germanlingvaj landoj. En 1955, okaze de la 40a Universala Kongreso (Bolonjo, 31 julio - 8 aŭgusto), dank'al li, oni reeldonis serion da glumarkoj, kiuj reproduktis la blazonojn de kelkaj friulaj urboj, sidejoj de esperantaj grupoj[124].

La glumarkfolio reeldonita de Helmut Rath

Poŝtkarto de Helmut Rath

Noto 123 E.N.A.L.: Institucio por subteno kaj distro de laboristoj, kiu anstataŭis O.N.D.-n. Establita en 1945 por kunordigi la kulturajn kaj distrajn aktivecojn de C.R.A.L.. Oni ĉesigis ĝin en 1980.

Faŭsto Barbina (Mortegliano, Udino, 31 januaro 1900 - Udino, 9 novembro 1982), doktoro pri komerco, deputito kristandemokrata por Udino de 1948 ĝis 1953. Li estis prezidanto de la Provinca Turisma Entrepreno de Udino.

Noto 124 En la katalogo E.L.F.-A.R.E.K. la glumarkfolio havas la n.ron 449.

Li proponis sian kontribuaĵon por kompili la katalogon E.L.F.-A.R.E.K.. Li forpasis la 4an de decembro 1971.

Estimataj klubaj geamikoj,

Jen la lasta LVL de la nuna jarcento. Respektoplene kaj kun danko ni memoras pri tiuj karmemoraj forpasintaj samideanoj, kies kontribuaĵoj ñiĝis nian informilon kaj nian Amikan Rondon. Eblas citi nur kelkajn:

Ivar Paulsson, Reinhold Jensen, Kurt Lindström, Franz Mayer, Gustave Chamaret, Georgo Saget, Jean Chapellier, Dolfa Bartošik, Frank Tichy, Zdenek Stifter, Stefano Fekete, A. Wenclewski, Ivan Andrejevič, L.J. Wulfers, Arie Lakemond, Evaristo Gil Pallares, Helmut Rath, Werner Simon.

Nia danko iras ankaŭ al ĉiuj tiuj, kiuj ankoraŭ nun aktive kunlaboras en nia klubo kaj en siaj landoj por la populariĝo de nia Esperanto-filatelo, ĉu per gazet-artikoloj en naciaj filatelaj gazetoj, ĉu per partopreno en filatelaj ekspozicioj. Esperas vian kunlaboron ankaŭ en la sekva jaro via redaktoro

Rudolf Burmeister

La memorigo pri Helmut Rath
("La Verda Lupeo", n.ro 119, decembro 1999)

La 1an de decembro 1955 okazis ĉe la Popola Universitato de Monfalcone prelego de d.ro Bruno Luciano Marini pri: "Aktualeco kaj valoro de la internacia lingvo Esperanto".
Post la prelego oni gvidis Esperantan kurson fare de Viktorio Malaroda (Monfalcone, 27 aprilo 1922 - tie, 8 januaro 2003), kiu startigis la Esperantista-Asocion de Monfalcone[125]. Prezidanto estis prof. Karlo Ceol, Prezidanto de la Universitato.
En 1957 la urbo Udino devis organizi la 28an Nacian Kongreson. La ebleco organizi ĝin en Udino estis prezentita al d.ro Renato Maltecca de kom. Martini, Prezidanto de la provinca E.N.A.L., kun kiu la Udine'a Esperanto-Grupo estis en bonaj rilatoj (la grupa aktiveco estis farita ĉe E.N.A.L.).
Kom. Martini engaĝiĝis doni lian Organizon por la laboroj kaj la Kongresa sukceso.
Pri tio, la 8an de septembro 1956 d.ro Malteka informis prof.on Georgo Canuto[126] precizigante, ke tio estus ebla se neniu faris proponon dum la kongreso de 1955; alie, li petis lin ekzameni la proponon de la Udine'a grupo.
Prof. Canuto respondis la 15an de septembro 1956 entuziasma pri la sciigo. Samtempte, li sin rekomendis studi bone la kongresan daton, eble la 25an - 27an de aŭgusto ĉar "la lerneja kalendaro estis ŝanĝita. Ekde la 1an de septembro ĉiuj geinstruistoj devos reveni sidejon por la ekzamenoj, kaj en Massa tute mankis la elementon geinstruistoj, kiu estas tre grava por nia movado.".
Kiam oni donis la definitivan respondon por organizi la kongreson en Udino, tiele, la 14an de decembro 1956, d.ro Maltecca skribas al prof. Canuto kaj al la I.E.F.: "Bedaŭrinde la sciigoj ne estas bonaj ĉar, malgraŭ nia bona volo, malfacilaĵoj prezentiĝis, kaj ili estas tiaj ke ne permesas la realigon. La unua pri interna karaktero. Kom. Martini ne povas engaĝiĝi dum la periodo, kiun ni diris al li, tio estas tiu de la 25a - 27a de aŭgusto 1957. Li estus libera el aliaj sindevigoj en septembro, proksimune duonmonate; sed kontraŭ tiu dato kontraŭas la argumentoj, kiujn vi klarigis per via letero de la 15a de septembro 1956, kaj pri kiu ankaŭ ni interkonsentis. La alia pri internacia karaktero, sed ne malpli grava. La nuna politika situacio certe ne estas bela, kaj, konsidere la lokiĝo de Udino, rilate al limoj, ni ne sentas tute trankvilaj surpreni sindevigojn longdaŭre. Ĉi tie estas senĉesa alfluo da rifuĝintoj, soldatoj ĉies nacioj, loĝejokrizo kaj kareco de la vivkostoj impresa, kiujn oni ne povas kompari kun aliaj italaj urboj. Ni pridiskutis tre multe en Konsilio kaj la opinioj estis multaj kontraŭaj; sincere estis pli NE ol JES. Antaŭ tiu situacio, amare ni preferas rezigni nian belan sonĝon organizi en Udino la venontan Esperanto-Kongreson, ol troviĝi en la situacio ne plenumi la surprenitajn sindevigojn. Pro tio, ni rifuzas la taskon kaj ni esperas, ke alia grupo estu en situacio pli favora por engaĝiĝi kun pozitiva resulto"[127].
En 1960 la I.E.F. petis al la grupo organizi la kongreson de 1961 kaj la Prezidanto, libr. Armando Blasoni, rifuzis la taskon ĉar estis malmultaj la esperantistoj liberaj de profesiaj sindevigoj en kondiĉo dediĉi la tutan ilian tempon por tiu kompleksa organizado, kiun postulas la kongresa preparo.

Noto 125 La grupsidejo estis en strato la IX de Junio n.ro 53, ĉe la Nacia Ligo.

Noto 126 Georgo Canuto (Torino, 3 junio 1897 - tie, 29 oktobro 1960), magistrita pri Medicino kaj Kirurgio (1920) kaj Juro (1924). Li estis profesoro pri jurmedicino en Peruĝo (1934), Parma kie li estis ankaŭ Universitata Rektoro (1950 - 1956). Prezidanto de la Esperanto-Grupo de Parma (1950 - 1959), I.E.F.- (1956 - 1960), U.E.A.-Prezidanto (1956 - 1960), Akademiano de Esperanto. Prof. Canuto interesiĝis pri Esperanto ekde 1925 kaj baldaŭ li ekinstruis la lingvon. Al li estas dediĉita la "Fondaĵo Canuto", kiu, en la sino de la U.E.A., helpas geulojn el ekonomiaj postrestintaj landoj aliĝi al la Asocio.

Noto 127 Per la Packontrakto de Parizo (10 februaro 1947), kiu antaŭfiksis la definitiva atribuo de Istrio al Jugoslavio intensiĝis elmigrado el tiu zono. La Packontrakto antaŭfiksis por tiuj, kiuj volis pluteni la italan civitanecon, la forlason de sia tero. La lasta migra periodo okazis post 1954 kiam oni atribuis por ĉiam la "Zono A" de la Libera Teritorio de Trieste al Italio kaj la "Zono B" al Jugoslavio (5 oktobro 1954).
Ĉe la Mezgrada lernejo "E. Fermi" (strato Pradamano) estas alfiksita la ŝtontabelo, kiu memorigas la elmigradon: "En ĉi tiuj konstruaĵoj de 1947 ĝis 1960, estis la klasifikada centro pri rifuĝintoj, kie oni pasis ĉirkaŭ cent miloj da personoj de Istrio, Fiume kaj Dalmatujo. La Konsilio de la 4a Distrikto je ĉiamdaŭra memoro de la elmigrada popolo. Udino la 10an de decembro 2007".

La krizo estis jam en la atmosfero pro la transloĝiĝo aŭ la forpaso de grupanoj. La situacio kriciĝis en aŭgusto 1961 pro malmulte da interesiĝo de grupanoj, krom iuj esceptoj, por la propagando kaj la partopreno en la grupvivo. Malplimultiĝis aliĝoj kaj, ĉar oni ne havis la minimumon de 25 por aliĝi al E.N.A.L., la grupo ne povis plu ĝui de la helpoj (sidejo senpage, diverstipa propagando kaj helpo). Oni sendis demandaron al grupanoj por scii la kialojn de la malzorgemo, petante samtempe pli kunlaboradon kaj novajn proponojn por decidi pri la sorto de la grupo. El grupanoj pridemanditaj, kelkaj ne respondis kaj la aliaj diris ke ne estis en kondiĉoj, pro diversaj kialoj, surpreni oficojn ĉe la gvido de la grupo. Per tiu rezultoj, la grupo lasis E.N.A.L.-n kaj havis provizoran sidejon ĉe la domo de Armando Blasoni, strato Cividale n.ro 78, por teni rilatojn kun la I.E.F. kaj kun la aliaj italaj kaj eksterlandaj esperantistoj. Kaj en tiu sidejo, en oktobro 1963, alvenis de Britio letero de Prezidanto de la Yorkshire-a Esperantista Federacio, F.L. Holden, por esprimi lian doloron kaj solidarecon por la popoloj de Vajont (la inundo kaŭzis la detruon de Longarone).
En la letero, datita la 13an de oktobro 1963, estas skribita interalie: "…mi petas vin esprimi niajn bondezirojn al ĉiu Esperanto-grupo en tiu parto de via lando. Ni sincere deziras ĉion bonan al ĉiuj, kiuj perdis parencojn aŭ posedaĵojn en tiu malfeliĉa tago…".

★ Federacio Esperantista de Yorkshire ★

Estimete S-ro. Blasoni,

Esteu kun grenze ŝuo se mi iernis pri la grenze ŝetestrofo ĉis betis le regionon Sirawŝ Sellana,

Al ajnitre ke vi estos le plej ruŝe ŝeligita el tiu regiono kiu suffrid, ke; pro tio mi petas vin esprimi niajn condoleancojn al ĉiu Esperanto-grupo en tiu parto de via lando. Mi ŝuere ŝuiras ĉion ĉomen al ĉiuj, kiuj perdis personojn aŭ posedaĵojn en tiu malfeliĉa tago.

Je tempo kiel ĉi tiu ŝuis vortoj ne estos grenze helpe ŝed nur; bonvolu; esprimi ke le kiro ŝem.

Mi, la Esperantistaj ŝe Yorkshire, Anglujo ŝendas niajn ŝeniŝoncojn.

Ŝinjore Via,

F. L. Holden.

F. L. Holden. Prezidanto.

La letero de la Yorkshire-a Esperantista Federacio

La Grupo nenian havis daŭran sidejon kaj pro tio ĝi estis devigita lokŝanĝi plifoje.
Ĉi tiuj la sidejoj dum la jardeko post la refondo:

- de 1950 en strato Poscolle n.ro 18, ĉe la Bankistaj Aŭtonoma Sindikato, sed la kunvenoj okazis ĉe "Bar alla posta"[128] (Kafejo apud la Poŝtoficejo). Ĉi tie, la 6an de novembro 1950, sukcese prelegis Don Juan Bernardis Fabricius (Giambattista Bernardis) de la Radio Nacional de España (Nacia Radiostacio Hispana).
  Tiele la 18an de decembro 1950 Titta Bernardis skribas al Chiaruttini: "…Prezentu miajn bondezirojn al la Estraro kaj al la esperantistaj geamikoj de Udino. Diru ilin, ke mi suferas ne esti en Udino… Via maljuna amiko, kiu suferas tiom da nostalgio esti fora de nia Cistiel de Udino (Kastelo de Udino);


Loni più affettuosi auguri
dal parte del friulano semideane,
attualmente a Madrid
Bernardi
Viva Esperanto!
6-11-50

La dediĉo de Titta Bernardinis de la 6a de novembre 1950

- de la 28a de januaro 1952 en strato Karducci n.ro 10;
- de la 1a de aprilo 1953 en strato Girardini n.ro 8. La kunvenoj okazis ĉe ĉambro de la Klubejo E.N.A.L., strato Belloni n.ro 1, ĉiu vendrede de 21.00 ĝis 22.30;
- de oktobro 1958 en strato Girardini n.ro 20 kaj poste sube la Kinejo "Eden", detruita ĉirkaŭ la jaroj sesdekaj por konstrui la nuna UPIM-palaco[129];
- de 1962 en strato Caiselli n.ro 1;
- de 1964 en strato Cividale n.ro 78, ĉe la domo de Armando Blasoni;
- de 1965 en strato Girardini n.ro 5.

Noto 128 Situita je la komenco de la portiko fronte al Centra Poŝtoficejo, en strato Vittorio Veneto, nune la ejo estas okupata de la librovendejo Einaudi. Kondukis la kafejon Johano Chiaruttini, onklo de Aldo.

Korespondaĵo sendita al la grupo en la diversaj sidejoj



Strato Poscolle n.ro 18

Strato Carducci n.ro 10

Strato Girardini n.ro. 8

Dum tiu periodo oni gvidis kursojn ĉe:

- la Grupsidejoj, zorge de libr. Armando Blasoni[130], d.ro Renato Maltecca[131] kaj Johano Della Savia, per duonsemajnaj lecionoj, mekrede kaj sabate, de 20.30 ĝis 21.30;
- la Teknika Instituto "A. Zanon" (placo Garibaldi, Udino), zorge de prof.ino Ada Rossi de Cordenons, (de la 29a de novembro 1950 ĝis la 13a de februaro 1951, per duonsemajnaj lecionoj: merkrede kaj vendrede de 20.30 ĝis 21.30). Fine de la kurso oni disdonis atestojn al 20 gelernantoj, el kiuj Aldo Chiaruttini, Bruno Tonon, Primo Trevisani, prof.ino Rosa Peano kaj Ĝian Franko Cosatti;

Noto 129 La Kinejo "Eden" estis projektita de Provino Valle kunlabore kun Ermes Midena en 1921. Ĝi estis inaŭgurita la 15an de aprilo 1922. En 1935 ĝi ŝanĝis nomon kaj iĝis "Savoia"; en 1943 "Garibaldi" kaj, en la postmilito, la proprietuloj ĝin nomis "Centrale" (Centra). Fine, ĉirkaŭ la Sesdekaj jaroj ĝi estis disfaligita por konstrui la UPIM-palacon.

U.P.I.M. (**U**nika **P**rezo **I**tala **M**ilano): itala ĉeno de grandaj magazenoj.

Provino Valle (Udino, 10 marto 1877 - tie, 12 aŭgusto 1955), arkitekto. Li diplomiĝis pri Arkitekturo ĉe la Belarta Akademio de Venecio en 1908. Li estis profesiulo ege serĉata inter la du militoj. Konstruaĵoj laŭ lia projekto estas en la tuta Friulo (interalie, la Osteja Templo de Udino, palaco del Torso kaj la plursporta Moretti) kaj en Milano, Padovo, Romo, Triesto kaj Venecio.

Hermeso Midena (San Daniele del Friuli, 12 septembro 1895 - Udino, 19 oktobro 1972), arkitekto. En 1912 li vizitadis la Superan Lernejon pri Arkitekturo de Venecio, sed en 1914 li estas vokita al rekrutiĝo. Post la milito li diplomiĝas pri arkitektura Desegno. Finitaj la studoj, li ekkunlaboris kun Provino Valle, en kies Udine'a ateliero li ĉeestas pli ol 3 jarojn, laborante, interalie, pri la projekto de la kinejo "Eden" (1921).

Noto 130 Per la kotizoj la grupo ne sukcesis pagi abonojn kaj libr. Blasoni (Udino, 20 januaro 1904 - tie, 15 februaro 1979), oficisto ĉe la Itala Kredito, subvenciis ĝin kaj ĉiufoje li klopodis por serĉi ĉiufoje novan sidejon (atesto de Aldo Chiaruttini dum interparolo registrita la 24an de februaro 1998).

Noto 131 Estro de la UPIM de Udino. Poste li transloĝiĝis al Milano (strato del Caravaggio n.ro 13) kie li laboris ĉe la Centra Sidejo de UPIM, en strato Balzaretti n.ro 5.

Istituto Italiano di Esperanto

Certificato

rilasciato al Sig. Chiaruttini Aldo

che ha superato presso la Cattedra di UDINE gli esami di 1° grado

di lingua Esperanto prescritti dalle disposizioni regolamentari dell'Istituto.

La Commissione Esaminatrice — Il Direttore Generale

UDINE, 13 FEB. 1951

La atesto donita al Aldo Chiaruttini

- la Teknika Instituto "A.Zanon", instruantino prof.ino Ada Rossi. Partoprenantoj 30 gelernantoj. La lecionoj, komenciĝitaj la 6an de februaro 1952 kaj finitaj la 6an de aprilo 1952, estis donitaj du foje semajne, merkrede kaj vendrede de 20.30 ĝis 21.30. La plej multo el la partoprenantoj estis mezgradaj lernantoj. Fine de la kurso oni disdonis atestojn al 23 gelernantoj, el kiuj pastro Ippolito Pellis (tiam parokestro en Corona de Mariano del Friulo), Viktorio Candotti, Luiza kaj Mario Blasoni;
- la Teknika Instituto "A. Zanon", zorge de Johano Della Savia. Partoprenantoj 25 lernantoj. Donitaj n.ro 16 atestojn (februaro 1953);
- la Profesia Lernejo de Tricesimo zorge de Johano Della Savia kaj per iniciato de Primo Trevisani, laŭ peto de gejunuloj de Reana del Rojale kaj Tricesimo (la kurso finiĝis la 28an de februaro 1954). La kurso, inaŭgurita la 20an de decembro 1953 ĉe la loka Koopera Sidejo, havis la apogon de la lernejaj Aŭtoritatoj. Oni liveris n.ro 13 atestojn, el ili 2 al instruistoj;

Tricesimo – la 28an de februaro 1954
1. Primo Trevisani, 2. Johano Della Savia, 3. Renato Maltecca, 4. Mario Blasoni

- la sidejo de la Klubo E.N.A.L. de Udino, komence de la 21a de aprilo 1954 zorge de d.ro Renato Maltecca. En la inaŭgura vespero ĉeestis E.N.A.L.-estraranoj kaj ankaŭ prof. Gregor Douglas de Nottingham[132]. Disdonitaj n.ro 15 unuagrada atestoj.
- la Metia Agrara Profesia Lernejo de Buja, en majo 1954, zorge de prof.ino Ada Rossi. Partoporenis en la kurso kvardeko da lernantoj, instruistoj, oficistoj. Indika kurso por kunmeti ulojn kaj aktivigi tie Esperantismo;
- mallonga kurso teorio-praktika zorge de d.ro Renato Maltecca, de la 11a de januaro 1955 ĝis la 20a de majo 1955. Ĉe la fermo kaj disdono de la atestoj partoprenis urbaj kaj lernejaj Aŭtoritatoj. Prof. Tortorici, Provinca Studestro, havis laŭdajn vortojn por la instruisto d.ro Maltecca kaj simpatian por Esperanto;
- en Azzano Decimo, gvidita de instruisto Silvano Manias por knaboj de 12 ĝis 14 jaroj, lernantoj de la Metia Lernejo "Kap. C. Monticco" (periodo: de la 21a de februaro ĝis la 24a de junio 1955). La 26an de junio 1955 oni disdonis atestojn al 16 partoprenantoj;
- en Azzano Decimo, ĉe la grupsidejo, 2agrada kurso gvidita de Silvano Manias (komenco: la 15an de oktobro 1955);
- ĉe la ENAL-sidejo, en strato Girardini n.ro 8, kurso por komencantoj, komenciĝita la 14an de oktobro 1958.

Noto 132 Gregor Douglas (Swansea, 6 februaro 1909 - Northampton, 26 marto 1995), brita esperantisto, poligloto, verkisto pri lingvoj kaj dialektoj de Nord-Italio (*Friulan, the language of Friuli* (1965) (Friula, la lingvo de Friulo); *Friulan: language and literature* (1975) (Friula: lingvo kaj literaturo).

Azzano Decimo – la 26an de junio 1955

1. Armando Blasoni, 2. Kleno Fantin, 3. Danilo Palù, 4. Petro Valvason, 5. Dino Andreatta, 6. Mario Ragogna, 7. Pierluizo Zanette, 8. Renato Maltecca, 9. Petro Gasparotto, 10. Dario Favret, 11. Arnaldo Moretton, 12. Gulielmo Tonus, 13. Aldo Peschiutta, 14. Silvano Stefani, 15. Silvano Manias, 16. Julio Belluz, 17. Aldo Marcuz, 18. Luciano Valeri, 19. Henriko Manias

Estis la unuaj jaroj ’50 kiam instruisto Silvano Manias, alprenis la edukon de knaboj eltrovinte studklasojn nomitaj sesa, sepa kaj oka kiel lermeja daŭrigo, en 1954 li sekvis la sugeston de pastro Jakobo Bianchini enmeti Esperanton kiel studobjekto. La antaŭa jaro, fakte, dum renkontiĝo kun dektrijaruloj, pastro Bianchini parolis pri la internacia lingvo kun la ĉiama entuziasmo ilin komprenigante, ke Esperanto ne estis nun komunikilo inter kulturoj malsamaj, sed ankaŭ ilo de frateco inter popoloj. Tial li interesiĝis paroli pri ĝi al la provinca Studestrejo.
Tiel, je la fino de la lernojaro 1954 - 55, estis fondita la Esperantista-Grupo de Azzano kaj, en aŭgusto, kelkaj knaboj, kune kun la instruisto, partoprenis en la Universala Kongreso en Bologna (40a, 30 julio – 6 aŭgusto 1955).
La grupo, estrita de Silvano Manias[133] estis tre aktiva kaj gastigis multajn eksterlandajn esperantistojn.
Nune la Acana Esperantista-Grupo de Azzano ne ekzistas.

Instruisto Silvano Manias

1 2 3

1. Silvano Manias, 2. Egil Øuen, norvega; 3. Mario Ragogna

En 1958 Giovanni Della Savia transloĝiĝis al Favaro Veneto en strato Monto Focobon n.ro 8, kaj ankaŭ aliaj geesperantistoj interrompis ilian aktivecon pro privataj okupoj aŭ forpasis. Tamen, malgraŭ malfacilaĵoj, en Udine pludaŭris ĉiam la intereso por la internacia lingvo: personoj paroladis pri Esperanto kaj de tempo al tempo oni gvidis kursojn.



Istituto V. ALFIERI
S. Croce 2267 - Telef. 23/277
VENEZIA

SABATO 22 MARZO AVRÀ INIZIO UN
CORSO GRATUITO
DI
ESPERANTO
TENUTO DAL SIG. GIOVANNI DELLA SAVIA.
PER ULTERIORI INFORMAZIONI RIVOLGERSI
ALLA SEGRETERIA TUTTI I GIORNI DALLE 9 AL-
LE 12 E DALLE 16 ALLE 22.

IL CORSO AVRÀ LA DURATA DI 21 LEZIONI
CON ORARIO BISETTIMANALE

Della Savia daŭrigas gvidi esperantajn kursojn



ESPERANTO Della Savia UDINE (ITALIA)

ERICH MARIA REMARQUE

LA VOJO RETURNE

EL GERMANA LINGVO TRADUKIS
JOSEPH F. BERGER

1931
HEROLDO DE ESPERANTO / KÖLN / GERM.

Dediĉo de la aŭtoro de *En Okcidento nenio nova* al Giovanni Della Savia

La 2an de marto 1960, en Palaco Kechler (placo XX Septembro), okazis la prelego pri Japanio farita de prof. Eizo Itoo, Estro de grava literatura revuo en Kyoto. La prelego, organizita de la Udine’a Esperantista-Grupo,

kunlabore kun la Banka Klubo, kaŭzis multe da intereso pro la prelega novaĵo, kiu estis farita esperante kaj tradukita iom post iom fare de prof.ino Ada Rossi.
La prelego estis ilustrita per serio da lumbildoj pri la ĉefaj urboj japanaj kaj prof. Itoo haltis precipe prelegi pri religioj, pri la virino kaj ŝiaj sociaj konkeroj, pri la komerco kaj la progresoj tekniko-industriaj en lia Lando kaj li finis la prelegon parolinte mallonge pri Hiroshima kaj pri pacdeziro de la hodiaŭaj japanoj. Libr. Armando Blasoni, Prezidanto de la grupo, prezentis la oratoron antaŭ lia prelego.



La dediĉo de Eizo Itoo

La 16an de junio 1961 Komunuma Konsilio de Cordenons, sekve de la revizio pri la urba toponimio, per decido n.ro 20 titolis "Strato Esperanto" la straton, kiu de placo Sankta Petro direktiĝas Sude al Case Zilli (Domoj Zilli).
La Udine'a grupo havis neaktivecan periodon kaj en 1965, en la nova sidejo en strato Girardini n.ro 5, ĝi ekreorganiziĝis dank'al prof.ino Luiza Deganutti[134] kaj Johano Della Savia, revenita de Favaro Veneto post la trofrua forpaso de la edzino. Unua sindevigo en programo: inaŭguro de la Zamenhofa mozaiko.
La 5an de septembro 1965, per simpla ceremonio, estis inaŭgurita la steleo kun la mozaikan portreton de d.ro Lazaro Ludoviko Zamenhof, eltrovinto de Esperanto, kiun prof. Tellini farigis je propraj elspezoj en 1935 kaj poste donacita al la Komunumo de Udino[135].
En la manifestacio, pretigita zorge de la Udine'a Esperantista-Grupo, partoprenis, krom s.rino Sparta Tellini Voltolini kaj Idanna Trevisan, respektive filino kaj nepino de prof. Tellini, reprezentantoj de la Esperantista-Grupo de Bolonjo "Achille Tellini", Germano Gimelli[136], kiel reprezentanto de la Italaj Ferfojistaj Esperantista Asocio, Franz Watzinger de Villach, Tone Logar kaj Dezideri Miseriĉ, kiel reprezentantoj de la Slovena Esperantista-Asocio de Ljubljana, d.ro Dino Fabris[137] kiel reprezentanto de la I.E.F. kaj de la U.E.A.. Dum lia parolado, d.ro Fabris, Sekretario de la Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio, dankis urbestron Bruno Cadetto[138] kaj memorigis prof.-on Tellini.

Noto 133 Silvano Manias (Le Fratte, Azzano Decimo, Pordenon0, 20 septembro 1913 - Cormons, 16 novembro 1969) forpasis en la Hospitalo de Cormons sekve de aŭtomobila akcidento okazita al li la 16an de novembro 1969 en Capriva de Friulo (Goricio). Li klopodis tre multe pri la Esperanta instruado kaj ofte li organizis ekskursojn kiel premio por lernantoj. La kurso starigis la bazon por fondi la Esperantista-Grupon de Azzano, kiu okazis la 7an de julio 1955. La trofrua forpaso de instruisto Manias kaŭzis malpliiĝon de la grupa aktiveco kaj iniciatis ion s.ro Mario Ragogna, kiu daŭrigas teni lumigita la flamon de Esperanto en Azzano Decimo. Silvano Manias estis instruisto en la Profesia Lernejo de Azzano Decimo.

Egil Øuen de Røra (Nord-Trøndelag), fervoja staciestro (Jarlibro 1956 - Unua parto).

Noto 134 Luisa Deganutti (Udino, 15 novembro 1920) lernis Esperanton aŭtodidakte. En 1950 prof.ino Roza Peano proponis al ŝi pasigi somere esperantistan ferion al Danio. Dank'al Esperanto, ili vizitis lernejojn kaj ili engastiĝis ĉe familioj. En Assens prof.ino Peano konis sian edzon, prof. Egon Børge Jensen. Post tiu vojaĝo, prof.ino Deganutti estas gastino en multaj landoj kaj ŝi gastigas multajn esperantistojn.
En januaro 2016 la skribanto telefonis plifoje al s.rino Deganutti pri la ĉujara reabonoj kaj, ne havinte ian respondon, iris ŝian loĝejon. Bedaŭrinde la loĝejo estis malfermita kaj ne konante iun familianon, mi ne sukcesis havi sciigojn. S.rino Deganutti antaŭ kelke da tempo estis flegita hejme.

Noto 135 El la libro de Jozefo Bergamini kaj Viktoria Masutti *Domo Beltrame en Udino: historio pri apoteko*, en la Masutti-a enkonduko oni legas: "Virinoj surmetis robojn ĝis tero kaj viroj promenis kun melonĉapelo kaj la promenbastono kiam apotekisto Luizo Viktorio Beltrame ekde la komenco de la Dudeka jarcento aĉetis la apotekon en la placo tiam simple nomita "Viktorio" (Emanuelo, nda). Generacioj da Udine-anoj de la tiama periodo al ĝi kunigis memoraĵojn, scivolemojn kaj personojn, kiuj evidentigis la urban kronikon. La sama apotekisto estis parto de tio kune kun liaj amikoj, kiuj iamaniere kunvenis en lia ejo. Antaŭ ol ĉiuj, estis la najbaro, la fama geografo Aĥilo Tellini, kiu loĝis supre la apoteko. Li tre sin dediĉis al studado de Esperanto, por kies kreinto li pretigigis mozaikon kun enskribo laŭ la plej amata lingvo, tiam lokita en la korteto de la konstruaĵo en la nuna placeto Belloni. D.ro Gino Beltrame (Udino, 6 julio 1902 - tie, 13 oktobro 1973, nda), kiam dum la sesdekaj jaroj ekrestaŭris la konstruaĵon por ĝin adapti kiel propra domo, donacis la mozaikon al Komunumo, kiu ĝin donis al la Urba Muzeo en kastelo.".
Ne ekzistas skribaĵo pri la mozaika donaco kaj ne rezultas ke oni ĝin katalogis kaj/aŭ surslipigis en la Urba Muzeo (Mastrina atesto de la Apoteko Beltrame kaj de s.ro Loris Milocco de la Urba Muzeo, post kiam li faris serĉon). La skribanto donis la mozaikan historion al s.ro Milocco por pretigi slipon pri la steleo.

Urbestro Bruno Cadetto, s.ino Sparta Tellini, d.ro Dino Fabris

La kunvenintoj en la inaŭguro de la Zamenhof-steleo
1. Andreino Della Savia-D'Ascoli, 2. prof. Generoso D'Ascoli, 3. Luiza Deganutti, 4. Johano Della Savia, 5. Primo Trevisani, 6. Amabile Zilli, 7. Armando Blasoni, 8. Bruno Tonon, 9. Elio Fabris, 10. Sparta Tellini, 11. prof. Bruno Cadetto, 12. d.ro Dino Fabris, 13. Viktorio Candotti, 14. Aldo Chiaruttini, 15. Fernanda Geligh, 16. Ĝan Franko Cosatti, 17 Gustavo Voltolini, nepo de Tellini, filo de Sparta

Tiu valora steleo farita de la Mozaika Lernejo de Spilimbergo[139], surmetita sur ruĝan platon marmoran el la marmorminejoj de Verzegnis, estis iasence forgesita en la korteto de la domo en strato Belloni n.ro 6, malantaŭe la apoteko Beltrame, kie loĝis prof. Tellini kaj, tra la jaroj, diversaj italaj kaj eksterlandaj geesperantistoj trapasinte Udine-n, manifestis grandan intereson por la Zamenhofa memoriĝo, kaj insiste petis la translokiĝon kie oni povis viziti ĝin facile.

Noto 136 Germano Gimelli (Fiumana, Forlì, 4 novembro 1913 - Gallipoli, Lecce, 12 novembro 1999) estis I.F.E.A.-sekretario, redaktoro de la revuo (1954 - 1984) kaj prezidanto (1884 - 1995). En la 40a U.K. (Bolonjo, 30 julio - 6 aŭgusto 1955) li estis L.K.K.-ano.

Noto 137 Johano Dino Fabris (Venecio, 29 decembro 1917 - Cittadella, Padovo, 13 marto 1996), klera kaj mensa homo, ĵurnalisto, esperantisto. Ekde 1950 li engaĝiĝis kun persisto kaj konvinko por disvastigi Esperanton. Li sukcesis en la 3agrada ekzameno en Sassari okaze de la 26a Nacia kongreso (24 - 29 aŭgusto 1954). Prezidanto (1967 - 1977) kaj Ĝenerala Direktoro (1977 - 1996) de la I.E.I., U.E.A.-delegito por Ĵurnalismo kaj Rotario, sekretario (1958 - 1991) kaj kasisto (1958 -1995) de T.E.Ĵ.A.. En la 80a U.K. en Tampere (Finlando, 22 - 29 julio 1995), li estis elektita honora membro de la T.E.Ĵ.A..

Noto 138 Bruno Cadetto (n. Canussio, Varmo, Udino, 1919 – Udino, 29 oktobro 2015). Magistrita pri Beletro, li estis profesoro ĉe la teknikaj institutoj. Li estis Urbestro de Udino de la 3a de decembro 1960 ĝis la 2a de januaro 1975 kaj Prezidanto de la Friula Filologia Societo de 1975 ĝis 1981.

Noto 139 Pro la evoluo de mietieoj, forĝejo de talentaj metiistoj el kiuj Ĝiandominico Facchina (Sequals, Pordenono, 10 oktobro 1826 - Parizo, 26 aprilo 1903), kiu perfektivigis la teknikon pri la renversita mozaiko, la itala registaro fondis la Friulan Mozaikan Lernejon en Spilimbergo. La plano, interrompita pro la 1a Mondmilito, estis reprenita tuj post kaj efektivigita en 1922 kiam estis fondita la Friula Mozaika Lernejo.

La steleo en la korteto en placo Belloni

La Udine'a Esperantista-Grupo, dank'al Johano Della Savia, prof.ino Luiza Deganutti kaj libr. Armando Blasoni, proparolantoj por tiuj necesoj per multaj petoj al lokaj Aŭtoritatoj, fine havis respondon ĉe la Urbestro de Udino, prof. Bruno Cadetto, kiu parolis pri ĝi okaze de kunsido de la Komunuma Konsilio. La peto, bedaŭrinde, ne estis akceptita. Kion fari? Oni decidis skribi al geesperantistoj petante sendi leteron al la Urbestro ĉar la mozaiko havu lokon en publika ejo. Ĉiuflanke alvenis leteroj al la Urbestro. Konsilianoj, miritaj pri tiom da intereso por la mozaiko, fine plenumis la peton de la Urbestro, kiu konsentis loki la steleon sur la ekstera glaciso de la kastelo[140].
Sur *UDINO stratoj, palacoj, aktiveco* de Ĝankarlo Gualandra (Chiandetti, Reana de Rojale, decembro 1995), je la paĝo 484a estas skribita: "Zonmurego de la kastelo, direkte al Placo I Majo: Jen unu el la malmultaj monumentoj en la Urbo, kiu ne memorigas la hororojn de la militoj! Esperantistaj vizitantoj, kaj ne, aŭ kulturŝatantoj, dum la vizito al la Urbo, inkluzivas ankaŭ la omaĝon al unu el la plej grandaj disvastigantoj de amikeco inter popoloj sur la tero: Doktoro Esperanto… ĈI Tiu lasta bildo, estas ankaŭ mia omaĝo al la kulturo, tio estas al ĉiuj homoj, kiuj dediĉis la vivon…"

La steleo en la nova loko

La mozaika historio komenciĝis la 4an de aprilo 1935, kiam prof. Aĥilo Tellini skribis al Lernejestro de la Mozaika Metia Lernejo "Irene de Spilimbergo" ĉar li deziris "situigi longdaŭran memoraĵon por la eltrovinto de la helpa internacia lingvo Esperanto. Tiu memoraĵo devus lokiĝi fine de la korteto" en lia loĝejo "larĝa 3,70 metrojn kaj longa 7 metrojn ĉirkaŭ, videbla de strato Belloni, apude Placo Viktorio Emanuelo".
La memoraĵo "devus havi mozaikan medalionon kun la kapo kaj parto el la busto de d.ro Zamenhof kaj enhavi la simplan surskribon d.ro Esperanto 1859 - 1917".
En la letero prof. Tellini rimarkigas ke "la emblemo de Esperanto estas la kvinpinta stelo, verda" kaj ke "tiu emblemo ne devus manki.".
Ĉar la kapo estu laŭ reala grandeco, prof. Tellini petas "kiom kostus la mozaikan medalionon ekzemple kun diametro je 40 centimetrojn".
Post kiam li havis la respondon de Lernejestro, la 29an de aprilo 1935 prof. Tellini sendas poŝtkarton kun la portreto de Zamenhof kaj la formo de la kvinpinta stelo, kiu "devas esti verdaflaga koloro". Plie, li petas skizon de la marmora plato, kia estas la marmoro, kelkajn teknikajn detalojn pri la medaliona kunigo kaj la platmuntado (konsistota el 4 marmorpecoj) kaj li sin rekomendas ke "por min logi, vi faros al mi la minimuman prezon" ĉar estis intento de prof. Tellini komisii aliajn medalionojn por merituloj de la friula lingvo kiel Pirona, Gortani, Ostermann[141].

Noto 140 La steleo estis lokita la monato de majo 1965. La 20an de novembro 1962 s.ro A. Venturini sugestis loki la steleon en la bedo, kie estas la monumento al poeto Jozefo Ellero (Tricesimo, 6 junio 1866 - Udino, 30 januaro 1925), en placo Patriarkato.

La mozaiko kostis al prof. Tellini 750 lirojn, el kiuj 600 lirojn por la medaliono kaj surskribo kun stelo kaj 150 lirojn por plano kaj skizoj pentrita, pagitaj per du ĉekoj respektive je 250 kaj 500 lirojn kvitigapago (atesto n.ro 490 de la 6a de majo 1935 kaj n.ro 518 de la 9a de julio 1935).
Oni alportis la marmoron kaj ĝin lokis en la korteto de strato Belloni la 5an de julio 1935; dimanĉon, la 7an de julio 1935, la lerneja stonĉizisto faris la marmoraĉizaĵon kaj prof. Tellini sendis al la Estro de la Mozaika Lernejo de Spilimbergo vizitkarton komunikante ke "mi restis plene kontenta pri la Zamenhofa medaliono.".
La iniziato, kiu havis multan reliefon pere de la loka gazetaro, ne kontribuis relevi la grupsorton kaj la sekvanta jaro, 1966, markis, fakte, la finon de la esperantista grupo de la dua postmilito[142].
La 22an de januaro 1967, post longa malsano, forpasis Johano Della Savia.

Cordoglio fra gli esperantisti per la morte di Della Savia

Si è spento ieri, dopo una lunga malattia, il signor Giovanni Della Savia, noto ed appassionato esperantista, il quale nel 1922, fondò il gruppo udinese dei seguaci del movimento linguistico internazionale. Sette anni dopo aveva organizzato a Udine un congresso nazionale esperantista e tale convegno costituì a quell'epoca un notevole avvenimento per la città.

Giovanni Della Savia era da tempo in pensione, dopo essere stato impiegato per lunghi anni nel settore commerciale, dove si era distinto per le sue capacità. Fu anche valoroso combattente della grande guerra. Qualche anno fa era rimasto vedovo e la scomparsa della moglie lo aveva molto prostrato. Aveva conosciuto la signora Bianca, ungherese, durante un congresso esperantista e da allora la coppia era rimasta unita anche dalla passione per la lingua universale.

I funerali di Giovanni Della Savia avranno luogo oggi alle ore 16. Alla figlia prof. Andreina e al genero prof. Generoso D'Ascoli, sentite condoglianze.

Artikolo pri la forpaso de Giovanni Della Savia

La 8an de oktobro 1969 konsiderinda nombro da anoj de la Udine'a Fervojista Postlaboro fondis la Kulturan Grupon de Esperantaj Fervojistoj, komisiinte al Primo Trevisani[143] organizi ĝin (Esperantista-Grupo "Espero Friuli" ĉe s.ro Primo Trevisani, strato Morosina n.ro 46/4). Samtempe la grupo petis ĉambron al Distrikta Estro de la Ŝtataj Fervojoj por havi ejon en avenuo Europa Unita (Eŭropo Unuiĝinta) kie praktiki aktivecon.

Marko kaj Roza Crespan, Primo Trevisani, Aldo Chiaruttini en foto de 1987

Dum la periodo 10 - 17 septembro 1972 okazis en Udine la XVIII Nacia Eŭkaristia Kongreso kun la ĉeesto de papo Paŭlo VI, kiu faris kvar paroladojn.

Noto 141 Julio Andreo Pirona (Dignano al Tagliamento, Udino, 20 novembro 1822 - Udino, 28 decembro 1895), naturisto, paleontologo. Malgraŭ ke li studis Medicinon en Padovo kaj Pavio, li dediĉis parton el lia aktiveco al botaniko, paleontologio kaj geologio, aldonante multe da studaĵoj.

Johano Gortani (Avosacco di Arta Terme, Udino, 20 julio 1830 - tie, 2 aŭgusto 1912), advokato, administranto, erudiciulo, novelisto. Magistrita pri Juro en Padovo en 1883, li okupiĝis pri Arto, Arkeologio kaj Loka Historio.

Valenteno Ostermann (Gemona del Friuli, Udino, 22 februaro 1841 - Treviglo, Bergamo,16 oktobro 1904), instruisto, folkloristo. Li estas la patro pri la folkloraj studoj en Friulo.

Noto 142 La Estraro de 1966 estis: prez. Luiza Deganutti, vic-prez. Bruno Tonon, sekr.-kas. Aldo Chiaruttini, konsilianoj Amabile Francisko Zilli, Johano Della Savia kaj Armando Blasoni.

Noto 143 Primo Trevisani (Reana de Rojale, 17 oktobro 1913 - Udino, 2 oktobro 1996) fervojisto, ano de la I.F.E.A. de 1951. Li fondis la Triĉesjmo-an grupon kun la grupeto de Zompitta.

La 10an de septembro oni celebris la Sanktan Meson en Esperanto en la preĝejo de la Pureco, en placo Duomo, fare de pastro Ferdinando Longoni, Prezidanto de I.K.U.E.[144].

Pri la organizado partoprenis Primo Trevisani por la Udine'a grupo "Espero Friuli".



La kovrilo de la programo

La 13an de decembro 1972, en la aŭlo de la Mezgrada Lernejo "A. Manzoni", per iniziato de la Popola Universitato de Udino, d.ro Sergio Boschin prelegis pri: "La problemo pri la internacia lingva kaj lingvo Esperanto". La preleganto, post kiam li skizis mallonge la historian trarigardon, li evidentigis ke la internacia lingva problemo estas ankoraŭ nesolvita ĉar ĝi estas barita de la grandaj internaciaj organizoj per la usado de lingvoj tiel nomataj por laboro. Per la akcepto de Esperanto kiel dua lingvo en la internaciaj rilatoj oni povus elimini ĉiajn malfacilaĵojn, kiujn hodiaŭ estas en la mondaj institucioj. D.ro Boschin finis dirante ke Esperanto respondas, per gramatika reguleco kaj per lernada facileco, al rekvizitoj petitaj ĉar unu lingvo povu leviĝi al internacia nivelo.
La 8an de majo 1974, en Goricio, en la salonego de la Provinca Administrejo, prof. Valerio Ari[145] prelegis pri "La lingva problemo en la mondo". Ĉeestis ankaŭ la Provincestro kaj la Urbestro..
La 8an de septembro 1974, la Komunumo kaj la Turisma Entrepreno de Linjano Orsablo kune kun la Sporta Klubo "Porta Villalta" (Pordego Villalta) de Udino organizis la Internacian longan Marŝon "L.L. Zamenhof". Al la partoprenantoj, kiuj finis la iron en la maksimuma fruo, oni aljuĝis artan medalionon.

La memoriga medalo

La 22an de septembro 1974 la G.E.A. organizis en la urba Muzika Instituto koncerton de Danielle Béguin, svisa artistino, kiu prezentis ŝian folkloran programon per Sud-Amerikaj arioj en Esperanto.

Dum la periodo de la 29a aprilo ĝis la 2a majo 1976 Primo Trevisani partoprenis en la seminario pri: "Metodoj kaj teknikoj por la instruado de lingvoj en la devigaj lermejoj".

La atesto de la partopreno en la seminario eldonita al Primo Trevisani

Noto 144 Pastro Ferdinando Longoni (Milano, 1 oktobro 1916 - Limbiate, Monza Brianza, 24 oktobro 1975), Prezidanto I.K.U.E. de la 4a de februaro 1971 ĝis la 24a de oktobro 1975.

Noto 145 Valerlo Ari, pseŭdonimo Giorgio Silfer (n. Milano, 1949), verkisto, poeto, magistriĝinta pri modernaj lingvoj. Li alproksimiĝis al Esperanto kiam li estis 20jara, laŭ hazardo, post kiam li trovis libron en la bofratina hejmo. En 1969 li startigis, kune kun Manuela Bottiglioni la literaturan klubon "La Patrolo". Li verkis multenombre da verkoj kiel esisto, poeto, prozisto, tradukisto.

Dum la periodo 16 -18 septembro 1977, en la kadro de la Gorici-a Septembro, okazis en Goricio la 9a Trilanda Konferenco temante pri: “Esperanto en lernejo kaj turismo”[146].

La glumarko

La laboroj okazis en la ejoj de la Palaca Hotelo kaj poste en la Kastelo por la oficialaj laboroj. Celo de la renkontiĝo estis plifortigi ligojn de amikeco jam ekzistantaj inter la najbaraj Landoj kaj faciligi la ŝanĝon de ideoj kaj spertoj.
La Kunordiga Komitato konsistis el: Martin Stuppnig, Aŭstrio; Tone Logar, Jugoslavio; Renato Bisi, Italio.
Post la Sankta Meso en Esperanto en la preĝejo Sankta Spirito celebrita de pastro Ippolito Pellis kaj de la aŭstria paŝtisto Till Geist, oni resumis la faritajn laborojn. La prelego estis karakterizita de studgrupoj, kiuj temis precipe pri instruado kaj turismo. Tre ŝatata estis la prelego de prof. Mario Dazzini, Sekretario de I.L.E.I., pri: “Instruado de Esperanto en lernejoj" dum pri Turismo tre grava estis la raporto de la Triest-ano Aldo Viotto (1933 - 1997)[147], delegito de la Internacia Klubo de Esperantistaj Aŭtomobilistoj.
La 6an de marto 1978 oni fondis la G.E.J.A.-n “Inĝ. Jordano De Luca”[148]. La asocio havis la sidejon ĉe la Oratorio en strato Brigado Pavia. La Estraro konsistis el: sekr. Massimo Soranzo, naskita en Goricio la 25an de julio 1963 kaj esperantisto de 1976; vic-sekr. Alessio Cvetreznik, naskita en Nova Gorica la 18an de januaro 1963 kaj esperantisto de 1973; kas. Marino Carpignano, naskita en Goricio la 18an de oktobro 1963 kaj esperantisto de 1977; bibl. Anna Cosenza, naskita en Goricio la 7an de februaro 1963 kaj esperantistino de 1976. La Junulara Asocio estis Sekcio de la G.E.A..
Dum la periodo 19 - 27 aŭgusto 1978 okazis en Goricio la 12a Internacia Konferenco de I.L.E.I.[149].



La poŝtkarto kun la speciala poŝtstampo

En la prelego partoprenis sesdeko da geesperantistoj, krom el diversaj italaj regionoj, de Aŭstrio, Francio, Germanio, Finlando, Jugoslavio, Respubliko de Sankta Marino, Svedio kaj Svisio, kaj, unuafoje, ankaŭ du afrikanaj reprezentantoj, kiuj venis el Malgaŝa Demokratika Respubliko, eks Madagaskaro. La malferma ceremonio okazis la 20an de aŭgusto 1978 ĉe la Aŭditorio de la Friula Kulturo en strato Romo, antaŭiĝita de mallonga folklora spektaklo de dancantetoj el kvartalo Sankta Rocco. Post salutoj de la reprezentantoj, prenis la parolon, enkondukita de prof. Mario Dazzini[150], Sekretario de I.L.E.I., prof. Helmut Sonnabend[151], Liga Prezidanto, Rektoro en Peine, kiu prelegis pri: “La humana konceptado de L L. Zamenhof”.

Noto 146 La glumarko estis enmetita en la parto “Trovita 1976 - 1980” de la katalogo E.L.F.-A.R.E.K..

Noto 147 Forpasis la 14an de oktobro 1997 sekve de aŭtomobila akcidento en Slovenia. Li lernis Esperanton aŭtodidakte, iĝis tre aktiva ano de la T.E.A., poste Sekretario kaj fine Prezidanto. Li estis ankaŭ la komencinto de la Esperanto-Komerca Agado, por utiigi la internacian lingvon en la komercaj rilatoj. Precipe li estis fondinto/redaktoro de “La eta gazeto”. Pro lia forpaso la T.E.A. haltigis la gazeteldonon laŭ nedefinita tempo. (Pri la biografio de Aldo Viotto vidu: *Cent jaroj de Esperanto en Triesto*, Biblion Eldonoj srl, Milano, 2008).

Noto 148 Jordano De Luca (Pola, Kroatio, 11 julio 1895 - Goricio, 4 decembro 1973). En 1921 li doktoriĝis pri Mekanika Inĝenierio ĉe la Politekniko de Milano. Li konis diversajn lingvojn el kiuj, krom la itala, kroata, franca kaj germana, esperantiĝis dum la sama jaro de sia Magistreco. Post la dua Granda Milito li transloĝiĝis al Goricio kie li laboris ĉe la Komunumo. En ĉi tiu urbo li organizis Esperantajn kursojn.

Noto 149 I.L.E.I.: Asocio inter Esperantaj geinstruistoj, starigita en 1949, por subteni la instruon de la internacia lingvo, krei instruistojn kaj anonci ekzamensesiojn. Ĝia organo esta “Internacia Pedagogia Revuo”.
La glumarko havas la n.ron 903 kaj la poŝtstampo la n.ron 29 de la katalogo E.L.F.-A.R.E.K..

Prof. Eŭgene Taveloson dum lia prelego.
Apude la alia africa delegato kaj prof. Sonnabend

Oni pridiskutis diversajn temojn pri instruado. Interesa estis la "ronda tablo" pri: "La instruado de fremdaj lingvoj en la lernejoj kaj la internacia lingvo Esperanto" kun la partopreno ankaŭ de ĵurnalistoj kaj neesperantistoj.
Ĉi tiu la rezolucio de la kunveno:
"La 12a Internacia Konferenco de I.L.E.I., okazinte de la 19a ĝis la 21a de aŭgusto en Goricio, konstatis en tiu ĉi regiono la lingvan problemon, kiu malfaciligas la sociajn rilatojn inter la popoloj. Tiucele la Internacia Ligo prezentis konstante sian proponon pri tiu peto por solvi la lingvan problemon kaj tute ne altruante la Internacian Lingvon Esperanto. Tamen, konstatante ke la registaroj ĝis nun neniam publike prezentis ian ajn solveblecon, I.L.E.I. demandas, ĉu la registaroj:

- jam ili konstatis la situacion rilate al la interkompreniĝo inter la Ŝtatoj kaj se jes, kiamaniere la registaroj konsideris kontribui al la solvo de la lingva problemo en la rilatoj inter la popoloj;

- intencas proponi sian propran lingvon, ekzemple en la Eŭropa Komunumo, kiel komunan lingvon, aŭ sub priatento de la homaj rajtoj, estimante ĉiujn lingvojn por eviti lingvan kaj kulturan diskriminaciojn, proponi neŭtralan lingvon.

La geinstruistoj membriĝantaj en nia Ligo timas ke gelernantoj en la diversaj lernejoj de la mondo ne estas sufiĉe preparataj por respondece partopreni, kiel estontaj adoltoj kaj civitanoj, la internaciajn taskojn kaj interrilatojn, ĉar la nuna sistemo de fremdlingva instruado, ne kapablas plenumi la postulojn de la estonteco".

Post la fondo de la G.E.J.A. oni bezonis kunigi la plej junulojn tial la 22an de decembro 1978 oni fondis la G.K.K.-on. Ilia Esperanta instruistino estis s.ino Di Maso. Kluba respondeculo estis Luigi Barbana, naskita en San Donà de Piave la15an de februaro 1963 kaj esperantisto de 1976.

Dum la periodo 3 -7 de aprilo 1980 okazis en Goricio la 4a I.J.E.F. dediĉita al vidaj artoj en ĝiaj diversaj manifestacioj (Bildartoj).

La kovrilo de la kajero

Noto 150 Mario Dazzini (Pietrasanta, Lucca, 16 julio 1910 - Massa, 31 majo 1985), magistriĝita pri Juro ĉe la Universitato de Pisa, post la milito li transloĝiĝis kune kun la familio al Massa, kie la fratino Catina obtenis instruan katedron ĉe la loka Liceo. Li eklernis Esperanton 17jara, perfektiĝonte pri la lingvo kun prof. Campetti de Lucca. En 1953 li iĝis la unua prezidanto de la Esperantista-Grupo de Massa. En 1972 li kreis la Nacian Esperanto-Bibliotekon en Massa dank'al la donacoj de fratoj Bruno kaj Elio Migliorini, de adv. Jozefo Stanislao Boscarino de Ragusa, de prof. Korado Grazzini, de Luizo Minnaja kaj aliaj. La Biblioteko estis inaŭgurita la 25an de oktobro 2008 en la Rezista Salono de la Doĝa Palaco. (Pri adv. Jozefo Stanislao Boscarino, vidu: *Esperantismo en Sicilio* de Jakobeto Martinez).

Noto 151 Helmut Sonnabend (1924 - 6 decembro 1986), I.L.E.I.-prezidanto dum pli ol 10 jaroj. Li dediĉis lian esperantan karieron al problemoj pri la instruado. Li lasis libron *Esperanto: Lerneja eksperimento* (1979).

Dum la lerneja jaro 1979 - 1980 Esperanto estis enmetita kiel instruobjekton en la programojn de la Udine'a Turisma Teknika Instituto "A. Volta" de Udino, per iniciato de prof. Ferruccio Costantini, Lernejestro de la Instituto kaj entuziasmulo de la Internacia lingvo[152]. La instruadon oni konfidis al s.rino Maria Zuppetta Di Maso, kiu lernis la lingvon en Triesto en 1972 kaj tuj ŝi estis tre aktiva en Goricio, kie ŝi gvidis kursojn kaj, en la daŭro de unu jaro, fondis la G.E.A.[153].
Eksperimentocele, ŝi instruis la lingvon ankaŭ en kelkaj elementaj kaj mezgradaj lernejoj en Goricio kaj Lucinico, fondinte plie la "Kastoretaj klubo"-n, al kiu partoprenis geknaboj ĝis 15 jaroj.

S.ino Maria Zuppetta-Di Maso,
fondintino de la "Goricia Esperanto-Asocio"


ISTITUTO TECNICO PER IL TURISMO
A. VOLTA
UDINE

DICHIARAZIONE

Si dichiara che la Signora Di Masomaria, residente in Gorizia, Via Michelstaedtel n.11, è insegnante presso questo Istituto Tecnico per il Turismo, della lingua Esperanto, nelle classi Prima e Seconda, legalmente riconosciute con D.M. del 15.6.78 e D.M. del 10.5.79 ai sensi dell'art. 6 e 7 della legge N. 86 del 19 Gennaio 1942.

Si dichiara inoltre che le lezioni hanno regolarmente luogo dalle ore 8.00 alle ore 13.00 e dalle ore 14.30 alle ore 17.00.

Si rilascia la presente, in copia unica, su richiesta dell'interessata, per gli usi consentiti dalla legge.

Udine, 25 Settembre 1980.

IL PRESIDE
La kurso ĉe la Instituto "A. Volta"

En la kadro de la eksperimento ĉe la Instituto "A. Volta", la venontan jaron okazis en Udino, de la 23a ĝis la 25a de majo 1980, la 12a Trilanda Konferenco de Esperantistoj de Aŭstrio, Jugoslavio kaj Italio pri la temo: "Lernejo - Esperanto - Turismo", en la ĉeesto de la Vic-urbestro de Udino, de multaj Lernejestroj kaj geinstruistoj kaj de prof. Mario Dazzini, kiel reprezentanto de la I.E.F., kiu faris la oficialan prelegon pri la kunvena temo.

12° TRILANDA KONFERENCO
SCUOLA - ESPERANTO - TURISMO
La anoncafiŝo


La propaganda poŝtkarto

La nomkarto

Noto 152 Tiele respondis prof. Costantini al la gratula letero de prof.ino Minjo Paluello Minnaja: "Emerito antaŭ du jarojn, oni konfidis al mi la estron de tiu privata instituto. Mi ne povis maltrafi la okazon, kiun de longe mi atendis: enmeti la studadon de Esperanto en la lernejo egale kiel la eksterlandaj lingvoj. Ĝis kiam mi estas ĉi tie, oni daŭrigos…".

Ferruccio Costantini (San Giorgio di Nogaro, Udino, 10 marto 1908 - Udino, 4 oktobro 1999), instruisto, verkisto. Lerneja homo, li verkis pri lernejo en multaj revuoj. Li verkis kelkajn eldonaĵojn el kiuj friullingve *L'an dai todescs* (*La jaro de germanoj)* (Udine, 1983), kie estas priskribita la aŭstrian okupacio de Friulo de 1917 tra naciista optiko.

Noto 153 Pro ŝia aktiveco porti alte la Esperantan Standardon, la Urbestro de Goricio ŝin nomis la "Pasieculinon de Esperanto".
La Asocio estis fondta la 6an de februaro 1974 kaj prezentita al la publiko fare de Giorgio Silfer la 8an de majo 1974. Oni organizis du 1agrada kaj unu 2agrada kursoj kun trideko da partoprenantoj. La tago de la prezento, en la sidejo de la Provinca Administrado, prof. Valerio Ari prelegis pri: "La lingva problemo en la mondo". La Asocio havis la provizora sidejo en Kvartalo Kastelo n.ro 20/i (ĉe la loka turisma instanco), poste en Avenuo XX Septembro (eks Vilao Serena) kaj fine en Trapasejo L.L. Zamenhof n.ro 3/1, inaŭgurita la 10an de septembro 1985 okaze de la 56a Itala E.-Kongeso (Grado, 7 - 11 septembro 1985).

La Kunvena sidejo estis la Instituto “A. Volta”, kiu prizorgis la organizadon, sed pro teknikaj necesoj por plenumi la programon estis kuntrenitaj en la manifestacio aliajn tri lernejajn institutojn: la Mezgrada Lernejo “A. Manzoni”, kiu oferis la Aŭlon por la malfermo kaj la fermo de la kunveno, kaj la Lernejoj “Valussi” kaj “Zanon”, respektive por la “interkona vespero” kaj la “folklora vespero”.
Tre interesa estis la renkontiĝo de esperanta delegacio gvidita de prof. Mario Dazzini kaj konsistita el prof. Lanfranko Cristofoli de la Instituto “A. Volta”, prof.ino Catina Dazzini kaj de la konstantaj membroj pri T.E.K. (Martin Stupnig por Aŭstrio, Tone Logar por Jugoslavio kaj Renato Bisi por Italio) kun prof. Roberto Gusmani, Docento pri Glotologio ĉe la Universitato de Udino, por interŝanĝi opiniojn kaj sugestojn por enmeti Esperanton en la universitatajn disciplinojn.
Ĉi tiu la rezolucio de la renkontiĝo:

“La aŭstriaj, italaj kaj jugoslavaj esperantistoj kunvenitaj en Udino por ilia 12a Trilanda Esperanto-Konferenco de la 23a ĝis la 25a de majo1980:

- konstatante la tre bona rezulto de la instrua programo pri la internacia lingvo Esperanto en lernejo, kiu havis ĉi tie en Udino pluan konfirmon ĉar ĝi kuntrenis dum la jara T.E.K. aliajn kvar lernejajn institutojn;
- konsiderante la intereson montrita de la sama Universitato de Udine por la solvo proponita de Esperanto pri la interlingva problemo;
- decidas daŭrigi la vojon entreprenita evidentigante la propedeŭtikan valoron de Esperanto por instrui la aliajn fremdajn lingvojn, konigante al la Lernejaj Aŭtoritatoj la rezultojn pri la eksperimentoj faritaj dum ĉi tiuj lastaj jaroj kaj precipe tiun tre dokumentitaj de prof. Helmut Sonnabend en lia lasta verko *Esperanto: Lerneja eksperimento*, kiu atestas la funkcion kaj utilecon de Esperanto por la hodiaŭa kaj la morgaŭa mondo”.

Sed kun la paso de la tempo, al gelernantaj entuziasmo ne plu respondis tiun de geinstruistoj, iĝitaj ĉiam pli senentuziasmaj: la eksperimento daŭris tri jarojn, sed la tria malmute sukcesis kaj oni decidis anstataŭigi Esperanton favore de aliaj instruobjektoj.
Pro tio, por ne perdi la tutan faritan laboron, la 31an de majo 1981, per iniciato de Primo Trevisani, oni refondis la Udine’an Esperantista-Grupon laŭ la nomo Nova Espero Friuli, dank’ al la helpo de la Fervojista Postlaboro, kie ĝi havis sidejon en strato Cernaia n.ro 2[154].

La grupo Nova Espero Friuli
1. Nunziante Di Maso, 2. Luisa Drusin, 3. s.ino Maria Di Maso, 4. Elisabetta Siegentaler-Cordovado, 5. Rino Chinese, 6. Serena De Sanctis, 7. Leonello Carletti, 8. Giorgio Alessandro Sincovich, 9. Francesco Bernabò

La grupa membrokarto donita al Martinez

Noto 154 La unua estraro konsistis el: prez. Carletti Leonello, vic-prez. Sinkovich Giorgio, sekr. Siegenthaler-Cordovado Elisabetta, vic-sekr. Baschirotto Nicoletta, kas. Trevisani Primo, vic-kas. Gerometta Daniela, bibl. De Sanctis Serena,vic-bibl. Tondat Franca, konsilantoj Bernabò Francesco, Chiandetti Paola, Turchetto Teresa.

Dum la ceremonio d.rino Fausta Zumin, G.E.A.-prezidantino, donacis al novfondita grupo esperantan flagon bondezirante ke ĝi alportu pacan kaj unuecan mesaĝon.
Ĉeestis reprezentantoj de aliaj esperantaj grupoj (Goricio, Monfalkone, Triesto, Venecio), Anita Alther (T.E.A.-prezidantino), Spartaco Tarlindano de Venecio (kiel reprezentanto de la I.E.F.), Mario Carmignani de Goricio (G.E.J.A.-sekretario) kaj ankaŭ grupanoj el Jugoslavio, precipe tiu el Nova Gorica.
Leonello Carletti, flegisto ĉe la Udine'a fervoja flegejo, estis la prezidanto, ĉar, kiel subordigita laboristo de la Ŝtatfervojoj, li peris kun la Postlaboro. Instruis s.ino Maria Di Maso, kiu, dum kelka jaro, venis de Goricio, kaj tio ĝis kiam ŝi transloĝiĝis al Kava dei Tirreni, ŝia naskiĝa urbo, lasante ke "...plantetoj kresku solaj" [155].

S.ino Maria Di Maso

Por festi la okazaĵon kelkaj Trieste'aj esperantistoj, gviditaj de ilia prezidantino Anita Alther, sin prezentis per teatraĵo en Esperanto. Por la I.E.F. salutis konsiliano Spartaco Tarlindano, emerita staciestro, kiu kuraĝigis kaj laŭdis la laboron de tiuj, kiuj tre klopodis por obteni tiun rezulton kaj, la unua el ĉiuj, Primo Trevisani. Fine de la parolado s.ro Tarlindano donacis al la grupa biblioteko librojn, el kiuj *Gvidlibro pri Venecio* de 1923. Poste parolis la oficiala oratoro, libr. Renato Bisi[156], kiu memorigis interalie ke Esperanto estis jam tre flora en Udino kelkajn jarojn antaŭe kaj ke prof. Tellini (aŭtoro de rimarkinda vortaro Esperanto - Itala) donacis al la urba biblioteko multajn Esperantajn librojn kaj al la urbo la belan mozaikon kun la bildo de Zamenhof, kiu ankoraŭ troviĝas irante kastelon. Libr. Bisi finis bondezirante al la nova grupo longan kaj fekundan vivon. Poste oni donis flordonaco al s.ino Maria Di Maso pro la multaj kursoj gviditaj en Udino kaj pro la varbado.
La nova grupo, dank'al la entuziasmo de la Estraro, tre klopodis por lerni la lingvon kaj disvastigi al aliaj la Zamenhofan mesaĝon per prelegoj, dissendoj, ĉeestoj en foiroj kaj manifestacioj, kursoj ankaŭ ĉe lernejoj kaj kluboj, kaj intensa aktiveco en la sidejo.
La 29an de aprilo 1981, en la Provinca Konsilia Salonego de Goricio (Corso Italia n.ro 55), Andreo Chiti-Battelli, Sekretario de la Italaj Parlamentaj Delegacioj ĉe la Eŭropaj Asembleoj, prelegis pri "Unu konstitucio kaj unu lingvo por Eŭropo".
La 30an de majo 1982 la grupo festis la 1an datrevenon de la fondo per simpla ceremonio, en kiu partoprenis gastoj, krom Udino, ankaŭ de Goricio, Monfalkone, Triesto, Venecio kaj reprezentantoj de esperantaj grupoj de Jugoslavio (Kapodistria, Nova Gorica, Lubiana), Aŭstrio kaj Japanio. Ĉeestis ankaŭ s.rino Iole Beorchia, edzino de la esperantista fervojisto Jakobo Beorchia, kiu kun ŝia partopreno donis pluan motivon por pliigi la grupon, por tiu idealo, kiu nin kunigas malgraŭ la pasintaj tempoj. El la diversaj paroladoj skabeno Franco Della Rossa, post kiam li gratulis la grupestron, li menciis la eblecon pri helpo de la komunuma administrado. Je la konkludo de la cerimonio estis recititaj scenetojn kaj kantitaj en Esperanto friulajn popolajn kantojn de la grupo junaj esperantaj kastoroj de Lucinicco, estrita de s.rino Genovese, kaj de la ĥoro de N.E.F. akompanita de Rino Chinese per gitaro.

Martin Stuppnig de Arnoldstein dum lia parolado

Giorgio Sincovich, Leonello Carletti, libr. Renato Bisi, Martin Stuppnig, skab. Franco Della Rossa

Sonja Tavčar de Kapodistria dum ŝia parolado

Sonja Tavčar, Giorgio Sincovich, Leonello Carletti, libr. Renato Bisi, Martin Stuppnig

La 23an de novembro 1982 okazis la unua dissendo pri Esperanto en Radio Onde Furlane.

Noto 155 S.ino Maria Di Maso naskiĝis en Vietri sul Mare (Salerno) la 2an de oktobro 1921.

Noto 156 Pri la biografio de libr. Renato Bisi vidu: *Cent jaroj de Esperanto en Triesto*, Biblion Eldonoj srl, Milano, 2008.

La 29an de majo 1983 la grupo N.E.F. festis la 2an datrevenon de la fondo en la ĉeesto de geesperantistoj de Goricio, Monfalkone, Triesto kaj Jugoslavio (Kapodistria, Fiume, Nova Gorica, Zagrebo). Hon. Georgo Santuz, vic-ministro de Trezoro, gratulis la estraron pri la farita aktiveco bondezirante ĉiam novajn rezultojn. Dum la ceremonio s.ro Renato Bisi, honora T.E.A.-prezidanto, donacis al la grupo grandavaloran libron: *La nobla Korano* esperantigita de Italo Chiussi (Triesto, 13 majo 1919 – Frankfurto sur Majno, 8 junio 1973).

Hon. Giorgio Santuz dum lia parolado

Alessandro Sincovich, Riccardo Cordovado

Libr. Renato Bisi dum lia parolado

Libr. Renato Bisi, Alessandro Sincovich, Riccardo Cordovado, hon. Giorgio Santuz, Dino Boezio

Post la komencaj paroladoj, estis disdonita de hon. Santuz la atestoj kaj plenumitaj kantoj (precipe estis ŝatata la kanzono "Paco jes, milito ne", skribita de grupanoj) kaj la amuza balado de Tomaŝ Pumpr *Foirfesta kanto pri Esperanto-instruisto*.



La dediĉo de Spomenka Štimec

Geaktoroj de la grupo Nova Espero Friuli
1. Alessandra Cordovado, 2: Renzo Scialino, 3. Marco Crespan, 4. Carla Cordovado, 5. Gibil Crespan

La ĥoro de la grupo Nova Espero Friuli
1. Elisabetta Cordovado, 2. Serena De Sanctis, 3. Kaj 4.. Karla kaj Aleksandra Cordovado, 5. Giorgio Sincovich, 6. Giacomino Martinez, 7. Leonello Carletti, 8. Rino Chinese

La 10an de decembro 1983, okaze de la Zamenhof-Tago, en Goricio, oni prezentis la romanon *Materada* de Fulvio Tomizza esperantigita de d.ro Pier Georgo Soranzo[157]. Ĉeestis, krom la verkisto, ankaŭ la eldonisto Bruno Casini kaj urbestro Antono Scarano.
Materada estis verkita tuj ĉe la inspiro dum unu monato kiam Fulvio Tomizza estis 23jaraĝa. La verkisto memorigis ke "gi estis konsiderita libron neproponebla ekstere Italio ĉar tre ligita al la realo de ĉi tiuj urboj. Por mi, kontraŭe, la romano lanĉas klaran mesaĝon, de amikeco inter popoloj kun lingvo diversa". Sukcesa unuiĝo inter lingvo, kiu ne havas limojn, Esperanto, kaj libro verkita por superi la etnajn diferencojn.

Noto 157 Fulvio Tomizza (Giurizzani di Materada, 26 januaro 1935 - Triesto, 21 majo 1999) estis ekzilulo en Triesto de 1955 kiam lia lando estis donata al Jugoslavio. Fulvio Tomizza kaj d.ro Pier Georgo Soranzo estis studkamaradoj en la Kolegio pastro Bosko de Goricio.

La dediĉo de Fulvio Tomizza kaj de Pier Georgo Soranzo

En la monato de februaro 1984, okaze de la jarkunveno de la G.E.A. oni elektis: prez. Leone Furlan, vic-prez. Serafina (Sera) Genovese, sekr. Maria Di Maso, kas. Atilio Liuzzo, bibl. Marino Carpignano, konsiliantoj Anna Cosenza, Nunziante Di Maso, Maria Degano, Vittorio Malaroda, revizoroj Fausta Zumin, Nella Fantini, Belinda Bisiani.
La 19an de februaro 1984, en la loka Auditorium (Aŭditorio), organizita de la G.E.A. kune kun la Kultura Asocio "Lipizer" kaj la Komunuma Administrado, okazis koncerto de la famaj bulgaraj kantistoj Veselin Damjanov kaj Maria Angelova[158].
La 22an de februaro1984 oni ciklostilis la unuan informilon de la grupo Nova Espero Friuli.

La Informilkapo

En januaro 1985, ĉe la G.E.A., okazis alia grava renkontiĝo kun la esperanta literaturo: d.ro Pier Georgo Soranzo de Monfalkone prezentis la romanon originale verkita *Ombro sur interna pejzaĝo* de Spomenka Štimec[159].

La prezento de la libro
Pier Georgo Soranzo, Spomenka Štimec, Anna Cosenza

La 22an de februaro 1985, dum la "Semajno de Internacia Amikeco", oni faris intervjuon ĉe la televizia sendostacio Telefriuli al Psikiatro d.ro Tazio Carlevaro de Bellinzona pri: "Esperanto kaj Sporto" kaj al hon. Georgo Santuz[160] pri "Esperanto kaj Lernejo".

Noto 158 Veselin Damjanov, operkantisto kaj bulgara esperantisto. Li surdiskigis pecojn el operoj en Esperanto.

Maria Angelova (1925 - Sofio, 12 decembro 1999), operkantistino kaj bulgara esperantistino.

Noto 159 Spomenka Štimec (Orehovica, 4 januaro 1949), verkistino, tradukistino, instruistino pri Esperanto. Diplomiĝita pri lingvoj (germana kaj franca, 1972), ŝi eklernis Esperanton en 1964. Ŝi estis tre aktiva en la T.E.J.O. kaj ŝi organizis la I.J.F. en Sarajevo (1973). De 1972 ĝis 1994 ŝi laboris en la Internacia Kultura Servo.

Noto 160 Tazio Carlevaro (n. Bellinzona, 27 julio 1945), Ticino'a psikiatro kaj psikoterapisto. Aktiva esperantisto kaj kunredaktoro de *Esperanto en Perspektivo* (1974), enciklopedia volumo pri la tuta esperanta mondo. Dum la sepdekaj jaroj li estis ano de "La Patrolo" kaj dum la okdekaj jaroj li kunlaboris en la Internacia Akademio de Sankta Marino. Inter 1980 kaj 1985 li estis prezidanto de "Literatura Foiro".

Giorgio Santuz (n. Udino, 23 januaro 1936), instruisto, kristandemokrata deputito de 1972 ĝis 1992. Li subskribis leĝproponon pri la lingvaj minoritatoj.

Vespere, de la 21.00 ĝis la 22.00, okazis ronda tablo rekte elsendita ĉe la loka televizio RDF kun la partopreno de prof. Roberto Gusmani de la Universitato de Udino[161], de d.ro Tazio Carlevaro kaj de Riccardo Cordovado; debatestro: la ĵurnalisto Nico Grilloni.
Alproksimiĝonte la 56a Nacia Kongreso kaj por ĝin organizi tre bone, dum la jarkunveno de februaro 1985 oni elektis: prez. Leone Furlan, vic-prez. Sera Genovese, sekr. Marino Carpignano, kas. Atilio Liuzzo, bibl. Anna Cosenza, revizoroj Nunziante Di Maso, Fausta Zumin, Nella Fantini. Aliaj Estraranoj estis: Maria Di Maso, Vittorio Malaroda, Luigi Barbana, Maria Degano.
Dum la periodo 7 - 11 septembro 1985 okazis en Grado, fare de la G.E.A. kaj kun la patroneco de la Provinca Administrado de Goricio, la 56a Nacia Esperanto-Kongreso, kiu havis kiel kongrestemo: "Esperanto kaj Mezeŭropo: du kulturoj plurismaj"[162].
La grupo N.E.F. interesiĝis pri la organizado de la ekspozicio de la libro, kun la ekspozicio de ĉirkaŭ 250 libroj kaj gazetoj.
Dimanĉon, la 8an de septembro, antaŭ ol la officiala inaŭguro de la Kongreso en la Kongresaj Palaco (avenuo Italia n.ro 2), pastro Ippolito Pellis celebris, en la Preĝejo sankta Crisogono, la Sanktan Meson en Esperanto, kun la kantoj luditaj de la "Ĥoro de Fiŝistoj" de Grado.
Post salutoj de prof. Renato Corsetti[163], I.E.F.-prezidanto, kaj de reprezentantoj el diversaj delegacioj, la Prezidanto de la Organiza Komitato, Leono Furlan, diris ke "la kongrestemo mem estas renkontmesaĝo inter gentoj kaj popoloj por la komprenado kaj la valorigo de kulturoj. Kaj Esperanto, pro ĝia intrinseka naturo de internacia kaj supernacia lingvo celas fortigi tiujn valorojn por homa kaj civila kunlaborado pli vasta".
La enkonduka prelego estis de prof. Giordano Formizzi, de la Universitato de Verona, kiu prelegis pri la kongrestemo farante historian kaj sociologian analizon pri la lastaj du jarcentoj, ekde kiam la franca revolucio iĝis premisio por la ascendo de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko.
Partoprenis: prof. Nikola Raŝiĉ, de la Universitato de Zagrebo, pri diversaj vidpunktoj de Mezeŭropo kaj pri la rutena popolo, disa en pli naskiĝlokoj ("Opinioj de Mikes György pri Mezeŭropa"), prof. Karlo Minnaja de la Universitato de Padovo, pri la mezeŭropaj aŭtoroj en la esperanta literaturo ("Mezeŭropaj verkistoj en la esperanta literaturo"), kaj prof. Hans Michael Maitzen[164] de la Universitato de Vieno, pri komputora analizo inter Esperanto kaj la centreŭropaj lingvoj ("Afinecoj inter Esperanto kaj la centreŭropaj lingvoj: rezultoj de komputora analizo").

La prelego de prof. Hans Michael Maitzen
(Foto el: L'Esperanto n.ro 9 - 10, sept. – okt. 1985, paĝo 8)

La prelego de prof. Karlo Minnaja
(Foto el: L'Esperanto n.ro 11, novembro 1985, paĝo 11)

Noto 161 Roberto Gusmani (Novaro, 18 oktobro 1935 - Udino, 16 oktobro 2009), glotologo, docento pri Glotologio en Mesino kaj de 1972 en Udino. Li estis Fakultatestro pri lingvoj, Rektoro de la Udine'a universitato kaj Estro de la Centro pri Plurlingvismo kaj de la Instituto pri Glotologio kaj pri klasika Filologio. En 2008 li estis nomita membro de la Nacia Akademio de Lincei, kiu motivis la indikon "unu el la plej italaj fakuloj pri lingvstika scienco".

Noto 162 La glumarko havas la n.ron 1027 kaj la poŝtstampo la n.ron 39 en la katalogo E.L.F.-A.R.E.K..

Noto 163 Renato Corsetti (n. Romo, 29 marto 1941), lingvisto, nomita I.E.F.-prezidanto dum la 74a Nacia Kongreso (Pizo, 1 - 7 septembro 2007). Post la universitataj studoj en la ekonomia kaj lingva kampo, prof. Corsetti laboris longe kiel Bankestro. Dum la jaroj '90 li iĝis asistento, kaj poste profesoro, ĉe la Fakultado pri Psikopedagogio pri Lingvoj kaj Komunikoj de la Universitato de Romo. Prof. Corsetti eklernis Esperanton dum la jaroj '60.aj, li okupis multajn oficojn ĉe diversaj esperantaj organismoj, kiel T.E.J.O. (1970 - 1973), U.E.A. (2001 - 2003). Li estas ankaŭ profesoro ĉe la Internacia Akademio pri Sciencoj de Sankta Marino kaj ankaŭ E.-Akademiano. Okaze de la inaŭgura ceremonio de la 96a U.K. (Kopenhago, 23 – 30 julio 2011), U.E.A. proklamis d.ron Corsetti sia Honora Membro rekompence por liaj meritoj akiritaj dum kvardek jaroj de esperanta aktiveco. Li verkis multe da verkoj Esperante kaj itale pri la lingva politiko, pri Esperanto, pri la infana dulingvismo kaj pri la psikopedagogio de la lingvo kaj la komunikado. Nune li vivas kun la edzino, Anna Löwenstein, ankaŭ ŝi esperantistino, kaj du filoj, ambaŭ esperantistoj de patrina lingvo.

Noto 164 Hans Michael Maitzen (n. Graz, Aŭstrio, 28 marto 1943), astronomo, magistriĝinta en Graz en 1967. Profesoro ĉe la Astronomia Istituto de la Universitato de Vieno. Aktiva esperantisto, li estis T.E.J.O.-prezidanto (1968 - 1969). Li kunlaboris en la 2a eldono de la *Plena Ilustrita Vortaro* (P.I.V.).

Ĉeestis ankaŭ la verkisto Fulvio Tomizza, kiu volis atesti lian simpation por Esperanto kaj la Kongreso, partoprenante en la debato.
La kongrestemo estis la okazo por revenigo al la eŭropa unueco por ekradiki firme inter personoj. La partopreno ankaŭ de multaj eksterlandanoj de Aŭstrio, Francio, Germanio Okc., Japanio, Jugoslavio, Nov-Zelando, Pollando, Svedio, Usono kaj Hungario pruvis ke la kongrestemo estis sentita ankaŭ de aliaj landoj kaj kiom eŭropaj esperantistoj estu sentemaj pri komuna lingvo por Eŭropo.
Dum la kongreso estis giĉeto por la speciala memoriga poŝtstampo de la kongreso kaj inaŭgurita la "Trapasejo L.L. Zamenhof" (la 10an de septembro 1985, decido n. 612/1985).

La poŝtkarto kun la speciala poŝtstampo kaj la glumarko de la 56a Kongreso

De oktobro 1985 oni reprenis la eldonon de "En kontakto", informilo de la G.E.A..
La 2an de novembro 1985, ĉe la G.E.A.-sidejo, Glauo Corrado (pseŭdonimo Antares) prezentis lian esperantan gramatikon al ĉeestantoj el Monfalkone,Triesto kaj Udino. Poste la prezento, Marino Carpignano komentaris centon da diapozitivoj pri la 56a Kongreso de Grado.
La 1an kaj la 2an de februaro 1986, en Goricio, prof. Nikolao Raŝiĉ de la Universitato de Zagrebo, fakulo pri Sociologio kaj Lingvistiko, faris du prelegojn. La unua, en la komunuma salono, pri: "Situacio socio-lingvistika pri slavaj literaturaj lingvoj". Prof. Raŝiĉ parolis pri la kialo la 52 slavaj lingvoj parolataj en la Landoj, kiuj estas de Kaspio al la Balta maro kunvivas kaj la kialo Jugoslavio uzas por la dokumentado nur la tri pli parolataj (serba, kroata kaj slovena) kaj en la armeo nur unu lingvo aŭ du iafoje. La dua, en la sidejo de la G.E.A., pri: "Por la difino de la esperanta kulturo. Raporto socio-historia pri la esperanta literaturo". Prof. Raŝiĉ precizigis ke Esperanto havas pli kulturo ol tre multe da aliaj lingvoj ekzistantaj de jarcento, tamen ĉi tiu kulturo apartenas al ĉiuj popoloj, kiuj intencas utiligi tiun lingvon tial ĝi neniam povos havi propran kulturon kiel ia nacia lingvo, alie oni falus en la eraron ke oni faris ne internacian lingvon sed oni aldonis alian al tiuj jam ekzistantaj. Krom la Gorici-anoj, ĉeestis esperantistoj de Konegliano Veneto, Monfalkone, Nova Gorica, Triesto kaj Udino.
La 1an de marto 1986 prof. Giordano Formizzi de la Universitato de Verona faris prelegon al gelernantoj de la Mezgrada Lernejo "Egidio Feruglio" de Tavagnacco pri: "Esperanto, ĉu ebla lingvo por Eŭropo?". Prof. Formizzi parolis pri la neceso trovi komunan lingvon por Eŭropo celante al konfederacio de ĝiaj Ŝtatoj kaj post kiam li analizis mallonge la nunan situacion, li rimarkigis ĉar ne estas justa, ke ĉiuj popoloj devas akcepti iĝi angleparolantoj, germaneparolantoj aŭ franceparolantoj. Ankaŭ agnoskante ke la studo de ĉi tiuj lingvoj estas necese, li tamen klarigis, ke la akcepto de una el la suprediritaj lingvoj povus signifi ankaŭ la politikan, ekonomian kaj kulturan submetitecon de eŭropanoj.
Okaze de la restado de prof. Formizzi, en Udino oni allasis ankaŭ intervjuon ĉe Radio Effe kaj alia enondiĝita ĉe Tele-Udine.
De la 23a ĝis la 31a de majo 1986, en la prestiĝa palaco Lantieri de Goricio, organizita de la G.E.A. kune kun la Komunuma Administrado kaj kun la loka Eŭropa Kultura Centro, kies sidejo estas propre en Palaco Lantieri, okazis ekspozicio de esperantaj libroj kaj gazetoj.

Sera Ĝenovese dum la ekspozicio de la libroj

Dum la ekspozicio, oni faris tri prelegojn. La unua, kiu inaŭguris ankaŭ la ekspozicion, pri "Esperanto, literatura lingvo" fare de prof. Giordano Formizzi. La tagon 28an prof. Mario Nordio de Venecio prelegis pri "Lingvoj kaj politikoj". Fine, d.ro Francesco Pignatelli, Psikologo kaj Prezidanto de la I.E.J., la 30an de majo prelegis pri "Esperanto kaj nekonscio".
La 1an de junio 1986, okaze de la 5a datreveno de la fondo de la Udine'a E.-grupo, oni prezentis, nacia antaŭmontro, la italan tradukon de la gramatiko *Esperanto, laŭ la Zagreba metodo*, italigita zorge de Elizabeth Siegenthaler-Cordovado kaj Giorgio Sincovich. La prezento de la gramatiko estis farita de prof. Zlatko Tiŝljar de la Universitato de Zagrebo, kiu estas ankaŭ unu el la aŭtoroj, en la ĉeesto de multaj lokaj aŭtoritatoj kaj de la najbaraj Regionoj. Temas pri gramatiko por memlernantoj, sed ankaŭ por normalaj aŭ intensivaj kursoj. Jam

alilingve tradukita, ĝi celas havigi bazan lingvan konon, kiu permesas praktiki la esprimkapablon per 500 vortradikoj pli utiligitaj, kiujn oni selektis per komputero el kolekto de sesdekmil vortoj.
En la sama mateno, en la preĝejo Sankta Maria de l' Angeloj en Baldasseria Media, pastro Nello Marcuzzi celebris la Sanktan Meson en Esperanto dum N.E.F.-grupanoj plenumis la kantojn, tradukitaj, aranĝita kaj estritaj de Manuel (Emanuelo Rovere, nda).
La 19an de oktobro 1986, okaze de la Misia Tago oni celebris la Sanktan Meson en la preĝejo Sankta Maria en Kastelo de Udino. Celebrantoj: Mons. Alfredo Battisti, pastro Ippolito Pellis, pastro Nello Marcuzzi[165].
Mons. Battisti povis celebri la Sanktan Meson en Esperanto post apenaŭ kelka esperanta leciono de pastro Marcuzzi.

Pastro Nello Marcuzzi, Mons. Alfredo Battisti kaj pastro Ippolito Pellis

Sanktaj bildetoj okaze de 50 jaroj de pastreco de pastro Ippolito Pellis

La Misiia Tago estis la homilia temo kaj mons. Battisti memorigis la altvaloran agon de la friulaj misiistoj kie pli necesas la parolo de Dio, de la ama kaj de la kristana karitato. Poste, mons. Battisti dankis esperantistojn kaj diris aprecajn vortojn pro ilia ago, pro ilia interkomprena kaj frata idealo inter popoloj per la internacia lingvo Esperanto.
Kiel konfirmo de la internacieco de Esperanto, ĉeestis multaj geesperantistoj de Karintio kaj Slovenio, krom tiuj el Konegliano, Goricio, Pordenono, Rimini, Treviso kaj Triesto. En ĉi tiu okazo Esperanto faris "miraklo"-n proksimigi por unika intereso arabon (alĝeria studento, gasto en Konegliano) kaj hebreon, Fausto Levi de Conegliano, prezidanto de la E.-grupo. Ili havis koran interparolon, monstrante ke Esperanto helpas la unuiĝon inter popoloj.
La ceremonio finiĝis per salutoj antaŭ la bildmozaiko de d.ro Zamenhof, kiu estas sur la ekstera glaciso de la kastelo.
La 22an de januaro 1987 okazis la jara asembleo de N.E.F.. Post la prezentado, fare de Elizabeth Cordovado, pri la grupa agado dum 1986 kaj pri la grava programo por la jubilea jaro de Esperanto, oni elektis la novan Estraron por la jarduo 1987 - 1988.
Dum la periodo 2a – 4a de aprilo 1987 prof. Giordano Formizzi, okaze de la Jarcento de Esperanto, faris prelegojn ĉe 5 mezgradaj lernejoj de Goricio, dank'al la kunlaborado de la loka Provinca Studestro.

Noto 165 Alfredo Battisti (Masì, Padovo, 17 januaro 1925 - Udino, 1 januaro 2012), Ĉefepiskopo de Udino de 1973 ĝis 2000.

Pastro Ippolito Pellis. En 1960 li estis delegito U.E.C.I.. En 1986 li festis sian 50jarojn de pastreco (1936 - 1986) eldonigante sanktajn bildetojn Esperante skribitaj.

Pastro Nello Marcuzzi (n. Cornino, 2 julio 1931). Li prestis paŝtista servo en San Giorgio di Nogaro, Rivalpo-Valle, Peonis kaj, kiel oblato, ene kaj estere la diocezo, en Italio, Germanio, Svisio, Kanado, Turkio, Luksemburgio kaj Francio. Li eklernis Esperanton en 1985 partopreninte en la 1a kaj 2agrada kursoj ĉe Nova Espero Friuli. Li verkis monografion je popola karaktero *Alc di Curnin* (Io pri Kornino*)* (1991), du verketojn *Peonis - Madonna della Salute* (Peonis - Madono de la Sano*)* (1994), *San Girolamo di Pampaluna* (Sankta Hieronimo el Pampaluna*)* (1995), biografion *Lettere di un Missionario* (Leteroj de Misiisto*)* (1999), diversaĵon per dialektaj versoj *Rimaries d'un Curniglàt* (Rimaro de Kornin-ano) (2000), tri monografiojn *Oratorio San Vincenzo Ferrer* (Preĝkapeleto Sankta Vincento Ferreri) (2002), *Comunità Cristiana in Corgnolo-Pampaluna (*Kristana komunumo en Cornjolo – Pampaluna*)* (2004), *Santa Giuliana V. e M. , 305-2005. Centenario del martirio,* Cornino (Sankta Juliana V. kaj M., 305-2005 jarcento de la martiriĝo, Kornino) (2005), biografion *Marie-Jeanne* (2007), kvar monografiojn *Mainas in Rivalpo-Valle* (2007), *Ancone in Peonis* (Retabloj en Peonis) (2007), *Ancone in Cornino (*Retabloj en Kornino) (2007), *Tempietto dedicato a San Floreano* (Templeto dediĉita al Sankta Floreano*)* (2009), biografion *Illustrazioni e Didascalie di un Missionario (*Bildoj kaj Subtekstoj de Missisto) (2011), monografion *Alc di Ciman* (Ion pri Cimano) (2012), broŝureto *Cornino. Centenario del Camposanto 1912 - 16 giugno - 2012* (Kornino. Centjaro de la Tombejo 1912 - 16 junio - 2012) (2012), *Un piccolo mondo intorno a me. Incontri ed esperienze* (Malgranda mondo ĉirckaŭ mi. Renkontoj kaj spertoj) (2012). Temas pri verkoj rilataj al la historio, la personoj kaj la okazaĵojn de lia naskiĝa lando.



Prof. Ĝiordano Formizzi gasto ĉe la G.E.A.

La 20an de septembro 1986 la grupo sin adresis al prof. Antonio De Ruosi, Lernejestro de la Ŝtata Metia Istituto "Giovanni Sello", por skizo farota dum la lecionoj pri Metia Desegno, kiu transdonu grafikforme, efikan, koncizan kaj tujan ideologian mesaĝon, ne ligita al okazintaĵoj aŭ konkretaĵoj, por publikigi gravajn iniciatojn de la grupo. Por instigi la lernantojn oni sugestis la eblon anonci konkurson kun la aliuĝo de premioj por la pli bonaj skizoj kaj ekspozicion de ĉiuj skizoj.
La konkurson pri diskoniga afiŝo de la Internacia Lingvo Esperanto inter la gelernantoj de la klaso 5a C de la Metia Istituto "Giovanni Sello", dank'al la laŭdinda interesiĝo de lernejestro ark. Antonio De Ruosi kaj de prof.ino Maura Prugger, estis anoncita en la unuaj monatoj de 1987. La 15 afiŝoj estis eksponitaj en la urbaj librovendejoj kaj ĉe la Foira Kvartalo de "Udino Ekspozicioj", okaze de la Ekspozicio "Hobio, Sporto kaj Libera Tempo" de la 4a ĝis la 12a de aprilo 1987.

La anoncafiŝo

La plej voĉdonita afiŝo

La ekspono de la afiŝoj en urba librovendejo

Vizitis la ekspozicion pli ol 2.500 personoj, el kiuj 1.260 voĉdonis por elekti la plej efikan afiŝon.
La premia ceremonio okazis la 11an de aprilo 1987. Krom la aŭtoroj, multe da esperantistoj kaj multenombra publiko, ĉeestis d.ro Benedikto Zangrì, reprezentanto de la Provinca Lernejestro, d.ro Anselmo Bertossi, Ĝenerala Sekretario de la Foira Instituto, Dino Boezio, Skabeno pri Publika Instruado de la Udine'a Komunumo kaj Prezidanto de la Fervojista Postlaboro, ark. Antonio De Ruosi, prof.ino Maura Prugger, kiu kunordigis la laboron de la gelernantoj de la Metia Instituto, kaj Sera Genovese, Regiona Delegito de la I.E.F.. Gajninto estis Lorenzo Colussi, kiu, per lia afiŝo, ne nur kapablis esprimi grafikan kaj koloran teknikon, sed precipe li elektis la trafan sloganon "Esperanto, la lingvo, kiu kreas la etoson de la paco"[166].

Noto 166 La manifestacio, subtenita de la Studestrejo de la Udine'a Provinco, estis enmetita en la kadron de la aktivecoj "Malfermu la fenestrojn al la mondo" - Korespondaĵa ekspozicio inter gelernantoj el 40 landoj el 5 kontinentoj en internacia lingvo Esperanto.

Gelernantoj de la Arta Instituto “G. Sello”

De la 4a ĝis la 6a de septembro 1987 la grupo N.E.F. organizis la 19an Trilandan Esperanto-Konferencon[167], kiu, okaze de la centjara datreveno de internacia Lingvo, havis kiel temo: “Perspektivoj por la dua jarcento de Esperanto”. La konferenctemo certe estis trafita specife ĉijare, ĉar en la tuta mondo oni celebras la unuan centjaran datrevenon de la internacia lingvo Esperanto.

19ª TRILANDA
ESPERANTO-KONFERENCO

UDINE
4-6 settembre 1987

1887-1987
Centjara jubileo
de Esperanto

S :
La nomkarto

La Kunordiga Komitato konsistis el: Martin Stuppnig (Aŭstrio), Tone Logar (Jugoslavio), Emanuelo Rovere (Italio); Elizabeth Cordovado kaj Giuseppe Vittorio Valente alflankiĝis al Emanuelo Rovere en la loka Komitato.

Multaj estis la eminentuloj, kiuj aliĝis en la Honora Komitato. El ili, oni nomas:

hon. Georgo Santuz, Ministro pri la Publika Funkcio
sen. Franko Castiglioni, Justica Subsekretario
hon. Martino Scovacricchi, Defenda Subsekretario[168]
d.ro Alfeo Mizzau, eŭropa Parlamentano
d.ro Francisko Larosa, Prefekto de Udine
Tiziano Venier, Prezidanto de la Provinca Administrado
adv. Piergeorgo Bressani, Urbestro de Udine
Dino Boezio, Skabeno pri Instruado kaj Prezidanto de la Fervojista Postlaboro
d.ro Dominico Savastano, Kvestoro de Udine
d.ro Valerio Giurleo, Provinca Studestro
Gianni Bravo, Prezidanto de la Komerca Industria Metiista Ĉambro.

Esperantismo estis reprezentita ankaŭ de d.ro Hans Michael Maitzen de la Universitato de Vieno, de pastro Franziskus Gruić[169] de Jugoslavio, kiu celebris, kune kun pastro Ippolito Pellis, la Sanktan Meson en Esperanto en la Preĝkapeleto de la Pureco, de d.ro Umberto Stoppoloni[170] el Pistoja, Konsiliano de la I.E.F., kaj libr. Renato Bisi de Triesto.
La oficiala malfermo okazis sabaton la 5an de septembro en Salono Aiace, disponigita de la Udine’a Komunumo, en la ĉeesto de multenombra publiko kaj, el aliaj, de la provinca skabeno pri kulturo Jakobo Cum kaj de hon. Martino Scovacricchi, kiu memorigis ke “la elekto de Esperanto aperas hodiaŭ la sola racia kaj demokrata solvo por oponi la diskriminacian kulturon de la anglalingvo, kiu, iom post iom, detruas la tutajn aliajn lingvojn kaj kulturojn. Ĉar Esperanto estas lingvo, kiu ne havas imperiojn kaj ĝi povas eviti, do, la superŝvebontan lingvan katastrofon.”.

Noto 167 Trilanda E.-Konferenco. Ĉiujara renkonto inter aŭstriaj, jugoslaviaj kaj italaj esperantistoj. En esperantismo ĝi estas simple nomita “Trilanda”. La unua kunveno okazis en Bohini en oktobro 1967, dank’al iniciato de Toni Logar de Lubiano, kun la celo kunigi esperantistojn el la tri najbaraj landoj por interŝanĝi spertojn pri la disvastigo kaj utiligo de Esperanto, por la reciproka kono de la respektivaj kulturoj.

Noto 168 Martino Scovacricchi (Udino, 11 novembro 1921 - tie, 5 februaro 2005), instruisto, pentristo, deputito socialdemokrata por Udino de 1976 ĝis 1992, vic-ministro pri defendo. Li estis magistro pri Beletro. En 1978 li prezentis la leĝproponon “preskriboj por la disvolvo de la kulturo, de la lingvo kaj de la tradicioj pri Friulo”.

Noto 169 Pastro Franciskus Gruiĉ (Trnjanski Kuti, 1 julio 1932 - Osijek, 14 aprilo 2004), poligloto, instruis germanan, latinan kaj francan lingvon en la dioceza gimnazio. Esperantisto de 1950, li estis dum multaj jaroj I.K.U.E.-reprezentanto.

La oficiala inaŭguro de la Kongreso.
Elizabeth Cordovado dum ŝia parolado

Kadro vere miriga pro la ĉeesto ankaŭ de ne esperantistoj, kiuj iamaniere kaj eble ne ekkonscii sentis la neceson kompreni la kialon personoj enhavante lingvojn diversajn sukcesis konversacii sen ia embaraso.
Dum lia parolado d.ro Maitzen prezicigis ke "la angla lingvo sin monstris, en tiuj lastaj jardekoj, lingva sperto, kiu strebas nur al hegemonia celo kaj ekonomia kaj kultura. En tiu optiko Esperanto, malproksima esti konsiderita kutimo aŭ utopio, povas vere iĝi komunikilo, kiu metus la popolojn samnivela kaj egala digno.".
Tre grava, dum la interveno de d.ro Maitzen, estis la raporto pri la projekto D.L.T. (Lingva Distribua Tradukado), finita de nederlanda firmo, unu el la plej gravaj produktantoj de "softvaro". Laŭ tiu projekto, Esperanto estas utiligita kiel "lingvo-peranto" por ĉiuj la aliaj en la aŭtomata tradukado per komputero.
En la kunveno, subtenita de la Udine'a Komunumo kaj Provinco kaj de la Regiono Friulo-Venetia Jiulio, aliĝis 75 geesperantistoj de Jugoslavio, 45 de Italio, 17 de Aŭstrio, 1 de Polio kaj 1 de Usono. Por la okazo oni eldonis specialan poŝtstampon[171].

La poŝtkarto kun la speciala poŝtstampo

Dum la kunveno, en la kinejo de la Fervojista Postlaboro, sin prezentis Claudio Livieri de Goricio, kiu per klasika gitaro ludis pecojn el la friula repertuaro, "Cantori del Friuli" (Friulaj kantistoj), kiuj kantis la esperantan himnon "La Espero" kaj la friulan viloton "La Ligrie" (La Gajeco) Esperantigita, kaj dancantetoj "Stelutis Alpinus" (Edelvejsoj).
La aktoj de la 19a T.E.K. estis eldonitaj de la grupo N.E.F..

La kovrilo de la aktoj de la 19a Trilanda

Noto 170 Umberto Stoppoloni (27 februaro 1917 – Pistoia, 6 aŭgusto 2001), juĝisto, honora membro de U.E.A. de 1992. Esperantisto de 1951, li estis tre gravulo de la itala esperantismo kaj dum 30 jaroj li surprenis diversajn oficojn en la I.E.F., kies li estis prezidanto de 1966 ĝis 1971. Dum la jaroj '70aj li havis la kuraĝon alfronti gravan ŝanĝon de la statuto kaj post longa kaj kompleksa proceduro li obtenigis por la I.E.F. oficialan agnoskon kiel organizo sen profita celo. Li laboradis longe kun gefratoj Dazzini por peti al Parlamento la oportunon enmeti la instruadon de Esperanto en la italajn lernejojn. Li kribis informan materialon kaj italigis diversajn E.-dokumentojn.
Per iniciato de familio Stoppoloni kaj de la E.-grupo de Pistoia oni fondis la "Premion Umberto Stoppoloni" por memorigi lian personon. La "Premio" intencas konstitui opportunon por trovi kaj valorigi personojn, kiuj karakterizis ilian socian kaj civilan sindevigon por akiri rezultojn per "integriĝoj" je realo, situacioj aŭ spertoj, kiuj, ĉe la unua impreso, oni dirus neakordigeblajn kaj, ĝuste, "neeblaj"" (El la flugfolio de la I.E.F.).

Noto 171 La poŝtstampo havas la n.ron 41 en la katalogo E.L.F.-A.R.E.K..

La 9an de majo 1988 gastis de la grupo d.ro Ĝiankarlo Sartorio de Ĝenovo, kiu faris prelegon pri: “Esperanto en la malnova socio: metodologio de la informo” en la kunvenejo de la Fervojista Postlaboro. D.ro Sartorio parolis pri la diversaj manieroj esti esperantistoj, reliefigante la urĝan neceson trovi unikan ideo-valoron kaj marŝi kompakte kaj konvinkitaj al kompakta ago por krei kaj lanĉi pozitivan imagon de Esperanto.
Dimanĉon, la 11an de septembro 1988, en la kadro de la celebrado de la “Festo de Amikeco” okazita sur Monto Forno, ĉe la limo de tri Statoj (Tarvisio, Italio; Dreiländer Hobe, Aŭstrio kaj Pecs, Jugoslavio), la grupanoj partoprenis en la manifestacio organizinte renkontiĝon kun esperantistoj de Karintio kaj Slovenio por fiksi laborplanon por la venonta jaro.
La renkontiĝo okazis kie estas la “Cipo de Amikeco”, en flagoflirtado de naciaj flagoj, sen burokrata ĝeno, kiuj limoj prezentas, kie la homa rilato riviviĝas sincere transe ĉiu lingva interkompreniĝo. Sed nur per fantazio eble estas imagi kian nivelon de kompreno kaj intimeco povus atingi tiu miriado da gentoj, kiu kune kantis kaj ŝercis, se, krom la limoj, oni superu ankaŭ la lingvan baron. Nur ni esperantistoj povis ĝin fari, kiuj estis tie supre por plifortigi tiujn ligojn kaj doni mesaĝon al tiuj, kiuj estis ĉirkaŭ ni.
La 1an de oktobro 1988, en la Salono Aiace, estis celebrita la 50a datreveno de la forpaso de prof. Aĥilo Tellini en ĉeesto de lokaj Aŭtoritatoj kaj la partopreno de la Bolonja E.-grupo, al li titolita.
Memorigis prof.on Tellini precipe d.rino Lidia Testoni Sassi (pranepino de Tellini), d.ro Maurizio Tellini (nepo de Tellini) kaj d.rino Rosalba Stefanutti[172] per ŝia prelego pri “La vivo kaj la verkoj de Aĥilo Tellini”.
Ili evidentigis la sciencan, filologian, humanisman kaj historian valoron kaj meriton kaj la kulturajn, politikajn, homajn kaj sociajn interesojn de Profesoro.

D.rino Rosalba Stefanutti dum ŝia prelego
(Dino Boezio de la DLF kaj prof. Manlio Michelutti de la Friula Filologia Societo)

Posttagmeze oni vizitis la naskiĝan domon de Tellini kaj la Zamenhofan mozaikon, jam propraĵo de Tellini kaj nun eksponata sur la ekstera Orienta glacigo de la kastelo. Poste pastro Nello Marcuzzi celebris propetan Sanktan Meson en la Preĝejeto Sankta Maria de Lombardejoj, en strato Mercatovecchio, kiun C.R.U.P. ĝentile metis je dispono, kaj fine oni vizitis la tombon de Aĥilo Tellini en la urba tombejo.

Geesperantistoj antaŭ la tombo de Aĥilo Tellini

Por memorigi la forpason de prof. Aĥilo Tellini, la Unio Friulaj Verkistoj lokigis memortabelon kun la surskribo: “In ta chest lûc al è nassût AchÎl Telin 1866 1938 sienziât, campion di furlanetât, profet dal resuriment dal Friûl e de patrie ladine” (Ĉi tie naskiĝis Aĥilo Tellini 1866 1938 scienculo, defendanto de la friula lingvo, aŭguristo pri la releviĝo de Friulo kaj de la ladina Patrio).

La 23an de februaro 2002, fine de la 34a Semajno Internacia de Amikeco, en la Kunvenejo de la Udine'a Fervojista Postlaboro okazis la prelego de d.ro Romano Bolognesi, I.F.E.F.-prezidanto, pri: "Origino de la lingvo. Evoluo de lingvoj". La manifestacio estis organizita de la grupo N.E.F. kunlabore kun la Klubo UNESKO de Udino. La prelego okazis post la vizito farita ĉe la orgena fabriko "Gustavo Zanin" de Codroipo. Ĉeetis geesperantistoj de Kroatio, Triesto, rumanino kaj s.rinoj Lucia De Stefano kaj Renata Capria D'Aronco respektive de la A.C.U.C. kaj de la Klubo UNESKO de Udino.

34a SETTIMANA
DELL'AMICIZIA INTERNAZIONALE

Sabato 23 febbraio alle ore 15:00
nella Sala Riunioni del DLF
in via Cernaia 2

Il dr. ROMANO BOLOGNESI
Presidente dell' Associazione Internazionale
dei Ferrovieri Esperantisti

parlerà sul tema

ORIGINE DELLA LINGUA
EVOLUZIONE DELLE LINGUE

La manifestazione è organizzata dal

Gruppo NOVA ESPERO FRIULI
sezione culturale del
DOPOLAVORO FERROVIARIO di Udine

in collaborazione con il

Club UNESCO
di Udine

La anoncafiŝo de la prelego

Noto 187 Semajno de Internacia Amikeco. Ĝi estas la lasta semajno de februaro, kiun, en 1969, la sveda esperantisto Eric Carlén proponis dediĉi al la ĉiujara celebrado, en la tuta mondo, de amikeco trans la limoj inter ĉiuj homoj.

La 5an de aprilo 2002, en la Ĉambro de la Provinca Konsilio de Udino (placo Patriarcato), fare de A.C.U.C., okazis enkonduka prelego pri la kurso farita de prof. Ĝiordano Formizzi de la Universitato de Verono pri: “Lingvaj komunicado kaj lernado”.
La 10an de aprilo 2002 komenciĝis baza kurso de la Helpa Internacia Lingvo Esperanto ĉe C.L.A.V. de la Udine’a Fakultato pri Lingvoj kaj Fremdaj Literaturoj. Instruis d.ro Serio Boschin, Estro de la E.-Katedro de Treviso, ĉe aŭlo de la Centro por la Episkopa Universitata (strateto Sillio n.ro 3). La kurso, organizita de la grupo N.E.F., havis apogon de prof. Adrzej Litwormia, Estro de C.L.A.V., kiu apudigis ĝin, eksperimentocele, kun aliaj aktivecoj de la Centro dum la Klubo UNESKO, kun kiu la grupo kunlaboras de ĉirkaŭ unu jaro, donis ĝian patronecon[188]. Du el la partroprenantoj ekzameniĝis la 19an de junio 2002, ĉe la grupo N.E.F..

Con il patrocinio del Club UNESCO di Udine,
Corso di Base della Lingua internazionale ausiliaria
ESPERANTO
Mercoledì 10 aprile 2002
dr. Serio Boschin
Mercoledì e Venerdì dalle 14 alle 15
presso il CLAV in via Zanon 6
Venerdì 5 aprile 2002
il prof. Giordano Formizzi
"Comunicazione e insegnamento delle lingue"

La anoncafiŝo de la kurso

La ekzamenantoj
Donatella Ermacora de Triesto, Maria Carmen Lauretta de Udino,
Johana Cassanego de Triesto, Roberto Pigro, Johano Di Bernardo,
ĉi lastaj partoprenantoj en la kurso ĉe la C.L.A.V.

La 24an de majo 2002, en la Ĉambro de palaco Mantica de la Friula Filologia Asocio (strato Manin n.ro 18), prof. Ĝiordano Formizzi prelegis pri: “Esperanto kaj minoritataj Lingvoj. Rilatoj inter internacia lingvo kaj friula lingvo”. La prelego estis organizita de la grupo N.E.F. kun la patroneco de la Klubo UNESKO de Udino, kunlabore kun A.C.U.C. kaj la Friula Filogia Asocio.

NOVA ESPERO FRIULI
Conferenza del
prof. Giordano Formizzi
dell'Università di Verona
ESPERANTO E
LINGUE MINORITARIE
Relazioni tra lingua internazionale e lingua friulana
Venerdì 24 maggio 2002 – ore 17.00
Salone di Palazzo Mantica della
SOCIETÀ FILOLOGICA FRIULANA - via Manin 18

La anoncafiŝo de la prelego

Noto 188 La kunlaborado kun la Klubo UNESKO de Udino komenciĝis la 17an de junio 2001, okaze de la 20a datreveno de la grupo Nova Espero Friuli.

La 24an de marto 2004 forpasis Aldo Chiaruttini. Mi ekkonis lin en 1970 kiam, apenaŭ Serĝento, mi iris al Papervendejo Flaibani, en strato Viktorio Veneto n.ro 12, por aĉeti skribvarojn por mia bataliono[189]. Mi ne sciis, ke li estis esperantisto, sed tuj ni sentis simpation unu la alian, kvazaŭ, senkonscie, ni havis ion komunan. Mi, fakte, vizitis E.-kurson en 1965, en Trapani, mia naskiĝa urbo.

Poŝtkarto sendita al Chiaruttini ĉe la papervendejo Flaibani

Mi renkontis lin en 1981, okaze de la kristnaskaj bondeziroj, ĉe la grupo Nova Espero Friuli, antaŭ nelonge starigita, kaj de li mi sciiĝis, ke de longe li sin dediĉis al Esperanto. Tio estis la komenco de amikeco finita nur la 23an de marto 2004. Jes, ĉar je la 07.30 de la sekva tago Aldo Chiaruttini forpasis post longa malsano. Dum tiu jardudeko ofte mi vizitis lin kaj de li mi heredis la pasion pri E.-filatelaĵoj.
Kiam mi eklaboris pri la unuan eldonon, en la komenco de la jaroj '90, Aldo Chiaruttini min tre helpis metante je mia dispono la tutan lian materialon, fonto de multaj kaj altvaloraj sciigoj. Lia ĉambro ŝajnis arkivo.
Aldo Chiaruttini naskiĝis en Udino la 19an de aprilo 1928. Li sciiĝis pri komuna lingvo la 7an de novembro 1944 de Aristide Colussi (forpasita la 4an de majo 1997) kiam ili estis en la deviga laborkampo germana de Opacchiasella[190].
Post la milito, en 1948 Chiaruttini havis okazon ekkontakti Anĝelo Zoratti, kiu adresis lin al Johano Della Savia, kiu havigis al li gramatikon (Korado Grazzini *Esperanto-kurso por la lernanto kaj la memlernanto* - 2a eldono - Paolet, Sankta Vito de Taljamento, 1948), post iom da sciigoj pri la lingvo.
En 1949 Chiaruttini eklernis Esperanton kaj en 1950 li partoprenis en la 23a SAT-Kongreso[191] (Torino, 29 julio – 4 aŭgusto). Lia nomo havis la n.ron 133 en la 4a nomlisto de Sennaciulo n.ro 6 (541), Junio 1950. Post la kongreso, Chiaruttini vizitis E.-kurson gvidita de prof.ino Ada Rossi ĉe la Teknika Instituto "A. Zanon" de Udino.
Kiam la 27an de majo 1950 oni restarigis la Udine'an grupon, dank'al Johano Della Savia kaj Armando Blasoni, unua Prezidanto, Chiaruttini estis unu el la unuaj aliĝintoj.
Estante longasperta ĉar dum 10 jaroj li laboris kiel komizo en la Papervendejo Flaibani, per letero de la 23a de septembro 1952, adresita al Eduardo Zumbo de la I.E.F., Chiaruttini proponis eldonigi esperantan gramatikon popece sur kovriloj de lernejaj kajeroj de Paperfarejo Pigna. Post kiam li parolis kun la reprezentanto de Paperfarejo Pigna, kiu donis al li sian apogon, Chiaruttini sugestis al s.ro Zumbo ekkontakti la suprediritan Paperfarejon dononte al ĝi ekskluzivecon, ĉar oni preparos la kajerojn por la lerneja jaro 1953 - 1954 en la monato de januaro - februaro, tio estas kiam la novaj kovriloj estas pretaj.
La respondo estis eldonita je la paĝo 7a de "Verda Steleto" n.ro 7 de 1952 (Organo de Centra E.-Oficejo, Torino - Strato Modena n.ro 33), kie oni legas: "K.do Aldo Chiaruttini (Udine)… Pri via letero pri la supresigo de la kovriloj de la kajeroj per resumo de la esperanta gramatiko, ni trovas la aferon interesa, sed malfacile realigebla; ni opinias, ke la eldonisto preferus presigi ion pri *Tom Miks* aŭ *Pekos Bill*…".

Noto 189 Aldo Chiaruttini dum 10 jaroj estis pedalo ĉe la Istituto "B. Stringer", antaŭe en la sidejo de Cervignano kaj poste en tiu de Udino.

Bonaldo Stringer (Udino, 18 decembro 1854 - Romo, 24 decembro 1930), ekonomikisto, eseisto, docento pri Financaj Scienco ĉe la Universitato de Romo en 1886. Diplomiĝita ĉe Ca' Foscari pri Ekonomio, li estis sendependa deputito por Ĝemona del Friuli, Vic-ministro, Ministro de Trezoro. Li preparis la Bankan Leĝon de 1893. Li estris la Oficejon pri la dogana leĝaro, Ĝenerala Direktoro pri Impostoj kaj poste Revizoro de Ministerio de Trezoro, Ŝtata Konsilisto kaj poste, kiam la ofico estis starigita, Gubernatoro de la Itala Banko de 1928 ĝis 1930.

Noto 190 Friedrich Todt (Pforzheim, 4 septembro 1891 - Berlino, 8 februaro 1942), germana inĝeniero, estro de la "Organizo Todt", fondita en 1933, kiu konstruis fortikaĵojn en la diversaj frontoj dum la dua mondmilito.

Noto 191 Laburista asocio socialista, starigita en Francio de Eŭgene Lanti en 1921 kiel Laburista E.-Movado. Ĝi havas solidarajn, mutualismajn kaj asistajn celojn, utiligante Esperanton kiel neŭtrala lingvo. Ĝia organo estas la revuo "Sennaciulo". Ĝi havas sidejon en Parigi, 67 Avenuo Gambetta.

Eŭgene Lanti, pseŭdonimo de Eŭgene Adam (Néhon, 19 julio 1879 - Meksikio, 17 januaro 1947) estis kunfondinto kaj ĉefa kreinto de S.A.T., la asocio de esperantistaj laboristoj, kaj teoriulo pri nova doktrino, la sennaciismo, kiu havis kiel celo la eliron el koncepto pri nacio kadre de ago de socia organizo.

Aldo Chiaruttini estis ankaŭ delegito por Italio de la Eŭropa Federalismo kaj li deziris komunan universalan lingvon por ĉiuj popoloj. Lia membrokarto por 1995 havis la n.ron 016977.

Leterkoverto de M.F.E. sendita al Chiaruttini

La 25an de marto 2004, Zoraide Del Giudice Carrubba, la plej maljuna itala esperantistino, festis siajn 100 jarojn. Naskita la 25an de marto 1904 en Basiliano (Udino), instruistino, ŝi praktis sian aktivecon en Italio kaj ankaŭ eksterlande (Grekio, Tunizio, Libio kie ŝi edziniĝis). Post la dua Mondmilito ŝi transloĝiĝis al Romo, kie eklernis Esperanton ĉe la loka grupo kaj ŝi konis Karolina kaj Luizo Minnaja. Ŝi partoprenis en multaj renkontiĝoj kaj U.K. kie ĉiam ŝi kaptis la okazon por disvastigi la internacian lingvon. S.rino Zoraide forpasis la 25an de julio 2007. Estis mia devo sciigi tion por memorigi ĉi tiun Friul-inon.
La 29an de majo 2004, en Sankta Vito de Taljamento, okazis la inaŭguro de "Strato A. Paulet" per prelego, en la Konsilia Ĉambro de la Urbodomo, farita de prof. Karlo Minnaja de la Universitato de Padovo, pri: "Antono Paolet, unua esperanta eldonisto en Italio" kaj per libra ekspozicio, en Esperanto kaj pri Esperanto, iuj el tiuj nun ne troveblaj, kaj leteroj el la korespondado de Paolet.
Krom Paolet-anoj, ĉeestis okdeko da geesperantistoj de Milano, Padovo, Treviso,Triesto, Venecio.
Antaŭ ol la prelego, prenis la parolon la kulturskabeno Gennaro Di Bisceglie. Dum lia parolado li diris interalie: "Laŭdinda provo pri komuna lingvo por ĉiuj homoj, Esperanto klopodu realigi la fratecan elementon, nefinita intenco de la Franca Revolucio, post libereco kaj egaleco, realigitaj post du militoj. Sed kiel estas malfacile fratigi popolojn".
Poste paroladis s.ino Edvige Ackermann de la T.E.A., kiu diris ke "en globamondo Esperanto estas la ideala ilo por rilatoj inter popoloj diversaj".
Fine prof. Karlo Minnaja[192], skizante la Paolet-an personecon per kelkaj diafanaĵoj, diris ke "Esperanto intencas esti super partioj per ĝia neŭtraleco, kiu fontas el partopreno la plej larĝa el ĉiuj lingvoj kaj Paolet volis disvastigi mesaĝon pri lingvo, ne ŝtatvoĉon eble opresa, sed voko de ĉiuj popoloj en ilia sama valoro, unuigitaj fraterne por la mondpaco".
Fojfoje prof. Minnaja sin adresis al s.ino Jozefa Paulet (eksinstruistino), naŭdedkdujara filino de Kavaliro, kiu rakontis kelkajn epizodojn el la vivo de la patro.

Edvige Ackermann dum ŝia parolado
Skab. Gennaro Di Bisceglie, Jozefa Paulet, prof. Karlo Minnaja, Edvige Ackermann

La prelego de prof. Karlo Minnaja

Noto 192 Karlo Minnaja (n. Romo, 19 marto 1940) doktoriĝis pri Matematikaj Sciencoj en Pizo en 1963. Profesoro pri Analitiko ĉe la Universitato de Padovo. Li estis dum 5 jaroj en la T.E.J.O.-estraro. Membro de la Internacia Akademio de San Marino, Ĝenerala Direktoro de la I.E.I., I.E.F.-estrarano, E.-Akademiano. Li esperantigis diversajn verkojn de italaj verkistoj, el kiuj: Karlo Goldoni, *La Gastejestrino* (La Locandiera) (1981); Nikolao Machiavelli, *La Princo* (Il Principe) (2006), li verkis multajn eseojn kaj kompilis la *Vortaron Itala-Esperanto* (1996). En 1990 li estis ordenita per la Kultura Premio de la Ĉefministro.

Post la prelego, geesperantistoj iris straton “A. Paulet”. La strattabulo estis kovrita per la Standardo de la unua Udine’a E.-grupo fondita la 6an de junio 1923. Tio estis justa kaj deva utiligi historian Standardon por historia gravulo. Antaŭ ol malkovri strattabulon fare de s.ro Antono Paulet, nepo de Kavaliro, pastro Nello Marcuzzi de la grupo Nova Espero Friuli, benis la novan straton.
Fine de la manifestacio, la Komunumo de Sankta Vito de Taljamento proponis abundan regaladon en la ĝardeno de la Urbodomo.
La famo de Paolet meritis, ke oni faris specialan ceremonion por inaŭguri straton al Li titolita kaj la plena sukceso de la manifestacio, enmetita en la VIn Kultursemajnon “Floritaj placoj”, estis ebligita dank’al intensa prepara aktiveco kaj la plena disponeblo de skabeno Gennaro Di Bisceglie.
Por kompletigi la programon de la manifestacio, la 17an de oktobro 2004 oni celebris la Sanktan Meson en Esperanto en la Preĝkapeleto de l’ Anunciacio.

Pastro Nello Marcuzzi benas la straton

Jozefa Paulet

Antono Paulet kaj Jakobeto Martinez

Kun familianoj de Paolet
1. Prof. Generoso D’Ascoli, edzo de 2. Andreina Della Savia, 3. Jakobeto Martinez,
4. Antono Paŭlet, filo de Adelio, 5. Jozefa Paulet, 6.Liliana Nonis, edzino de Adelio
7. Flavia Paulet-Castellarin, filino de Adelio, 8. kaj 9. Gefiloj de Flavia

La 5an de junio 2004, ĉe la sidejo de la grupo N.E.F., okazis la 1a kaj 2agrada E.-ekzamenoj. Eltenis ekzamenon ankaŭ Ugo Patti, aŭtodidakto, de Valguarnera (Enna).

Momento de la ekzamena ceremonio

Ugo Patti gasto ĉe Martinez

La partopreno en la ekzamenoj de siciliano estas frukto de la senĉesa laboro, ankaŭ je distanco, ke la skribanto, ankaŭ li siciliano, de longe faras en Sicilio por vekigi el letargio tiujn, kiuj en la pasinteco tre laboris por disvastigi la Zamenhof-an lingvon. Diskoniga kaj, samtempe, serĉada laboro por rekonstrui la historion de *Esperantismo en Sicilio*.
La 18an de junio 2005, en Cimpello de Fiume Veneto, okaze de la 50jara de la forpaso, oni memorigis pastron Jakobo Bianchini, parokestro en Cimpello de 1927 ĝis 1954, ne nur kiel esperantisto sed ankaŭ kiel paŝtisto engaĝiĝita en la socialaj temoj kaj kiel kulturulo, per ekspozicio kaj kunveno ĉe la Paroĥa Centro; antaŭiĝitaj de la Sankta Meso en Esperanto, kun kantoj ankaŭ itallingve kaj latinlingve, en la Paroĥa preĝejo, celebrita de pastro Nello Marcuzzi kun la helpo de ses sacerdotoj, kiuj reprezentis ĉiujn paŝtistojn ligitaj iamaniere al pastro Bianchini (la tri sacerdotoj prelegantoj, la paroĥestro de Cimpello pastro Lino Moro, la Saveriana Misiisto naskita en Cimpello pastro Jozefo Nardo, la Komboniana Misiisto pastro Eduardo Sandron). La preĝejo ne povis enteni tian imponan ĉeeston kaj parto el fideluloj aŭskultis la Sanktan Meson en la antaŭanta esplonado per aŭda instalaĵo. La kantoj, diverslingvaj, estis plenumitaj de la Cimpello-a kaj de la esperanta ĥoro.
En la kunveno sekvis serio de prelegoj. Komencis prof. Ĝianni Strasiotto pri "Pastro Jakobo Bianchini kaj lia tempo" (li enkadrigis la personecon de pastro Bianchini en la tiama historio-socia kunteksto, turmentita pro du mondaj militoj, pro la bienulaj egoismo kaj pro la popola mizero), pastro Viktorino Zanette pri "La Animprizorganto Jakobo Bianchini" (li priparolis la personecon de pastro Bianchini paŝtisto, kiu estis humila homo, proksima al lia gento, kiun li konsilis ne nur pri la spirita kampo, sed ankaŭ li instruis pri la novaj kultivadaj teknologioj), pastro Terziano Cataruzza pri "Pastro Jakobo Bianchini kaj la hororkavo en Pradis" (li memorigis la periodon kiam pastro Bianchini, paroĥestro en Pradis, estis ravita pro la majesta beleco de la hororkavo borita de la akvoj en tiu zono, verkis poeziaĵon antaŭvidante, ke en la estonteco ĝi iĝos natura templo. Pastro Cataruzza rakontis kiamaniere li sentis sin kuntreni leginte tiun verkon kaj emigita agadi. La ejo baldaŭ iĝis atrakcia centro por pilgrimantoj, kiuj multenombre alkuras el la tuta regiono), pastro Antono Zanette pri "Pastro Jakobo Bianchini kaj la atestaĵoj" (li raportis atestaĵojn pri pastro Bianchini kunigitaj el tiuj, kiuj konis lin) kaj Jakobeto Martinez pri "La esperantisto pastro Jakobo Bianchini" (li priparolis kiamaniere pastro Bianchini alproksimiĝis al tiu lingvo, pri la rilatoj kun Zamenhof ĉirkaŭ la unua sia gramatiko, pri lia verkara eldono kaj pri lia agado por disvastigi Esperanton en Friulo).

Jakobeto Martinez dum lia prelego
Prof. Ĝianni Strasiotto, pastro Viktorino Zanette, pastro Terziano Cataruzza, pastro Antono Zanette.

Fine de la kunveno la Urbestro de Fiume Veneto malfermis la historian ekspozicion, kiu, per 36 afiŝoj kun tekstoj kaj epokaj fotografaĵoj, memorigis la civilan kaj la paŝtistan vivon de pastro Bianchini kaj lia esperantista sperto.
Por ĉiu loko kie pastro Bianchini vivis, oni faris fotografian kaj historian afiŝon por subteni la turisman pliigon kaj la malkovron de artaĵoj de la ejo.

Bildo el la historia ekzpozicio

Pastraj lokoj de pastro Bianchini

Specialan sekcion oni dediĉis al la historio pri Esperanto per ekspozicio de originalaj kaj historiaj altvaloraj dokumentoj pri la aktiveco de pastro Bianchini por disvastigi Esperanton[193].

En la ekspozicio oni aldonis akvarelan pentraĵon kun la bildo de pastro Bianchini farita de Julio Belluz[194], esperantisto dum la jaroj '50, donita de la E.-Grupo de Azzano "por la iniciato memorigi la faman paroĥestron de Cimpello pastro Jakobo Bianchini ekzempla paŝtisto, atestanto de lia tempo, fakulo kaj pioniro de Esperanto okaze de la 50a datreveno de lia forpaso.".

La pentraĵo donacita de la Grupo de Azzano

Plie, oni prezentis la broŝuron *Pastro Jakobo Biankini kaj Esperanto*, fare de Ĝianni Strasiotto kaj Jakobeto Martinez, disdonita al partoprenantoj en la kunveno kaj al familioj de la Paroĥa Komunumo de Cimpello, kun biografiaj skizoj kaj la esperantista aktiveco.
Je kompletigo de la aktiveco rilata al la ceremonio, oni eldonis DVD enhavante filmadon pri la ceremonio kaj la ekspozicio.
La kunveno, enmetita en la aktivecon por memorigi la faman friulan esperantiston, estis patronita ankaŭ de la I.E.F. kaj de la Klubo UNESKO de Udino.
Krom la Cimpell-anoj, ĉeestis Henriko Bianchini (nevo de pastro Giacomo), d.ro Elio De Anna (Provincestro de Pordenone), adv. Tiziano Borlina (Urbestro de Fiume Veneto) kaj aliaj aŭtoritatoj de la Provinco Pordenono, esperantistoj de Azzano Decimo, Napolo, Padovo, Trento, Treviso, Triesto, Udino kaj Johano Daminelli de Milano, Prezidanto de U.E.C.I..
Multenombra estis la ĉeesto de Azzan-anoj pli malpli 60jaraj, kiuj, kun emocio, sekvis la prelegojn revivante tiele la junecajn jarojn vivitaj en kontakto kun pastro Bianchini.
Lanĉis la iniciaton la Sporta Fiŝkaptista Asocio "A.P.S. Rio Rui" kaj la volontulaj asocioj de Cimpello por valorigi la zonon de Fiume Veneto kaj Azzano Decimo najbare de Torento Meduno, tre grava kaj historie kaj nature. En tiu zono, fakte, je duonvojo, kiu kunligas Cimpello-n kun Corva, troviĝas fascina preĝejeto, kiun la popolo nomas "Le Cisiole" (Le Ĉisiole), konstruita en 1251, kiu donis la nomon al la najbara vilaĝeto ĝis nun nomata Chiesiole (Kiesiole). Tiu loko estis tre grava en la manuskripta historio pri Cimpello de pastro Jakobo Bianchini.
La personeco de pastro Jakobo Bianchini neniam estis revalorigita kaj tio emigis la asociojn de Cimpello plenigi tiun vakuon organizonte la kunvenon kaj la historian ekspozicion tre grava ankaŭ ekstere la lokaj kaj regionaj limoj, dank'al la kapilara komunika reto de la esperanta mondo.
Kiam la 6an de januaro 2005 oni redaktis la unuan skizon pri la programo de la ceremonio, la organiza Komitato nomumis la skribanton Respondeculo pri la rilatoj kun la esperantista mondo.
La manifestacio estis ankaŭ prezentita en la reta adreso de la Komunumo de Fiume Veneto.

Noto 193 La ekspozicion estis malfermita al la publiko de la 18a de junio ĝis la 11a de julio 2005.

Noto 194 Julio Belluz (n. Azzano Decimo, 1943), pentristo, gravuristo. Li diplomiĝis en Venecio pri fresko. S.ro Belluz partoprenis en la kurso ĉe la Metia lernejo "Kap. C. Montico" de la 21a de februaro ĝis la 24a de junio 1955 (vidu foton je la paĝo 71).

En la kadro de la aktivecoj organizitaj de la Nacia D.L.F., la jaro 2006 estis tiu, kiam la D.L.F. de Udino estis taskita organizi la "Nacian Kulturan Manifestacion de la Fervojistaj Postlaboroj". La atribuo pri tio oni decidis laŭ decido de la Nacia Komitato n.ro 274 de la 28a de novembro 2005 kaj komunikita al D.L.F. de Udino per letero n.ro GN-DLF/330/2005 de la 15a de decembro 2005. La manifestacio, nomita "Nacia Kultura Semajno" antaŭfiksas, interalie, la teatran Konkurson kaj la Literaturan. Fotografian, Filatelan kaj Pentrartan Konkurson Nacian. En la letero ne estis citita Esperanto, sed, ĉar ĝi temas pri kultura aktiveco, la Prezidanto de la D.L.F., Roberto Francescatto, taskis la grupan Estraron partopreni kiel Kultura Sekcio de la antaŭdirita organismo.

Elektita antaŭe Lignano Sabbiadoro, la manifestacio poste estis translokita al Grado pro organizaj kialoj, precipe ekonomiaj.

La 6a fojo de la "Nacia Kultura Semajno" okazis, do, en Grado de la 19a ĝis la 22a de oktobro 2006 kun la ĉeesto de la D.L.F..oj de Cagliari, Foligno, Ĝenovo, Portogruaro, Rimini, Romo, Taranto, Treviso, Triesto kaj Udino.

La Udine'a grupo N.E.F., pere de sekretario Jakobeto Martinez, nomumita respondeculo de la organizado pri la esperantaj aferoj, prezentis propran programon por ĝin enmeti en la aktivecon de la D.L.F.. Ĝi enhavis ankaŭ la memorigan datrevenan feston pri la 25 jaroj de la grupa fondo, starigita la 31an de majo 1981. Oni decidis celebri ĝin ene la manifestacio en Grado por doni gravecon kiel eble vaste por disvastigi la internacian lingvon Esperanto. La programo enhavis la filatelan ekspozicion pri fervojiaj Esperantaĵoj, la libran ekspozicion pri originaj kaj Esperantigitaj verkoj, la poŝtgiĉetan malfermon por la poŝtstampo sur la speciala karto por memorigi la 25 jarojn de la esperanta grupo, la prelegoj "Esperanto: origino kaj ĝiaj aplikadoj" kaj "Esperanto en la Fervojistaj Postlaboroj", la celebro de la Sankta Meso en Esperanto.

La ekspozicio, malfermita posttagmeze de la 19a de oktobro en la Preĝejo/Aŭditorio Sankta Rocco, kune kun la fotografia kaj la pentrarta, estis vizitita de multaj vizitantoj, al kiuj oni disdonis informan materialon por rekta kono de la lingvo.

Jakobeto Martinez dum la ekspozicio

Sabaton matene, la 21an de oktobro, ĉe la Hotelo "Diana", du poŝtoficistinoj poŝtstampis la specialan karton; posttagmeze, kontraŭe, ĉe la Hotelo "Astoria", oni ekprelegis per mallonga parolado en Esperanto de la Prezidanto de D.L.F. de Udino, Roberto Francescatto, kiu esprimis, poste, lian apogon al Esperanto certigante, kiel ĉiam, la ne indiferentan subtenon dum la aktiveco organizota de la grupo en la sidejo kaj ekstere

Poste prenis la parolon la respondeculo de la grupo, Mario Liva, kiu salutis nome de la esperanta grupo kaj de la Prezidanto de la Klubo UNESKO de Udine, okupita ĉe alia manifestacio en Akvileia. Devis prelegi d.ro Serio Boschin de Treviso, sed pro abrupta misfarto li devis resti hejme, pro tio d.ro Romano Bolognesi, I.F.E.F.-prezidanto, prelegis pri ambaŭ temoj de la programo.

D.ro Bolognesi dum lia prelego
Mario Liva, Romano Bolognesi, Roberto Francescatto, Jakobeto Martinez



La poŝtkarto kun la speciala poŝtstampo

La prelego kaŭzis multe da scivolemo inter la neesperantistoj, kiuj petis sciigojn pri Esperanto kaj la kialoj ĉar oni ne utiligas ĝin kiel komunuma lingvo fare de la Regadoj. D.ro Bolognesi respondis kompetente kaj klare dirante ankaŭ travivitaj epizodojn dum liaj vojaĝoj kiel Prezidanto de I.F.E.F..

Ĉeestis geesperantistoj de Azzano Decimo, Padovo, Triesto, Udino kaj Andreo Montagner, de Milano, kiu salutis nome de la I.E.F.. Por la neesperantistoj parolis s.ro Gennaro Avagliano, Vic-Prezidanto de la Nacia D.L.F., kiu

donis lian apogon ĉe la centra sidejo, en Romo, por pli disvastigi Esperanton kaj fondigi aliajn E.-grupojn en la D.L.F..
Sukceso pli granda ol estis atendeble la ĉeesto okaze de la Sankta Meso celebrita de pastro Nello Marcuzzi la 22an en la baziliko Sankta Maria de la Gracoj. La ĉeestantoj, multaj el ili ne esperantistoj, al kiuj oni disdonis la meslibron, respondis laŭte en Esperanto kaj kantante kune kun la N.E.F.-grupanoj.

Pastro Nello Marcuzzi dum la celebrado de la Sankta Meso

La 22an de oktobro 2006, fermo de la manifestazio, la programo pretigita de N.E.F. bone sukcesis.
Tre kontenta estis la Estraro pro la patroneco de la I.E.F., de la Itala Federacio Kluboj UNESKO kaj de la Klubo UNESKO de Udino, kun kiu la grupo kunlaboras de la jaro 2001 ĉar Esperanto estas konsiderita de UNESKO paclingvo, de kompreno inter popoloj kaj de kultura interŝanĝo laŭ la celoj kaj idealoj de UNESKO kiel sankciita okaze de la Ĝeneralaj Konferencoj en Montevideo en 1954 kaj Sofia en 1985.
Lundon la 9an de aprilo 2007 dudedko da gejunuloj vizitis nian urbon, sekve de ekskurso enmetita en la programo de la 31a I.J.F..
Post kiam ili alvenis en placo I Majo, akceptis la geesperantistojn Jakobeto Martinez, kiu kunportis la gastojn laŭ la itinero koncernanta Esperanton en Udino: Kastelo (vizito al Zamenhof-mozaiko), placo Libereco (loĝejo de prof. Aĥilo Tellini), strato Kanciani (naskiĝdomo de prof. Aĥilo Tellini), placeto Lionello (la Loĝio estis sidejo de la 14a Itala E.-Kongreso (1929) kaj de la 19a Trilanda (1987)).
Estis devige paroli esperante, precipe pro la ĉeesto de gejunuloj devenintaj el eŭropaj landoj.
Je la fino de la vizito, ĉiuj estis kontentaj pri la historio kaj la Udine'aj monumentoj priskribitaj.
Memore al la renkontiĝo, oni donacis la broŝureton *Mia praktika gvidlibro* esperantigita, la poŝtkarton kun la bildo de la Zamenhof-mozaiko kaj tiun eldonita okaze de la 25a datreveno de la fondo de Nova Espero Friuli.
La intervenon de N.E.F. volis Mikele Gazzola, Udine-ano, unu el la Festivalorganizanto, kiu antaŭe partoprenis en la 1a kaj 2agrada kurso en nia sidejo, kaj la grupa kunlaborado ne limiĝis al la ekskurso. Jam vendredon, la 6an de aprilo Mario Liva gvidis mallongan kurson pri la friula lingvo kaj dimanĉon posttagmeze, la 8an de aprilo (Pasko), pastro Nello Marcuzzi celebris la Sanktan Meson en Esperanto en la preĝejeto Sankta Maria, ene la Turisma Centro; tuj poste Jakobeto Martinez prelegis pri Esperantismo en Friulo projekciante, dum la prelego, bildojn pri famaj esperantistoj kaj historiaj dokumentoj.
La 31a I.J.E.F., okazita en Lignano Sabbiadoro de la 5a ĝis la 10a de aprilo 2007, sub la patroneco de la Klubo UNESKO de Udino kaj de la Udine'a D.L.F., temis pri: "120 jaroj de Esperanto, 120 jaroj de interkompreniĝo kaj paco".
Celo de la Festivalo estis prezenti al partoprenantoj la samajn tolereman kaj pacan principoj, kiuj inspiris Majstron. La nuna internacia scenejo estas karakterizita de nestabileco, militoj kaj tensio kaj post kiam novaj Ŝtatoj aliĝis al Eŭropa Komunumo, oni faris alian paŝon por la paco kaj la interkompreniĝo en tiu mozaiko el kulturoj kaj popoloj kie tre gravaj estas la etnaj kaj lingvaj minoritatoj, ankaŭ pro la migradoj el aliaj Landoj, kies kulturoj estas tre diversaj de la eŭropaj. Pro tio oni elektis Friuli-n, ĉar ĝi prezentas idealan scenejon, kulturkruciĝon inter la aeroj latina, slava kaj germana; regiono de minoritatoj (friula kaj slava), de elmigrintoj kaj de enmigrintoj.
La 15an de aprilo 2009, ĉe la antikva Kafejo "Sankta Marco" en Triesto (strato Cesaro Battisti n.ro 18), la T.E.A. prezentis la verkon *Cento anni di Esperanto a Trieste* (Cent jaroj de Esperanto en Triesto). Kunlaboris pri la historia redakto ankaŭ la skribanto, al kiu oni dediĉis kelkajn liniojn, kiel oni legas je la paĝo 9: "Specialan dankon estas deviga por Jakobeto Martinez, de la grupo Nova Espero Friuli de Udino, pro la skrupula laboro farita dum la realigo de la unua redakto, frukto de serĉadoj en la arkivoj kaj en la bibliotekoj ĉe nia Asocio kaj de la Udine'a Grupo, kaj ankaŭ ĉe la publikaj bibliotekoj en Udino kaj Sankta Vito de Taljamento. Lia dediĉo kaj lia specifa sindevigo permesis al ni superi grandajn malfacilaĵojn, kiujn simila verko implikas". Estas tiuj la unuaj fruktoj pri laboro, kiu de longe okupas la skribanto. Aliaj verkoj, ankoraŭ en la tirkesto, atendas esti eldonotaj.

La kovrilo de la libro

La 27an de majo 2009 la temperaturo tre malaltis, sed tio ne malpermesis viziti la urbon al kvindeko da esperantistaj fervojistoj partoprenante en la 61a I.F.E.F.-kongreso (Triesto, 23 - 29 majo). La vizito al Udino estis parto de la programo pretigita de la T.E.A., kun kiu la grupo N.E.F. kunlaboras okaze de ĉefaj manifestacioj.

Martinez kun la geesperantistaj fervojistoj dum la vizito en Udino

Post kelkaj historiaj sciigoj pri la origino de N.E.F., la vizito ne povis ne komenci suprenirante la kastelon kie estas lokita la steleo kun la bildo de Zamenhof, vera surprizo kvazaŭ por la tuta vizitantaro, kiu amasiĝis pro memorfoto. Kaj por memori la viziton, Martinez disdonis al ĉiuj la poŝtkarton de la mozaiko, eldonita okaze de la inaŭguro de "Ĝardeno de Esperanto" (6 aprilo 1997) kaj tiun pri la 25a datreveno de la grupstarigo (31 majo 2006). La vizito daŭrigis laŭ la itinero jam elprovita, kiu tuŝas interesajn punktojn por la esperantista mondo. Varma aplaŭdo estis la respondo al la dankaj vortoj de Martinez, ĉar la vizitantoj sin portu bonan memoron de Udino post kiam ili hejmen reiros.
Okaze de la 77a Nacia Kongreso (Lignano Sabbiadoro, 24 - 28 aŭgusto 2010), ankaŭ la grupo N.E.F. estis invitita doni sian kunlaboron.
Sekve de renkonto kun s.ro Bruno Casini en Lignano la 12an de januaro 2010 vespere, Mario Liva kaj la skribanto, anoj de la estraro de la Udine'a grupo, estis je dispono por la celebrado de la Sankta Meso en Esperanto kaj por la gvidita ekskurso tra la urbo Udino.
Bedaŭrinde la vizito en nia urbo ne okazis pro malmultaj da aliĝoj al la ekskurso, enmetita en la kongresan programon. La tuta materialo jam pretigita por ĝin disdoni al ekskursantoj restis pro tio neutiligebla.
Pri la celebrado de la Sankta Meso, oni transskribas kiom eldonita je la paĝo 13a sur "Katolika Sento" n.ro 5, septembro - oktobro 2010: "Pri la bona rezulto kontribuis certe la ejo kaj la bela vetero, malpli iomete la organizado, ankaŭ se, fronte al tia kvanto de aliĝintoj, per la malmultaj fortoj disponeblaj oni ne povis fari plibone. El nia vidpunkto, la unua bedaŭrindaĵo jam aperis sabaton la 21an kiam estis programita la Sankta Meso en Esperanto en la Preĝejo Sankta Johano Bosco kun kantoj de sopranulo Irena Urbaska. Ĉeestis pastro Nello Marcuzzi (de N.E.F., nda) preta por la celebrado, la Meslibretoj zorge pretigitaj de Jakobeto Martinez, sed la Meso en Esperanto ne estis kaj ankaŭ ne la kanto de sopranulo. Oni ne akordiĝis kun la paroĥestro pri la horo de la Meso. En la fiksita horo (je la 19.00), estis la paroĥa Meso, kaj la celebrado estis farita itale kun unu legaĵo Esperante (plie unu fidelula preĝo kaj unu kanto, nda). Kompense, diris pastro Nello, ni faris iom da propagando por Esperanto al la ĉeestantaj somerumantoj. Oni sin demandas interalie kial elekti preĝejon je 3 kilometraj distanco, malfacile atingebla per aŭtomobilo kiam, ene la turisma vilaĝo (kongresejo, nda) estis bela preĝejo de Sankta Maria de la Maro de la XV jarcento. Rezulto: nur 4 aŭ 5 samideanoj partoprenis en la Sankta Meso".
Ĝi estis perdita okazo por pli intensa E.-propagando, konsiderinte la ĉeesto de somerumantoj el urbaj kaj Landoj diversaj. Nur restis la mesaĝo, kiun oni donis sciigante ke en Udine Esperanto ankoraŭ vivas.
La 4an kaj 5an de aprilo 2011 la grupo N.E.F. gastigis srinon Hiroko Katayama, japana esperantistino, kiu en la antaŭaj tagoj, ekkontaktis la estraron dank'al la retadreso de la Fervojista Postlaboro.en kiu estas ankaŭ la E.-grupo de Udino.
La edzo, Maasaki Katayama, profesoro ĉe la Universitato de Nagoya, devis partoprenis en internacia kongreso ĉe la Universitato de Udino kaj s.rino Katayama esprimis la deziron koni kelkajn grupanojn kaj viziti la urbon.

Kelkajn tagojn antaŭe ŝia alveno Udinon, Mario Liva kaj la skribanto klopodis lasante mesaĝon ĉe la Ambasadoro Palaco Hotelo por informi Ŝin pri la renkontiĝa horo.
Lundo 4an, s.rino Katayama jam estis ĉe la eliro de Ambasadoro atendante nin kun la rideto kaj la afableco tipaj de japaninoj.
Post la unuaj vortoj diritaj esperante, tuj manifestaciis amikeca sento, kvazaŭ ni nin konis de longe. Ni ne plu estis gefremduloj, sed apartenante al mondo kie ne ekzistas diferencoj inter personoj de diversa nacio, komunigitaj per unu sama lingvo.
Kiel antaŭe, okaze de vizitoj de geesperantistoj partoprenantoj en kongresoj faritaj en nia regiono, la vizito al la urbo okazis laŭ itinero rilata al Esperanto. Dum la vizito, la skribanto donis kelkajn historierojn pri la Udine'a esperantismo kaj la vizitataj lokoj.
Posttagmeze, en Cividale del Friuli, Manuel Rovere nin atendis por ĉiĉeroni tra la longobarda urbo.
Mardo matene, antaŭ ol iri al Akvileia, ni iris al nia grupsidejo, kie s.ino Katayama metis sian dediĉon sur la libreton de vizitantoj memore al sia paso.
Antaŭ la forsaluto, s.ino Katayama dankis Mario Liva kaj la skribanto pro la gastigo aldonante ke ŝi estus feliĉa reciproki ĉu ni irus al Japanio.
Artikolo pri la vizito en Udino de s.rino Katayama estis eldonita sur "La Harmonio" n.ro 228, organo de Rondo Harmonia kaj en "La informilo de N.E.C." n.ro 264, organo de Nagoja Esperanto-Centro. El la suprediritaj revuoj, s-rino Katayama sendis ekzempleron al la grupo.



La dediĉo de s.ino Katayama

Martinez kun s.ino Katayama

La 30an de aprilo 2011, en la Preĝkapeleton de l'Anunciacio en Sankta Vito de Taljamento, pastro Nello Marcuzzi celebris la Sanktas Meson por memorigi la 50an datrevenon de la forpaso de Antono Paolet. La manifestacio estis jam planita por la 18an de decembro 2010 sed pro abunda neĝfalado ĝi ne eblis celebri.
Antaŭ ol celebri la Sankta Meson, la skribanto paroladis mallonge Esperante kaj itale por memorigi la personecon de Paolet kaj liaj familianoj (gefiloj Adelio kaj Jozefa, bofilino s.rino Liliana Nonis kaj la nepo Antono). Krom esperantistoj de Chions kaj Azzano Decimo, ĉeestis s.ino Regina Cantoni kune kun la filo Paolo, edzino kaj filo de Antono Paulet kaj s.ino Flavia Paulet-Castellarin, genepoj de Kavaliro, skabeno Gennaro Di Bisceglie kaj eksskabeno Antono Di Bisceglie.
Partoprenantoj sekvis la celebradon de la Sankta Meso per la libreto pretigita de la grupo, kie estas enmetita folieton, itale, enhavante biografiajn sciigojn kaj du fotojn pri Paolet.
Intensa aktiveco estis jam farita la 29an de majo 2004 okaze de la inaŭguro de la strato al Li titolita; manifestacio, kiun la grupo N.E.F. volis por memorigi Kavaliron, ankaŭ dank'al la plena disponeblo de skabeno Gennaro Di Bisceglie.
Post la Sankta Meso, partoprenantoj iris al la Urba Biblioteko kie, en la Leĝoĉambro, estrino d.rino Rosalba Garlatti aranĝigis ekspozicion de libroj eldonitaj de Paolet kaj, poste, al la tombejo por surmeti florbukedon sur la tombo de Paolet kaj en "strato A. Paŭlet" por la memoriga foto sub la strattabulo, kie estis aldonita la skribo "Esperantisto de Sankta Vito", dank'al la interesiĝo de la eksskabeno Antono Di Bisceglie.

Martinez kun familianoj de Paolet antaŭ la preĝkapeleto

Ekspozicio de libroj eldonitaj de Paolet

La tombo de familio Paulet

La nova stratabulo

Martinez, Ĝian Franko Cosatti, Leonello Carletti
Kaj Mario Liva sube la nova strattabulo

En la tagoj 15a kaj 16a junio 2013, en la palaco Altan en Sankta Vito de Taljamento, la Filatela kaj la Numismatika Sekcio de la Laborista Societo pri Mutuala Helpo kaj Instruo (SOMSI) kaj la Asocio Kulturaj Kruciĝoj en Friuli (ICF) prezentis la ekspozicion “La homo parolas Esperanton”, per poŝtmarkoj, poŝtkartoj, vortoj kaj bildoj pri la mondo Esperanto kaj “(Casarsa) Sankta Vito de Taljamento - Motta di Livenza. La fervojo inter du riveroj, en la jarcenta de fervoja linio hodiaŭ forlasita”, per bildoj, dokumentoj kaj historio pri fervoja linio transformebla en biciklokurejon.
La inaŭguro de la ekspozicio, enmetita en la XVn Kultursemajno “Floritaj placoj”, okazis sabaton, la 15an de junio per la prezentado de la ekspozicioj.
Ĉeestis aŭtoritatoj de la Provinco Pordenone, Urbestro de Sankta Vito de Taljamento Antono Di Bisceglie kaj la skabeno Pier Georgo Sclippa, kiu, per lia propono de la 27an de decembro 2000, ebligis la titoladon de strato al Antono Paolet.
La tago de la inaŭguro oni faris du prelegojn: “La dekadenco de la fervojai linioj duarangaj. Kia estonto?”, kun la interveno de Paŭlo Garofalo, ICF-prezidanto, d.ro Romano Vecchiet, estro de la biblioteko “V. Joppi” de Udino, Italo Flaborea, Luciano Gradini kaj Johano Strasiotto kaj “La Cent jaroj de la Motta di Livenza - Sankta Vito de Taljamento (Casarsa). Historio de la fervojo inter la du riveroj” fare de Paŭlo Garofalo. Fine de la prelegoj, oni disdonis al la ĉeestantoj la broŝuron por la centjara de la fervoja linio Sankta Vito - Motta di Livenza.
Dimanĉon la 16an de junio, Jakobeto Martinez faris prelegon pri Esperanto. Dun sia prelego la skribanto donis skizojn pri Esperanto kaj ĝia eltrovinto kaj poste li priparolis de la vivo kaj de la verkoj de la tri “granduloj” friulaj esperantistoj: prof. Aĥilo Tellini, pastro Jakobo Bianchini kaj Antono Paolet, projekciinte, dum la prelego, diafanaĵojn kun fotoj kaj dokumentoj pri la tri fakuloj. Antaŭ ol fini sian prelegon, la skribanto aldonis kelkan sciigoj pri la grupo Nova Espero Friuli kaj ĝia aktiveco por transdoni la mesaĝon heredita de Zamenhof: “...sed homoj kun homoj”.
Por la okazo estis eldonita personigitan postmarkon, specife por la ekspozicio, fare de la SOMSI, reproduktante poŝtkarton kun la skribo: “Amikajn salutojn”.

La poŝtmarko de la ekspozicio


Martinez dum lia prelego

Martinez kaj Mario Liva kun SOMSI-reprezentantoj

Krom en la sidejo fare de katedranoj, la Grupo organizis kursojn ankaŭ ĉe:
- la Klubo "Valussi", zorge de Serena De Sanctis (1982);
- la Mezgrada lernejo "Egidio Feruglio" de Feletto Umberto, zorge de prof.ino Andreina Della Savia. Komenco: la 10an de marto 1986 kun la partopreno de 20 gelernantoj;
- la Instituto "Bearzi", gvidita de Manuel (Emanuelo, nda) Rovere;
- la Universitato de la Tria aĝo en Sankta Vito de Taljamento, zorge de Manuel Rovere, finiĝita la 18an de majo 1988. Je la malfermo de la kurso ĉeestis s.rino Sandra Carniel, skabeno pri Kulturaj Aferoj de la Komunumo de Sankta Vito;
- la Universitato de la Tria aĝo en Cividale del Friuli, zorge de prof. Nikolao Delli Santi (1990 - 1991);
- la Universitato de la Tria aĝo en Udino, zorge de Elizabeta Cordovado;
- la Kultura Asocio "Amici del salotto" (Salona geamikoj) de Udino, zorge de Jakobeto Martinez (2008);
- la Kultura Asocio SHEVET[195], zorge de Jakobeto Martinez (2009).

El la Grupaj aktivecoj, oni citas la jenajn:
- la prelego pri Esperanto en la Mezgrada Lernejo "Ellero", zorge de Daniela Di Montegnacco kaj Manna Crespan (23 oktobro 1985);
- la dissendoj en "Radio Effe", de 1986, zorge de Daniela Di Montegnacco, Elizabeta Cordovado kaj aliaj grupanoj;
- la kanzonkompono "Paco jes, milito ne", muziko de Rino Chinese sur vortoj de Serena De Sanctis, Elizabeta Cordovado kaj Renzo Marcuzzi. La kanzono estis plenumita ankaŭ la 19an de junio 1983 ĉe la G.E.A. (Avenuo XX Septembro, eksVilao Serena) okaze de renkontiĝoj Udino kaj Goricio. La teksto de la kanzono estas pli antaŭe;
- la prelegoj pri "Malfermu la fenestrojn al la mondo", zorge de Elizabeta Cordovado, Daniela Di Montegnacco kaj Manuel Rovere (marto - aprilo 1987);
- la ĉeesto, de 1987, en la ĉiujara Foiro "Hobio, Sporto kaj Libera Tempo" ĉe la Foira Kvartarlo en Torreano de Martignacco, pere de stando dediĉita al Esperanto;

Panelo dediĉita al Esperanto

Raffaella Martinez anataŭ sia panelo (1999)

Noto 195 SHEVET: hebrea vorto, kun la signifo de "grupo da anĝeloj", kiuj batalas por la bono. Precizigo de Sonia Albrizio de la SHEVET.

- la aranĝo de benketo en la urbocentro por disvastigi Esperanton;

Martinez dum benketo por disvastigi Esperanton

- la partopreno en urbaj manifestacioj, kiel “Udino biciklas”;

“Udino biciklas” de 1991.
Raffaella Martinez stiras Marko Crespan

- la ĉeesto de grupanoj en Naciaj kaj Universalaj Kongresoj;
- la ĉiujaraj festaĵoj pri la datreveno de la grupfondaĵo, kun la esperanta Sankta Meso en urbaj preĝejoj;
- la vesperaj projekcioj de diapozitivoj, zorge de Anita Altherr de la T.E.A. kaj per Esperantaj eksplikoj;
- la multenombraj prelegoj en la Kunvenejo de la Fervojista Postlaboro, kie prelegis ankaŭ:
  . Nilaŝ Balaĵ el Kapodistrio pri “Verkistoj de originalaj verkoj en Esperanto” (12 marto 1984);
  . Viktorio Malaroda el Monfalkone pri “Miaj 25 jaroj de esperantista vivo” (2 aprilo 1984);
  . Sera Genovese[196] de Goricio pri la inaŭguro de la Internacia Scienca Akademio de San Marino (16 aprilo 1984);
  . prof. Ĝiordano Formizzi pri “Kia lingvo por Eŭropo?” (25 majo 1984);
  .Tazio Carlevaro de Bellinzona pri “Kio estas la psikoterapio?” kaj Pierluizo Marelli de Milano pri “Esperantologio” (25 februaro 1985). D.ro Carlevaro ilustris kelkajn vidpunktojn pri la moderna psikoterapio kaj Pierluizo Marelli[197] prezentis lian prelego-serĉadon pri esperantologio;


La dediĉo al la grupo de d.ro Tazio Carlevaro kaj de Pierluizo Marelli

Noto 196 Serafina (Sera) Genovese, esperantistino de 1977. Ŝi komencis sian aktivecon ĉe la G.E.A.. Ŝi estis komitatino de la 56a Nacia E.-kongreso en Grado (1985) kaj kunlaboris kun la Internacia Kultura Servo de Zagrebo por kunordigi la esperantan aktivecon en Alp-Adrio. Ŝi estis regiona I.E.F.-delegito por Friulo-Julia Venetio kaj U.E.A.-delegito.

Noto 197 Pierluizo Marelli (Milano, 12 aprilo 1929 - Trezzano sul Naviglio, 16 decembro 1986), Industria Diplomito. Li eksciis pri Esperanto ne ankoraŭ 20jara kaj en 1963 li fondis la “Itala E.-Revuo”-n. En sia testamento li fiksis ke ĉiuj siaj havaĵoj servu por starigi fonduson (la “Fonduso Marelli”) asignota subvencii la partopreno de gejunuloj en la U.K. de Esperanto.

- la prelegoj faritaj de Jakobeto Martinez okaze de la renkontiĝoj organizitaj de la Klubo UNESKO de Udino, en la kadro de la "Listo de la internaciaj tagoj" atribuitaj de la Unuiĝintaj Nacioj:
  . Internacia tago de la Poezio (palaco Florio, Universitato de Udino, 21 marto 2008). Je la konkludo de lia prelego, Martinez recitis pecon, kaj esperante kaj itale, el lia neeldonita opereto;
  . Internacia Tago de la Patrina Lingvo (Unuigita Klubo de Armeo, 2 marto 2009). Dum lia prelego Martinez definis Esperanton kiel "la idiomo de ĉiuj kaj de neniu, kiu povos esti utiligota por protekti la patrinajn lingvojn";
  . Internacia Tago de la Patrina Lingvo (palaco Florio, Universitato de Udino, 19 februaro 2010). Dum lia prelego Martinez diris ke "la uzado de komuna lingvo estas absolute necesa tiel ke iu, transpasinte la landlimojn, trovu komunan lingvan kodon, kiu lin informu kaj gvidu al ĉiu cirkonstanco, tiel kiel ekzistas komunan trafiksignalaron, kiu igas sekura la gvidon de veturiloj;

- la prelegoj farita ĉiam de la skribanto en:
  . Bolonjo la 24an de oktobro 2013 en la sidejo de la Universitato Primo Levi (strato Azzogardino n.ro 20/b), en la kadro de la X eldono de la Internacia Festo pri la Historio. La prelego. organizita de la Bolonja E.-Grupo "Aĥilo Tellini 1912", temis pri: "La influo de Aĥilo Tellini scienculo kaj esperantisto al la bolonja kulturo dum la unuaj jardekoj de la Naŭdekjarcenta".
  Dum lia prelego la skribanto, per la helpo de diversaj diafanaĵoj enhavante fotojn kaj dokumentoj, skizis la vivon de Aĥilo Tellini, dum Ivan Orsini de la Bolonja E.-Grupo, priparolis pri la rilato estita inter Tellini kaj la urbo Bolonjo dum la restado de la scinculo en la urbo de la Du Turoj;

La afiŝo de la prelego

Ivan Orsini kaj Jakobeto Martinez

  . Udino la 22an de novembro 2016, en palaco Mantica (Mantjka, Strato Manin n.ro 18), sidejo de la Friula Filogia Societo. En la kadro de la aktivecoj antaŭenpuŝitaj de la Regiona Konsilio de Friulo-Julia Venetio por memorigi la 650an datrevenon de la proklamado de la Konstitucioj de la Friula Patrujo, la 11an de novembro 2016, kun la kunordigo de la Friula Filologia Societo, okazis serio de renkontiĝoj pri "Identeco kaj aŭtonomeco. Debato pri Friulo de hieraŭ kaj de hodiaŭ". Ĉisupre por memorigi ankaŭ la datrevenojn de gravuloj, kiuj multe markis la konstruon de la Friula identeco. El tiuj eminentuloj certe estas prof. Aĥilo Tellini, naskiĝità en Udino ĝuste antaŭ 150 jaroj.
  Por la renkontiĝo al Li dediĉita, pri "Aĥilo Tellini. Friulaj radikoj kaj internacia vido", estis invititaj partopreni, kiel prelegantoj, d.ro Donato Toffoli, kiu parolis pri "Aĥilo Tellini. La frukto de libero", kaj la skribanto pri "Aĥilo Tellini kaj Esperanto".
  La skribanto pritraktis sian temon parolante pri la lastaj 38 jaroj de Tellini, de kiam la profesoro alproksimiĝis al Esperanto, tio estas de 1901. Dum la parolado, estis projekciitaj dokumentoj kaj verkoj de Tellini, kiuj permesis al ĉeestantoj koni plibone la personeco de tiu gravulo, kiu multe klopodis pri la gardo de la ladina lingvo kaj de la "Malgranda Patrujo".



La afiŝo de la prelego ital- kaj friullingve

PACO JES, MILITO NE

1. Estas filoj ni de l' Tero, gravas por ni la espero:
   esprimiĝu per ĉi kanto vivoĝoj' de l' Esperanto.

2. Ofte estas miskompreno, kontraŭ paco la veneno;
   pretas ja medikamento: ĝi nomiĝas "Esperanto".

(Itala)	Pace si, guerra no
(Angla)	Yes to peace, no to war
(Ĉina)	Ĉu he pin, pujò zan zen
(Germana)	Frieden ja, Kriege nein.

3. Paco jes sed kun justeco, en liber' kaj egaleco,
   sen tirana subpremanto, kun la lingvo Esperanto.

4. Porĉiame Sud' kaj Nordo povus vivi en konkordo,
   sed l' estrar' politikanta estas kontraŭ Esperanto.

(Hispana)	La paz si, guerra no
(Japana)	Mevà sansei, sansò hantai
(Franca)	Oui la paix, pas de guerre
(Rusa)	Da mir, vòinà njet.

5. Per la forto de la penso senkatena iĝas menso;
   flugas kiel milda vento l' ideal' de l' Esperanto.

6. Por la paco de l' homaro ni batalas kontraŭ baro;
   nian celon defendante ni parolas esperante.

(Itala)	Amarsi si
(angla)	Loving yes
(Ĉina)	Ĉu ai ĉin
(Germana)	Lieben ja
(Hispana)	Amarsi si
(Japana)	Haio sansai
(Franca)	S'aimer oui
(Rusa)	Jubit da.
(Esperanto)	PACO JES, MILITO NE, PACO JES, MILITO NE!


PACO JES, MILITO NE

1. Estas filoj ni de l'Tero, gravas por ni la espero;
esprimiĝu por ĉi kanto vivoĝoj' de l'esperanto.
Ofte estas miskompreno, kontraŭ paco la veneno;
pretas ja medikamento: ĝi nomiĝas "Esperanto".

(Itala): Pace si, guerra no (Paĉe si, ĝu...a no)
(Angla): Yes to peace, no to war (Jes tu pis, noŭ tu vor)
(Ĉina): 愛和平, 不要戰 (Jaŭ hepin, bujaŭ zanzen)
(Germana): Frieden ja, kriege nein. (Friden ja, kriĝe najn)

2. Paco jes, sed kun justeco, en liber' kaj egaleco,
sen tirana subpremanto, kun la lingvo Esperanto.
Porĉiame sud' kaj nordo povus vivi en konkordo,
sed l'estrar' politikanta estas kontraŭ Esperanto.

(Hispana): La paz si, guerra no (La paz si, ĝuera no)
(Japana): へいわ さんせい, せんそう はんたい (Heĵŭa sansej, senso hantaj)
(Franca): Oui la paix, pas de guerre (Ui la pe, pa de ger)
(Rusa): Да мир, нет войне (Miru da, vojne net)

3. Per la forto de la penso senkatena iĝas menso,
flugas kiel milda vento l'ideal' de l'Esperanto.
For la paco de l'homaro ni batalas kontraŭ baro:
nian celon defendante ni parolas esperante.

